

世译《诗经》

La libro de poezio en Esperanto

elĉinigis Vejdo

Bitigita de Elerno

Dec. 2022

目录 Enhavo

译者语		1
Vortoj de tradukinto		2
国 风 Parto de kantoj		3
周 南 Kantoj kolektitaj en la suda parto de Zhou-dinastio		4
关雎 Koturnoj		5
葛覃 Reiro al hejmvilaĝo		6
卷耳 Sopire al la edzo		7
樛木 Kurba arbo		7
蟋斯 Akridoj		8
桃夭 Persikfloroj pompas		9
兔置 Lepor-kaptaj retoj		9
芣苢 Kolektado de plantagaj semoj		10
汉广 Larĝas Han-rivero		10
汝坟 Sur la digo rivera		11
麟之趾 La hufoj de unukornulo		12
召 南 Kantoj kolektitaj en la suda parto de Shao-regno		13
鹊巢 Nesto de pigo		14
采芣 Kolektado de abrotanoj		14
草虫 Griloj		15
采蘋 Kolektado de absintoj		15
甘棠 Sub pirarbo		16
行露 Roso sur vojo		16
羔羊 Ŝafida peltaĵo		17
殷其雷 Eksonas tondro		18
標有梅 Prunoj falas		18
小星 Steletoj		19
江有汜 Branĉe fluas la rivero		19
野有死麕 Amo de ĉasisto		20
何彼禕矣 Nupto de nobela filino		20
驺虞 Ĉasisto		21
邶 风 Kantoj kolektitaj en Bei-regno de Zhou-dinastio		22
柏舟 Kiel cipresa boato		23
绿衣 Mia verda robo		24
燕燕 Hirundoj		24

日月	Suno kaj luno	25
终风	Furioza vento	26
击鼓	Tamburado	27
凯风	Vento el la sudo	28
雄雉	Fazano	28
匏有苦叶	Amaras karabasfolioj	29
谷风	Vento al la valo	30
式微	Vesperigō	31
旄丘	Plendoj de rifuĝantoj	32
简兮	Soldat-dancisto	32
泉水	Fonto	33
北门	Norda pordo	34
北风	Norda vento	35
静女	Linda junulino	35
新台	Nova turo	36
二子乘舟	Du filoj en boato	36
邶 风	Kantoj kolektitaj en Yong-regno de Zhou-dinastio	38
柏舟	Cipresa boato	39
墙有茨	Veproj sur la muro	39
君子偕老	Kunvivi ĝis la vivfino	40
桑中	Rendevuo sub morusarbo	41
鸛之奔奔	Koturnoj flugas	41
定之方中	Konstrui laŭ stelaj pozicioj	42
蟋蟀	La ĉielarko	43
相鼠	Rato	43
干旄	Flagoj	44
载驰	La patriota Damo Mu de Xu-regno	44
卫 风	Kantoj kolektitaj en Wei-regno de Zhou-dinastio	46
淇奥	Rafinita duko	47
考槃	Ligna kabano en la monto	48
硕人	Novedzino de Duko Zhuang	48
氓	Malfidela viro	49
竹竿	Bambua stango	51
芄兰	Senscia bubo	52
河广	Rivero vastas	52
伯兮	Mia edzo	53

有狐	Vulpo	53
木瓜	Cidonio	54
王 风	Kantoj kolektitaj ĉirkaŭ la ĉefurbo de Zhou-dinaastio	55
黍离	En ruinigita ĉefurbo	56
君子于役	Edzo en servuto	56
君子阳阳	Mia amata	57
扬之水	Malforta garnizono	57
中谷有蓷	Forlasita edzino	58
兔爰	Libera leporo	59
葛藟	Juna rifuĝanto	60
采葛	Unu tago tro longas	60
大车	Ĉaro	61
丘中有麻	Kanabo kreskas sur la duno	61
郑 风	Kantoj kolektitaj en Zheng-regno de Zhou-dinastio	63
缁衣	Nigra kostumo	64
将仲子	Al mia amato	64
叔于田	Kapabla ĉasisto	65
大叔于田	kurĉasado	65
清人	Armeo el subprefektujo Qing	66
羔裘	Ŝafpelta palto	67
遵大路	Sur la vojo	68
女曰鸡鸣	Je kokerikado	68
有女同车	Veturo kun belulino	69
山有扶苏	Lamentado	69
蓀兮	Falantaj folioj	70
狡童	Belaspekta junulo	70
褰裳	Levu rob-baskon!	70
丰	Pentado	71
东门之墀	Terspaco ebena ĉe l' Oriento	72
风雨	Vento kaj pluvo	72
子衿	Al klerulo	73
扬之水	Akvo en la malprofunda rojo	73
出其东门	Ekster l' orienta urba pordo	74
野有蔓草	Sarmentoj rampas	74
溱洧	Rendevuo ĉe riverbordo	75
齐 风	Kantoj kolektitaj en Qi-regno de	76

Zhou-dinastio	
鸡鸣 Kokerikado	77
还 Laŭdoj inter du ĉasistoj	77
著 Novedzo	78
东方之日 L' eosta suno	78
东方未明 Tuj antaŭ tagiĝo	79
南山 Suda monto	79
甫田 Sopire al la filo	80
卢令 Ĉashundo kaj ĉasisto	81
敝笱 Truhava fiŝkapta korbo	81
载驱 Ĉarveturo	82
猗嗟 Juna arkpafisto	82
魏 风 Kantoj kolektitaj en Vej-regno de Zhou-dinastio	84
葛屨 Pajl-sandaloj	85
汾沮洳 Ĉe riverbordo	85
园有桃 Persikoj en ĝardeno	86
陟岵 Sopirema soldato	87
十亩之间 Kolektantoj de morusfolioj	87
伐檀 Kanto de arbohakistoj	88
硕鼠 Kampmuso	89
唐 风 Kantoj kolektitaj en Tang-regno de Zhou-dinastio	90
蟋蟀 Griloj	91
山有枢 Kial ne?	91
扬之水 Nia princo	92
椒聊 Pipraj semoj	93
绸缪 Nupta kanto	93
杕杜 Sola pirarbo	94
羔裘 Ŝafidfela survesto	95
鸛羽 Plendo de kampuloj	95
无衣 Ĉu vestoj mankas?	96
有杕之杜 Pirarbo sola staras	97
葛生 Elegio	97
采芣 Onidiro	98
秦 风 Kantoj kolektitaj en Tang-regno de Zhou-dinastio	100
车邻 Kaleŝo kuras	101

驷驥	Ĉasado de Duko	101
小戎	Militĉaro	102
蒹葭	Kie ŝi estas?	103
终南	La Suda Monto	104
黄鸟	Orioloj	104
晨风	Sopiremo	105
无衣	Militirado	106
渭阳	Adiaŭado	107
权輿	Pli bona pasinteco	107
陈 风	Kantoj kolektitaj en Chen-regno de Zhou-dinastio	108
宛丘	Sorĉ-dancistino	109
东门之枌	Dancantaj gejunuloj	109
衡门	Kontenteco	110
东门之池	Al teksistino	110
东门之杨	Rendevuo	111
墓门	Kondamnita malbonulo	111
防有鹊巢	Ne kredu!	112
月出	La lunleviĝo	112
株林	Irado al la arbaro	113
泽陂	Ĉe lotusa lageto	113
桼 风	Kantoj kolektitaj de Gui-regno de Zhou-dinastio	115
羔裘	Ŝafidfela robo	116
素冠	Blanka ĉapo	116
隰有萇楚	Senkonscia arbo	117
匪风	Nostalgio	117
曹 风	Kantoj kolektitaj en Cao-regno de Zhou-dinastio	119
蜉蝣	Efemero	120
候人	Povraj intendantoj	120
鸛鳴	La kukolo	121
下泉	Subtera fonto	122
邶 风	Kantoj kolektitaj en Bin-regno de Zhou-dinastio	123
七月	La vivo de kampuloj	124
鸛鳴	Mava strigo	126
东山	Reveno al la orienta monto	127
破斧	Kun breĉita hakilo	129

伐柯	Hakil-tenilo	129
九罭	Fiŝ-reto	130
狼跋	Afabla princo	130
小雅	Parto de odoj	132
鹿鸣	Regalo al gastoj	133
四牡	Kvar stalonoj	133
皇皇者华	Floroj en pompo	134
常棣	Floroj de prunarbo	135
伐木	Amikeco kaj parenceco	136
天保	La Ĉielo benas	138
采薇	Hejmveo	139
出车	Triumfo el militiro	140
杕杜	Sola pirujo	142
鱼丽	Fiŝoj kaj vino	143
南有嘉鱼	Bonaj fiŝoj en la sudo	144
南山有台	Longviveco	144
蓼萧	Abrotanoj	145
湛露	Densa roso	146
彤弓	Ruĝa pafarko	146
菁菁者莪	Densaj abrotanoj	148
六月	En la sesa lunmonato	148
采芑	Laŭdo al generalo Fang	150
车攻	Ĉasado	151
吉日	Bonaŭgura tago	153
鸿雁	Damninda servuto	153
庭燎	Matena aŭdienco	154
沔水	Rivero ŝvelas	155
鹤鸣	Gruoj krias	155
祈父	Demande al milita ministro	156
白驹	Blanka poneo	157
黄鸟	Oriolo	158
我行其野	Forlasita edzino	158
斯干	Finkonstruado de nova palaco	159
无羊	Kanto de paŝtisto	161
节南山	Al kortegano Yin	162
正月	Lamentoj	164
十月之交	En la deka monato	167

雨无正	Malfrua pluvo	169
小旻	Plendo de konsilisto	171
小宛	Malgranda birdo	172
小弁	Plendo de ekzilito	173
巧言	Malordo kaj onidiro	175
何人斯	Ĉu amiko aŭ malamiko	177
巷伯	Voĉo de eŭnuko	178
谷风	Vento el la valo	180
蓼莪	Sopiro al gepatroj	180
大东	Eosto kaj uesto	181
四月	Lamentado de ekzilito	183
北山	Maljusteco	184
无将大车	Ne ĝenu vin mem	185
小明	Hejmsopiro	186
鼓钟	Sonoriloj kaj tamburoj	188
楚茨	Kulta ceremonio	188
信南山	Kultado piede de la Suda Monto	191
甫田	Riĉrikolto	192
大田	Kamplaboro	193
瞻彼洛矣	Ĉe rivero Luo	194
裳裳者华	Nobla lordo	195
桑扈	Tosta kanto	196
鸳鸯	Ambirdoj	196
頍弁	La palaca bankedo	197
车輶	Survoje al novedzina hejmo	198
青蝇	Verdaj muŝoj	199
宾之初筵	Orgio	200
鱼藻	Fiŝo inter akvoherboj	202
采芣	Aŭdienco de la regnestro	203
角弓	Admonoj	204
菀柳	Maljusta tirano	205
都人士	Homo de l' ĉefurb' malnova	206
采芣	Atendo al lia reveno	207
黍苗	Reveno post konstruado	207
隰桑	Morusarbo	208
白华	Blankaj floroj	209
绵蛮	Malfacila vojiro	210

瓠叶	Regalo en la hejmo	211
渐渐之石	Ekspedicio eosten	212
苕之华	Floroj de begonio	212
何草不黄	Peza servuto	213
大雅	Parto de epopeoj	215
文王	Regnestro Wen	216
大明	Tri regnestroj de Zhou-dinastio	217
緜	Migrado kaj fiksloĝado	219
棫朴	Reĝo Wen kaj liaj talentuloj	221
旱麓	Benoj en kultado	222
思齐	Bonvirtoj daŭras	223
皇矣	Leviĝo de Zhou-regno	224
灵台	Mirinda parko	226
下武	Reĝo Wu	227
文王有声	Reĝoj Wen kaj Wu	228
生民	Hou Ji, la Lordo de Greno	230
行苇	Reĝa festeno	232
既醉	Ebriiĝo en drinkado	233
鳧鷖	Spiritoj de prapatroj	234
假乐	Pri Reĝo Cheng	235
公刘	Duko Liu	236
洞酌	Ĉerpi riverakvon el la foro	238
卷阿	Talentuloj bezonatas	239
民劳	Plebanoj severe subpremataj	241
板	Kondamnado	242
荡	Averto al Regnestro Li	244
抑	Admonoj de Duko Wu	246
桑柔	Riproĉado al Reĝo Li	250
云汉	Sekego	253
崧高	Pri Grafo Shen	256
烝民	Pri Ĉefministro Shan Fu	258
韩奕	Talenta Markizo Han	260
江汉	Brava Duko Mu	262
常武	Ekspedicio kontraŭ Regno Xu	264
瞻卬	Plendoj kontraŭ Reĝo You	265
召旻	Sentaŭga Reĝo You	267
颂	Parto de himnoj	269

周 颂	Himnoj de Zhou	270
清庙	La kvieta templo	271
维天之命	Reĝo Wen sur la ĉielo	271
维清	Statuto de Reĝo Wen	271
烈文	Adresado de Reĝo Cheng ĉe surtroniĝo	272
天作	Monto Qi	272
昊天有成命	Pri Reĝo Cheng	273
我将	Kultado de Reĝo Wu	273
时迈	Kultado al la Ĉielo far Reĝo Wu	273
执竞	Prilaŭdo al Reĝoj Cheng kaj Kang	274
思文	Kultado al prapatro Hou Ji	275
臣工	Preta por kamplaboro	275
噫嘻	Preĝo de Reĝo Kang	276
振鹭	Al gasto ĉe kultado	276
丰年	Riĉa rikolto	276
有瞽	Blindaj Muzikistoj	277
潜	Oferado per fiŝoj	277
雍	Kultado al Reĝo Wen	277
载见	Kultado ĉe surtroniĝo	278
有客	Gasto ĉe kultado	279
武	Laŭdo al Reĝo Wu	279
闵予小子	Elegio pri Reĝo Wu	279
访落	Surtroniĝo de Reĝo Cheng	280
敬之	Averto al si mem	280
小毖	Memkritiko	281
载芟	Kulturado	281
良耜	Kamplaboroj	282
丝衣	Inspekto al festeno post kultado	283
酌	La reĝo lerta en milito	283
桓	La brava Reĝo Wu	284
赉	La sagaca Reĝo Wen	284
般	Kultado dum ĉasado	285
鲁 颂	Himnoj de Lu	286
駟	Ĉevaloj	287
有駟	La festeno al siaj oficialuloj	288
泮水	Apudlaga palaco	289
閟宫	La solena templo	291

商 颂	Himnoj de Shang		295
那	Himno pri Reĝo Tang		296
烈祖	Al prapatroj		297
玄鸟	La dia hirundo		297
长发	Leviĝo de Shang		298
殷武	Venko super tribo Chu		300

译者语

《诗经》是中国第一部古代诗歌总汇，书中收集了西周初年至春秋中叶（前十一世纪至前六世纪）的诗歌，距今已有三千多年历史。它由《国风》、《雅》（《小雅》和《大雅》）和《颂》三个部分组成。《国风》部分是周代各地流传于民间的民歌民谣，《雅》是周人正声的雅乐，《颂》是周王庭和贵族宗庙祭祀的乐歌。《国风》大都淳朴自然，反映了古代人民各方面的生活、劳动情景、思想感情和喜怒哀乐。《小雅》主要用于贵族之间交流，反映贵族奢靡的生活，其中也有对贵族嘲讽和批评的诗篇。《大雅》记载史实、反映统治者的生活。《颂》主要是赞美王室祖先的丰功伟绩，引发后人对祖先的崇拜。《诗经》是我国古代诗歌辉煌的开端，它对中国后世诗歌，以至整个古代文学的发展都有着极为巨大的影响。

《诗经》产生于先秦时期，它的文字与现代文字间的差异巨大，时间久远，各家对它的理解和诠释五花八门，注释的版本汗牛充栋。对于译者来讲，要在这浩如烟海的参考材料中找出译者自认为比较可靠的的诠释，那的确困难重重。在翻译的过程中，译者一般会参考三至五种材料予以取舍，其中一种是许渊冲先生的英译《诗经》，借助这些参考材料，译者可以更深入地理解原文，如诗歌产生的背景、诗歌的表现手法、诗歌所采用的艺术形式等等。

在世界语的表现形式上，译者重在意境上的忠实再现，而不追求原诗字面意思和诗体结构上的对等。译者参考了国外 Kalocsay 和我国世界语专家徐声越前辈所译的十来首《诗经》，这些译诗基本上都不是按照字面意思来处理的，而且在世界语诗歌形式的表达上，也没有完全按照原诗的韵式来安排韵脚。在这个集子里的译诗沿袭了前辈们的处理方法，但在音节数上作了较灵活的处理，以意思表达清楚为前提，不拘泥于多一两个音步；韵脚亦没有按照原诗的韵脚安排，显得更随意一些。此外，在每一个标题下面添加了一两句有关本诗题旨的说明，使读者更易明白这首诗的内容，不知道这种做法是否有画蛇添足之嫌。

世译古诗本是一件不讨好的事情，译出的诗文常常饱受诟病，要么是因为译者与读者对原诗的理解存在差异，要么是因为世界语诗词格律的要求而令译者顾此失彼在表达上发生失误，要么是译者世界语表达手段的欠缺。尽管如此，古诗的翻译仍在不断继续，因为这些中国文化中的精髓需要努力介绍到国外，让外国人尽可能多地了解中国的文化，同时也为世界语的后继者们开辟出一条路来，前仆后继地去讲好中国的故事。译者就是属于明知前路困难重重，也要砥砺前行的那类人。译者自知个人能力与古文化方面的造诣不够，仍和盘托出这份有待改进并使之日臻完善的译品，希望得到行家和有识之士的点拨和指正。

译者

Vejdo

联系方式: vejdo@163.com

Vortoj de la tradukinto

Libro de poezio estas la unua kolekto de la ĉinaj antikvaj poemoj, aperintaj antaŭ pli ol tri mil jaroj. Ĝi entenas versojn kolektitajn dum la tempdaŭro de la komencaj jaroj de la Okcidenta Zhou-dinastio ĝis la mezo de la epoko de Printempo kaj Aŭtuno (de la dekunua jarcento a. K. ĝis la sesa jarcento a. K.). La libro konsistas el tri partoj: kantoj, odoj (inkluzive epopeojn) kaj himnoj. Tiuj kant-versoj cirkulis inter popolanoj de tiamaj feŭdregnoj de Zhou-dinastio. Tiuj kantoj kaj kanzonoj ĉefe priskribas la diversflankajn vivscenojn, laborojn, pensojn, ĝojojn kaj malĝojojn de la antikvaj popolanoj; odoj estis ortodoksaj muzikpecoj cirkulantaj inter nobeloj kaj aristokratoj de tiu tempo, prezentantaj la luksan kaj diboĉan vivon, interalie, inkluzivante kelkajn satirajn kaj kritikajn pecojn kontraŭ tiu reganta klastavolo; epopeoj reflektas la historiajn faktojn kaj la vivon de la regantoj; himnoj estis ĉefe panegiroj dediĉitaj al la meritoj de la prareĝoj por veki adoron en posteuloj al la prapatroj. La libro estas la splenda komenco de la ĉina antikva poezio kaj alportas grandan influon al disvolviĝo de la ĉinaj antikvaj poemoj, kaj eĉ al tiu de la ĉina moderna poezio.

Pro tio, ke la libro kreita antaŭ pli ol tri mil jaroj la lingvaĵo de tiuj versoj multe diferencas de la ĉina moderna lingvo, estas malfacile por la nuntempaj legantoj kompreni la sencon de tiuj versoj. Multaj kleruloj de diversaj epokoj publikigis librojn por doni notojn kaj eksplikojn al la versoj de *La libro de Poezio*, por ke la studantoj kaj legantoj de la postaj generacioj povu ekhavi pli bonan komprenon kaj ĝuon dum legado. En tradukado de tiu ĉi libro mi ofte konsultis tiujn referencajn materialojn por faciligi mian tradukadon per jam akirita pli profunda kono pri tiuj versoj en al libro. En Esperantujo Kalocsay kaj Saint Jules Zee, ĉina elstara esperantisto, tradukis kelkajn pecojn de tiuj versoj. Sed bedaŭrinde ili nur tradukis ĉirkaŭ dek poemojn. Mi kompreneble prenis iliajn tradukojn kiel modelojn kaj finfine kompletigis la tutan libron kun 305 poemoj.

Mi penis fidele reprodukti tiujn poemojn en ritmo, rimado, vorto-elektado, stilo k.a. Tamen miaj scioj pri la ĉina antikva lingvo kaj historia medio, en kiu kreiĝis tiuj poemoj, estas limigitaj kaj mi certas, ke miaj versioj neeble estas perfektaj en iuj flankoj. Espereble tiuj poem-tradukoj estos reviziitaj kaj plibonigitaj. Viaj konsiloj, proponoj kaj eĉ kritikoj estas bonvenaj kaj utilaj al mia estonta plibonigado de *La libro de poezio*. Antaŭdankon!

Mia retadreso: vejdo@163.com

la tradukinto

Vejdo

国风

Parto de kantoj

周南

**Kantoj kolektitaj en la suda parto de Zhou-dinastio (en
nuna Shaanxi kaj Henan)**

关雎

关关雎鸠，在河之洲。窈窕淑女，君子好逑。
参差荇菜，左右流之。窈窕淑女，寤寐求之。
求之不得，寤寐思服。悠哉悠哉，辗转反侧。
参差荇菜，左右采之。窈窕淑女，琴瑟友之。
参差荇菜，左右芼之。窈窕淑女，钟鼓乐之。

Koturnoj

Amkanto al la junulino, kiu kolektas akvokresojn.

Kvivit! Kveras koturnoj
sur rivera insulo.
Bela svelta knabino—
amcel' de mi junulo.

Kresojn altajn, malaltajn
plukas ŝi pene tie.
Belan sveltan knabinon
mi prisonĝas manie.

Vana sonĝa vizio
sopirigas min plie.
Amsofia, tranokte
mi maldormas anksie.

Kresojn altajn, malaltajn
pinĉas ŝi jen laŭire.
Belan sveltan knabinon
mi amuzu per-lire.

Kresojn altajn, malaltajn
ŝi forŝiras laŭflue.
Bela svelta knabino—
Tamburludu mi ĝue.

alia versio

Ĉirpantaj Akv-birdoj

Akv-birdoj ĉirpas
sur dun' rivera.
Knabino bela,
vin mi sopiras.

Enakvaj kresoj
sub man-plukado.
Knabino bela,
vin mi prisonĝas.

Sopiro vana
inklinon spronas.
Aspir' persista
ne dormon konas.

Enakvaj kresoj
sub man-plukado.
Knabino bela,
por vi mi liru.

Enakvaj kresoj
sub man-plukado.
Knabino, mi vin
gonge admiru.

葛覃

葛之覃兮，施于中谷，维叶萋萋。黄鸟于飞，集于灌木，其鸣喈喈。
葛之覃兮，施于中谷，维叶莫莫。是刈是濩，为絺为绤，服之无斁。
言告师氏，言告言归。薄污我私，薄浣我衣。害浣害否？归宁父母。

Reiro al hejmvilaĝo

Post laboro servistino petas forpermeson por viziti siajn gepatrojn.

Visterioj kreskas longaj,
rampas trae en montvalo,
kun pompantaj la folioj.
Birdoj flugas jen en aro,
falas sur arbedojn kune,
kantas kun trilada klaro.

Visterioj kreskas longaj,
rampas trae en montvalo,
kun folioj en prospero.
Ili taŭgas al tol-varo
post falĉad' kaj kuirado
kaj ne mankas vest-elfaro.

Kun permes' de l' intendant' mi
reiros al nask-vilaĝo.
Mi purigos per lavado
la vestaĵojn kun domaĝo
kaj aperos bele antaŭ
la gepatroj en grand-aĝo.

卷耳

采采卷耳，不盈顷筐。嗟我怀人，寘彼周行。
陟彼崔嵬，我马虺隤。我姑酌彼金罍，维以不永怀。
陟彼高冈，我马玄黄。我姑酌彼兕觥，维以不永伤。
陟彼砠矣，我马瘠矣。我仆痡矣，云何吁矣。

Sopire al la edzo

La junulino, kiu kolektas ksantiojn, sopiras al sia edzo kaj imagas al si diversajn bildojn pri sia edzo.

Edzino:
“Mi ksantiojn ŝirkolektas,
sed ankoraŭ l' korb' malplenas.
Mi sopiras al la edzo,
ĉe la voj' la korbo ĝemas.”

Edzo:
“Mi suriras l' altan monton,
molas kruroj de l' ĉevalo.
Jen por trankviligi l' koron,
drinkas mi per or-pokalo.

Mi ascendas sur altaĵon,
la ĉeval' sin sentas laca.
Mi per korno-taso drinkas
kaj la koro restas paca.

Mi surgrimpas rokan monton,
l' ekvo stari malfacilas,
kaj l' lake' tuj morbe falos
pro la ĝeno mi suspiras.”

樛木

南有樛木，葛藟累之。乐只君子，福履绥之。
南有樛木，葛藟荒之。乐只君子，福履将之。

南有樛木，葛藟荒之。乐只君子，福履成之。

Kurba arbo

Gratulon al la feliĉulo.

Kurba arbo kreskas sude,
ĝi volvitas per lianoj.
Hom' feliĉa povas doni
al aliaj gaj-balzamojn.

Kurba arbo kreskas sude,
ĝi volvitas per lianoj.
Hom' feliĉa povas sproni
per la konsoligaj manoj.

Kurba arbo kreskas sude,
ĝi volvitas per lianoj.
Feliĉulo povas beni
homojn per beataj banoj.

螽斯

螽斯羽，诜诜兮。宜尔子孙，振振兮。
螽斯羽，薨薨兮。宜尔子孙，绳绳兮。
螽斯羽，揖揖兮。宜尔子孙，蛰蛰兮。

Akridoj

Gratula kanto al tiuj, kiuj havas multajn gefilojn.

Akridoj flugas are
malalte en aero.
Vi havas multajn
gefilojn en prospero.

Akridoj flugas are
kun obtuza zumo.
Gefiloj viaj daŭros
eterne en grand-sumo.

Akridoj flugas are
amase kun pasio.
Gefiloj viaj multas
kaj vivas en legio.

桃夭

桃之夭夭，灼灼其华。之子于归，宜其室家。
桃之夭夭，有蕡其实。之子于归，宜其家室。
桃之夭夭，其叶蓁蓁。之子于归，宜其家人。

Persikfloroj pompas

Gratula kanto al la junulino edziniĝonta.

Persikfloroj ĉie pompas
ruĝe kiel fajra flamo.
Edziniĝas ŝi al viro,
ili vivas en plen-amo.

Persikfloroj ĉie pompas,
grasaj sub la suna varmo.
Edziniĝas ŝi al viro,
ili havos idan svarmon.

Persikfloroj ĉie pompas,
kun folioj en prospero.
Edziniĝas ŝi al viro,
ili vivas sen sufero.

兔置

肃肃兔置，椹之丁丁。赳赳武夫，公侯干城。
肃肃兔置，施于中逵。赳赳武夫，公侯好仇。
肃肃兔置，施于中林。赳赳武夫，公侯腹心。

Lepor-kaptaj retoj

Laŭdoj al la bravulo.

Plantitas firme l' retoj prete,
por ĉasi sonas la tamburoj.
Impone staras la bravuloj—
eskorto bona por feŭduloj.

Plantitas firme l' retoj prete
por kapti ĉe la vojoforko.
Impone gardas la bravuloj—
helpantoj de l' feŭdula zorgo.

Plantitas firme l' retoj prete,

embuskas ili en ĝangalo.
Impone staras la bravuloj—
feŭdulaj pugnoj en batalo.

茅苜

采采茅苜，薄言采之。采采茅苜，薄言有之。
采采茅苜，薄言掇之。采采茅苜，薄言捋之。
采采茅苜，薄言祜之。采采茅苜，薄言禴之。

Kolektado de plantagaj semoj

Kanto kantata de la virinoj, kiuj kolektas Plantag-semojn.

Ni kolektu plantag-semojn
plenkreskantajn en prospero.
Ni kolektu plantag-semojn,
tenu ilin kun prefero.

Ni kolektu plantag-semojn
kaj deŝiru ilin mane.
Ni kolektu plantag-semojn,
kaj ne perdu ilin vane.

Ni kolektu plantag-semojn,
tenu ilin en survesto.
Ni kolektu plantag-semojn,
portu ilin al loĝ-nesto.

汉广

南有乔木，不可休思；汉有游女，不可求思。汉之广矣，不可泳思；江之永矣，不可方思。
翘翘错薪，言刈其楚；之子于归，言秣其马。汉之广矣，不可泳思；江之永矣，不可方思。
翘翘错薪，言刈其蒹；之子于归，言秣其驹。汉之广矣，不可泳思；江之永矣，不可方思。

Larĝas Han-rivero

Kanto pri ĉaso al belulino ĉe rivero kaj pri malespero en malsukceso.

En la sudo kreskas alta arbo,
mi ne povas ĝian ombron ĝui.
Sur rivero vagas belulino,
mi ne povas kun ŝi rendevui.
Larĝas kaj torentas Han-rivero,
ne eblas tranaĝi en leĝero.
Longas kaj rapidas akvofluo,

ne eblas traflosi jen kun ĝuo.

Herboj kaj plantaĵoj kreskas dense,
mi lianojn falĉu el ĝangalo.
Se ŝi vole edziniĝos al mi,
por ŝi mi grasigas la ĉevalon.
Larĝas kaj torentas Han-rivero,
ne eblas tranaĝi en leĝero.
Longas kaj rapidas akvofluo,
ne eblas traflosi jen kun ĝuo.

Herboj kaj plantaĵoj kreskas dense,
la absintojn falĉu mi fervore.
Baldaŭ edziniĝos ŝi jen al mi,
mi tuj min preparas de ĉi-hore.
Larĝas kaj torentas Han-rivero,
ne eblas tranaĝi en leĝero.
Longas kaj rapidas akvofluo,
ne eblas traflosi jen kun ĝuo.

汝坟

遵彼汝坟，伐其条枚。未见君子，惄如调饥。
遵彼汝坟，伐其条肄。既见君子，不我遐弃。
鲋鱼赀尾，王室如毁。虽则如毁，父母孔迯。

Sur la digo rivera

Edzino sopiras al sia edzo en servuto.

Irante sur la digo de l'rivero,
mi hak-kolektas vergojn en ĉagreno.
Ankoraŭ ne vidiĝas mia edzo,
kvazaŭ ja mi malsatus en mateno.

Irante sur la digo de l'rivero,
mi hak-kolektas branĉojn mem en solo.
Finfine mi sukcesas vidi lin nun,
ne lasu forlasita min en foro.

La vosto de bram-fiŝ' skarlate ruĝas,
l' aferoj regnaj ankaŭ preme urĝas.
Eĉ se vin pelas ien la servuto,
ne lasu la gepatrojn al viv-krudo.

麟之趾

麟之趾，振振公子，于嗟麟兮。
麟之定，振振公姓，于嗟麟兮。
麟之角，振振公族，于嗟麟兮。

La hufoj de unukornulo

Laŭdkanto al princido.

Unukornulo ne hufbatas,
samkiel la princido kun honesto.
Aĥ, la laŭdinda besto!

Unukornul' ne frunt-atakas,
samkiel princa nepo sen majesto.
Aĥ, la laŭdinda besto!

Unukornulo ne korn-frapas,
samkiel princaj posteuloj de modesto.
Aĥ, la laŭdinda besto!

召南

**Kantoj kolektitaj en la suda parto de Shao-regno (en nuna
Henan)**

鵲巢

维鵲有巢，维鳩居之。之子于归，百两御之。
维鵲有巢，维鳩方之。之子于归，百两将之。
维鵲有巢，维鳩盈之。之子于归，百两成之。

Nesto de pigo

Kanto pri repudiita edzino, kiu vidas sian nobelan eksedzon edzinigi alian virinon.

Konstruis neston pigo kun pen-pleno
sed turt' ekloĝas en ĝi sen konsent'.
Ŝi edziniĝas en la nupta vesto,
eskortas ŝin kaleŝoj luksaj cent.

Konstruis neston pigo kun pen-pleno,
sed turt' sin trudas kun impertinent'.
Ŝi edziniĝas en la nupta vesto,
forportas ŝin kaleŝoj luksaj cent.

Konstruis neston pigo kun pen-pleno,
sed turto ĝin okupas kun ofend'.
Ŝi edziniĝas en la nupta vesto,
forsendas ŝin kaleŝoj luksaj cent.

采芣

于以采芣？于沼于沚。于以用之？公侯之事。
于以采芣？于涧之中。于以用之？公侯之宫。
被之僮僮，夙夜在公。被之祁祁，薄言还归。

Kolektado de abrotanoj

Kanto pri kolektado de abrotanoj por kulto

Kie mi kolektas abrotanojn?
Sur sablejo apud marĉa tero.
Por kio ni ilin uzos vere?
Por l' altrangula kulto-ofero.

Kie mi kolektas abrotanojn?
En profunda, bela la montvalo.
Por kio ni ilin uzos vere?
Meti ilin al la kult-altaro.

Kun surkorpaj ornamaĵoj orde

mi okupas min pri l' kult' kun peno.
Tintas pompaj juvel-ornaĵoj,
post la ritoj tempas hejmraveno.

草虫

嘒嘒草虫，趯趯阜螽。未见君子，忧心忡忡。亦既见止，亦既覯止，我心则降。
陟彼南山，言采其蕨。未见君子，忧心惓惓。亦既见止，亦既覯止，我心则说。
陟彼南山，言采其薇。未见君子，我心伤悲。亦既见止，亦既覯止，我心则夷。

Griloj

Sopiremo al amato kaj ĝojo post rendezuo kun amato.

Ĉirpadas griloj en herbejo,
akridoj saltas en libero.
Sen vidi vin, ho, mia kara,
mi ĉagreniĝas en sufero.
Se mi vin vidas, mia kara,
kaj nestas en brakumo via,
tristeco senas en korĉelo.

Ascendas mi sur altan monton,
filikfoliojn mi deŝiras.
Sen vidi vin, ho, mia kara,
doloro mian koron ŝiras.
Se mi vin vidas, mia kara,
kaj nestas en brakumo via,
ĝojsento en la koro trilas.

Ascendas mi sur sudan monton,
filikfoliojn mi kolektas.
Sen vidi vin, ho, mia kara,
mian sanon malĝoj' difektas.
Se mi vin vidas, mia kara,
kaj nestas en brakumo via,
ĉion morozan mi neglektas.

采蘋

于以采蘋？南涧之滨。于以采藻？于彼行潦。
于以盛之？维筐及筥。于以湘之？维箒及釜。
于以奠之？宗室牖下。谁其尸之？有齐季女。

Kolektado de absintoj

Por la kulta ceremonio de nobelo, junulinoj kolektas absintojn.

Kie ni absintojn plukas?
Ĉe rojbordo en montvalo.
Kie algojn ni kolektas?
Jen tuj apud la kanalo.

Kiaj ujoj tenas ilin?
Korboj rondaj kaj kvadrataj.
Kie ni kuiras ilin?
En kaldronoj larĝaj, plataj.

Kie stoki ilin bone?
Sub kulteja la fenestro.
Kiu jen prezidos kulton?
Juna lindulin' 'stos l' estro.

甘棠

蔽芾甘棠，勿剪勿伐，召伯所茇。
蔽芾甘棠，勿剪勿败，召伯所憩。
蔽芾甘棠，勿剪勿拜，召伯所说。

Sub pirarbo

Kanto dediĉita al Duko Shao

Pirarbon riĉan je folioj
ne haku, tondu sen raci',
ĉar sub ĝi pace restis li.

Pirarbon riĉan je folioj
ne haku, tondu sen raci',
ĉar sub ĝi ripozetis li.

Pirarbon riĉan je folioj
ne haku, tondu sen raci',
ĉar sub ĝi paŝojn stopis li.

行露

厌浥行露，岂不夙夜，谓行多露。
谁谓雀无角？何以穿我屋？谁谓女无家？何以速我狱？虽速我狱，室家不足！
谁谓鼠无牙？何以穿我墉？谁谓女无家？何以速我讼？虽速我讼，亦不女从！

Roso sur vojo

Junulino rifuzas submetiĝi sub la perforta edziniĝo kaj esprimas sian decidemon.

La vojon humidigas roso plene.
Ĉu mi ne volus treti sur la vojon
malsekigitan jam nun frumatene?

Oni asertas, bird' ne havas bekon.
Kial trabekas ĝi tegmenton vere?
Kiu ja diras, ke vi ne edziĝis?
Kial vi min mem enfermas karcere?
Spite al via abomena celo
mi volus vivi for de vi libere.

Kiu diras, rato ne havas dentojn?
Kial tramordas ĝi la muron ŝtele?
Kiu ja diras, ke vi ne edziĝis?
Kial vi trenas al proces' min cele?
En la proceso eĉ favora al vi
obeas vin mi certe neniele.

羔羊

羔羊之皮，素丝五紵。退食自公，委蛇委蛇。
羔羊之革，素丝五緘。委蛇委蛇，自公退食。
羔羊之缝，素丝五总。委蛇委蛇，退食自公。

Ŝafida peltaĵo

Kanto pri la komforta vivo de feŭda nobelaro.

En ŝafid-pelt' kun densaj haroj
garnita per kvin blankaj strekoj
rehejmen ili por ripozi
trankvile paŝas el kortego.

En ŝafid-pelto altvalora
jen kun kvin blankaj pasamentoj
rehejmen ili por manĝeti
aplombe paŝas kun kontento.

En ŝafid-pelto okulplaĉa
kun kvin blankaj punktoj brilhelaj
rehejmen ili por dieto

marŝas kun rideto fiera.

殷其雷

殷其雷，在南山之阳。何斯违斯，莫敢或遑？振振君子，归哉归哉！
殷其雷，在南山之侧。何斯违斯，莫敢或遑？振振君子，归哉归哉！
殷其雷，在南山之下。何斯违斯，莫或遑处？振振君子，归哉归哉！

Eksonas tondro

Kanto pri la virino, kiu volas, ke ŝia edzo en servuto pli frue revenu el la foro.

Eksonas tondro
super la pint' de l' suda monto.
Kial vi restas en la foro,
sed ne revenas por renkonto?
Mi ja sopiras vin, sinjoro.
Rapide revenu, revenu!

Eksonas tondro
apud la flank' de l' suda monto.
Kial vi estas malproksime
kaj vagas kiel vagabondo?
Mi kore vokas vin intime.
Rapide revenu, revenu!

Eksonas tondro
piede de la suda monto.
Kial vi vivas for de mi,
ho ve, je mia desaponto?
Vi, viro en servut-misi',
rapide revenu, revenu!

標有梅

標有梅，其实七兮。求我庶士，迨其吉兮。
標有梅，其实三兮。求我庶士，迨其今兮。
標有梅，顷筐塈之。求我庶士，迨其谓之。

Prunoj falas

Kanto de la junulino, kiu esperas, ke sinsvatantoj rapide venu.

Jam maturiĝas prunoj,
trion' da ili teren falas.
Se vi min amas kun sincero,

jen nun la bela tago staras.

Jam maturiĝas prunoj,
jam du trionoj teren falas.
Se vi min amas kun honesto,
tuj vi viziton al mi faras.

Jam maturiĝas prunoj,
sur l' arbo ĉiuj prunoj falas.
Se estas vi junul' kuraĝa,
la amon al mi tuj deklaras.

小星

嘒彼小星，三五在东。肃肃宵征，夙夜在公。寔命不同。
嘒彼小星，维参与昴。肃肃宵征，抱衾与裯。寔命不犹。

Steletoj

Kanto de malaltrangaj oficistoj, kiuj plendas pri sia mizera sorto en klopodado.

Tri aŭ kvin steloj flagras alte,
sur orienta la ĉielo.
Ni klopodadas tage-nokte
peneme por ofic-aferoj.
Lamentas ni pri sorto-pelo.

Ni estas etaj steloj sube
de radiantanta la Plejado.
Ni klopodadas tage-nokte
por regna ofic-laborado.
Lamentas mi pri sorto-bato.

江有汜

江有汜，之子归，不我以。不我以，其后也悔。
江有渚，之子归，不我与。不我与，其后也处。
江有沱，之子归，不我过。不我过，其啸也歌。

Branĉe fluas la rivero

Plendkanto de l' forlasita edzino.

Branĉe fluas la rivero,
l' edzo jam revenas hejmen.
Li min tenas en despero,

li min tenas en despero.
Dronos li en pent-sufero.

Sablo-benk' 'stas en rivero,
l' edzo jam revenas hejmen.
Li min vidas sen prefero,
li min vidas sen prefero.
Kaptos lin ĉagren-kruelo.

Rojo branĉas el rivero,
l' edzo jam revenas hejmen.
Li min ĵetas al malhelo,
li min ĵetas al malhelo.
Trafos lin korŝir-mizero.

野有死麕

野有死麕，白茅包之。有女怀春，吉士诱之。
林有朴樕，野有死鹿。白茅纯束，有女如玉。
舒而脱脱兮！无感我帨兮！无使龙也吠！

Amo de ĉasisto

Kanto pri ĉasisto, kiu akiras amon dum ĉasado.

Kapreolon mortan kampe
kovras blanka herb-vualo.
Junulino korinklinas
al ĉasisto sen am-ŝparo.

Li dehakas arbon forte,
kuŝas morta cerv' sur tero.
Ilin ligas per liano,
ŝi pli belas ol jad-helo.

“Venu lante, mia kara,
ne tuŝetu mian veston,
nek veku hundon boj-stara.”

何彼禕矣

何彼禕矣，唐棣之华？曷不肃雝？王姬之车。
何彼禕矣，华如桃李？平王之孙，齐侯之子。
其钓维何？维丝伊缁。齐侯之子，平王之孙。

Nupto de nobela filino

Kanto pri kaleŝ-vico de nobela nupto.

Eleganta kaj ĉarmplena
kiel bela pruna floro,
iras la kaleŝ' nobela
de l' filin' kun digno-gloro.

Elegantaj kaj belplenaj
kiel persikflor' en brizo,
venas nepo de feŭdulo
kaj la filo de markizo.

Kio bone hokas fiŝojn?
Per silk-farita fadeno.
Belaspektas markizido,
lindas nep' kun honorpleno.

驄虞

彼茁者葭，壹发五豝，于嗟乎驄虞！
彼茁者蓬，壹发五豝，于嗟乎驄虞！

Ĉasisto

Kanto pri lerta ĉasisto.

Prospere kreskas fragmitaro.
Kvin aprojn boras unu sago,
kia ĉasist' kun lerta ago!

Abunde kreskas densaj kanoj.
Kvin etajn aprojn trafas sago,
kiel lertas li per pafarko!

邶风

Kantoj kolektitaj en Bei-regno de Zhou-dinastio (en nuna Hebei)

柏舟

泛彼柏舟，亦泛其流。耿耿不寐，如有隐忧。微我无酒，以敖以游。
我心匪鉴，不可以茹。亦有兄弟，不可以据。薄言往愬，逢彼之怒。
我心匪石，不可转也。我心匪席，不可卷也。威仪棣棣，不可选也。
忧心悄悄，愠于群小。觐闵既多，受侮不少。静言思之，寤辟有嫫。
日居月诸，胡迭而微？心之忧矣，如匪澣衣。静言思之，不能奋飞。

Kiel cipresa boato

Plendkanto pri la forlasita virino kiu priploras siajn mizeron kaj splenon.

Kiel cipresa boato,
mi ja flosas sur rivero.
Mi ne povas endormiĝi
pro ĉagreno en korĉelo.
Ne min savas vin' el spleno,
nek vojaĝo kun libero.

Mi ne estas bronz-spegulo,
kiu tenas ĉion klare.
Miaj fratoj ne fidindas,
kvankam ni rilatas kare.
Kiam mi al ili plendas,
ili tondras jen vulgare.

Mia kor' ne estas ŝtono,
nemovebla laŭ bontrovo,
nek dorm-mato obeanta
al kaprica movo-ŝovo.
Memestimon mi ja havas,
ne molaĉa kiel ovo.

Min turmentas kor-ĉagreno,
malbonula kalumnio,
multaj mokoĵ, rikanado
kaj insultoj, ironio.
Kiam mi meditas kalme,
mi anksias pri ĉi ĉio.

Kial iam sun' kaj luno
malheliĝas sen lumgloro?
Dronas mi en trist' korŝira,
kvazaŭ en haladza tolo.

Mi kontemplas en silento:
kial flugi ne al foro?

绿衣

绿兮衣兮，绿衣黄里。心之忧矣，曷维其已？
绿兮衣兮，绿衣黄裳。心之忧矣，曷维其亡？
绿兮丝兮，女所治兮。我思古人，俾无訖兮。
絺兮绌兮，凄其以风。我思古人，实获我心。

Mia verda robo

Je ekvido de sia verda robo farita de sia mortinta edzino, la edzo sopiras al ŝi.

Je ekvid' de l' verda robo
kun subŝtof' kun flavkoloro
mi sopiras al l' edzino
ja senlime en la koro.

Je ekvid' de l' verda robo
super flava silka vesto
naskas triste mi ĉagrenon
la senfinan en kor-nesto.

Verdan robon, silkan veston
vi elfaris, mia kara.
Kiam mi sopiras al vi,
mi min montras mensoklara.

Ĉu kabana, ĉu tolkruda,
vestoj tristan freŝon donas.
Kiam mi sopiras al vi.
mi en kontenteco dronas.

燕燕

燕燕于飞，差池其羽。之子于归，远送于野。瞻望弗及，泣涕如雨。
燕燕于飞，颙之颙之。之子于归，远于将之。瞻望弗及，伫立以泣。
燕燕于飞，下上其音。之子于归，远送于南。瞻望弗及，实劳我心。
仲氏任只，其心塞渊。终温且惠，淑慎其身。先君之思，以勖寡人。

Hirundoj

Edzo adiaŭas edzinon, kiu reiros al sia gepatra hejmo.

Paro da hirundoj flugas
sor kaj suben en libero.

Ŝi reiras al naskhejmo,
mi ŝin ĝisas ĉe kamptero.
Ŝi vanuas en la foro,
mi larmadas kun sufero.

Paro da hirundoj flugas
flirte, flose en aero.
Ŝi reiras al naskhejmo,
mi ŝin ĝisas sen prefero.
Nevideblas ŝi plu jame,
ploras mi per larm-ofero.

Paro da hirundoj flugas
pepante kun voĉ-tenero.
Ŝi reiras al naskhejmo,
mi ŝin ĝisas kun sincero.
Ĉe urbpordo ŝi foriras,
min doloras disiĝ-kvero.

Ŝi bonvirta ino estas
kun honesto kaj fidelo.
Ŝi aferojn traktas takte
kun dolĉ-milda karaktero.
Ŝi per vortoj de la patro
min konsolas sen leĝero.

日月

日居月诸，照临下土。乃如之人兮，逝不古处？胡能有定？宁不我顾。
日居月诸，下土是冒。乃如之人兮，逝不相好。胡能有定？宁不我报。
日居月诸，出自东方。乃如之人兮，德音无良。胡能有定？俾也可忘。
日居月诸，东方自出。父兮母兮，畜我不卒。胡能有定？报我不述。

Suno kaj luno

Virino akuzas sian edzon pri ties forlaso disde ŝi.

La suno kaj la lun' disĵetas
radiojn brilajn al la tero.
Ĉi tiu viro en la hejmo
min traktas en mav-maniero.
Li agas brute kaj kaprice,
forĝegas min jam en mizero.

La suno kaj la lun' prilumas

la tutan teron per brilgloro.
Ĉi tiu viro en la hejmo
min traktas kun malbona koro.
Kondutas li kruele al mi,
reduktas min al kor-doloro.

La suno kaj la lun' leviĝas
konstante el la oriento.
Ĉi tiu viro en la hejmo
nenion diras kun amsento.
Ignoras li min tute flegme,
turmentas mense per ofendo.

La suno kaj la lun' aperas
el l' oriento kun lumbrilo.
Gepatroj miaj karaj, ho ve,
mi restu ĉe vi kun trankvilo.
Li tenas sin perfida al mi,
mi glutas ĉion kun humilo.

终风

终风且暴，顾我则笑。谑浪笑敖，中心是悼。
终风且霾，惠然肯来。莫往莫来，悠悠我思。
终风且曠，不日有曠。寤言不寐，愿言则嚏。
曠曠其阴，虺虺其雷。寤言不寐，愿言则怀。

Furioza vento

Edzino rankoras kontraŭ sia feroca edzo.

Minacas pluv' en forta vento;
li trudas ridon sur vizaĝo
kaj flirtadas obscene kun mi,
mi ĉagreniĝas en malsaĝo.

La vento kirlas polvon trae;
vizitoj liaj raras al mi.
Se ne frekventas ni plejofte,
mi dubas pri li ja min ami.

En grizaj nuboj vento hurlas,
malhelas jen sen suna lumo.
Maldormas mi sur lito splene,
mi tenas lin en pensbrakumo.

Sur malserena la ĉielo
la tondro sonas kun rul-bruo.
Enlite nun mi turniĝadas,
vole, ke amu ni kun ĝuo.

击鼓

击鼓其镗，踊跃用兵。土国城漕，我独南行。
从孙子仲，平陈与宋。不我以归，忧心有忡。
爰居爰处？爰丧其马？于以求之？于林之下。
死生契阔，与子成说。执子之手，与子偕老。
于嗟阔兮，不我活兮。于嗟洵兮，不我信兮。

Tamburado

Soldato, kiu militiras fore kaj ne povas hejmeniri dum longa tempo, sopiras al sia edzino.

Tamburojn oni batas forte,
soldatoj sin ekzercas bole.
Urbmuroj konstruatas urĝe,
senditas mi al sudo sole.

Mi sekvas la generalon Sun,
kaj mi batalas kun kuraĝo.
Reiri mi ne povas longe,
sopiras mi al hejmvilaĝo.

Kie mi loĝas en batalo?
Kie mi perdis la rajdbeston?
Kie mi ĝin priserĉas blinde?
Arbaron preni kiel neston.

Mi ĵuris, ke ni vivu kune,
ĉu en mizero, ĉu suferi.
Mi firme prenas vin je l' mano
ĝis nia haroj blankos vere.

Nun mi lamentas pri disiĝo,
ne vivante jen kun vi kune,
kaj veas pri l' distanco longa
ne plenumante l' vorton nune.

凯风

凯风自南，吹彼棘心。棘心夭夭，母氏劬劳。
凯风自南，吹彼棘薪。母氏圣善，我无令人。
爰有寒泉？在浚之下。有子七人，母氏劳苦。
睨睨黄鸟，载好其音。有子七人，莫慰母心。

Vento el la sudo

Filo prikantas sian panjon pro ties peniga vivo.

Zefiro blovas el la sudo
tra jujuarboj en vegeto.
La arboj verdas kaj fortikas
dank' al la panja zorgo-meto.

Zefiro blovas el la sudo
al arbaj branĉoj en prospero.
Al panj' bonvola kaj bonkora
ni ŝuldas dankon kun sincero.

Fontakvo fluas pike fride
ĉirkaŭ l' piedo de l' urbmuro.
Sep filoj devas ja obei
al ŝia elkora postulo.

La flava birdoj kantas bele
por plaĉi al ni per l' ario.
Sed ni sep filoj ne sukcesas
konsoli ŝin per emocio.

雄雉

雄雉于飞，泄泄其羽。我之怀矣，自诒伊阻。
雄雉于飞，下上其音。展矣君子，实劳我心。
瞻彼日月，悠悠我思。道之云远，曷云能来？
百尔君子，不知德行。不忮不求，何用不臧？

Fazano

Edzino sopiras al sia edzo en la foro.

Fazano flugas en arbaro
svingante sian flugilparon .
Sopiras mi al li en foro,
mi lin ne vidas pro montbaro.

Fazano flugas sur ĉielo
ĉirpante per ario bela.
Ho, mia kara honestul', vin
sopiras mi kun kor' mizera.

Forpasas tagoj fulmrapide,
mi ĉiam tenas vin en koro.
La vojo kuŝas tre tre longa,
kiam revenu vi el foro?

Konduti devas ĉiuj viroj
honeste en dec-maniero.
Sukcesas bonvirtuloj ĉie,
se sen avida karaktero.

匏有苦叶

匏有苦叶，济有深涉。深则厉，浅则揭。
有漚济盈，有鷺雉鸣。济盈不濡轨，雉鸣求其牡。
雍雍鸣雁，旭日始旦。士如归妻，迨冰未泮。
招招舟子，人涉卬否。人涉卬否，罔须我友。

Amaras kalabasfolioj

Junulino atendas sian amaton ĉe riverbordo.

Amaras kalabasfolioj.
Vadeblas akvo de l' rivero:
ĉe profundej', kun vesto iru,
kuspu baskon ĉe l' basa sfero.

En la ŝvelinta riverfluo
anasoj naĝas kun ĝojkrio.
Ĉarradon mian l' akv' atingas,
vokas fazan' por kompanio.

Anseroj gakas harmonie,
matena suno lumas brile.
Se vi min edzinigi volas,
nun vadu al mi sensopire.

Pramisto vokas pasaĝerojn,
atendas ja lin mi prefere
dum oni l' bordon prame lasas.

Lin atendadas mi sincere.

谷风

习习谷风，以阴以雨。黽勉同心，不宜有怒。采葑采菲，无以下体？德音莫违，及尔同死。行道迟迟，中心有违。不远伊迓，薄送我畿。谁谓荼苦？其甘如荠。宴尔新昏，如兄如弟。泾以渭浊，湜湜其沚。宴尔新昏，不我屑以。毋逝我梁，毋发我笱。我躬不阅，遑恤我后！就其深矣，方之舟之。就其浅矣，泳之游之。何有何亡，黽勉求之。凡民有丧，匍匐救之。不我能慙，反以我为讎。既阻我德，贾用不售。昔育恐育鞫，及尔颠覆。既生既育，比予于毒。

我有旨蓄，亦以御冬。宴尔新昏，以我御穷。有洸有溃，既诒我肄。不念昔者，伊余来暨。

Vento el la valo

Edzino forlasita de sia edzo rakontas pri sia malfeliĉo.

Furioza vento blovas kun susuro,
pluvo falas el griznuba la ĉiel'.
Ni kunvivi devus bone harmonie,
vi ne emu koleriĝi al kverel'.
Se eltiri rapojn aŭ rafanojn plene,
ne forgesu la radikojn el la ter'.
Ni memoru la amsenton en inteco,
ni daŭrigu postan vivon kun fidel'.

Elpelite de la dom' mi paŝas lante,
neregebla kun rankoro en la kor'.
Mia voj' ne malproksimas de la domo,
vi nur sendas min ĉe sojlo sen konsol'.
Ĉu laktuko gustas ja amare vere?
Tamen ĝi pli dolĉas ol mia dolor'.
Via nupto donos al vi ravan ĝojon,
ĝuos vi plezuron en intima hor'.

La malpura akvo de la alfluanto
ne influas la klarecon de l' river'.
Ravas vin la novedzino kun koketo,
vi ne plu atentis min en la desper'.
Ne fuŝ-tuŝu miajn ilojn por fiŝado,
nek malfermu la fiŝ-keston kun kruel'.
Ĉar vi ne toleras min kun indulgemo,
mia tagoj postaj daŭros en sufer'.

Kiam la river' profundas pro ŝvelado,
mi transiras ĝin per remo de boat'.

Kiam ĝi malfluse jam malprofundiĝas,
mi do naĝas transe aŭ iras per vad'.
Se en hejmo mankas io laŭbezone,
mi akiri penas ĝin de strat' al strat'.
Se najbaroj trafas vivan malfacilon,
helpi ilin mi tuj iras kun kompat'.

Vi ne plu min amas fakte el la koro,
kaj min traktas malamike sen fidel'.
Vi nigrigas mian virton kaj konduton,
kvazaŭ estus mi postiĉo kun or-hel'.
En inteco, de paniko kaj malriĉo
ni suferis multe kune en sortpel'.
Sed nun nia vivo vere pliboniĝas,
vi rigardas min la vermo de malbel'.

Mi konservas vazon da legompeklaĵoj
por pasigi frostan vintron por manĝ-ĝu'.
Vi kaj l' novedzino dronas en plezuro,
sed ignoras min en spleno de viv-sku'.
Vi kolere muĝis kontraŭ mi feroce,
tamen la mizeron tutan portas mi, ĉu?
Vi neniam pensas pri l' pasinta sento,
nia amo jam finiĝis en detru'.

式微

式微，式微，胡不归？微君之躬，胡为乎泥中？
式微，式微，胡不归？微君之躬，胡为乎泥中？

Vesperigo

Plendkanto de tiuj, kiuj servutas por lordoj.

Tuj venos vesperigo.
kial ne hejmenveno?
Ho, por vi granda lordo
mi ŝvitas en la servutpeno.

Tuj venos vesperigo.
Kial ne hejmenveno?
Por min vivteni, lordo,
en koto penas mi kun ĝemo.

旄丘

旄丘之葛兮，何誕之節兮。叔兮伯兮，何多日也？
何其處也？必有與也！何其久也？必有以也！
狐裘蒙戎，匪車不東。叔兮伯兮，靡所與同。
琐兮尾兮，流離之子。叔兮伯兮，裒如充耳。

Plendoj de rifuĝantoj

Plendoj de rifuĝantoj.

Sur alta monto kreskas grimpaj plantoj
kun longaj la radikoj en la tero.
Ho, karaj onkloj kaj parencoj miaj,
kial ne venas al ni en despero?

Kial vi restas longe sen moviĝo?
Vi havas amikaron apud vi.
Vi ne moviĝas longe laŭ bontrovo,
io retenas vin sen nia sci'.

Paradas peltaj luksaj en pelmelo;
eosten ne la ĉaroj iras rule.
Ho, karaj onkloj kaj parencoj miaj,
kompaton al ni vi ne nutras lule.

Kiel plebanoj agas ni humile,
ni malfacile trovas hejmon vage.
Ho, karaj onkloj kaj parencoj miaj,
Kial do vi ne aŭdas nin malsvage?

簡兮

簡兮簡兮，方將萬舞。日之方中，在前上處。
碩人俣俣，公庭萬舞。有力如虎，執轡如組。
左手執鵠，右手秉翟。赫如渥赭，公言錫爵。
山有榛，隰有苓。云誰之思？西方美人。彼美人兮，西方之人兮。

Soldat-dancisto

Prilaŭdo kaj admiro al bravulo lerta en dancado.

Vi soldato brava en tamburad-sonoj
tuj komencos danci per graciaj pozoj.
Ĉe zenit' la suno ardas en lumgloro,
la unua li ekdancos sen nervozo.

Kun staturo alta kaj fortika korpo
li saltete dancas en kortego bela.
Li fortikas kiel tigro el la monto,
kaj mantenas bridon de ĉeval' libera.

Li jen prenas fluton per maldekstra mano
kaj per dekstra svingas fazanplumojn skue.
Post dancado liaj vangoj brile ruĝas,
lordo donas al li vinon aprez-ĝue.

Sur la monto alta staras avelarboj,
sube kreskas herboj sur humida tero.
Kiun mi sopiras en momento nuna?
La belulon el eosta la kastelo.
Tiu ulo estas vere bela viro
el l' eosto veninta por danc-ofero.

泉水

瑟彼泉水，亦流于淇。有怀于卫，靡日不思。变彼诸姬，聊与之谋。
出宿于泂，饮饯于祢，女子有行，远父母兄弟。问我诸姑，遂及伯姊。
出宿于干，饮饯于言。载脂载輶，还车言迈。遄臻于卫，不瑕有害？
我思肥泉，兹之永叹。思须与漕，我心悠悠。驾言出游，以写我忧。

Fonto

Kanto pri sopiro al la karuloj kaj patrio.

Fontakvo klara lirlu fluas
laŭlonge de la Qi-rivero.
Fore de la patri' mi ĉiam
sopiras al ĝi kun sincero!
Diskutos kun fratinoj do mi
kion mi faru kun prefero.

Mi por reiri loĝos ie
kaj manĝos en alia loko.
Mi edziniĝis for de l' hejmo,
de la gepatra milda voko.
Ĉe l' hejm' babilos mi kun ili
intime kune en dombloko.

Mi ĉe l' reiro restos ie,
kaj manĝos sur la fremda tero.

Pretigos mi la ĉaron bone,
ĝin rapidigos kun espero.
Al la patrio mi veturos
spite al survoja danĝero.

Ekpenso pri la pura fonto
sopiron mian vekas forte.
La penso vagas vaste foren,
de lok' al loko jen malorde.
Per ĉarveturo mi do lasu
la koron senti sin komforte.

北门

出自北门，忧心殷殷。终窶且贫，莫知我艰。已焉哉！天实为之，谓之何哉！
王事适我，政事一埤益我。我入自外，室人交徧谪我。已焉哉！天实为之，谓之何哉！
王事敦我，政事一埤遗我。我入自外，室人交徧摧我。已焉哉！天实为之，谓之何哉！

Norda pordo

Plendaj versoj de eta oficisto, kiu vivas mizere, sed kun peza respondeco.

Mi iras tra la norda pordo,
la koro plenas de ĉagreno.
Mi vivas povre kaj mizere,
kiu min konas per kompreno?
Do lasu!
Laŭ la aranĝo de l' ĉiel' mi
nenion faras eĉ per peno.

La lordo sendas min per tasko,
ofica ŝarĝo sur mi pezas.
revenas hejmen mi lacega,
domanoj skoldi min ne ĉesas.
Do lasu!
Laŭ la aranĝo de l' ĉielo
klopodo al mi ne sukcesas.

La lordo premas min tre urĝe,
la tasko puŝas min al kuro.
Revenas hejmen mi deprima,
min ilin mokas sen mezuro.
Do lasu!
Laŭ la aranĝo de l' ĉiel' mi
akceptas tion sen plezuro.

北风

北风其凉，雨雪其雱。惠而好我，携手同行。其虚其邪？既亟只且！
北风其喈，雨雪其霏。惠而好我，携手同归。其虚其邪？既亟只且！
莫赤匪狐，莫黑匪乌。惠而好我，携手同车。其虚其邪？既亟只且！

Norda vento

Kantoj pri la kruela regado sub la tirano de Wei-regno.

Blovas la norda vent' kun frido,
neĝo falas en pluv-nebulo.
Mi kaj miaj amikoj iras
man-en-mane en vent-ululo.
Ni ne prokrastu dum momento,
jam venas la malbonaŭguro.

Blovas la norda vento forte,
neĝflokaj flirtas en ĉielo.
Mi kaj miaj amikoj trenas
nin man-en-mane en sufero.
Ni ne prokrastu al la hejmo,
jam ekminacas la mizero.

Neniu vulp' ne ruĝas hare,
korvoj ĉiam nigre koloras.
Mi kaj miaj amikoj kune
tra neĝado la vojon boras.
Ni ne prokrastu hejmeniron,
katastrofo al ni ne foras.

静女

静女其姝，俟我于城隅。爱而不见，搔首踟蹰。
静女其娈，贻我彤管。彤管有炜，说怿女美。
自牧归荭，洵美且异。匪女之为美，美人之贻。

Linda Junulino

Kanto pri la rendevuo inter geamantoj.

Altira junulin' teneras,
por rendevuo min invitas.
Ŝi kaŝiĝinte ne aperas,
kaprate ire mi hezitas.

Tenera junulin' altiras,
ŝi muziktubon jen donacas.
La tub' maldika ruĝe brilas,
lindeco ŝia al mi plaĉas.

Ŝi donas herbon ja ameme,
la freŝan, kuriozan vere.
Ne belas la herbeto meme,
sed ĝin prezentas ŝi sincere.

新台

新台有泚，河水弥弥。燕婉之求，籛篠不鲜。
新台有洒，河水浼浼。燕婉之求，籛篠不殄。
鱼网之设，鸿则离之。燕婉之求，得此戚施。

Nova turo

*Satira kanto pri Duko Xuan de Wei-regno, kiu edzinigis la novedzinon de sia filo
kaj konstruigis turon por bonvenigi ŝin (699 a.K.).*

Nova turo impone staras
ĉe ŝvelanta fluo rivera.
Juna edzo ja plaĉas al ŝi,
sed ŝin tenas l' oldul' malbela.

Nova turo alte rigardas
la riverfluon en ondpelo.
Juna edzo ja plaĉas al ŝi,
sed ŝi dronas en nupt-sufero.

Ĵeti la reton por fiŝado,
sed kapti bufon jen rezulte.
Juna edzo ja plaĉas al ŝi,
ŝi hatas l' oldan edzon multe.

二子乘舟

二子乘舟，泛泛其景。愿言思子，中心养养！
二子乘舟，泛泛其逝。愿言思子，不瑕有害！

Du filoj en boato

Kanto pri gepatroj, kiuj maltrankvilas pri siaj du filoj boate veturantaj foren.

Du miaj filoj en boato
rivere flosas en nebulo.
Ekpens' pri ili en veturo
min bakas arde per splen-brulo.

Du miaj filoj en boato
lante glitas laŭ riverfluo.
Ekpens' pri ili ja min pikas:
ĉu ilin trafus ŝip-detruo?

鄆风

Kantoj kolektitaj en Yong-regno de Zhou-dinastio (en la suda parto de nuna Xinxiang, Henan-provinco)

柏舟

泛彼柏舟，在彼中河。髧彼两髦，实维我仪。之死矢靡它。母也天只！不谅人只！
泛彼柏舟，在彼河侧。髧彼两髦，实维我特。之死矢靡慝。母也天只！不谅人只！

Cipresa boato

Junulino, sen libereco memvole edziniĝi, esprimas sian firman amon al sia amato.

Boato el cipreso flosas
en la mezo de la rivero.
La viro kun hartufoj frunte—
amato mia kun brilbelo,
Mi amas lin ĝis mia morto!
Ho, mia panjo, ho, l' ĉielo,
mi amu lin ja kun fidelo.

Boato el cipreso flosas
leĝere ĉe l' rivera bordo.
La viro kun hartufoj frunte—
parulo mia laŭ la sorto.
Mi amas lin ĝis la vivfino!
Ho, mia panjo, ho, l' ĉielo,
mi amu lin ĝis mia morto.

墙有茨

墙有茨，不可埽也。中冓之言，不可道也。所可道也，言之丑也。
墙有茨，不可襄也。中冓之言，不可详也。所可详也，言之长也。
墙有茨，不可束也。中冓之言，不可读也。所可读也，言之辱也。

Veproj sur la muro

Popolkanto en Wei-regno, malkaŝanta la skandalojn de la palaco.

Surmuraj veproj
jen forigeblas malfacile.
L' obscenaj vortoj en palaco
ne liku elen enbabile.
Se oni publike parolus,
la skandalo pikas rapire.

Surmuraj veproj
neeltireblas de radiko.
L' obscenaj vortoj en palaco
ne malkovriĝu en publiko.

Se al aliaj jen eldiri,
fariĝus ĝi venena piko.

Surmuraj veproj
ne kunligeblas firme kune.
L' obscenaj vortoj en palaco
ne metiĝu klare subsune.
Se la skandalo diskoniĝus,
akceptus ili baton pune.

君子偕老

君子偕老，副笄六珈。委委佗佗，如山如河，象服是宜。子之不淑，云如之何？
玼兮玼兮，其之翟也。鬢发如云，不屑髢也；玉之瑱也，象之掄也，扬且之皙也。胡然而天也？胡然而帝也？
嗟兮嗟兮，其之展也。蒙彼绉紵，是继袿也。子之清扬，扬且之颜也。展如之人兮，邦之媛也！

Kunvivi ĝis la vivfino

Temas pri la juna edzino de la maljuna Duko Xuan de Wei-regno. La popolkanto donas sarkasmon al ŝiaj elmontriĝemo kaj hipokriteco.

Por vivi kun la duko ĝis vivfino,
ŝi portas jadpinglojn sur kap' la tuta.
Kondutas ŝi gracie kaj aplombe,
kvazaŭ firma monto, river' mamuta.
paradas ŝi en luksa, bela robo,
ŝi tamen kovas mavon en la koro.
Ankoraŭ ŝi sin duŝas en favoro!

Kiel radie bela, kiel ĉarma!
Sidas sur ŝi vest' brodita kolora.
Hararo ŝia longas nubsimila,
ne al ŝi plaĉas peruko furora.
Tintas orelingoj el bona jado,
staras surkape pingloj el eburo
sur frunto larĝa de la blanka haŭto.
Kiel fein' ŝi paŝas kun plezuro!
Kia diino en sorĉa staturo!

Kiel radie bela, kiel ĉarma!
Sub la vesto el krepo vermiljona
montriĝas ĉemizo el lina tolo—
subvesto blanka la somer-sezona.

Kun fajnaj, belaj trajtoj en aspekto
ŝi havas larĝan frunton en fascino.
Tia ino kia ŝi en la regno
indas, ho, la nomon de belulino!

桑中

爰采唐矣？沫之乡矣。云谁之思？美孟姜矣。期我乎桑中，要我乎上宫，送我乎淇之上矣。
爰采麦矣？沫之北矣。云谁之思？美孟弋矣。期我乎桑中，要我乎上宫，送我乎淇之上矣。
爰采葑矣？沫之东矣。云谁之思？美孟庸矣。期我乎桑中，要我乎上宫，送我乎淇之上矣。

Rendevuo sub morusarbo

Junulo prikantas rendevuojn kun amatino.

Kie kolekti kuskuton?
Tie en kampar' tereno.
Kiun vi sopiras ame?
La knabinon sen ĉagreno.
Ŝi atendas morusarbe,
rendevuos min sen ĝeno,
min forsendos kun amemo.

Kie kolekti tritikojn?
Norde de tiea tero.
Kiun vi sopiras mense?
La knabinon kun tenero.
Ŝi atendas morusarbe,
min renkontos kun sincero,
min forsendos ĉe vespero.

Kie kolekti rafanojn?
Oriente de la monto.
Kiun vi sopiras vere?
La knabinon kun volonto.
Ŝi atendas morusarbe,
vidos min ĉe la renkonto,
min forsendos ĉe la ponto.

鶉之奔奔

鶉之奔奔，鶉之疆疆。人之无良，我以为兄！
鶉之疆疆，鶉之奔奔。人之无良，我以为君！

Koturnoj flugas

Oni sarkasmas la viron, kiu kondutas malvirte.

Koturnoj flugas en duopo,
leĝere pigoj flirtas are.
La viron, kiu ja malvirtas,
fratigas vere mi erare.

Koturnoj flugas en duopo,
leĝere pigoj flirtas are.
La viron, kiu agas mave,
eĉ traktas mi amike, kare.

定之方中

定之方中，作于楚宮。揆之以日，作于楚室。樹之榛栗，椅桐梓漆，爰伐琴瑟。
升彼虛矣，以望楚矣。望楚與堂，景山與京。降觀于桑，卜云其吉，終焉允臧。
靈雨既零，命彼倌人。星言夙駕，說于桑田。匪直也人，秉心塞淵。騾牝三千。

Konstrui laŭ stelaj pozicioj

Kanto laŭdanta pri meritoj de Duko Wen de Wei-regno en konstruado kaj feliĉigo al popolanoj.

Orientiĝas li laŭ steloj sur ĉielo
por konstruigi novan palacon ĉe Chuqiu.
Per suna lumo li mezuras sur la tero,
direktas konstruadon de domegoj luksaj.
Ordonas planti li forstumi ĉirkaŭ l' sfero
per aveluoj, kaŝtanoj kaj cipresoj
por fari citrojn jen kun ties ligna belo.

Ascendas oni al malnova urb-ruino
por pririgardi la palacon novan sube.
Esploras oni l' konstruaĵon de proksimo,
spaliras montoj kaj domego tre impone.
Sur ebenaĵo morusarboj en domino
aŭguras bone la feliĉon de la regno.
Ĝi vere estas deca loko de sublimo.

Ĉi tie pluv' abundas en la primavero.
la Duk' ordonas stiri la kaleŝon frue
al moruskampo en serena la vetero
por bone pririgardi, kiel plantoj kreskas
kaj zorge admoni famulojn kun sincero.

Deziras li ke tri mil ĉevaloj bredatu
kaj brutaro reproduktiĝu en prospero.

蜎蜎

蜎蜎在东，莫之敢指。女子有行，远父母兄弟。
朝隤于西，崇朝其雨。女子有行，远兄弟父母。
乃如之人也，怀昏姻也。大无信也，不知命也！

La ĉielarko

Junulino propradecide serĉas sian edzon, spite al la feŭdisma etiketo.

Ĉielark'aperas oriente,
ĝin neniuj montras kun kuraĝo.
Mi deziras edziniĝi foren,
forlasi gepatrojn en grandaĝo.

Matennuboj pendas okcidente,
pluvo dume falas continue.
Mi deziras edziniĝi foren,
kaj forlasi miajn fratojn frue.

Ŝi ja estas homo kun obstino,
ŝi nur pensas pri memvola amo.
Ŝi atendu venon de la svatistino,
kaj obeu al gepatra nupta plano.

相鼠

相鼠有皮，人而无仪！人而无仪，不死何为？
相鼠有齿，人而无止！人而无止，不死何俟？
相鼠有体，人而无礼！人而无礼，胡不遄死？

Rato

Oni malbenas la regantojn, kiuj trompas popolanojn per hipokritaj ritoj.

Rato havas felon, ĉu ne?
Homo devas agi rite.
Se ritsento mankas al li,
li mortaĉu laŭmerite.

Rato havas dentojn, ĉu ne?
Homo devas digni vere.
Se digneco mankas al li,

li mortaĉu malespere.

Rato havas korpon, ĉu ne?
Homo devas ja ĝentili.
Se li senas je ĝentilo,
li mortaĉu sen trankvili.

干旄

子子干旄，在浚之郊。素丝紕之，良马四之。彼姝者子，何以畀之？
子子干旌，在浚之都。素丝组之，良马五之。彼姝者子，何以予之？
子子干旌，在浚之城。素丝祝之，良马六之。彼姝者子，何以告之？

Flagoj

Nobela junulo petas manon de ĉarma junulino.

Flagoj dekorita per bovvosto
flirtas en la ĉirkaŭurba sfero.
Kun rubandoj blankaj plenkovritaj
kvar staloj iras kun fiero.
Al la ĉarmulino mi donacu
kion por min teni kun sincero?

Flagoj kun pentrita akcipitro
flirtas en suburbo en ventpelo.
Kun bridŝnuroj blankaj streĉ-tiritaj
 kvin staloj iras en leĝero.
Al la ĉarmulino mi liveru
kion por min montri per fidelo?

Flagoj ornamitaj per bird-plumoj
flirtas en la urbo en sunhelo.
Kun plektitaj ŝnuroj pure blankaj
ses staloj iras sen ŝancelo.
Al la ĉarmulino mi aldonu
kion por klopodi al la celo?

载驰

载驰载驱，归唁卫侯。驱马悠悠，言至于漕。大夫跋涉，我心则忧。
既不我嘉，不能旋反。视尔不臧，我思不远。既不我嘉，不能旋济？视尔不臧，我思不閔。
陟彼阿丘，言采其蕝。女子善怀，亦各有行。许人尤之，众稚且狂。
我行其野，芄芃其麦。控于大邦，谁因谁极？大夫君子，无我有尤。百尔所思，不如我所之。

La patriota Damo Mu de Xu-regno

Informite pri la pereco de Wei-regno, kie la Damo naskiĝis, kaj pri la morto de sia frato, la suvereno de Wei-regno, ŝi rapidis per ĉevalĉaro por esprimi sian kondolencon, sed ŝi estis haltigita dumvoje de la sendito de Xu-regno. La jena poemo rakontas pri ŝia menskonflikto.

Galopas urĝe mi per ĉevalĉaro,
ve, por funebri triste pri la frato.
Longlonge antaŭ mi la vojo kuŝas,
sed haltas mi dumvoje sur ĉar-rado.
Persvade la sendito min malhelpas,
kaj mi min trovas en aflikta stato.

Al mia ago li oponas firme,
sed mi neniel returniĝos vere.
Ne lia penso estas tute ĝusta,
dum mi ne klinas kapon senŝancele.

Al mia ago li kontraŭas simple,
insistas mi pri tio kun obstino.
Ideo lia ne konvinkas min mem,
antaŭeniros mi ja sen kapklino.

Mi grimpas jen sur la malgrandan holmon
kaj fritilari-bulbojn plukas mane.
Virino vere havas sian penson
kaj ĉiam agas diskrete laŭplane.
Riproĉas la sendito al mi ke mi
naivas karaktere kaj mens-nane.

Mi iras sur la tero de la regno,
grenplantoj verde kreskas en prospero.
De grandaj landoj mi ja petas helpon
por savi la Wei-regnon el danĝero.
Ho, karaj korteganoj kaj sinjoroj,
ne moku min pro mia konsidero.
Kvankam vi havas diversspecajn pensojn,
persone mi mem agu kun prefero.

卫风

Kantoj kolektitaj en Wei-regno de Zhou-dinastio (en nuna provinco Henan)

淇奥

瞻彼淇奥，绿竹猗猗。有匪君子，如切如磋，如琢如磨。瑟兮僖兮，赫兮咺兮。有匪君子，终不可谖兮。

瞻彼淇奥，绿竹青青。有匪君子，充耳琇瑩，会弁如星。瑟兮僖兮，赫兮咺兮。有匪君子，终不可谖兮。

瞻彼淇奥，绿竹如簣。有匪君子，如金如锡，如圭如璧。宽兮绰兮，猗重较兮。善戏谑兮，不为虐兮。

Rafinita duko

Laŭdkanto pri rafinita duko.

Sinuas l' akvofluo de l' rivero,
bambuoj verdaj jen prospere kreskas.
La duko rafinita en apero
similas al eburo polurita
aŭ gem' tajlita pure kun brilbelo.
Impone li sin tenas grandanima,
ĝentila kaj bonkora kun tenero.
Ĉi viro eleganta kaj decplena
ne plu viŝeblas el la menskajero.

Zigzagis l' akvofluo de l' rivero,
bambuoj verdaj pompas je folioj.
La duko eleganta sen fiero
similas al brilantaj orelingoj
aŭ al glimanta l' stelo sur ĉielo.
Kondutas li akordiĝema ame
afabla kaj bonkora kun fidelo.
Ĉi viro eleganta kaj bonvirta
ĉiame gravuriĝas en korĉelo.

Serpentas l' akvofluo de l' rivero,
bambuoj verdaj vigle kreskas altaj.
La duko bonhumora kun bon-klero
ja estas oro aŭ arĝento brila,
ja estas ronda jado kun blank-helo.
Li sin apogas nun al la kaleŝo
kun bonhumor' kaj milda karaktero.
Li estas parolema kaj ŝercema,
sed traktas popolanojn sen severo.

考槃

考槃在涧，硕人之宽。独寐寤言，永矢弗谖。
考槃在阿，硕人之藹。独寐寤歌，永矢弗过。
考槃在陆，硕人之轴。独寐寤宿，永矢弗告。

Ligna kabano en la monto

Laŭdkanto al la vivo en la monto.

Kabano ligna en montvalo
donas la vivon de komforto.
Mi dormas, memparolas sola,
mi ĝojas, distras min ĝis morto.

Ligna kaban' sur montdeklivo
provizas per la viv' senĝena.
Mi dormas, kantas en izolo,
mi dronas en humor' sensplena.

Kabano sur ebena tero
donas la vivon de libero.
Mi dormas, sonĝas, manĝas sola,
mi ĝuos vivon sen sufero.

硕人

硕人其颀，衣锦褰衣。齐侯之子，卫侯之妻。东宫之妹，邢侯之姨，谭公维私。
手如柔荑，肤如凝脂。领如蝤蛴，齿如瓠犀。螓首蛾眉，巧笑倩兮，美目盼兮。
硕人敖敖，说于农郊。四牡有骄，朱幘镗镗。翟茀以朝。大夫夙退，无使君劳。
河水洋洋，北流活活。施罟濊濊，鱣鲔发发。葭莼揭揭，庶姜孽孽，庶士有暵。

Novedzino de Duko Zhuang

Laŭdo pri la beleco de la novedzino.

Ŝi altas en statur' kun belo,
vestite pelte kaj satene.
Karuloj ŝiaj de bon-klero:
markizo-patro, duko-edzo.
Ŝi estas franjo de princido,
bofranko juna de feŭdlordo
kaj bofilno de erudito.

Fingroj ŝiaj pint-sveltas bele,
ŝia haŭto blankas neĝece,

ŝia kolo suplas leĝere,
ŝiaj dentoj vicas bonorde,
ŝiaj brovoj kurbas apere,
ŝiaj vangoj ridas alloge,
okuloj ŝiaj brilas hele.

Ŝi belaspekta senkompare
kaj stopas ĉaron ĉe kamprando.
Imponas kvar stalonoj stare
kun ruĝa silko ĉe buŝbrido.
Kaleŝas ŝi en korton knare,
korteganoj retiriĝas jam
ŝi kaj duko kunas senbare.

Flava Rivero glitas flue,
kurante norde kun murmuro.
Ĵetiĝas retoj akven brue,
elsaltas fiŝoj jen kun ĝojo
inter kanoj ondantaj skue.
Knabinoj ĉarmaj kaj soldatoj
spektas ŝian nupton plenĝue.

氓

氓之蚩蚩，抱布贸丝。匪来贸丝，来即我谋。送子涉淇，至于顿丘。匪我愆期，子无良媒。将子无怒，秋以为期。
乘彼坳垣，以望复关。不见复关，泣涕涟涟。既见复关，载笑载言。尔卜尔筮，体无咎言。以尔车来，以我贿迁。
桑之未落，其叶沃若。于嗟鸠兮，无食桑葚！于嗟女兮，无与士耽！士之耽兮，犹可说也。女之耽兮，不可说也。
桑之落矣，其黄而陨。自我徂尔，三岁食贫。淇水汤汤，渐车帷裳。女也不爽，士贰其行。士也罔极，二三其德。
三岁为妇，靡室劳矣。夙兴夜寐，靡有朝矣。言既遂矣，至于暴矣。兄弟不知，咥其笑矣。静言思之，躬自悼矣。
及尔偕老，老使我怨。淇则有岸，隰则有泮。总角之宴，言笑晏晏。信誓旦旦，不思其反。反是不思，亦已焉哉！

Malfidela viro

Laborema kaj bonkora virino rakontas, kiel ŝi estas forlasita.

Tiu viro venas kun rideto
ŝanĝi sian silkon por la tolo.
Tio ne 'stas lia vera celo,
li sin svatas al mi kun fervoro.

Mi lin akompanas trans riveron,
rekte ĝis la monto en la foro.
“Mi ne vin rifuzas laŭ bontrovo,
ĉar vi ne vin svatas en la koro.
Ne koleru kontraŭ mi laŭvole,
atendu ĝis la aŭtun’, sinjoro!”

Ascendas sur muron mi por vidi
la pasejon por reveno lia.
Sen lin vidi trairi l’ pasejon,
mi larmadas kun la kor’ anksia.
Kiam li aperas ĉe l’ pasejo,
mi ekĝojas kun ridet’ radia.
Li divenas per testuda ŝelo,
kaj l’ aŭguro estas cert’ premia.
“Do, alvenu al mi kaj forportu
mian doton per ĉarego via.”

Tiam morusarboj pompe kreskas
morusberoj plenas en prospero.
Koturnetoj, ho, vin gardu bone,
ne ludu per beko kun la beroj.
Knabino bela, vin gardu bone,
ne ravitas tro pro l’ vira belo.
Se li amas vin eĉ el korfundo,
li vin ĵeti povas sen fidelo.
Tamen junulin’ lin amas arde,
pentos ŝi pro lia malsincero.

La morusfolioj ekflaviĝas
kaj faladas flirte en ventpelo.
Kiam mi al via hejmo iris,
mi tri jarojn dronas en sufero.
Plene ŝvelas l’ akvsurfaco vasta,
la ĉaron trafas ond’ de l’ rivero.
Restas ĉiam mi fidela al li,
sed li ŝanĝas sin en maniero.
Nediveneblas la vira menso,
li frivole agas kun leĝero.

Mi tri jarojn estas bofilino,
mi plenŝarĝas min per hejmlaboro.
Mi penadas de maten’ ĝis nokto,
ja malmultas miaj ripozhoroj.

Vivo iras glate jen pli kaj pli,
sed li min mistraktas kun rigoro.
Mia frato ne scias pri tio,
male li min mokas sen konsolo.
Mi meditas pri aferoj tiuj,
mi min sentas trista kun doloro.

Volus mi kunvivi ĝis oldiĝo,
sed min trafas kontraŭ vi rankoro.
La rivero larĝa havas bordojn,
sed senfinas mia kordoloro.
Kiam estis ni ankoraŭ junaj,
ni babilis ride kun saporo.
Li jam ĵuris eternan amligon,
sed fariĝis fola kun frivolo.
Li neniam sin mem renovigos,
lia ĵur' jam senas en memoro.

竹竿

籊籊竹竿，以钓于淇。岂不尔思？远莫致之。
泉源在左，淇水在右。女子有行，远兄弟父母。
淇水在右，泉源在左。巧笑之瑳，佩玉之傒。
淇水滢滢，桼楫松舟。驾言出游，以写我忧。

Bambua stango

La virino, kiu edziniĝis en alia lando, sopiras al siaj gepatroj kaj gefratoj.

Per elasta longa bambustango
mi hokfiŝis borde de l'rivero.
Tia sceno oftas en la menso,
mia hejm' ja foras kvazaŭ stelo.

La fontakvo fluas lirle live,
kuras la river' ĉe dekstra alo.
Mi por edziniĝi iris foren,
forlasis gepatrojn en amaro.

La river' torentas dekstraflanke,
la fontakvo lirle fluas live.
Mi ridetas jen kun blankaj dentoj,
miaj jadpendaĵoj tintas vive.

Sur fluanta longa la rivero

flosas la boatoj kun leĝero.
Remas mi boaton laŭ la fluo
por mildigi splenon en korĉelo.

芄兰

芄兰之支，童子佩觿。虽则佩觿，能不我知。容兮遂兮，垂带悸兮。
芄兰之叶，童子佩鞿。虽则佩鞿，能不我甲。容兮遂兮，垂带悸兮。

Senscia bubo

Poetino mokas tiujn bubojn, kiuj nur scipovas paradi sin en publiko.

Similas guŝoj de sarmento
al zon-pendaĵoj el eburo.
Kvankam li portas ĝin ĉe l' zono,
li scias ne pri la amĵuro.
Li nur paradas ĝian belon,
li tamen stultas kiel mulo.

Folioj de sarmento ŝajnas
dikfingra ringo el eburo.
Kvankam li portas ĝin sur fingro,
li scias ne pri amplezuro.
Li nur paradas ĝian lukson,
sed perfidiĝas lia puro.

河广

谁谓河广？一苇杭之。谁谓宋远？跂予望之。
谁谓河广？曾不容刀。谁谓宋远？曾不崇朝。

Rivero vastas

Song-regnanoj en alilando sopiras al sia patrolando per tiuj ĉi versoj.

Kiu diras, ke l' rivero tre vastas?
Ĝin transpasas nur kan-floso facile.
Kiu diras, ke l' hejmlando ja foras?
Piedpinte mi ĝin vidas admire.

Kiu diras, ke l' rivero tre vastas?
Boat' atingi povas transan bordon.
Kiu diras, ke l' hejmlando ja foras?
Dum tago povas mi atingi l' pordon.

伯兮

伯兮朅兮，邦之桀兮。伯也执殳，为王前驱。
自伯之东，首如飞蓬。岂无膏沐，谁适为容？
其雨其雨，杲杲出日。愿言思伯，甘心首疾。
焉得谖草，言树之背。愿言思伯，使我心痗。

Mia edzo

Kanto pri edzino sopiranta al sia edzo, kiu militiras en la foro.

Mia edzo, mia kara,
vi bravulo de nacio.
Kun la dura lanc' en mano
vi batalas kun pasio.

Ekde via militiro
miaj haroj en malordo.
Ĉu mi malhavas pomadon?
Jen langvoras mi ĝis morto.

Mi deziras pluvi, pluvi,
sed elvenas sun' kun gloro.
Mi sopiras al vi forte
spite eĉ al kapdoloro.

La tristo-forgesaj herboj
kreskas en la ombr' de arbo.
Mi sopiras al vi, kara,
brulus mia kor' de karbo.

有狐

有狐绥绥，在彼淇梁。心之忧矣，之子无裳。
有狐绥绥，在彼淇厉。心之忧矣，之子无带。
有狐绥绥，在彼淇侧。心之忧矣，之子无服。

Vulpo

Edzino sopiras al sia edzo, kiu servutas longatempe en malproksimo.

Kiel vulp' soleca, lante
li sur ponto ŝtona iras.
Mi eknaskas triston kore,
li sen vesto maltrankvilas.

Kiel vulp' soleca, vage
ĉe pramejo li hezitas.
Mi eknaskas triston kore,
li sen zono malrapidas.

Kiel vulp' soleca, borde
de l' rivero li vojiras.
Mi eknaskas triston kore,
sen ĉemizo li suspiras

木瓜

投我以木瓜，报之以琼琚。匪报也，永以为好也！
投我以木桃，报之以琼瑶。匪报也，永以为好也！
投我以木李，报之以琼玖。匪报也，永以为好也！

Cidonio

Kanto pri reciproka donacado inter geamantoj.

Vi donas al mi cidonion,
mi reciprokas per jadplato.
Mi ja ne volas kompensi,
sed, ho, ke daŭru l' amrilato.

Vi donas al mi jen persikon,
mi reciprokas per jadrado.
Mi ja ne volas kompensi,
sed, ho, ke brulu nia am-ardo.

Vi donas al mi freŝan prunon,
mi reciprokas per jad-hoko.
Mi ja ne volas kompensi,
sed ke firmu l' am-reciproko

王风

**Kantoj kolektitaj ĉirkaŭ la ĉefurbo de Zhou-dinastio (en
nuna provinco Henan)**

黍离

彼黍离离，彼稷之苗。行迈靡靡，中心摇摇。知我者，谓我心忧；不知我者，谓我何求。悠悠苍天，此何人哉？

彼黍离离，彼稷之穗。行迈靡靡，中心如醉。知我者，谓我心忧；不知我者，谓我何求。悠悠苍天，此何人哉？

彼黍离离，彼稷之实。行迈靡靡，中心如噎。知我者，谓我心忧；不知我者，谓我何求。悠悠苍天，此何人哉？

En ruinigita ĉefurbo

Kanto lamentanta pri pereco de la dinastio.

Milioj staras en linioj,
folias sorgoj en prospero.
Mi trenas paŝojn en ĉi urbo
kun kor' dronanta en sufero.
Min konante, homoj diras, ke mi mornas,
kaj ne min konante, homoj diras, ke mi paŝadas kun celo.
Lazura la ĉielo vasta,
ĉu la hejmland' 'stas sen espero?

Milioj staras en linioj,
sorgplantoj en spikiĝa horo.
Mi trenas paŝojn en ĉi urbo
kun koro en mizera ploro.
Min konante, homoj diras, ke mi mornas,
kaj ne min konante, homoj diras, ke mi paŝadas kun celo.
Lazura la ĉielo vasta,
ĉu ĝi sin trovas en hororo?

Milioj staras en linioj,
grajniĝas sorgoj en sunhelo.
Mi trenas paŝojn en ĉi urbo
kun kor' ŝtopita de kolero.
Min konante, homoj diras, ke mi mornas,
kaj ne min konante, homoj diras, ke mi paŝadas kun celo.
Lazura la ĉielo vasta,
ĉu ĝi finiĝis pro sortpelo?

君子于役

君子于役，不知其期。曷至哉？鸡栖于埭，日之夕矣，羊牛下来。君子于役，如之何勿思！

君子于役，不日不月。曷其有佸？鸡栖于桀，日之夕矣，羊牛下括。君子于役，苟无饥渴！

Edzo en servuto

Edzino sopiras al sia edzo, kiu servutas jam dum longa tempo.

Li servutas en la foro,
mi ne scias, kiam vere
li revenos al la hejmo.
Kokoj nestiĝis vespere;
suno sinkis okcidenten;
brutoj enstaliĝis plene.
Li servutas en la foro,
mi sopiras al li splene.

Li servutas senrevene,
tagoj jen forpasas flue.
Kiam ni ja renkontiĝos?
Kokoj jam nestiĝis brue;
suno sinkis okcidenten;
brutoj venas el la pado.
Li servutas senrevene,
lin ne trafu sortobato.

君子阳阳

君子阳阳，左执簧，右招我由房，其乐只且！
君子陶陶，左执翫，右招我由敖，其乐只且！

Mia amato

Geamantoj kune ekskursas kun plezuro.

Li alvenas kun triumfa gesto,
fluton tenas li en liva mano
kaj alvokas min jen per la dekstra
por dancad' en ama akompano.

Li alvenas kun delica sento,
Plumojn tenas li en liva mano
kaj alvokas min jen per la dekstra
por promeno en sincera amo.

扬之水

扬之水，不流束薪。彼其之子，不与我戍申。怀哉怀哉，曷月予还归哉？

扬之水，不流束楚。彼其之子，不与我戍甫。怀哉怀哉，曷月予还归哉？
扬之水，不流束蒲。彼其之子，不与我戍许。怀哉怀哉，曷月予还归哉？

Malforta garnizono

Satiro al la malforta garnizono, kiu ne povas defendi popolanojn.

Langvora riverfluo
povas ne forporti herbojn vere.
Tiu hom' restanta pace hejme
povas ne batali sinofere.
Sopiremo min sufokas forte,
kiam mi revenos jen libere?

Langvora riverfluo
povas ne forporti kanojn plene.
Tiu hom' nestanta kalme hejme
povas ne defendi l' regnon pene.
Mi sopiras al hejmlok' enpense,
kiam mi ĝin vidos jen revene?

Langvora riverfluo
povas ne forporti junkojn flue.
Tiu hom' kuŝanta dolĉe hejme
povas ne protekti nin senskue.
Min nostalgio alpremas streĉe,
kiam hejmeniros mi satĝue?

中谷有蓷

中谷有蓷，暵其乾矣。有女仳离，嘒其叹矣。嘒其叹矣，遇人之艰难矣！
中谷有蓷，暵其脩矣。有女仳离，条其嘯矣。条其嘯矣，遇人之不淑矣！
中谷有蓷，暵其湿矣。有女仳离，啜其泣矣。啜其泣矣，何嗟及矣！

Forlasita edzino

Forlasita edzino plendas pri sia mizero.

Kreskas leonuroj* en la valo
ili velkis pro sekec' ĝis morto.
Forlasita de la edz' bestia,
ŝi lamentas pri l' malbona sorto.
Ŝi lamentas pri' malbona sorto,
ŝin la viro traktas per perforto.

Kreskas leonuroj en la valo,

ili velkis pro manĉ' de pluvfalo.
Forlasita de la edz' tirana,
ŝi plorplenas pri la vivamaro.
Ŝi plorplendas pri la vivamaro,
ŝin mistraktas ja la hom-ŝakalo.

Kreskas leonuroj en la valo,
ili mortas en seka aero.
Forlasita de la edz' fripona,
ŝi larmadas triste pro mizero.
Ŝi larmadas triste pro mizero,
ŝin turmentas li ja kun kruelo.
**leonuto: Leonurus Heterophylls*

兔爰

有兔爰爰，雉离于罗。我生之初，尚无为；我生之后，逢此百罹。尚寐无吿！
有兔爰爰，雉离于罌。我生之初，尚无造；我生之后，逢此百忧。尚寐无觉！
有兔爰爰，雉离于置。我生之初，尚无庸；我生之后，逢此百凶。尚寐无聪！

Libera leporo

Dekadencinta nobelo lamentas pri siaj ĉagrenoj.

Libere kuras la leporo,
fazan' kaptiĝas en ĉas-reto.
Min dum knabeco la favoro
ja volvis sen ajna turmento.
Sed trafas min en nuna horo
mil katastrofoj kaj mizeroj.
Mi volus droni en soporo.

Leporo kuras kun libero,
fazan' sin trovas en kaptilo.
Mi naskiĝinte sen sufero
de punlaboro kaj servuto
renkontas nun en viv-severo
mil kaj dek mil malagrablaĵojn.
Mi dormu ĉiam en malhelo.

Leporo kuras ja senbride,
fazano falas en ĉas-reton.
Kiam mi 'stis juna timide,
ne aŭdis mi pri viv-barakto.
Sed subpremetas mi trepide

sub jug' de malfacila vivo.
Mi dormu peze kaj rigide.

葛藟

绵绵葛藟，在河之浒。终远兄弟，谓他人父。谓他人父，亦莫我顾。
绵绵葛藟，在河之涘。终远兄弟，谓他人母。谓他人母，亦莫我有。
绵绵葛藟，在河之漘。终远兄弟，谓他人昆。谓他人昆，亦莫我闻。

Juna rifuganto

Forlasinte siajn gefratojn kaj gepatrojn, la juna rifuganto levas sian tristan voĉon.

Sarmento disetendas foren
laŭ l' longa bordo de l' rivero.
Lontane de la fratoj miaj,
mi vokas iun kun tolero
“Ho, mia patro, min prizorgu!”
Li ne zorgas min en sufero.

Sarmento disetendas foren
laŭ la rivero pura, klara.
Lontane de la fratoj miaj,
vokas iun per voĉ' amara
mi “panjo mia, min kompatu”,
sed ŝi rigardas min senfara.

Sarmento disetendas foren
sinue laŭ l' rivera rando.
Lontane de la fratoj miaj,
mi vokas iun en fremdlando
“kara fraĉjo, volu min helpi!”
li surdmutas al mi ĉe stando.

采葛

彼采葛兮，一日不见，如三月兮！
彼采萧兮，一日不见，如三秋兮！
彼采艾兮，一日不见，如三岁兮！

Unu tago tro longas

Kanto de geamantoj.

Ŝi kolektas trapojn en boato,
mi ne vidas ŝin jam unu tagon,

kvazaŭ ja forpasus tri monatoj.

Ŝi brotanojn plukas en montzono,
mi ne vidas ŝin jam unu tagon,
kvazaŭ ja forpasus tri sezonoj.

Ŝi kolektas herbojn en montvalo,
mi ne vidas ŝin jam unu tagon,
kvazaŭ forpasus tri tutaj jaroj.

大车

大车槛槛，毳衣如𦃟。岂不尔思？畏子不敢。
大车哼哼，毳衣如璫。岂不尔思？畏子不奔。
穀则异室，死则同穴。谓予不信，有如皦日。

Ĉaro

Viro esprimas la fidelan amon al sia amatino.

Ruliĝas ĉar' kun sono knara,
brodita via rob' smeraldas.
Do, ĉu mi ne sopiras al vi?
Se via volo firma ardas!

Knaradas ĉaro en irado,
mantelo via jade ruĝas.
Ĉu mi ne korinklinas al vi?
Se brave vi kun mi amfuĝas!

Ni loĝas en apartaj ĉambroj,
sed restu ni en sama tombo.
Ĉu mi ne fidelas al vi, nu?
Atestu la suno sen trompo.

丘中有麻

丘中有麻，彼留子嗟。彼留子嗟，将其来施施。
丘中有麦，彼留子国。彼留子国，将其来食。
丘中有李，彼留之子。彼留之子，贻我佩玖。

Kanabo kreskas sur la duno

Junulino imagas, kiam ŝi atendas sian amaton.

Kanabo kreskas sur la duno,

ĉi tie restas lia amo,
ĉi tie restas lia amo.
Aŭdiĝas paŝoj de la junco.

Tritiko kreskas sur la duno,
amanto lia restas tie,
amanto lia restas tie.
Pikniku ĝoje ni en kuno.

Sur duno kreskas arb' de pruno,
li amon bone tenas tie,
li amon bone tenas tie.
Li donos al mi jadan umon.

郑风

**Kantoj kolektitaj en Zheng-regno de Zhou-dinastio (en nuna
Henan-provinco)**

緇衣

緇衣之宜兮，敝予又改为兮。适子之馆兮，还予授子之粢兮。
緇衣之好兮，敝予又改造兮。适子之馆兮，还予授子之粢兮。
緇衣之席兮，敝予又改作兮。适子之馆兮，还予授子之粢兮。

Nigra kostumo

Kanto pri edzino, kiu zorgas pri la vivo de sia oficista edzo.

Kostumo nigra sur li sidas bone.
Se ĝi jam trivis, mi elfaru la alian.
Mi lin forsendas al la oficejo
kaj por li jen preparas manĝon ambrozian.

Kostumo nigra sur li sidas bele.
Se ĝi jam trivis, mi elfaru la alian.
Mi lin forsendas al la oficejo
kaj por li preparas la manĝon tradician.

Kostumo nigra sur li sidas dece.
Se ĝi jam trivis, mi elfaru la alian.
Mi lin forsendas al la oficejo
kaj al li donas manĝon gustvarian.

将仲子

将仲子兮，无逾我里，无折我树杞。岂敢爱之？畏我父母。仲可怀也，父母之言亦可畏也。
将仲子兮，无逾我墙，无折我树桑。岂敢爱之？畏我诸兄。仲可怀也，诸兄之言亦可畏也。
将仲子兮，无逾我园，无折我树檀。岂敢爱之？畏人之多言。仲可怀也，人之多言亦可畏也。

Al mia amato

Amantino petas al sia amato ne esti skeptika pri ŝia amo.

Vin mi petas, mia karulo:
ne ŝtele iru en la domon,
nek difektu l' arbon ĉe muro.
Mi ne domaĝas ĝin ameme,
sed gepatroj bojas je l' spuro.
Mi vere tenas vin en koro.
iliaj vortoj estas juro.

Vin mi petas karulo mia:
ne transprimi penas la muron,
nek pluku vergojn akaciajn.

Mi ne domaĝas ilin zorge,
sed sakros frat' per voĉo kria.
Mi vere tenas vin en menso.
La frataj vortoj estas fiaj.

Vin mi petas, mia trezoro:
ne eniru en mian korton,
nek disŝiru branĉojn kun floroj.
Mi ne domaĝas ilin vere,
sed najbaroj klaĉos laŭ volo.
Mi vere tenas vin en kapo.
La kraĉoj ĵetos min al ploro.

叔于田

叔于田，巷无居人。岂无居人？不如叔也。洵美且仁。
叔于狩，巷无饮酒。岂无饮酒？不如叔也。洵美且好。
叔适野，巷无服马。岂无服马？不如叔也。洵美且武。

Kapabla ĉasisto

Laŭdkanto al juna kaj lerta ĉasisto.

Li ĉasadi iras en kamparo,
neniu ŝajnas loĝi apude.
Ĉu vere ne loĝas la najbaroj?
Ili ja ne povas lin superi,
kiu belaspektas sen komparo.

Li ĉasadi iras en arbaro,
neniu ŝajnas drinki ĉirkaŭe.
Ĉu vere ne 'stas drinkanta aro?
Ili povas ne rivali kun li,
kiu estas hom' de temeraro.

Li ĉasadi iras en ĝangalo,
neniu ŝajnas rajdi surstrate.
Ĉu ne homoj rajdas per ĉevalo?
Ili ja ne povas lin konkeri,
kiu tre imponas sen rivalo.

大叔于田

叔于田，乘乘马。执辔如组，两骖如舞。叔在藪，火烈具举。袒裼暴虎，献于公所。将叔勿狃，戒其伤女。

叔于田，乘乘黄。两服上襄，两骖雁行。叔在薮，火烈具扬。叔善射忌，又良御忌。抑罄控忌，抑纵送忌。

叔于田，乘乘鸞。两服齐首，两骖如手。叔在薮，火烈具阜。叔马慢忌，叔发罕忌。抑释搢忌，抑鬯弓忌。

Kurĉasado

Laŭdkanto pri la imponeco kaj lerteco de juna ĉasisto.

Li kurĉasi iras en l' arbaro
en ĉar' tirata de kvar ĉevaloj.
Tenante bridojn per man' facile,
ĉevaloj ĉe flankoj dancas ire.
Li pretigas ĉason ĉe la lago,
ĉasfajro ekbrulas por la ago.
Li nudmane kaptis tigron brave
kaj prezentis ĝin al duko pave.
Ho, ne faru l' samon laŭkutime,
por eviti vundon ja fascine.

Li veturas al ĉasej' tre fora
jen per kvar ĉevaloj orkoloraj.
Frontaj ĉevaloj galopas ĝoje,
la flankaj trote sekvas dumvoje.
Herboj kreskas longaj en prospero,
la ĉasfajro brulas kun lumhelo.
En arkopafad' li estas lerta
kaj en ĉar-stirado ankaŭ sperta.
Li jen galopas jen bridon tiras,
jen pafas sagojn jen ĉaron stiras.

Li kurĉasas sur sovaĝa tero
en ĉevaltirata ĉar' kun belo.
Antaŭe kuradas ĉevalparo,
kaj ekambblas tiuj ĉe la alo.
Loĝas li bravega en la tendo,
la ĉasfajro scintilas en vento.
Lia stalono ekkuras lante,
li jam pafas sagojn malmult-kvante.
Li ekŝultroportas l' arkon bone,
kaj l' sagujon ekfermas klaksone.

清人

清人在彭，驷介旁旁。二矛重英，河上乎翱翔。

清人在消，驷介麋麋。二矛重乔，河上乎逍遥。
清人在轴，驷介陶陶。左旋右抽，中军作好。

Armeo el subprefektujo Qing*

Satiro al sendisciplinaj soldatoj, kiuj emas paradi per siaj ekipaĵoj.

Ili garnizonas ĉe l' rivero
kun kirasĉevaloj en parado.
Kvast' de lancoj flirtas en leĝero,
la soldatoj ludadas laŭ ŝato.

Ili garnizonas laŭ la bordo
kun imponaj militaj ĉevaloj.
Lancaj plumoj pavas en ventforto,
la soldatoj kuras per la ĉaroj.

Ili garnizonas ĉe la roĵo
kun ĉevaloj en kiraso fera.
Ili svingas armilojn kun ĝojo,
kontentiĝas general' la vera.
**Subprefektujo Qing sin trovas en Zheng-regno.*

羔裘

羔裘如濡，洵直且侯。彼其之子，舍命不渝。
羔裘豹饰，孔武有力。彼其之子，邦之司直。
羔裘晏兮，三英粲兮。彼其之子，邦之彦兮。

Ŝafpelta palto

Laŭdkanto pri la honestaj kaj justaj oficistoj.

En ŝafpelta palto mola, luksa
li sin montras justa kaj fidela.
Li elstaras en la oficistoj,
kun la neŝanĝebla virto vera.

Kun leopardfela manik-puntoj
la palt' lin igas honesta juste.
Li unika en la oficistoj
en procesaj kazoj juĝas ĝuste.

La ŝafpelta palto kun tri strioj
da leopardfel' aspektas bela.
Eminenta en la oficistoj

li 'stas regna piliero fera.

遵大路

遵大路兮，掺执子之袂兮，无我恶兮，不寔故也！
遵大路兮，掺执子之手兮，无我醜兮，不寔好也！

Sur la vojo

Popola amkanto.

Sur la vojo ni du iras,
mi vin tiras je la mano.
Ne min abomenu fride.
Pensu pri l' antaŭa amo.

Sur la vojo ni du marŝas,
mi vin tenas je la mano.
Ne diru, ke mi malbelas,
nek forĵetu min al flamo.

女曰鸡鸣

女曰鸡鸣，士曰昧旦。子兴视夜，明星有烂。将翱将翔，弋鳧与雁。
弋言加之，与子宜之。宜言饮酒，与子偕老。琴瑟在御，莫不静好。
知子之来之，杂佩以赠之。知子之顺之，杂佩以问之。知子之好之，杂佩以报之。

Je kokerikado

Geedzoj kunvivas en harmonio.

Ŝi diras, “Kok’ jam kokerikis.”
Li diras, “Jen ĵus je aŭroro.”
“Rigardu bone al ĉielo,
brilas matenstel’ en ĉi horo.”
Birdoj tra l’ nokta dorm’ ekflugos,
mi pafos ilin per sag-boro.”

“Vi lertas en pafad’ sendube,
kuiros ilin mi por plado.
Ni drinkos kune kun ĝi ĝue,
kaj kunvivos ĝis la mort-dato.
Mi akompanos vian citron
en harmonia viva stato.”

“Mi ja konas vian prizorgon.

Jen la jad 'stas al vi donaco.
Jes ja, vi amas min profunde,
iras la jad' al via plaĉo.
Vian bonon mi reciprokas
pro via laco kaj sagaco.

有女同车

有女同车，颜如舜华。将翱将翔，佩玉琼琚。彼美孟姜，洵美且都。
有女同行，颜如舜英。将翱将翔，佩玉将将。彼美孟姜，德音不忘。

Veturo kun belulino

Laŭdkanto al la junulino en la sama veturilo.

La belulin' en sama ĉaro
aspektas hibiskflore bele.
Malpeze birde ŝi kondutas,
tintas jadpendaĵoj leĝere.
Ŝi estas la knabino linda,
agmanieras ŝi anĝele.

La belulin' en sama ĉaro,
similas al hibiska floro.
Ŝi agas fluge kaj leĝere,
sonetas ŝia jad-dekoro.
La junulin' kun bona virto
parolas sen ajna frivolo.

山有扶苏

山有扶苏，隰有荷华。不见子都，乃见狂且。
山有桥松，隰有游龙。不见子充，乃见狡童。

Lamentado

Junulino lamentas pri malsukcesa rendevuo kun sia amato.

Sur monto kreskas morusarbo,
lotusoj floras en la lago.
Mi vin ne vidas, mia kara,
sed ulon kun frivola ago.

Sur monto kreskas alta pino,
kaj muskoj sur humida tero.
Mi vin ne vidas, vi belulo,

sed ruzemulon en malhelo.

蓀兮

蓀兮蓀兮，风其吹女。叔兮伯兮，倡予和女。
蓀兮蓀兮，风其漂女。叔兮伯兮，倡予要女。

Falantaj folioj

Junulino volas kanti kune kun junulo.

Folioj velkas, falas flirte
malpeze en aŭtuna vento.
junuloj belaspektaj venu
kantadi kun mi en kontento.

Folioj velkas kaj flaviĝas,
kaj ili falas en ventpelo.
Junuloj gajaj tuj rapidu
por kanti kun mi kun prefero.

狡童

彼狡童兮，不与我言兮。维子之故，使我不能餐兮。
彼狡童兮，不与我食兮。维子之故，使我不能息兮。

Belaspekta junulo

Junulino admiras belulon.

Ho, vi junulo belaspekta
parolas al mi sen prefero.
Mi nur pro vi, kun belaj trajtoj,
malemas manĝi kun ĝojhelo.

Ho, vi junulo belaspekta
ne manĝas kun mi propravole.
Mi nur pro vi, kun lindaj vangoj,
ripozi povas ne tutsole.

褰裳

子惠思我，褰裳涉溱。子不我思，岂无他人？狂童之狂也且！
子惠思我，褰裳涉洧。子不我思，岂无他士？狂童之狂也且！

Levu rob-baskon!

Amantino ŝerce provokas sian amaton.

Se vi amsopiras al mi kore,
vadu tra l' river' kun basko supren.
Se vi ne min amas ja trezore,
ĉu alia viro mankas al mi?
Vi stultulo pensas iom fole.

Se vi amsopiras al mi vere,
vadu tra l' river' kun basko supren.
Se vi amas min ja malprefere,
ĉu mi trovus viron anstataŭe?
Vi stultulo vivos malespere.

丰

子之丰兮，俟我乎巷兮，悔予不送兮。
子之昌兮，俟我乎堂兮，悔予不将兮。
衣锦褰衣，裳锦褰裳。叔兮伯兮，驾予与行。
裳锦褰裳，衣锦褰衣。叔兮伯兮，驾予与归。

Pentado

*Virino pentas, ke ŝi ne tenas sian promeson kuniri kun sia amato, kaj
esperas, ke li revenu al ŝi.*

Kun aspekto grasa kaj fortika
li atendis longe min en strato.
Pentas mi ne iri kun li sen kompatato.

Kun aspekto forta kaj impona
li atendas longe min en halo.
Pentas mi ne kun li foriri en paro.

Mi min vestas per broditaj
vestoj, jupo jen kun kapvualo.
Ho, sinjoro mia, min kunportu
tuj foriri fluge per la ĉaro.

Mi min vestas per satenaj
vestoj, silkaj jup' kaj kufo nune.
Ho, karulo mia, min akceptu
kaj ni hejmeniru prompte kune.

东门之墀

东门之墀，茹蘆在阪。其室则迩，其人甚远。
东门之栗，有践家室。岂不尔思？子不我即！

Terspaco ebena ĉe l' Oriento

Virino plendas, ke ŝia amato ne alvenas edzinigi ŝin.

Oriento terspac' ebenas,
rubiherb' deklive plenas.
Domoj niaj ja najbaras,
koroj niaj diste staras.

Tie kaŝtanarb' frond-riĉas,
sub arbombro domoj vicas.
Ĉu mi al vi ne sopiras?
Ve! Maleme vi aliras.

风雨

风雨凄凄，鸡鸣喈喈。既见君子，云胡不夷。
风雨潇潇，鸡鸣胶胶。既见君子，云胡不瘳。
风雨如晦，鸡鸣不已。既见君子，云胡不喜。

Vento kaj pluvo

Kanto pri la ĝojo de l' virino, kiu vidas sian edzon.

Pluvo falas en vent-ululo,
koko senĉese krias brue.
La edzon mi finfine vidas,
kiel ĝojegas mi plenĝue!

Vento blovas en pluvo sibla,
koko kokerikas senĉese.
La edzon mi finfine vidas,
kiel mi delicas ekscese!

Vento siblas en pluv-nebulo,
koko krias brue en ĥoro.
La edzon mi finfine vidas,
kiel mi ekstazas en koro!

子衿

青青子衿，悠悠我心。纵我不往，子宁不嗣音？
青青子佩，悠悠我思。纵我不往，子宁不来？
挑兮达兮，在城阙兮。一日不见，如三月兮！

Al klerulo

Virino esprimas sian malpaciencon en atedado al klerulo.

Kolumo blukolora via
ofte flagras en mia koro.
Eĉ mi ne povas iri al vi,
kial ne mesaĝi, sinjoro?

Kolumo blukolora via
ofte naĝas en mia cerbo.
Eĉ mi ne povas iri al vi,
kial ne viziti kun certo?

Mi paŝadas tie kaj tie
sur la urba mur' por gvato.
Unu tagon mi ne vin vidas,
kvazaŭ forpasus tri monatoj!

扬之水

扬之水，不流束楚。终鲜兄弟，维予与女。无信人之言，人实诳女。
扬之水，不流束薪。终鲜兄弟，维予二人。无信人之言，人实不信。

Akvo en la malprofunda roĵo

Edzino admonas la edzon ne kredi onidiron.

Akvo en la malprofunda roĵo
ne forporti povas vergojn flue.
Mi malhavas fratojn en la hejmo,
nur vi kaj mi kunvivas plenĝue.
Nu, ne kredu vortojn aliulajn,
ili trompas kaj fraŭdas senbrue.

Akvo en la malprofunda roĵo
ne forporti povas branĉojn vere.
Mi ne havas fratojn miajn proprajn,
Nur ni ambaŭ kunas sensufere.
Ne facile kredu onidirojn,

oni ruzas je vi malsincere.

出其东门

出其东门，有女如云。虽则如云，匪我思存。缟衣綦巾，聊乐我员。
出其闉闍，有女如荼。虽则如荼，匪我思且。缟衣茹蘂，聊可与娱。

Ekster l' orienta urba pordo

Viro esprimas sian amon al la propra amatino.

Ekster l' orienta urba pordo
multas belulinoj kiel nuboj.
Kvankam ili belas en amaso,
mia kara 'stas ne en la grupo.
En blanka kaj palverda kostumo
ŝi estas mia amata pupo.

Ekster l' orienta urba pordo
multas belulinoj kiel floroj.
Kvankam ili ĉarmas tre fascine,
mia kara staras en la solo.
En la blanka kaj skarlata robo
ŝi 'stas mia amata trezoro.

野有蔓草

野有蔓草，零露漙兮。有美一人，清扬婉兮。邂逅相遇，适我愿兮。
野有蔓草，零露瀼瀼。有美一人，婉如清扬。邂逅相遇，与子偕臧。

Sarmentoj rampas

Kanto pri la ĝojo, kiam geamantoj renkontiĝas neatendite.

Sovaĝeje rampas la sarmentoj
kun kristalaj rosoj en lumhelo.
Jen alvenas ĉarma belulino
kun irmaniera la leĝero.
Renkontiĝas ni neatendite,
ŝi ja plaĉas al mi per la belo.

Sur kamptero rampas la sarmentoj
kun rosgutoj klaraj en lumgloro.
Jen alvenas juna ĉarmulino
kun vizaĝo roza kiel floro.
Renkontiĝas ni neatendite,

gravuriĝas ŝi en mia koro.

溱洧

溱与洧，方涣涣兮。士与女，方秉蘭兮。女曰观乎？士曰既且，且往观乎！洧之外，洵訏且乐。维士与女，伊其相谑，赠之以勺药。

溱与洧，浏其清矣。士与女，殷其盈矣。女曰观乎？士曰既且，且往观乎！洧之外，洵訏且乐。维士与女，伊其将谑，赠之以勺药。

Rendevuo ĉe riverbordo

Kanto pri ĝojo de gejunuloj en ekskurso.

Zhen-river' kaj Wei-rivero
torentfluas en akv-ŝvelo.
Gejunuloj nun ekskursas
mane kun herboj de belo.
Ŝi: "Ni iru tien, bone."
Li: "Ho, mi jam, nebezono."
Ŝi: "Ni iru do refoje!
Kuras Zhen-river' laŭtsone,
multas ĉe la bord' plezuro."
Ili paŝas en rukulo,
kaj senĉese ŝerce ridas,
floroj donacatas en ambrulo.

Zhen-river' kaj Wei-rivero
fluas haste en libero.
Gejunuloj boras sian vojon
tra homamaso kun ŝancelo.
Ŝi: "Ni iru tien kune."
Li: "Ho, mi iris aŭtune."
Ŝi: "Ni iru do refoje!
Wei-river' torentas nune,
plenas ĉe la bord' hombruo."
Ili marŝas laŭ l' akvfluo
kaj kveradas man-en-mane,
floroj donacatas en amĝuo.

齐风

Kantoj kolektitaj en Qi-regno de Zhou-dinastio (en nuna Shandong-provinco)

鸡鸣

鸡既鸣矣，朝既盈矣。匪鸡则鸣，苍蝇之声。
东方明矣，朝既昌矣。匪东方则明，月出之光。
虫飞薨薨，甘与子同梦。会且归矣，无庶予子憎。

Kokerikado

Matene edzino urĝas l' edzon frue ellitiĝi kaj iri al la oficejo.

“Vekiĝu. Kokoj kokerikas.
Jam ekas l' ofica laboro.”
“Tio ne estas kokaj krioj,
sed muŝoj zumas en ĉi horo.”

“Heliĝas jam en oriento,
Jam iras l' ofica laboro.”
“Tio ne estas tag-heliĝo,
sed tuj alvenos la aŭroro.”

“Insektoj zumas en aero,
ja dolĉas l' enlita soporo.”
“Ne volas oni vin atendi,
kaj plendas pri via langvoro.”

还

子之还兮，遭我乎狺之间兮。并驱从两肩兮，揖我谓我儇兮。
子之茂兮，遭我乎狺之道兮。并驱从两牡兮，揖我谓我好兮。
子之昌兮，遭我乎狺之阳兮。并驱从两狼兮，揖我谓我臧兮。

Laŭdoj inter du ĉasistoj

Du ĉasistoj renkontiĝas en la monto kaj donas laŭdojn unu al la alia.

Kiel vi estas lerta, facilmovi!
Okaze renkontiĝas ni en valo.
Ni ambaŭ kure ĉasas du bestetojn,
vi laŭdas min pro mia senrivalo.

Kiel vi havas imponan staturon!
Okaze renkontiĝas ni en monto.
Ni ambaŭ persekutas du ŝakalojn,
vi laŭdas mian sperton kun volonto.

Kiel vi estas forta kaj fortika!
Okaze li min trafas en montsudo.
La spuron de du lupoj ni postsekvas,
vi laŭdas pro mia bona ĉasludo.

著

俟我于著乎而，充耳以素乎而，尚之以琼华乎而。
俟我于庭乎而，充耳以青乎而，尚之以琼莹乎而。
俟我于堂乎而，充耳以黄乎而，尚之以琼英乎而。

Novedzo

Novedzino pririgardas la novedzon antaŭ nupto.

Trankvile li atendas antaŭ la ekrano,
du silkrubandoj blankaj pendas el la krono,
inkrustitaj jadoj brilas en kapornamo.

Senĝene li atendas en la doma halo,
du verdaj silkaj fale pendas el la krono,
la gemoj kaj rubenoj glimas en brilpalo.

Kviete li atendas pace en la korto,
du flavaj silkrubandoj pendas el la krono,
la jaspoj kaj turkisoj flagras en akordo.

东方之日

东方之日兮，彼姝者子，在我室兮。在我室兮，履我即兮。
东方之月兮，彼姝者子，在我闼兮。在我闼兮，履我发兮。

L' eosta suno

Kanto pri reciporka korinklino inter genovedzoj.

L' eosta suno ruĝas je aŭroro,
knabin' la bela jen en mia domo
kunvivas kun mi sub mia favoro.
Ŝi akompanas min tagnokte milde,
ni zorgas reciproke kor' ĉe koro.

L' eosta luno brilas kun lumhelo,
knabin' la linda jen en mia domo
kunvivas kun mi plene en leĝero.
Ŝi staras strikte alkroĉante al mi,

ni dronas en akorda atmosfero.

东方未明

东方未明，颠倒衣裳。颠之倒之，自公召之。
东方未晞，颠倒裳衣。倒之颠之，自公令之。
折柳樊圃，狂夫瞿瞿。不能辰夜，不夙则莫。

Tuj antaŭ tagiĝo

Povraj popolanoj lamentas pri frua ellitiĝo kaj fuŝa preparo por la servuto.

Antaŭ ol l' orient' heliĝos,
vi vestas vin ja en malordo,
malorde vi vin vestas fuŝe,
vi vokatas al servuthordo.

Antaŭ ol l' orient' ekbrilos,
vi vestas vin en konfuzpleno,
vi ĵetas vestojn sur vin fuŝe,
vi irigitas kun ĉagreno.

Por plekti heĝon jen per vergoj
vi penas sub la vokta gardo.
Tagnokte vi servutas vere,
ĉu sub lumlum', ĉu sub sunardo.

南山

南山崔崔，雄狐绥绥。鲁道有荡，齐子由归。既曰归止，曷又怀止？
葛屨五两，冠綌双止。鲁道有荡，齐子庸止。既曰庸止，曷又从止？
蓺麻如之何？衡从其亩。取妻如之何？必告父母。既曰告止，曷又鞫止？
析薪如之何？匪斧不克。取妻如之何？匪媒不得。既曰得止，曷又极止？

Suda monto

Satiro pri Duko Xiang de Qi-regno, Duko Huan de Lu-regno kaj Damo Wen Jiang. Laŭ historia literaturo, Duko Xiang kaj lia duonfratino Wen Jiang tenis incestan rilaton. En 708 a. K., Wen Jiang edziniĝis al Duko Huan de Lu-regno. Kiam Duko Xiang heredis la tronon, geedzoj Duko Huan venis viziti lin. Tamen Duko Xiang ankoraŭ faris inceston kun lia edzino. Trovinte tion, Duko Huan riproĉis sian edzinon. Duko Xiang pretekstis eskorti Dukon Huan kaj lian edzinon al la hejmlando kaj murdis lin per soldatoj sur la vojo.

Suda monto altas kaj imponas,
vira vulpo paŝas kun libero.
Vojo al Lu-regn' ebene larĝas,

per ĝi ŝi veturas por nupt-celo.
Ĉar ŝi edziniĝis al Lu-regno,
kial ŝi lin tenis en korĉelo?

Tolaj ŝuoj faratas duope,
pendas ĉapaj rubandoj en paro.
Vojo al Lu-regn' ebene larĝas,
iris ŝi per ĝi kun nupt-vualo.
Ĉar fariĝis ŝi Lu-regnanino,
kial ŝi sopiras al hejm-valo?

Oni plugas por kultivi linojn
laŭ la kampaj sulkoj ja zorgeme.
Oni, antaŭ ol edzinon preni,
al gepatroj diras jen sensplene.
Ĉar gepatroj jam sciiĝas bone,
kial ŝi agaĉu senkatene?

Kiel hejtolignojn ni dishakas?
Ni dependas de l' akra hakilo.
Kiel edzinigas ni fraŭlinon?
Ni svatiston petas por konsilo.
Ĉar ŝi edziniĝis jam decide,
Incestad' ne licas kun facililo.

甫田

无田甫田，维莠骄骄。无思远人，劳心忉忉。
无田甫田，维莠桀桀。无思远人，劳心怛怛。
婉兮变兮。总角卯兮。未几见兮，突而弁兮！

Sopire al la filo

Patrino sopiras al sia filo, kiu vivas en foro.

Ne vane plugu tiun vastan kampon,
herbaĉoj en ĝi kreskas en prospero.
Ne sopiremu al la hom' en foro,
alie, vi vin turnas al sufero.

Ne vane plugu tiun vastan kampon,
herbaĉoj en ĝi jam densdense plenas.
Ne sopiremu al la hom' en foro,
alie, en la kor' vi vin ĉagrenas.

La fil' atenton tiras per aspekto,
sur kapo staras du plektaĵoj belaj.
Mi ne lin vidas dum mallonga tempo,
nun li fariĝas jam adulto vera.

卢令

卢令令，其人美且仁。
卢重环，其人美且鬋。
卢重鋠，其人美且偲。

Ĉashundo kaj ĉasisto

Laŭdkanto pri lerta kaj belaspekta ĉasisto.

Kolringo de ĉashundo tintas bele,
aspektas ĝia mastro ja sincere.

Ĉashundoj portas koltintilojn du,
La mastro havas buklojn de nigr-blua'.

Tintiloj ĝiaj aŭdiĝas belsone,
li lertas en ĉasad' senfanfarone.

敝笱

敝笱在梁，其鱼鲂鰈。齐子归止，其从如云。
敝笱在梁，其鱼鲂𩚰。齐子归止，其从如雨。
敝笱在梁，其鱼唯唯。齐子归止，其从如水。

Truhava fiŝkapta korbo

Satiro pri skandalo de Wen Jiang kaj Duko Xiang de Qi-regno (vd. "Suda monto").

En truhava korb' fiŝkapta
fiŝoj naĝas en libero.
Ŝi revenas kun sekvantoj
kiel nuboj sur ĉielo.

En truhava korb' fiŝkapta
fiŝoj naĝas kun leĝero.
Ŝi revenas kun sekvantoj
multaj kiel pluv' al tero.

En truhava korb' fiŝkapta
fiŝoj naĝas en pelmelo.

Ŝi revenas kun sekvantoj
multaj kiel akv-prospéro.

载驱

载驱薄薄，簟茀朱鞅。鲁道有荡，齐子发夕。
四骖济济，垂辔泠泠。鲁道有荡，齐子岂弟。
汶水汤汤，行人彭彭。鲁道有荡，齐子翱翔。
汶水滔滔，行人儻儻。鲁道有荡，齐子游遨。

Ĉarveturo

Satiro pri Damo Wen Jiang, la edzino de Duko Huan de Lu-regno.

Ĉaro kuras kun sonora knaro,
kurtenita per leda dekoro.
Vojo de Lu-regn' ebenas glate,
ŝi revenas haste en nokt-horo.

Tirĉevaloj kvar galopas pace,
kun bridar' pendanta de la kolo.
Vojo de Lu-regn' ebenas glate,
ŝi ekiras frue ĉe aŭroro.

La rivero torentfluas vaste,
homoj haltas por vidi kun folo.
Vojo de Lu-regn' ebenas glate,
ŝi veturas hejmen kun frivolo.

La river' rapide kuras larĝe,
homoj pririgardas kun fervoro.
Vojo de Lu-regn' ebenas glate,
ŝi ekskursas hejmen kun honoro.

猗嗟

猗嗟昌兮，颀而长兮。抑若扬兮，美目扬兮。巧趋跄兮，射则臧兮。
猗嗟名兮，美目清兮。仪既成兮，终日射侯。不出正兮，展我甥兮。
猗嗟娑兮，清扬婉兮。舞则选兮，射则贯兮。四矢反兮，以御乱兮。

Juna arkpafisto

Laŭdkanto pri lerta arkpafisto.

Kiel forta kaj fortika li 'stas!
Li tre altas kun rekta staturo.

Lia frunto angulece platas,
l' okulparo belas sen mezuro.
li sin movas vere kun facilo.
lertas li arkpafi en konkuro.

Kiel li aspektas vigloplene!
belas, klaras lia okulparo.
Li arkpafas dum la tuta tago
en falango neta de batalo.
Celon pafas li per ĉiu sago,
fil' neniuj 'stas lia rivalo.

Kiel belaspekta li 'stas vere!
L' okulparo ja kun brava brilo.
Li laŭritme dancas kun gracio,
ĉiu pafo trafas sen oscilo
kaj kvar sagoj pikas en la celon.
Li 'stas pafa majstr' en militiro.

魏风

Kantoj kolektitaj en Vej-regno de Zhou-dinastio (en nuna Shanxi-provinco)

葛屨

纠纠葛屨，可以履霜？掺掺女手，可以缝裳？要之襍之，好人服之。
好人提提，宛然左辟，佩其象揅。维是褊心，是以为刺。

Pajl-sandaloj

Satiro de servistino pri ŝia fierma mastrino.

Kun trivitaj pajl-sandaloj piede
ĉu mi povus treti sur prujno-gelo?
Per delikataj kaj gracilaj fingroj
ĉu mi kudrus kostumon en mizero?
Post preparo de l' vesto por mastrino,
ŝi mem ĝin venas provi kun fiero.

Kvankam ŝi en ĝi komfortsentas vere,
ŝi sin turnas de mi kaj min ignoras,
ŝi ŝovas pinglon en harojn leĝere.
Kia etanima virino ŝi 'stas!
Mi kantas por sarkasmi ŝin kolere.

汾沮洳

彼汾沮洳，言采其莫。彼其之子，美无度。美无度，殊异乎公路。
彼汾一方，言采其桑。彼其之子，美如英。美如英，殊异乎公行。
彼汾一曲，言采其蕒。彼其之子，美如玉。美如玉，殊异乎公族。

Ĉe riverbordo

Virino laŭdas sian amaton pro ties bonvirto.

Ĉe riverbordo, kie akv' torentas,
li plukas akvokresojn okupite.
Vidu tiun junulon laboreman,
li belaspektas netimide.
Li belaspektas netimide,
malsama ol la dandoj memkonfide.

Ĉe riverbordo trans alia flanko,
kolektis li morusfoliojn pene.
Vidu tiun junulon diligentan,
li flore belas senĉagrene.
Li flore belas senĉagrene,
malsama ol principidoj ridserene.

Ĉe la turniĝo de la riverbordo,
deŝiras li akvherbojn asidue.
Vidu tiun junulon energian,
li tenas bonvirtecon ja senskue.
Li tenas bonvirtecon ja senskue,
malsama ol ranguloj moral-ĝue.

园有桃

园有桃，其实之肴。心之忧矣，我歌且谣。不知我者，谓我士也骄。彼人是哉，子曰何其？
心之忧矣，其谁知之？其谁知之，盖亦勿思！
园有棘，其实之食。心之忧矣，聊以行国。不知我者，谓我士也罔极。彼人是哉，子曰何其？
心之忧矣，其谁知之？其谁知之，盖亦勿思！

Persikoj en ĝardeno

Poeto lamentas pri nekomprenemo de l' aliaj al si mem.

Persikoj en ĝarden' maturaj
ja povas min satigi plene.
Sed tio igas min kortrista,
mi zumas kanton malserene.
Tiuj, kiuj ne konas min mem,
diras: fieras vi miene.
Ĉu ili ja asertas prave ?
Tion diru al mi senĝene.
Mi plenas de tristo enkore,
ne homo konas min komprene.
Neniu min komprenas vere,
mi ne plu cerbumu ĉagrene.

Jujuboj en ĝarden' maturaj
min nutris povas ĝis plensato.
Sed tio faras min kortrista,
mi promenas laŭ mia ŝato.
Tiuj, kiuj ne konas min mem,
diras: vi estas stulta frato.
Ĉu ili ja asertas ĝuste?
Do min admonu per persvado.
Je tristo mia koro plenas,
kiu scias pri mia stato?
Ne homo konas mian koron,
mi volu muti sen debato.

陟岵

陟彼岵兮，瞻望父兮。父曰：嗟！予子行役，夙夜无已。上慎旃哉，犹来无止。
陟彼屺兮，瞻望母兮。母曰：嗟！予季行役，夙夜无寐。上慎旃哉，犹来无弃。
陟彼冈兮，瞻望兄兮。兄曰：嗟！予弟行役，夙夜必偕。上慎旃哉，犹来无死。

Sopirema soldato

Soldato sopiras al siaj familianoj en imago.

Starante sur la verda monto,
rigardas paĉjon mi de foro.
Li diras: “Ho, ve ! mia filo,
vi servas nun en militiro,
vi restas en mia memoro.
Zorgu pri vi sen maltrankvilo,
revenu frue pli kun gloro.”

Starante sur la kalva monto,
rigardas panjon mi de foro.
Ŝi diras: “Ho ve! mia filo,
vi nun ’stas en trupa defilo,
vi vin trovas en mia koro.
Vin gardu bone sen gracilo,
rehejmiĝu en frua horo.”

Starante sur herbriĉa monto,
rigardas fraton mi de foro.
Li diras: “Ho ve, mia frato,
vi nun servas kiel soldato,
mi tenas vin en mia koro.
Atentu pri via sanstato,
nu, rehejmiĝu sen langvoro!”

十亩之间

十亩之间兮，桑者闲闲兮，行与子还兮。
十亩之外兮，桑者泄泄兮，行与子逝兮。

Kolektantoj de morusfolioj

Kanto de moruskolektantoj.

En dek akreoj da moruskampo
kolektantoj laboras libere
kaj ĝoje hejmeniras vespere.

Ekster tiu vasta moruskampo
kolektantoj vivas harmonie
kaj ripozas vere senanksie.

伐檀

坎坎伐檀兮，置之河之干兮。河水清且涟猗。不稼不穡，胡取禾三百廛兮？不狩不猎，胡瞻尔庭有县貆兮？彼君子兮，不素餐兮！

坎坎伐辐兮，置之河之侧兮。河水清且直猗。不稼不穡，胡取禾三百亿兮？不狩不猎，胡瞻尔庭有县特兮？彼君子兮，不素食兮！

坎坎伐轮兮，置之河之漘兮。河水清且沦猗。不稼不穡，胡取禾三百困兮？不狩不猎，胡瞻尔庭有县鹑兮？彼君子兮，不素飧兮！

Kanto de arbohakistoj

Satiro pri tiuj parazitaj de la reganta klaso.

Hak! hak! ni faligas arbojn per hakilo,
kaj stakigas lignojn apud la rivero
kie akvaj fluoj kaj ondetoj klaras.
Tiuj nek plugas nek plantas en mizero,
sed posedas tri cent garbojn da rizplantoj.
Tiuj nek ĉasas nek predkaptas kun peno
sed pendigas la ĉasaĵojn sur dommuroj.
Tiuj lordoj ĝuas jen de riĉaĵpleno,
ili vivas sen ĝeno kaj sen ĉagreno.

Hak!hak! ni faligas arbojn por radspokoj,
kaj almetas lignojn borde de l' rivero
kie pura akvo fluas en torento.
Tiuj nek plugas nek plantas en sufero,
sed proprigas tri mil garbojn da grenplantoj.
Tiuj nek ĉasas nek predkaptas kun peno
sed pendigas ĉasajn predojn sur domtraboj.
Tiuj lordoj ĝuas jen kun ridmieno,
ili vivas sen ĉagreno kaj sen ĝeno.

Hak!hak! ni faligas arbojn por rad-faro,
kaj stokigas lignojn borde de l' rivero
kie pura akvo fluas, ondoj ludas.
Tiuj nek plugas nek plantas sen prefero,
sed ekhavas tri mil faskojn da grenplantoj.
Tiuj nek ĉasas nek predkaptas kun ĝemo
sed pendigas birdajn predojn sur aleroj.

Tiuj lordoj ĝuas sub ĉiela beno.
ili vivas sen amaro kaj sen spleno.

硕鼠

硕鼠硕鼠，无食我黍！三岁贯女，莫我肯顾。逝将去女，适彼乐土。乐土乐土，爰得我所。
硕鼠硕鼠，无食我麦！三岁贯女，莫我肯德。逝将去女，适彼乐国。乐国乐国，爰得我直。
硕鼠硕鼠，无食我苗！三岁贯女，莫我肯劳。逝将去女，适彼乐郊。乐郊乐郊，谁之永号？

Kampmuso

Satiro kontraŭ la reganta klaso, kiu estas komparata al kampmuso.

Kampmuso, kampmuso, ja plu ne
ŝtelmanĝu for de mi milion.
Trijare mi servis vin, ĉu ne?
Kompense mi gajnis nenion.
Forlasos de vi mi sen ĝeno
al land' ĝojbrila, trankvila.
Ĝojbrila, trankvila tereno ——
Jen mia loĝloko stabila.

Kampmuso, kampmuso ja plu ne
ŝtelmanĝu for de mi avenon
Trijare mi servis vin, ĉu ne?
Sendankas vi mian ŝvitpenon.
Forlasos de vi mi sen ĝeno
al land' la ĝojbrila, trankvila.
Ĝojbrila, trankvila tereno ——
Forpreno via malfacila.

Kampmuso, kampmuso, ja plu ne
ŝtelronĝu jen mian grenplanton.
Trijare mi servis vin, ĉu ne?
Neglektas vi l' favordonanton.
Forlasos de vi mi sen ĝeno
al rur' la ĝojŝenta, silenta.
Ĝojŝenta, silenta tereno ——
Jen mia vivado senplenda.

唐风

Kantoj kolektitaj en Tang-regno de Zhou-dinastio (en nuna Shanxi-provinco)

蟋蟀

蟋蟀在堂，岁聿其莫。今我不乐，日月其除。无已大康，职思其居。好乐无荒，良士瞿瞿。
蟋蟀在堂，岁聿其逝。今我不乐，日月其迈。无已大康，职思其外。好乐无荒，良士蹶蹶。
蟋蟀在堂，役车其休。今我不乐，日月其慆。无已大康，职思其忧。好乐无荒，良士休休。

Griloj

Poeto admonas al si kaj la aliaj, ke oni devas ĝui tempon, sed ne ekscese.

Griloj ĉirpas en la halo,
jar' tuj iros al la fino.
Se ni ne la tempon kaptas,
ĵetos ĝojon ni al ŝlimo.
Sed ni ne ĝuadas troe,
ni laŭ devo agu bone.
Kaj distriĝi kaj labori
bakas homon ja bontone.

Griloj krias en la domo,
jar' forpasos senrevene.
Se ni ne la tempon tenas,
ni ne povas ĝui plene.
Sed ni ne ekscese gajas,
ni laŭ devo agu bele.
Kaj distriĝi kaj labori
puŝas vian vivon vele.

Griloj zumas ĉe la pordo,
tuj al fino iros jaro
Se ni ne retenus tagojn,
ni ne vivus en nektaro.
Sed ni ne ekstreme ĝojas,
agu ni laŭ dev' prefere.
Kaj distriĝi kaj labori
vin ĝojigas feliĉ-cele.

山有枢

山有枢，隰有榆。子有衣裳，弗曳弗娄。子有车马，弗驰弗驱。宛其死矣，他人是愉。
山有栲，隰有杻。子有廷内，弗洒弗扫。子有钟鼓，弗鼓弗考。宛其死矣，他人是保。
山有漆，隰有栗。子有酒食，何不日鼓瑟？且以喜乐，且以永日。宛其死矣，他人入室。

Kial ne?

Ironia kanto pri avaremulo.

La ulmoj kreskas sur la monto,
abioj staras en la valo.
Vi havas vestojn en la kesto,
kial ne volvi vin per vesto?
Ne mankas al vi rajd-ĉevalo?
Kial ne uzi ĝin por iro?
Nu, se vi mortos laŭ fatalo
ĝin oni gajnos laŭ deziro.

Sur la monto kreskas cedreloj,
montpiede staras tibioj.
Vi havas korton kaj domhalon,
kial ne purigi kun scio?
Vi havas gongon kaj tamburon?
Kial ne frapi ilin rite?
Se malfeliĉe vi formortus,
oni rabos ilin rapide.

Lakarboj kreskas sur deklivo,
sube la kaŝtanoj staras.
Vi havas vinon kaj frandaĵon,
kial vi ilin akaparas?
Kial ne frandi nek gustumi,
kial ne vin subteni bone?
Se vi mortaĉos laŭ sortbato,
ĝin oni manĝos laŭbezzone.

扬之水

扬之水，白石凿凿。素衣朱褱，从子于沃。既见君子，云何不乐？
扬之水，白石皓皓。素衣朱绣，从子于鹄。既见君子，云何其忧？
扬之水，白石粼粼。我闻有命，不敢以告人。

Nia princo

Oni malpacience atendas ke la princo sukcedos la tronon.

La roĵo fluas kun murmuro,
videblas ŝtonoj blankaj klare.
En vesto kun kolumo ruĝa
ni certe sekvas vin lojale.
Ni jam vin vidas, nia princo,

kial ne ĝoji joviale?

La roĵo fluas kun susuro,
elstaras roĵoj blankaj vere.
En vesto kun manikoj ruĝaj
ni strikte sekvas vin espere.
Ni jam vin vidas, kara princo,
kial ne aspekti fiere?

La roĵo fluas kun lirlado,
naĝas ŝtonoj blankaj en ondo.
Ĝus venis sekreta ordono,
ni ĝin obeas kun volonto.

椒聊

椒聊之实，蕃衍盈升。彼其之子，硕大无朋。椒聊且，远条且。
椒聊之实，蕃衍盈匊。彼其之子，硕大且笃。椒聊且，远条且。

Pipraj semoj

Laŭdkanto al la fekunda virino.

La semoj en grapoloj de piprujo
jam plenas en vazego superflue.
Tiu virino alte bonstaturas,
ŝi naskadas belajn idojn senbrue.
La pipraj semoj disŝutas ĉirkaŭen
kaj reprodukiĝas oble pluplue.

La semoj en grapoloj de piprujo
plenas en mankavoj kun bonodoro.
Tiu ino staras kun dika korpo,
ŝi fekundas oftege sen langvoro.
La pipraj semoj disŝutas sur teron
kaj ĝermas kaj fruktiĝas kun fervoro.

绸缪

绸缪束薪，三星在天。今夕何夕，见此良人？子兮子兮，如此良人何？
绸缪束刳，三星在隅。今夕何夕，见此邂逅？子兮子兮，如此邂逅何？
绸缪束楚，三星在户。今夕何夕，见此粲者？子兮子兮，如此粲者何？

Nupta kanto

Novedzino ekscitiĝas ĉe nupta nokto.

Brulligno faske kunligitas firme,
kiam tri steloj brilas sur ĉielo.
Kio okazos al mi en ĉi-nokto?
Mi novedzon vidos en kandelhelo.
Ho, li ĉi tie restos, li ĉi tie,
kiel ni noktu kune en mielo?

Paŝt-herbojn faske kunligitas strikte,
kiam tri steloj flagras sur ĉielo.
Kio okazos al mi en ĉi-nokto?
Mi renkontos la novedzon de belo.
Ho, li ĉi tie restos, li ĉi tie,
kiel ni noktu kune kun sincero?

Dorn-vergojn garbe kunligitas streĉe,
kiam tri steloj glimas sur ĉielo.
Kio okazos al mi en ĉi-nokto?
Novedzo venos al mi ĉe vespero.
Ho, li ĉi tie restos, li ĉi tie,
kiel ni noktu kune en libero?

秋杜

有秋之杜，其叶湑湑。独行踽踽。岂无他人？不如我同父。嗟行之人，胡不比焉？人无兄弟，胡不依焉？

有秋之杜，其叶菁菁。独行晬晬。岂无他人？不如我同姓。嗟行之人，胡不比焉？人无兄弟，胡不依焉？

Sola pirarbo

Kanto de vagabondo.

La pirarbo staras sola
kun folioj en prospero.
Mi ja vagabondas ĉien
sen karulo sur ĉi sfero.
Ho, sur voj' neniŭ karas
al mi kiel patr' tenera
zorgas min en ĉiu flanko.
Ĉe mi sen la frat' fidela
blinde iras mi izola.

La pirarbo sola staras
kun folioj en abundo.

Kiel vagabond' mi iras
jen sencele kun kor-vundo.
Ho, neni min ignoras
kiel panjo kun prefero
min prizorgas jen bonkore.
Ĉe mi sen frat' de fidelo
dum vivvojo mi amaras.

羔裘

羔裘豹祛，自我人居居。岂无他人？维子之故。
羔裘豹褰，自我人究究。岂无他人？维子之好。

Ŝafidfela survesto

Malestimo al la fieraco de nobelo.

Vi en peltaĵ' el ŝafidfelo
konduktas al ni ja fiere.
Ĉu povas trovi ni la ĉefon,
kiu prizorgas nin prefere?

Vi en survesto ŝafidfela
rigardas nin kun malestimo.
Ĉu povas serĉi ni la ĉefon,
kiu nin regas kun intimo?

鸛羽

肃肃鸛羽，集于苞栩。王事靡盬，不能蓺稷黍。父母何怙？悠悠苍天，曷其有所？
肃肃鸛翼，集于苞棘。王事靡盬，不能蓺黍稷。父母何食？悠悠苍天，曷其有极？
肃肃鸛行，集于苞桑。王事靡盬，不能蓺稻粱。父母何尝？悠悠苍天，曷其有常？

Plendo de kampuloj

Kampulo plendas, ke ili ne povas vivteni la familion pro peza servuto.

Sovaĝanseroj svingas flugilparon
starante sur branĉoj de kverkoj are.
Servut' de regno multas ja senfine,
grenplantojn ni ne povas plu kultivi,
per kio nutri gepatrojn rutine?
Ho, la ĉielo, alta la ĉielo!
Kiam ni povos vivi kun espero?

Sovaĝanseroj svingas flugilparon

starante nun sur jujubarboj grupe.
Servut' de regno multas senmezure,
rizplantojn ni ne povas plu kreskigi,
per kio nutri gepatrojn sekure?
Ho, la ĉielo, alta la ĉielo!
Kiam ni vivos sur solida tero?

Sovaĝanseroj frapas flugilparon
starante sur morusarboj trupe.
Servut' de regno multas miriade,
maizojn ni ne povas plu kulturi,
per kio nutri gepatrojn ĝissate?
Ho, la ĉielo, alta la ĉielo!
Kiam ni povos vivi en libero?

无衣

岂曰无衣？七兮。不如子之衣，安且吉兮。
岂曰无衣？六兮。不如子之衣，安且燠兮。

Ĉu vestoj mankas?

Poeto aprezas la vestojn faritaj de ŝi.

Ĉu al mi mankas vestoj disponeblaj?
Mi havas sep, sed donas ne komforton.
La vestoj far ŝi al mi nun haveblaj
aspektas bele, vibrigas korkordon.

Ĉu al mi mankas vestoj disponeblaj?
Mi havas ses, sed donas ne kontenton.
La vestoj far ŝi al mi nun haveblaj
aspektas bele, montras egan tenton.

alia versio:

Ĉu al mi mankas vestoj?
Mi havas sep,
sed mi min sentas pli komforta
en vestoj el ŝia steb'.

Ĉu al mi mankas vestoj?
Mi havas ses,
sed mi min sentas pli kontenta
en vestoj sub ŝia kares'.

有杕之杜

有杕之杜，生于道左。彼君子兮，噬肯适我？中心好之，曷饮食之？
有杕之杜，生于道周。彼君子兮，噬肯来游？中心好之，曷饮食之？

Pirarbo sola staras

Poeto esprimas sian senton al tiu, kiun li amas

Pirarbo sola staras firme
live de la vojo ebena.
Vi, kiun mi admiras kore
proksimiĝas al mi tristplena.
Mi tenas vin jen en la koro,
vin regalias per manĝo bona.

Pirarbo sola staras rekte
jen dekstre de la vojo glata.
Vi, kiun mi adoras kore
aliras al mi ĝen-mordata.
Mi ŝatas vin jen en la menso,
vin regalias per manĝ' senflata.

葛生

葛生蒙楚，葭蔓于野。予美亡此，谁与独处？
葛生蒙棘，葭蔓于域。予美亡此，谁与独息？
角枕粲兮，锦衾烂兮。予美亡此，谁与独旦？
夏之日，冬之夜。百岁之后，归于其居。
冬之夜，夏之日。百岁之后，归于其室。

Elegio

Edzino kondolencas sian edzon en la tombo.

Lianoj rampas sur dornaĵojn,
herbaĉoj kreskas ja prospere.
Karulo mia kuŝas ene,
kiu restus kun li prefere?

Lianoj etendiĝas disen,
herbaĉoj kovras veprojn plene.
Sinjoro mia dormas ene,
kiu lin akompanus pene?

Lia kapkuseno helbrilas
littuko riĉas en koloro.
Nun mia edzo restas ene,
kiu lin vartus ĝis aŭroro

Someraj varmaj tagoj longas,
la vintro frostas kun rigoro.
Nu, post cent jaroj en sufero
mi restos kun li en soporo.

La vintro gelas tre severe.
la tagoj longas en somero.
Nu, post centjara sintreniĝo
mi kunos kun li en mortkelo.

采苓

采苓采苓，首阳之巔。人之為言，苟亦無信。舍旃舍旃，苟亦無然。人之為言，胡得焉？
采苦采苦，首阳之下。人之為言，苟亦無與。舍旃舍旃，苟亦無然。人之為言，胡得焉？
采葑采葑，首阳之東。人之為言，苟亦無從。舍旃舍旃，苟亦無然。人之為言，胡得焉？

Onidiro

Poeto admonas, ke oni ne akceptu onidirojn.

Ĉu dolĉ-herbojn oni povus pluki
sur la pinto de la monto alta?
L' onidiro kuras disen vaste,
ne konigu ĝin per ago salta.
Ĝin ne kredu, tute ĝin ne kredu!
Estas ĝi senbaza onidiro.
Se ni ĝin facile ja akceptas,
ĝi iras kontraŭ nia deziro.

Ĉu laktukojn oni povus pluki
sur la pinto de la monto kalva?
L' onidiro kuras disen larĝe,
ne konigu ĝin per ag' malprava.
Ĝin ne kredu, tute ĝin ne kredu!
Estas ĝi senbaza la malvero.
Se ni ĝin facile ja akceptas,
ĝi iras kontraŭ nia espero.

Ĉu rapojn eltiri oni povus
oriente de la mont' apika?

L' onidiro kuras disen prompte,
ne konigu ĝin al rond' amika.
Ĝin ne kredu, tute ĝin ne kredu!
Estas ĝi senbaza la mensogo.
Se ni ĝin facile ja akceptas,
nin do trafos aliula moko.

秦风

**Kantoj kolektitaj en Qin-regno de Zhou-dinastio (en nuna
Shaanxi)**

车邻

有车邻邻，有马白颠。未见君子，寺人之令。
阪有漆，隰有栗。既见君子，并坐鼓瑟。今者不乐，逝者其耄。
阪有桑，隰有杨。既见君子，并坐鼓簧。今者不乐，逝者其亡。

Kaleŝo kuras

Nobelo urĝas, ke oni ĝuu plezuron kiel eble plej frue.

Kaleŝo kuras kun rulanta sono,
jen tirĉevalo blanka henas klare.
Anta ŭ ol vidi la nobelan lordon,
atendas ni lian ordonon stare.

Sur monto kreskas verda vernis-arbo,
kaŝtanarbo staras sur la val-tero.
Ĉe l' lordo sidas ni pacienco
ludatas muzikiloj en leĝero.
“Se vi ne ĝuas la plezuron tuj nun,
vi ĉe grandaĝo mortos en mizero.”

Sur monto kreskas freŝaj morus-arboj,
la sveltaj poploj staras en la valo.
Ĉe l' lordo sidas ni obeeme
apud la muzik-bando en la halo.
“Se vi ne ĝuas la plezuron tuj nun,
vi ĉe grandaĝo mortos en fatalo.”

駉驥

駉驥孔阜，六轡在手。公之媚子，从公于狩。
奉时辰牡，辰牡孔硕。公曰左之，舍拔则获。
游于北园，四马既闲。輶车鸾镳，载猷歇骄。

Ĉasado de Duko

Priskribado pri ĉasado de Duko.

Tenante ses bridrimenojn de
kvar stalonoj nigraj en mano,
Duko iras ĉasi impone
kun sekvantoj sur la savano.

Jen kuras grasaj predoj ĉie,

ĝuste por oferaĵoj kulte.
Li nun ordonas: “Pafu liven!”
Pafitaj predoj falas multe.

Li iras al la parko norda,
la ĉevaloj trotras leĝere.
La kaleŝo tintas sur vojo,
la ĉashundoj bojas fiere.

小戎

小戎賃收，五檠梁輶。游环胁驱，阴靽鋈续。文茵畅毂，驾我骐驎。言念君子，温其如玉。
在其板屋，乱我心曲。
四牡孔阜，六轡在手。骐驎是中，騊駼是驂。龙盾之合，鋈以觶軛。言念君子，温其在邑。
方何为期？胡然我念之。
賃驎孔群，公矛鋈錡。蒙伐有苑，虎韞镂膺。交韡二弓，竹闭緼滕。言念君子，载寝载兴。
厌厌良人，秩秩德音。

Militĉaro

Edzino sopiras al sia edzo en militiro.

Malgranda lia militĉaro,
volvitas ĝi per led-striaro.
Tra ringoj iras bridrimenoj,
du ĉevaloj trotras sen ĝenoj.
Sidilon kovras tigra felo,
tirbestoj kuras sub vip-pelo.
Sopire al mia sinjoro
milda kiel gema trezoro,
mi sidas muta en kabano
kun koro en mizera bano.

Impone kvar stalonoj iras,
li ses bridorimenojn tiras.
Ĉevaloj nigraj du interas
kaj du flavaj bestoj eksteras.
Du drak-ŝildoj sidas ĉe po alo,
kunas bridoj, ringoj en paro.
Sopire al mia karulo
kun mola, tenera naturo,
mi esperas, ke li rapide
revenu hejmen senhezite.

Kvar ĉevaloj trotras leĝere,

brilas tridenta lanc' fiere.
Granda ŝildo belas plenbrave,
sagujo fela sidas pave.
Mi sopiras al li ja morne
ve, ĉu ensonĝe ĉu maldorme.
Kondutas ĉiam li kun mildo,
li estas homo kun bonvirto.

蒹葭

蒹葭苍苍，白露为霜。所谓伊人，在水一方。溯洄从之，道阻且长。溯游从之，宛在水中央。
蒹葭萋萋，白露未晞。所谓伊人，在水之湄。溯洄从之，道阻且跻。溯游从之，宛在水中坻。
蒹葭采采，白露未已。所谓伊人，在水之涘。溯洄从之，道阻且右。溯游从之，宛在水中沚。

Kie ŝi estas?

Ama liriko.

Fragmitoj verdas en prospero,
la blanka ros' prujniĝas fride.
Kie ŝi estas, ĉarmulino?
Ŝi loĝas fore trans rivero.
Mi ŝin serĉadas kontraŭflue,
la vojo longas kaj malglatas.
Laŭflue mi ŝin serĉas pene,
ŝi ŝajnas en akvmezo skue.

Fragmitoj densas en abundo,
la blanka ros' ankoraŭ sekas.
Kie ŝi estas, belulino?
Ŝi foras sur humida grundo.
Mi ŝin serĉadas kontraŭflue,
la vojo longe malfacilas.
Laŭflue mi ŝin serĉas strebe,
ŝi staras sur sablej' senbrue.

Fragmitoj densas en abundo,
blanka ros' ankoraŭ ne sekas.
Kie ŝi estas, belulino?
Ŝi distas sur la transa bordo.
Mi ŝin serĉadas kontraŭflue,
la vojo longe serpentumas.
Laŭflue mi ŝin serĉas reve,
ŝi nestas sur insul' vivĝue.

终南

终南何有？有条有梅。君子至止，锦衣狐裘。颜如渥丹，其君也哉！
终南何有？有纪有堂。君子至止，黻衣绣裳。佩玉将将，寿考不亡！

La Suda Monto

Knabino en la Suda Monto admiras la junulon, kiu eniras la monton.

Kio sur la Suda Mont' troviĝas?
Sorparboj, plumarboj en prospero.
Jen junul' alvenas al la monto.
en peltaĵo kaj satenmantelo.
Liaj vangoj ruĝas kiel floro,
kia viro kun aspekt' de belo!

Kio sur la Suda Mont' sin trovas?
Pirarboj, lakarboj sub sunbrilo.
Jen junul' alvenas al la monto,
en brokita vest' kun ora vilo.
Tintas liaj jadpendaĵoj klare,
Kia okulplaĉa vir-profilo!

黄鸟

交交黄鸟，止于棘。谁从穆公？子车奄息。维此奄息，百夫之特。临其穴，惴惴其栗。彼苍者天，歼我良人！如可赎兮，人百其身！
交交黄鸟，止于桑。谁从穆公？子车仲行。维此仲行，百夫之防。临其穴，惴惴其栗。彼苍者天，歼我良人！如可赎兮，人百其身！
交交黄鸟，止于楚。谁从穆公？子车针虎。维此针虎，百夫之御。临其穴，惴惴其栗。彼苍者天，歼我良人！如可赎兮，人百其身！

Orioloj

La historia fakto diras, kiam Duko Mu de Qin-regno mortis (620 a. K.), 147 vivantoj estis ankaŭ enterigitaj en lia tombo. La poemo lamentas pri tri talentuloj el tiuj viktimoj.

Orioloj ĉirpas triste
kaj sur veprobranĉojn falas.
Kiu sekvas mortan Dukon?
Ziche l' talentul' fatalas.
En saĝeco eĉ neniu
povas lin superi plene.
Ĉe la mazoleo sombra
li timegas ja ekstreme.
Ho, l' ĉielo senkompata,

kial li mortaĉu viva?
Se li povus vivi ree,
certe estus li aktiva.

Orioloj ĉirpas triste
kaj sur morusarbojn staras.
Kiu sekvas mortan Dukon?
Zhongxing l' talentul' amaras.
En klereco eĉ neniu
povas lin konkeri certe.
Ĉe la mazoleo sombra
li timegas ja inerte.
Ho, l' ĉielo senkompata,
kial mortu li tragike?
Se li povus vivi ree,
pensus certe li pli dike.

Orioloj ĉirpas triste
kaj sur veprovergoj nestas.
Kiu sekvas mortan Dukon?
Zhenhu l' talentul' kunestas.
En dikteco eĉ neniu
povas lin transpasi multe.
Ĉe la mazoleo sombra
li timegas kor-tumulte.
Ho, l' ĉielo senkompata,
kial mortu li domaĝe?
Se li povus vivi ree,
li paradus pli kuraĝe.

晨风

馱彼晨风，郁彼北林。未见君子，忧心钦钦。如何如何，忘我实多！
山有苞栢，隰有六驳。未见君子，忧心靡乐。如何如何，忘我实多！
山有苞棣，隰有树檖。未见君子，忧心如醉。如何如何，忘我实多！

Sopiremo

Virino sopiras al sia amato.

Nizo flugas per matena vento
kaj sin kaŝas norde en arbaro.
Mi ne vidas, ve, amaton mian,
ĉagreniĝas, ho, mi kun amaro.
Kial min molestas la destino?

Dronas mi en lia forges-mar.

Sur la monto kreskas kverkoj dense,
jen ses ulmoj staras en la valo.
Mi ne vidas, ve, amaton mian,
min doloras forte la kor-knaro.
Kial min turmentas la destino?
Li jam min forgesas en realo.

Sur la monto kreskas la prunarboj,
sube la pirarboj sur val-tero.
Mi ne vidas, ve, amaton mian,
mi suferas kvazau en mizero.
Kial min torturas la destino?
Li jam min forgesas kun kruelo.

无衣

岂曰无衣？与子同袍。王于兴师，修我戈矛。与子同仇！
岂曰无衣？与子同泽。王于兴师，修我矛戟。与子偕作！
岂曰无衣？与子同裳。王于兴师，修我甲兵。与子偕行！

Militirado

Kanto de soldatoj, kiuj dividas ĝojon kaj mizeron en militirado.

Ĉu vi ne havas veston vere?
Ni portas samajn la armaĵojn.
Antaŭ ol lukti ordonpele,
riparu ni glavojn kaj lancojn.
Batalos ni ja kuraĝ-ŝvele.

Ĉu vi ne havas veston vere?
Ni portas samajn la tunikojn.
Antaŭ ol lukti ordonpele,
riparu ni nun halebardojn.
Batalos ni brave fiere.

Ĉu vi ne havas veston vere?
Ni portas samajn la kirasojn.
Antaŭ ol lukti ordonpele,
ordigu ni nun militrobojn.
Batalos ni ĝis fin' prefere.

渭阳

我送舅氏，曰至渭阳。何以赠之？路车乘黄。
我送舅氏，悠悠我思。何以赠之？琼瑰玉佩。

Adiaŭado

Kanto pri intima rialto de nevo kaj onklo dum adiaŭado.

Mi forsendas mian onklon
al la bordo de l' rivero.
Kio 'stas donaco al li?
La kaleŝ' kun luksa belo.

Mi forsendas mian onklon,
pensas mi pri panjo kara.
Kio 'stas donaco al li?
Jadpendaĵo tre kristala.

权輿

於我乎，夏屋渠渠，今也每食无余。于嗟乎，不承权輿！
於我乎，每食四簋，今也每食不饱。于嗟乎，不承权輿！

Pli bona pasinteco

Plendo de dekadencinta nobelo.

Ho, mi
loĝis ja en luksa domo,
sed nun jam fariĝas malsatanta homo.
Ho ve! ol la pasinteco,
nuno havas ja malpli da bono.

Ho, mi
iam manĝis ja kvar pladojn da legomoj,
sed nun mi malsatas kiel la fantomo.
Ho ve! ol la pasinteco
nuno havas ja malpli da bono.

陈风

**Kantoj kolektitaj en Chen-regno de Zhou-dinastio (en nuna
Henan-provinco)**

宛丘

子之汤兮，宛丘之上兮。洵有情兮，而无望兮。
坎其击鼓，宛丘之下。无冬无夏，值其鹭羽。
坎其击缶，宛丘之道。无冬无夏，值其鹭翻。

Sorê-dancistino

Poeto esprimas sian korinklinon al sorê-dancistino.

Sur la alta duno dancas
vi gracie kun leĝero.
Mi jam enamiĝas al vi,
sed mi vanas kun despero.

Sube de la alta duno
vi tamburon batas sone.
Ĉu en vintro, ĉu somere,
vi kun plumoj dancas bone.

Sur la vojo al la duno
tintas vazo porcelana.
Ĉu en vintro, ĉu somere,
dancas vi kun ĉapo lana.

东门之枌

东门之枌，宛丘之栩。子仲之子，婆娑其下。
穀旦于差，南方之原。不绩其麻，市也婆娑。
穀旦于逝，越以鞿迈。视尔如晷，贻我握椒。

Dancantaj gejunuloj

Amkanto de gejunuloj.

Ulmo staras ĉe eosta pordo,
kverko kreskas sur la duno sabla.
Junulin' de Zizhong-familio
dancas bele kun sento agrabla.

Bona tago estas elektita,
ni kuniras al la suda tero.
Jut-teksadon knabinoj flankmetas,
kaj gracie dancas kun fiero.

Estas bona tag' por rendevuo,
baras al ŝi l' vojon la junulo.
Kun ridetaj vangoj malvofloraj
ŝi donacas florojn de purpuro

衡门

衡门之下，可以栖迟。泌之洋洋，可以乐饥。
岂其食鱼，必河之鲂？岂其取妻，必齐之姜？
岂其食鱼，必河之鲤？岂其取妻，必宋之子？

Kontenteco

Memkonsolo de dekadencintaj nobeloj.

Sub la pordo kun lintelo sola,
sidi aŭ ripozi mi ja povas.
Ĉe river' kun lanta akvofluo
ankaŭ mi manĝon kaj trinkon trovas.

Se mi ja deziras manĝi fiŝon,
ĉu necesas nepre bram' bongusta?
Se mi ja deziras edzinigi,
ĉu necesas nepre in' belbrusta?

Se mi ja deziras manĝi fiŝon,
ĉu necesas nepre karmo franda?
Se mi volas ekhavi edzinon,
ĉu nepras virino eleganta?

东门之池

东门之池，可以沤麻。彼美淑姬，可与晤歌。
东门之池，可以沤纈。彼美淑姬，可与晤语。
东门之池，可以沤菅。彼美淑姬，可与晤言。

Al teksistino

Amkanto al juna teksistino.

En lageto ĉe eosta pordo
oni povas jutajn tigojn rui.
Ho, vi junulino ĉarma, bela,
povas kanti ni por rendevui.

En lageto ĉe eosta pordo

oni povas kanabon maceri.
Ho, fraŭlino, bela kaj alloga,
povas dialogi ni por kveri.

En laĝeto ĉe eosta pordo
oni povas la fragmitojn trempi.
Ho, knabino rava, belaspekta,
staras longe mi por vin atendi.

东门之杨

东门之杨，其叶牂牂。昏以为期，明星煌煌。
东门之杨，其叶肺肺。昏以为期，明星皙皙。

Rendevuo

Amkanto pri rendevuo.

Ĉe l' eosta pordo staras poplo,
folioj susuras en ventpelo.
L' rendevu' fiksitas post vespero,
kiam steloj brilas sur ĉielo.

Ĉe l' eosta pordo staras poplo,
folioj murmuras en ventŝvelo.
L' rendevuo falas post vespero,
kiam steloj glimas kun brilhelo.

墓门

墓门有棘，斧以斯之。夫也不良，国人知之。知而不已，谁昔然矣。
墓门有梅，有鸛萃止。夫也不良，歌以讯之。讯予不顾，颠倒思予。

Kondamnita malbonulo

Kondamno kontraŭ malbonfarantoj.

Veproj ĉe l' tombeja pordo
devas forhakati plene.
Malbonulo malkaŝati
devas al publiko pene.
Se li tarde eksponatas,
plagas ĉiujn li tre ĝene.

Sur prunarbo ĉe tombejo
strigo nestas kun ululo.

Malbonulo avertati
devas per milit-tamburo.
Se li ne obeas spite,
ĉar li estas mava ulo.

防有鵲巢

防有鵲巢，邛有旨苕。谁侑予美？心焉忉忉。
中唐有薳，邛有旨鶯。谁侑予美？心焉惕惕。

Ne kredu!

Poeto sentas ĝenon, kiam lia amatino estas trompita.

Sur la dig' sin trovas piga nesto;
kreskas akvoherboj sur la duno.
Kredu ja neniun, kiu trompas,
alie, mi plenas je trist-puno.

Korto pavimitas per tegoloj;
dunon kovras akvoherboj plene.
Kredu ja neniun, kiu trompas,
alie, mi ĉagreniĝas splene.

月出

月出皎兮，佼人僚兮。舒窈纠兮，劳心悄兮。
月出皓兮，佼人憯兮。舒懣受兮，劳心慄兮。
月出照兮，佼人燎兮。舒夭绍兮，劳心惨兮。

La lunleviĝo

Sub la luno junulo sopiras al belulino.

La luno brilas sur ĉielo,
ŝi ĉarmas des pli sub lunlumo.
Ŝi paŝas lante kun leĝero,
mi ŝin enfermus en brakumo.

La luno lumas kun helbrilo,
ŝi lindas pli kun rava belo.
Ŝi iras lante kun facilo,
mi volus kisi ŝin en ŝtelo.

La lun' radias lumon bele,
ŝi ravas min pli per altiro.

Ŝi pasas lante senŝancele,
mi ŝin sopiras kun admiro.

株林

胡为乎株林？从夏南！匪适株林，从夏南！
驾我乘马，说于株野。乘我乘驹，朝食于株！

Irado al la arbaro

La kanto malkaŝas la intrigon de Duko Liang de Chen-regno (612-590 a. K.) kun la bela sinjorino Xia. Li iris al la arbaro por rendevui kun ŝi sub la preteksto viziti ŝian filon Xia Nan, kiu mortigis lin en 598 a.K.

“Kial vi veturas al l’ arbaro?
Por viziti ŝian filon, ĉu?”
“Mi ne iras al l’ arbaro tamen,
sed renkontos lin, nu.

Mi veturas al l’ arbaro
kaj ripozos dum momento.
Mi do rajdos sur ĉevalo,
matenmanĝos kun ŝi en kontento.”

泽陂

彼泽之陂，有蒲与荷。有美一人，伤如之何？寤寐无为，涕泗滂沱。
彼泽之陂，有蒲与蒿。有美一人，硕大且卷。寤寐无为，中心悁悁。
彼泽之陂，有蒲菡萏。有美一人，硕大且俨。寤寐无为，辗转伏枕。

Ĉe lotusa lageto

Junulino sopiras al la junulo, kiun ŝi renkontis ĉe lotusa lageto.

Ĉe la bordo de lageto
pompas kanoj, lotusfloroj.
Tie staras bela viro,
mi lin amas en la koro.
Mi maldormas en la lito,
larmas mi pro la sinjoro.

Ĉe la bordo de lageto
belas kanoj kaj nimfeoj.
Tie staras bela viro,
bonaspekta kiel feo.
Mi malddormas en la lito,

pikas min amaj ideoj.

Ĉe la bordo de lageto
pimpas kresoj kaj fragmitoj.
Tie staras bela viro,
jen impona en spirito.
Mi maldormas en la lito,
min turmentas am-ekscito.

脍风

**Kantoj kolektitaj en Gui-regno de Zhou-dinastio (en nuna
Henan-provinco)**

羔裘

羔裘逍遥，狐裘以朝。岂不尔思？劳心忉忉。
羔裘翱翔，狐裘在堂。岂不尔思？我心忧伤。
羔裘如膏，日出有曜。岂不尔思？中心是悼。

Ŝafidfela robo

Nobelino sopiras al sia amato.

En ŝafidfela robo vi vin distras,
kaj oficas en vulp-pelta mantelo.
Ĉu ne sopiri povus mi en ĝeno?
Ĉagreno min torturas kun kruelo.

En ŝafidfela rob' vi vin amuzas,
kaj oficas en vulp-pelta mantelo.
Ĉu ne sopiri povus mi en ĝeno?
Sufero min atakas per despero.

La ŝafidfela robo blankas sebe,
kaj glime brilas sub la suna helo.
Ĉu ne sopiri povus mi en ĝeno?
Mi korŝiriĝas tute en mizero.

素冠

庶见素冠兮？棘人栌栌兮，劳心博博兮。
庶见素衣兮？我心伤悲兮，聊与子同归兮。
庶见素韠兮？我心蕴结兮，聊与子如一兮。

Blanka ĉapo

Simpatio al tiu en funebro.

Vi portas blankan ĉapon en funebro,
jam malgraseta por laŭrite stari,
mi vee volus por vi ion fari.

Vi portas blankan veston en funebro,
mi sentas triston kaj ĉagrenon kore,
mi volus simpatii kun vi plore.

Vi portas blankan robon en funebro,
doloras mia koro kun ĉagreno,

mi volus funebri kun sama ĝeno.

隰有苓楚

隰有苓楚，猗傩其枝，天之沃沃，乐子之无知。
隰有苓楚，猗傩其华，天之沃沃。乐子之无家。
隰有苓楚，猗傩其实，天之沃沃。乐子之无室。

Senkonscia arbo

Vivante en tumulta epoko, la poeto lamentas, ke arbo vivas senĝene sen zorgoj pri familio.

Sur basa tero kreskas persikarbo
kun verda foliaro en prospero.
Ĝi senĉagrene fartas en bonsorto,
envias mi pri ĝia senmizero.

Sur basa tero kreskas persikarbo
kun buntaj floroj flirtaj en ventpelo.
Ĝi senĉagrene vivas en bonordo,
envias mi pri ĝia kor-libero.

Sur basa tero kreskas persikarbo
plena je fruktoj sub la suna helo.
Ĝi senĉagrene restas en vegeto,
envias mi pri ĝia viv-leĝero.

匪风

匪风发兮，匪车偈兮。顾瞻周道，中心怛兮。
匪风飘兮，匪车嘌兮。顾瞻周道，中心吊兮。
谁能亨鱼？溉之釜鬯。谁将西归？怀之好音。

Nostalgio

Vagemulo sopiras al sia hejmloko.

Vento donas fortan blovon,
ĉar' galopas kun radknaro.
Rigardas alhejman vojon
mi kun pleno da amaro.

Vent' kirliĝas furioze,
ĉar' kuregas kun sonbruo.
Rigardas alhejman vojon
mi dronanta en larmfluo.

Kiu povas friti fiŝon?
Mi voluntus lavi paton.
Kiu uesten reiras?
jen vizitu mian fraton.

曹风

Kantoj kolektitaj en Cao-regno de Zhou-dinastio (en nuna provinco Shandong)

蜉蝣

蜉蝣之羽，衣裳楚楚。心之忧矣，於我归处。
蜉蝣之翼，采采衣服。心之忧矣，於我归息。
蜉蝣掘阅，麻衣如雪。心之忧矣，於我归说。

Efemero

Lamentado pri la homviva mallongeco.

Efemera flugilparo
glimas kiel luksa vesto.
Ĉagreniĝas mi amare
pri mia lasta viv-resto.

Efemera la plumaro
brilas kiel vesto riĉa.
Ĉagreniĝas mi dolore
pri la fino malfeliĉa.

Efemerido naskiĝas
en neĝblanka mola korpo.
Ĉagreniĝas mi korŝire
pri mia trista mort-mordo.

候人

彼候人兮，何戈与祿。彼其之子，三百赤芾。
维鹄在梁，不濡其翼。彼其之子，不称其服。
维鹄在梁，不濡其味。彼其之子，不遂其媾。
荟兮蔚兮，南山朝隰。婉兮变兮，季女斯饥。

Povraj intendantoj

La poeto montras simpatian al la malaltrangaj intendantoj kaj ironion al malindaj novenomumitaj altranguloj.

Mantenante lancon, halebardon,
povraj intendantoj sen aŭdaco
akompanas tri cent korteganojn
en kostumo ruĝa al palaco.

Pelikanoj kaptas fiŝojn akve
eĉ sen akvi la flugilojn mire.

Tiuj korteganoj kontentiĝas
sed malindas je l' titol' suspire.

Pelikanoj kaptas fiŝojn akve
eĉ sen akvi l' bekon nenifare.
Tiuj altranguloj do fieras
sed favoron perdos jen amare.

Nuboj kaj nebulo jen senlimas,
ĉielarkas sur sudmont' matene.
La filinoj de la intendantoj
nun eltenas malsatadon pene.

鸣鸠

鸣鸠在桑，其子七兮。淑人君子，其仪一兮。其仪一兮，心如结兮。
鸣鸠在桑，其子在梅。淑人君子，其带伊丝。其带伊丝，其弁伊骐。
鸣鸠在桑，其子在棘。淑人君子，其仪不忒。其仪不忒，正是四国。
鸣鸠在桑，其子在榛。淑人君子，正是国人，正是国人。胡不万年？

La kukolo

Laŭdkanto al la bonkonduito de nobluloj.

Kukol' en la nest' sur morusarbo
sep siajn idojn zorge vartas pene.
Reganto bonkonduitas al la plebo
kaj traktas ilin bone kaj konvene.
Se vere traktas ilin ja egale,
li sidas firme sur la tron' senĝene.

Kukolo nestas sur la morusarbo,
inter prunarboj l' idoj flugas fole.
Reganto devas esti grandanima,
silka zono lia blankas kolore.
Se lia zono blankas en koloro,
lia feltĉap' sin montras riĉa glorie.

Kukolo nestas sur la morusarbo,
en veproj l' idoj flugas kun leĝero.
Reganto devas bonkonduiti prave
kaj fari veran bonon kun prefero.
Se li volantas fari bonon vere,
li staras kiel regna la modelo.

Kukolo nestas sur la morusarbo,
inter kverkoj la idoj flugas lude.
Reganto l' ideala agas dece
kaj traktas popolanojn ja malkrude.
Se li kondutas dece kaj konvene,
li vivu milmil jarojn sendispute!

下泉

冽彼下泉，浸彼苞稂。忼我寤叹，念彼周京。
冽彼下泉，浸彼苞萧。忼我寤叹，念彼京周。
冽彼下泉，浸彼苞蓍。忼我寤叹，念彼京师。
芄芃黍苗，阴雨膏之。四国有王，郇伯劳之。

Subtera fonto

Kanto pri sopiremo.

Tufoj da hundvostaj herboj dronas
en la frida fluo el la fonto.
Vekiĝinte, mi suspiras ade,
sopirante al ĉefurba rondo.

Tufoj da abrotanoj jen dronas
en malvarma fonta akvofluo.
Vekiĝinte, longe mi suspiras,
sopirante al ĉefurba bruo.

Tufoj da absintoj jen trempiĝas
en malvarma la fontakva roĵo.
Vekiĝinte, mi senĉese veas,
sopirante al ĉefurbaj vojoj.

Tiam la grenplantoj ja prosperis,
nutrataj de favora pluvfalo.
La regnestro saĝe regas landon
kaj l' popol' obeis kun lojalo.

豳风

**Kantoj kolektitaj en Bin-regno de Zhou-dinastio (en nuna
Shaanxi-provinco)**

七月

七月流火，九月授衣。一之日鬻发，二之日栗烈。无衣无褐，何以卒岁。三之日于耜，四之日举趾。同我妇子，饁彼南亩，田峻至喜。

七月流火，九月授衣。春日载阳，有鸣仓庚。女执懿筐，遵彼微行，爰求柔桑。春日迟迟，采繁祁祁。女心伤悲，殆及公子同归。

七月流火，八月萑苇。蚕月条桑，取彼斧斨，以伐远扬，猗彼女桑。七月鸣鵙，八月载绩。载玄载黄，我朱孔阳，为公子裳。

四月秀葽，五月鸣蜩。八月其获，十月陨箨。一之日于貉，取彼狐狸，为公子裘。二之日其同，载缵武功，言私其豳，献豨于公。

五月斯螽动股，六月莎鸡振羽，七月在野，八月在宇，九月在户，十月蟋蟀入我床下。穹窒熏鼠，塞向墐户。嗟我妇子，曰为改岁，入此室处。

六月食郁及薁，七月亨葵及菽，八月剥枣，十月获稻，为此春酒，以介眉寿。七月食瓜，八月断壶，九月叔苴，采荼薪樗，食我农夫。

九月筑场圃，十月纳禾稼。黍稷重穆，禾麻菽麦。嗟我农夫，我稼既同，上入执宫功。昼尔于茅，宵尔索綯。亟其乘屋，其始播百谷。

二之日凿冰冲冲，三之日纳于凌阴。四之日其蚤，献羔祭韭。九月肃霜，十月涤场。朋酒斯飧，曰杀羔羊。跻彼公堂，称彼兕觥，万寿无疆。

La vivo de kampuloj

Priskribado pri la mizera vivo de kampuloj tra la tuta jaro.

En la sepa* Fajra Stel' uesten iras,
en la naŭa vintrajn vestojn kudras inoj.
En la dekunua norda vento blovas,
en la dekdua regas frosta domino.
Sen vestaĵoj tolaj aŭ vat-remburitaj,
kiel vintron pasigi tiom facile?
En l' unua ni riparas laborilojn,
en la dua teron preparas plugile.
Kun edzino, filo kaj mi sur kamptero
manĝas, drinkas kune sub sunvarma lumo,
vokto laŭdas nin pro nia sinofero.

En la sepa* Fajra Stel' uesten iras,
en la naŭa vintrajn vestojn kudras inoj.
En printempo sun' disĵetas lumon varmajn,
orioloj kantas ĝoje en proksimo.
Kun bambua korbo sur la brak' knabino
lante iras sur la kampa voj' en libero,
kaj kolektas freŝajn morusajn foliojn.
Tagoj longas pli kaj pli en primavero,
oni falĉas abrotanojn en homfluo.

La knabino kovas triston en la koro,
time edziniĝi al hom' de influo.

En la sepa* Fajra Stel' uesten iras,
en la oka oni hakas kanojn pene.
En la tria oni pritondas la branĉojn
morusarbajn per ilo akra ekstreme.
Jen fortondas oni altajn longajn vergojn
kaj morusfoliojn plukas en korbpleno.
En la sepa aŭdiĝas laniaj krioj,
en l' oka oni teksas tolon kun peno.
Mi tinkturas tolon per ruĝo kaj flavo,
kaj per la ruĝa pec' elfaras kostumon
por la lorda fil' batalanta kun bravo.

En la kvara verdaj herboj donas semojn,
en la kvina ĉirpas cikadoj libere.
En l' oka sur kampo oni sin okupas,
en la deka falas folioj leĝere.
En la dekunua oni ĉasas vulpojn
kaj donacas felojn al Duko ofere
por elfari belan la peltaĵon por li.
En la dekdua ĉasistoj kunas vere
kaj daŭrigas la ĉasadon en konkuro.
Ili retenas al si mem etajn predojn,
kaj oferas grandajn predojn al rangulo.

En la kvina saltas akridoj en herboj,
en la sesa flugas lokustoj amase.
En la sepa griloj zumas sovaĝeje,
ili iras en l' oka tegmenten kaŝe,
en la naŭa ĉirpas naŭze ĉe l' dompordo
kaj en la deka enrampas sub la liton.
Ni sufokas ratojn en fermita ĉambro
per fajr-fum' por eviti ilian gliton.
Ho, edzino kaj gefiloj miaj devas
enloĝiĝi en ĉi domon ĉe l' jarfino
kaj ĉi tie manĝon kaj trinkon ricevas.

En la sesa ni manĝas prunojn, vinberojn,
en la sepa faban supon ni preparas.
En la oka ni kolektas la jujubojn,
en la deka ni riz-rikoltadon faras
kaj distilas vinon bonan kaj bongustan

por ĝuado kaj sanig' al nia vivo.
En la sepa povas manĝi ni melonon,
en la oka kalabasojn el deklivo.
En la naŭa sezamgrajnojn ni kolektas,
hakas arbobranĉojn kiel la brullignon,
kaj trankvilan vivon jaran ni ja plektas.

En la naŭa ni riparas la draŝejon,
en la deka ni rikoltas ĉion plene:
rizoj la plantitaj frue kaj malfrue,
faboj kaj mili' jam stokitaj konvene.
Ni kampuloj vere dronas en klopodo!
Kiam tuj la rikoltad' finiĝos tute,
ni labori devigitas por palaco.
Ni dum la tago falĉadas herbojn mute,
en la nokte tordas ni pajlŝnurojn haste,
por ripari la tegmenton en bonordo,
ĉar printempe ni laboros senprokraste.

En la dekdua glacien ni ŝovelas,
en l' unua stokas ni legomojn kele.
En la dua venas temp' prapatrojn kulti.
ni prezentas ŝafon, legomojn ofere.
En la naŭa ekas malvarmiĝi prujne,
ni purigas la draŝejon en la deka.
Ni regalas gastojn per buĉita ŝafo
kaj aroma vino en pokalo ega.
Iras al la lord' kaj tostas ni sincere
je la lorda feliĉa vivo kaj sano
kaj deziras, ke li vivu ja prospere.

**En la sepa = en la sepa monato laŭ la ĉina lunkalendaro k.s.*

鸛鸛

鸛鸛鸛鸛，既取我子，无毀我室。恩斯勤斯，鬻子之闵斯。
迨天之未阴雨，彻彼桑土，绸繆牖户。今女下民，或敢侮予？
予手拮据，予所捋荼。予所蓄租，予口卒瘁，曰予未有室家。
予羽谿谿，予尾綯綯，予室翘翘。风雨所漂摇，予维音哓哓！

Mava strigo

Fablo pri strigo, kiu metaforas rabadon de regantoj.

Strigo, strigo, la birda pesto,
vi jam forrabis miajn idojn,

sed ne detruu mian neston.
Mi nutris ilin kun penego,
ne eltenas novan infeston!

Antaŭ ol pluvos en ventpelo,
mi ŝtopas truojn de la nesto
per arbaj vergoj en sunhelo.
Kiu veni povus tirani
min kontraŭ la firma kastelo?

Miaj ungoj lacas pro peno,
sed mi kolektas herbojn plue
por fiksi neston per herbpleno.
Mia bek' ankaŭ malsaniĝas
nur por mia nesta edeno.

Miaj plumoj pokas pro falo,
ĉu sur korpo, ĉu sur la vosto.
Al la nesto mankas riparo,
kiu skuiĝas en ventpluvo.
Mi nur suspiras en amaro.

东山

我徂东山，惓惓不归。我来自东，零雨其濛。我东曰归，我心西悲。制彼裳衣，勿士行枚。
蜎蜎者蠋，烝在桑野。敦彼独宿，亦在车下。
我徂东山，惓惓不归。我来自东，零雨其濛。果臝之实，亦施于宇。伊威在室，蠨蛸在户。
町疃鹿场，熠熠宵行。不可畏也，伊可怀也。
我徂东山，惓惓不归。我来自东，零雨其濛。鸛鸣于垤，妇叹于室。洒扫穹窒，我征聿至。
有敦瓜苦，烝在栗薪。自我不见，于今三年。
我徂东山，惓惓不归。我来自东，零雨其濛。仓庚于飞，熠熠其羽。之子于归，皇驳其马。
亲结其缡，九十其仪。其新孔嘉，其旧如之何？(熠熠 一作：熠熠)

Reveno el la orienta monto

Soldato hejmenrevenas, imagante al si la staton de la hejmloko kaj edzino.

Mi militiris oriente,
sed longe restis sen reveno.
Nun mi revenas de la monto,
min trafas pluv' ekde mateno.
Nun mi revenas el eosto,
uesten flugas mia koro.
Civilan veston mi pretigas,
ne servos dum militdeĵoro.

Kiel sovaĝa raŭp' vivanta
sur branĉo de la morusarbo,
mi dormas kuntiriĝe strikte
sub ĉaro kvazaŭ pajlogarbo.

Mi militiris oriente,
sed longe restis sen reveno.
Nun mi revenas de la monto,
min trafas pluv' ekde mateno.
Sarmantoj de velkintaj plantoj
ja grimpas jam ĝis la alero.
akvopuloj saltas en ĉambro,
jen araneoj ĉe lintelo.
vidatas cerva spuro tere,
lampiroj flagras en nokthoro.
Je tia hejm-sceno dezerta,
mi des pli tristas en la koro.

Mi militiris oriente,
sed longe restis sen reveno.
Nun mi revenas de la monto,
min trafas pluv' ekde mateno.
La gruoj gakas sur la duno,
l' edzino en la dom' suspiras.
Ŝi metas domon en bonordo,
atendante al mi sopiras.
La karabaso pendas alte
sur neuzita lignostako.
Tri jaroj jam forpasis flue
ekde la lasta disiĝ-tago.

Mi militiris oriente,
sed longe restis sen reveno.
Nun mi revenas de la monto,
min trafas pluv' ekde mateno.
Flirt-flugis tiam orioleoj
kun flavaj plumoj en sunhelo.
Ŝi edziniĝis al mi rajde
sur ĉevalo kun kolorbelo.
Skarpon panjo metis sur ŝin
kaj ŝin kondukis laŭ la rito.
Mi ĝojis vidi ŝin ĉe l' nupto,
ne ŝin forgesas en medito.

破斧

既破我斧，又缺我斨。周公东征，四国是皇。哀我人斯，亦孔之将。
既破我斧，又缺我錡。周公东征，四国是吡。哀我人斯，亦孔之嘉。
既破我斧，又缺我鍬。周公东征，四国是遄。哀我人斯，亦孔之休。

Kun breĉitaj hakilo

Soldato gratulas sin pro tio, ke li sukcesas hejmenveni transvivante la severan militon.

Kun breĉitaj hakil' kaj glavo
ni pene luktis en batalo
sub rekta gvido de la Duko,
kvar regnoj fiaskis en falo.
Ni nin gratulas, ke ni vivas
trans enmilita la fatalo.

Kun breĉitaj hakil' kaj lanco
ni tre penas en militiro
sub rekta gvido de la Duko,
kvar regnoj malvenkis sen brilo.
Ho ve, ni ĝojas, ke feliĉe
ni ja eskapis kun humilo.

Per difektita halebardo
ni batalis por la konkero
sub rekta gvido de la Duko,
kvar regnoj dronas en sufero.
Bonŝance ni supervivantoj
eĉ staras ekster mort-danĝero.

伐柯

伐柯如何？匪斧不克。取妻如何？匪媒不得。
伐柯伐柯，其则不远。我觐之子，笱豆有践。

Hakil-tenilo

Kanto pri entreprenado laŭ reguloj.

Kiel fari hakil-tenilon?
Nur akra hakilo el fero.
Kiel preni belan edzinon?
Nur per svatisto kun prefero.

Kiam tenilo elfaratas,

ne malproksimas la regulo.
Se volas vidi vi fraŭlinon,
regalos ŝin vi kun plezuro.

九罍

九罍之鱼，鱄魴。我覯之子，袞衣绣裳。
鸿飞遵渚，公归无所，於女信处。
鸿飞遵陆，公归不复，於女信宿。
是以有袞衣兮，无以我公归兮，无使我心悲兮。

Fiŝ-reto

Kanto por reteni gaston.

En fiŝreto kun etaj maŝoj
kaptiĝas bramoj, trutoj freŝaj.
Jen vidu tiun grandsinjoron
en broditaj vestaĵoj riĉaj.

Cigno flugas laŭ sabla bordo,
kie ripozos nia lordo?
Loĝu ĉe ni laŭ nia kor', do.

Cigno flugas laŭ la rivero,
Vi ne plu venos al ĉi tero,
Loĝu ĉe ni, do, kun prefero.

Restigi volu vian veston
ne foriru nia lordo, nu,
mi ne dronu ja en tristflu'!

狼跋

狼跋其胡，载寔其尾。公孙硕肤，赤舄几几。
狼寔其尾，载跋其胡。公孙硕肤，德音不瑕？

Afabla princo

Laŭdkanto al la afableco de princo.

Antaŭen tretas lup' la barbon,
retroen stumblas ĝi pro l' vosto.
Princo iras kun grasa korpo,
brilas ŝuoj je multa kosto.

Retroen stumbas lup' pro l' vosto,
antaŭen glitas ĝi pro l' barbo.
Princo iras kun grasa korpo,
grandas la famo kiel arbo.

小雅

Parto de odoj

鹿鸣

呦呦鹿鸣，食野之苹。我有嘉宾，鼓瑟吹笙。吹笙鼓簧，承筐是将。人之好我，示我周行。
呦呦鹿鸣，食野之蒿。我有嘉宾，德音孔昭。视民不怵，君子是则是效。我有旨酒，嘉宾式燕以敖。

呦呦鹿鸣，食野之芩。我有嘉宾，鼓瑟鼓琴。鼓瑟鼓琴，和乐且湛。我有旨酒，以燕乐嘉宾之心。

Regalo al gastoj

Versoj pri regalado al nobelaj gastoj.

Cervoj ĝoje krias senĉese,
dum ili mordas herbojn pace.
Mi havas gastojn por festeno,
muzikiloj sonas senlace.
En la muzika akompano
donacoj mi disdonas kore.
Afable ili ja min traktas
kaj vere helpas min favore.

Cervoj gaje krias senĉese,
dum ili paŝtas sin trankvile.
Mi havas gastojn por festeno,
konduktas ili jen ĝentile.
Sin montras ili digne, dece,
meritas ili laŭdon bone.
Per bona vino mi regalias
ilin ĝis kontento persone.

Cervoj dolĉe krias senĉese
sur la verda herboza tero.
Mi havas gastojn por festeno,
muziko sonas en leĝero.
Ario ŝvebas en la halo,
plaĉas etos' al gasta koro.
La bonan vinon ili drinkas
en plezuriga atmosfero.

四牡

四牡騤騤，周道倭迟。岂不怀归？王事靡盬，我心伤悲。
四牡騤騤，咍咍骆马。岂不怀归？王事靡盬，不遑启处。
翩翩者騅，载飞载下，集于苞栩。王事靡盬，不遑将父。

翩翩者騅，载飞载止，集于苞杞。王事靡盬，不遑将母。
驾彼四骆，载骤骎骎。岂不怀归？是用作歌，将母来谗。

Kvar stalonoj

Priskribo pri oficisto, kiu aferveturas kun sopiremo al sia hejmloko.

Galopas kvar stalonoj kun fervoro
sur malproksima kaj zigzaga vojo.
Ĉu mi forgesas hejmon per ignoro?
Pro l' regnestra tasko neplenumita
mi sentas ĉagreniĝon en la koro.

Kuregas kvar stalonoj energie,
la blanka jam tremetas pro galopo.
Ĉu pensas mi pri hejmo nostalgie?
Pro l' regnestra tasko neplenumita
mi naskas maltrankvilon ja anksie.

Perdrik' alflugas jen de malproksimo,
jen supren jen malsupren en libero
kaj falas sur la kverkon kun kapklino.
Pro l' regnestra tasko neplenumita
mi ne zorgas pri l' patro per intimo.

Perdrik' alflugas flirte de la foro,
jen glisante jen flosante laŭflue
kaj plongas sur arbon en fina horo.
Pro l' regnestra tasko neplenumita
mi ne sidas kun panjo en parolo.

Mi stiras kvar stalonojn kun libero,
rapide ili kuras kiel fulmo.
Ĉu pensas mi pri hejmo kun sincero?
Mi devigite skribas tiujn versojn
por sendi senton al panjo el koro.

皇皇者华

皇皇者华，于彼原隰。駉駉征夫，每怀靡及。
我马维驹，六轡如濡。载驰载驱，周爰咨諏。
我马维骐，六轡如丝。载驰载驱，周爰咨谋。
我马维骆，六轡沃若。载驰载驱，周爰咨度。
我马维骝，六轡既均。载驰载驱，周爰咨询。

Floroj en pompo

Senditoj iras ĉien por kolekti konsilojn.

Buntaj floroj sin prezentas pompe
sur la vasta kaj humida tero.
La senditoj rajdas sur la vojo
por konsilojn ĉasi kun sincero.

Rajdas mi sur la ĉeval' fortika
kun ses bridrimenoj en la mano.
Mi ĉevalon vipas kaj galopas
por konsiloj pri l' regna bonsano.

Rajdas mi sur la ĉeval' blanknigra
kun ses bridrimenoj en man-teno.
Mi ĉevalon pelas tra la lando
por konsiloj pri ŝtat-entrepreno.

Rajdas mi sur la ĉeval' purblanka
kun ses bridoj silkaj en brileto.
Mi ĉevalon urgâs tra la regno
por konsiloj pri rega rimedo.

Rajdas mi sur la ĉeval' ebona
kun ses bridrimenoj en leĝero.
Mi ĉevalon spronas sur la kampoj
por konsiloj pri l' regna espero.

常棣

常棣之华，鄂不韡韡。凡今之人，莫如兄弟。
死丧之威，兄弟孔怀。原隰裒矣，兄弟求矣。
脊令在原，兄弟急难。每有良朋，况也永叹。
兄弟阋于墙，外御其务。每有良朋，烝也无戎。
丧乱既平，既安且宁。虽有兄弟，不如友生。
宾尔笾豆，饮酒之饫。兄弟既具，和乐且孺。
妻子好合，如鼓瑟琴。兄弟既翕，和乐且湛。
宜尔室家，乐尔妻帑。是究是图，亶其然乎？

Floroj de prunarbo

Odo al frateco.

Floroj de prunarb' arĝente blankas,
la vidaĵ' tre belas en prospero!

Rilat' en la mondo inter homoj
malpli bonas ol frat-sinofero.

Kiam venas krizo de viv-morto,
fratoj helpas ĉiam reciproke.
Se unu en sovaĝej' senspuras,
lin l' alia serĉas tiuloke..

Kiel niz' sin trovas en danĝero,
nur sangfratoj venas kun sincero.
Kaj l' amikoj eĉ intimaj nure
vesuspiras kontraŭ la sufero.

Se malpacas fratoj en la hejmo,
ili alfrontas fremdulojn kune.
Kaj l' amikoj eĉ intimaj nure
lasas tiujn ĝenulojn senpune.

Kiam venas milito al la fino,
ĉio reiras al la bonordo.
Tiam bedaŭrinde fratoj malpli
karas ol amikoj en samsorto.

En festeno kun manĝaĵoj riĉaj
oni drinkas ĝisebrie plene.
Fratoj kunas kun intima sento,
ili ĝoje orgias senĝene.

Harmonio de geedzoj estas
orelplaĉa la muziko bela.
Kun viaj fratoj vi certe vivas
en akordo kaj etos' sincera.

Lasu vian familion vivi
kaj gajigu anojn sur vivvojo.
Se la veron vi komprenas bone,
vi vin banas en feliĉa ĝojo.

伐木

伐木丁丁，鸟鸣嚶嚶。出自幽谷，迁于乔木。嚶其鸣矣，求其友声。
相彼鸟矣，犹求友声。矧伊人矣，不求友生？神之听之，终和且平。
伐木许许，酺酒有藟！既有肥羜，以速诸父。宁适不来，微我弗顾。
於粲洒扫，陈馈八簋。既有肥牡，以速诸舅。宁适不来，微我有咎。

伐木于阪，酺酒有衍。筵豆有践，兄弟无远。民之失德，乾餱以愆。
有酒湑我，无酒酤我。坎坎鼓我，蹲蹲舞我。迨我暇矣，饮此湑矣。

Amikeco kaj parenceco

Odo pri regalo al amikoj kaj parencoj.

Hak! hak! aŭdiĝas el lignohakado,
pepado birda jen alŝvebas klare
el la profunda kaj kvieta valo
al l' alta pinto de la arb' senbare.
Eligas birdoj longajn, laŭtajn pepojn
por peti al kunuloj eĥi kare.

Eĉ birdoj peti al amikoj eĥi
per sia longa pepo atent-tira.
Ni homoj tamen devas amikiĝi
unu kun l' alia per voj' akira.
Se dio konas l' amikiĝan vojon,
ni vivos vere en akord' admira.

Hak! hak! hakadas arbojn oni pene,
mi jam preparas vinon kun prefero.
Mortigis ŝafon grasan prete mi kaj
invitas onklojn manĝi ĉe vespero.
Kial ili nun ne ankoraŭ venas?
Ĉu mi ne faras tion el sincero?

Mi jam balais domon hele pura,
kaj jam frandaĵojn surtabligis prete.
Kuiris grasan ŝafon mi prepare
por manĝi kun geparencoj laŭpete.
Kial ili nun ankoraŭ ne venas?
Do, ĉu mi faras ion maldiskrete?

Hakitaj arboj falas sur deklivon,
mi kribris vinon en pokalojn orde.
Jam ĉiuj pladoj staras sur la tablo,
atendas mi vin fratojn nun enkorto.
Malpacas homoj ofte disputante
pri l' manĝaĵoj vitalaj malakorde.

Nu, drinku se vi havas bonan vinon,
se mankas ĝi, ni faras ĝin ĉi-hore.
Tamburon frapu ni nun kun plezuro

kaj dancu laŭ tamburbatoj fervore.
Ni nun liberan tempon havas ĝuste,
ni drinku l' bonan vinon ja elkore.

天保

天保定尔，亦孔之固。俾尔单厚，何福不除？俾尔多益，以莫不庶。
天保定尔，俾尔戩穀。罄无不宜，受天百禄。降尔遐福，维日不足。
天保定尔，以莫不兴。如山如阜，如冈如陵，如川之方至，以莫不增。
吉蠲为饔，是用孝享。禴祠烝尝，于公先王。君曰：卜尔，万寿无疆。
神之吊矣，诒尔多福。民之质矣，日用饮食。群黎百姓，遍为尔德。
如月之恒，如日之升。如南山之寿，不骞不崩。如松柏之茂，无不尔或承。

La Ĉielo benas

Korteganoj bondeziras la regnestron.

La Ĉielo benas la regnestron,
ke li sidu sur la tron' sekure,
ke la ŝtato fortu kaj prosperu,
ke li feliĉegu senmezure,
ke li faru bonojn por popolo,
ke pli ili manĝu laŭpostule.

La Ĉielo benas la regnestron,
ke li ĝuu mil feliĉojn vere,
ke li manipulu ĉion glate,
ke li plene sukcesu prospere.
ke li banu sin en milmil benoj ,
ke finiĝu bonoj neniele.

La Ĉielo benas la regnestron,
ke prosperu ĉio en la ŝtato,
ke ĝi ŝajnu duno sur la tero
kaj similas al mont' sub beato
kaj al riverreg' kun multaj fluoj
kaj ĉio kreskas en bona stato.

Sur altaro vino kaj manĝaĵoj
surmetitas por prapatroj kulti.
Oni oferaĵojn al prareĝo
ja dediĉas por ilin aŭskulti.
la prareĝoj sendas benon al vi:
“Via regno daŭras sen tumulto!”

La Ĉielo dotas la regnestron
per multego da graca favoro
kaj la ordinarajn, simplajn homojn
per manĝaĵoj, akvo de valoro.
la nobeloj kaj l' popolo dankas
vin pro via elkora bonvolo.

“Vi similas al la luna lumo,
al la leviĝanta suna brilo,
al la monto ja staranta firme,
neniel falanta en senilo,
al pompanta pino sur la monto
ĉiamverda vere en trankvilo.

采薇

采薇采薇，薇亦作止。曰归曰归，岁亦莫止。靡室靡家，玁狁之故。不遑启居，玁狁之故。
采薇采薇，薇亦柔止。曰归曰归，心亦忧止。忧心烈烈，载饥载渴。我戍未定，靡使归聘。
采薇采薇，薇亦刚止。曰归曰归，岁亦阳止。王事靡盬，不遑启处。忧心孔疚，我行不来！
彼尔维何？维常之华。彼路斯何？君子之车。戎车既驾，四牡业业。岂敢定居？一月三捷。
驾彼四牡，四牡骎骎。君子所依，小人所腓。四牡翼翼，象弭鱼服。岂不日戒？玁狁孔棘！
昔我往矣，杨柳依依。今我来思，雨雪霏霏。行道迟迟，载渴载饥。我心伤悲，莫知我哀！

Hejmveo

Lamento de hejmveanta soldato.

Ni kolektas ŝosojn verdajn
aperantajn en prospero.
Kial hejmeniri ne nun
kiam pasas jar' en ŝtelo?
Mi ne havas familion,
ĉar mi luktas kontraŭ hunoj.
Mi ne havas tempon dormi,
ĉar mi luktas kontraŭ hunoj.

Ni kolektas ŝosojn verdajn
aperantajn en abundo.
Kial hejmeniri ne nun
kiam tristas la korfundo?
Nun mi brulas de ĉagreno,
mi soifas en malsato.
Vagas mi sen ripozejo,
kiu konas mian staton?

Ni kolektas ŝosojn verdajn
kiuj kreskas fortaj, duraj.
Kial hejmeniri ne nun
kiam oktobras nebula?
La milito ne finiĝas,
mi ne povas resti kalma.
Venas neniun konsoli,
ĉagreniĝas mi ja larma.

Kiel floroj de prunarbo
belas, kreskas en prospero!
Kiel fortas kaj imponas
militĉaroj kun fiero!
Kuras sur la voj' la ĉaroj,
kaj galopas kvar ĉevaloj.
Ni ne povas fikse loĝi
kaj moviĝas je signaloj.

Tirata de kvar ĉevaloj
militĉaro knaras brue.
Lordo nia sidas sur ĝi,
ni soldatoj sekvas flue.
Kvar ĉevaloj henas laŭte,
portas ni armilojn prete.
Ni nin gardas ĉiutage,
ĉar hunoj agas obsede.

Kiam mi forlasis hejmon,
poploj flirtis en ventpelo.
Nun mi hejmeniras ĝoje,
pluvo falas en pelmelo.
Mi min trenas malrapide
spite suferon sur vojo.
min atakas ĉagreniĝo,
supervenkas min malĝojo.

出车

我出我车，于彼牧矣。自天子所，谓我来矣。召彼仆夫，谓之载矣。王事多难，维其棘矣。
我出我车，于彼郊矣。设此旂矣，建彼旄矣。彼旂旄斯，胡不旆旆？忧心悄悄，仆夫况瘁。
王命南仲，往城于方。出车彭彭，旂旄央央。天子命我，城彼朔方。赫赫南仲，玁狁于襄。
昔我往矣，黍稷方华。今我来思，雨雪载途。王事多难，不遑启居。岂不怀归？畏此简书。
嘒嘒草虫，趯趯阜螽。未见君子，忧心忡忡。既见君子，我心则降。赫赫南仲，薄伐西戎。
春日迟迟，卉木萋萋。仓庚喈喈，采芣苢之采。执讯获丑，薄言还归。赫赫南仲，玁狁于夷。

Triumfo el militiro

Kanto por gratuli la soldatojn pro ties triumfo el militiro.

Veturas mi per militĉaro
al paŝtejo en la kamparo.
La ordono de la regnestro
min alvokas al la batalo.
Ni nun ekipas militĉarojn
per kiraso el dura fero.
Atakate de mavaj hunoj,
la regno dronas en danĝero.

Veturas mi per militĉaro
al ĉirkaŭurbo en la ruo.
Ni starigas militajn flagojn
kun totemoj de bonaŭguro.
Jen tiuj diverkoloraj flagoj
fiere flirtas en ventpelo.
Mi naskas triston en la koro,
soldatoj lacas en apero.

Ordonas generalo, ke ni
konstruu muron en la nordo.
La ĉaroj rulas sin amase,
la flagoj flirtas en malordo.
Remparojn ni konstruas prete
en la norda fronto ĉe l' limo
por kontraŭstari invadantojn
fortege kaj kun tutanimo.

Kiam mi forlasis la hejmon,
grenplantoj kreskis en disfloro.
Nun mi revenas al hejmloko,
neĝeroj flirtas en ĉi-horo.
La regn' nun trovas sin en krizo,
mi devas resti ĉe la limo.
Sed mia kor' doloras forte
se mi ne luktas kun obstino.

Insektoj ĉirpas klare laŭte,
akridoj saltas sub sungloro.
Antaŭ ol li ekiros fronten,
mi kovis ĝenojn en la koro.

Revenon lian nun mi vidas,
mi trankviliĝas kun ĝojŝvelo.
Merito lia en batalo
lin honorigas per glorphelo.

Ĉijara primavero longas,
herboj apudvoja prosperas.
Ĉirpadas oriojoj ĝoje,
knabinoj plukadon preferas.
Kun kaptitoj en militiro
revenas soldatoj fiere.
La hunoj ne plu furiozas
nek minacas ja kun ribelo.

秋杜

有秋之杜，有暎其实。王事靡盬，继嗣我日。日月阳止，女心伤止，征夫遑止。
有秋之杜，其叶萋萋。王事靡盬，我心伤悲。卉木萋止，女心悲止，征夫归止！
陟彼北山，言采其杞。王事靡盬，忧我父母。檀车幝幝，四牡瘳瘳，征夫不远！
匪载匪来，忧心孔疚。期逝不至，而多为恤。卜筮偕止，会言近止，征夫迓止。

Sola pirujo

Edzino, sopirante al sia edzo, esperas, ke li revenue pli frue.

Staras sola pirujo kapkline
kun peza ŝarĝo da fruktoj sur ĝi.
Regn-aferoj multas ja senfine,
reveno lia 'stas prokrastita.
Jam la jaro iras ĝis la fino,,
mi ja afliktiĝas kun anksio.
Ĉu lia reven' 'stas en proksimo?

Staras sola pirujo silente
kun folioj verdaj en prospero.
Regn-aferoj multas ja farende,
mia koro tristas ĝis ekstremo.
Floroj, herboj pompas en freŝ-helo;
ĉagreniĝas mi en maltrankvilo,
kiam li revenos kun espero?

Mi surgrimpas monton en la nordo
kaj kolektas liĉi-berojn tie.
Regn-aferoj multas en malordo,
la gepatroj dronas en ĉagreno.

Ĉaro el santalo iras lante
tirata de kvar stalonoj fortaj;
ĉu li tuj revenos nedemande?

Jen videblas nek homo nek ĉaro,
mia kor' doloras neregeble.
Tardas la reveno el batalo
des pli afliktiĝas mi enkore.
La sort-divenisto kun plenfido
diras, ke li revenas sur vojo,
sed kieas lia ombro glite?

鱼丽

鱼丽于罟，𩚑𩚑。君子有酒，旨且多。
鱼丽于罟，𩚑𩚑。君子有酒，多且旨。
鱼丽于罟，𩚑𩚑。君子有酒，旨且有。
物其多矣，维其嘉矣！物其旨矣，维其偕矣！物其有矣，维其时矣！

Fiŝoj kaj vino

La sceno en festeno.

Videblas fiŝoj kaptitaj en naso:
jen bramoj kaj flavfiŝoj en amaso.
La gastiganto bonan vinon havas,
abundas vino, gastiganto pavas.

Videblas fiŝoj kaptitaj en naso:
jen karpoj kaj alozoj en amaso.
La gastiganto vinon ja konservas,
abundas vino, gastiganto servas.

Videblas fiŝoj kaptitaj en naso:
jen trutoj kaj ezokoj en amaso.
La gastiganto vinon ja disponas,
abundas vino, gastigant' disdonas.

Frandaĵoj vere multas en festeno,
manĝaĵoj bonodoras kun gustpleno.
Ne mankas sur la tablo ambrozio,
manĝaĵaj specoj estas en vario.
Tro multas bonaj aĵoj laŭ sezono,
tio eble staras super bezono.

南有嘉鱼

南有嘉鱼，烝然罩罩。君子有酒，嘉宾式燕以乐。
南有嘉鱼，烝然汕汕。君子有酒，嘉宾式燕以衍。
南有樛木，甘瓠累之。君子有酒，嘉宾式燕绥之。
翩翩者鵻，烝然来思。君子有酒，嘉宾式燕又思。

Bonaj fiŝoj en la sudo

Nobeloj regalas siajn gastojn.

En la sudo bonaj fiŝoj naĝas
tien kaj ĉi tien kun leĝero.
gastiganto havas bonan vinon
gastoj manĝas, drinkas en ĝoj-helo.

En la sudo bonaj fiŝoj naĝas
tien kaj ĉi tien en libero.
Gastiganto havas bonan vinon,
gastoj manĝas, drinkas kun gaj-ŝvelo.

En la sudo staras kurba arbo
plenvolvitaj de sarment' serpenta.
Gastiganto havas bonan vinon,
gastoj manĝas kun mien' kontenta.

Birdoj ŝvebas flirte en aero
kaj sur branĉojn falas kun trankvilo.
Gastiganto havas bonan vinon,
gastoj manĝas, drinkas en jubilo.

南山有台

南山有台，北山有莱。乐只君子，邦家之基。乐只君子，万寿无期。
南山有桑，北山有杨。乐只君子，邦家之光。乐只君子，万寿无疆。
南山有杞，北山有李。乐只君子，民之父母。乐只君子，德音不已。
南山有栲，北山有杻。乐只君子，遐不眉寿。乐只君子，德音是茂。
南山有枸，北山有楸。乐只君子，遐不黄耇。乐只君子，保艾尔后。

Longviveco

Gastiganto deziras al honorindaj gastoj, ke ili vivu longe.

Plantoj kreskas sur la suda monto,
sur la norda herboj en prospero.
Vi plezuras vere ĝis ekstremo,

kaj 'stas bazo sur la regna tero.
Vi satĝuas vivon kun plezuro,
vi vivadu longe kun espero.

Morusarboj kreskas sur sudmonto,
sur la norda poploj en ventblovo.
Vi plezuras vere ĝis ekstremo,
kaj vi estas baz' de regna povo.
Mi deziras, ke vi vivu longe
kaj plezure agu laŭ bontrovo.

Ulmoj kreskas sur la suda monto,
sur la norda la prunarboj staras.
Vi plezuras vere ĝis ekstremo,
kaj vi ĉion por popolo faras.
Mi esperas, ke vi vivu longe
kaj vi al popolo ĉiam karas.

Kverkoj kreskas sur la suda monto,
sur la norda arboj fruktodonaj.
Vi plezuras vere ĝis ekstremo,
tial vivas longe vi imponaj.
Miaj gastoj ĝojas kun plezuro,
Famo via estas ĉampiona.

Arboj staras sur la suda monto,
sur la norda kreskas herboj altaj.
Vi nobluloj veraj kun plezuro
certe vivas longe tre bonfartaj.
Dum longlonga vivo senĉagrena
via postaj tagoj 'stos ekzaltaj.

蓼萧

蓼彼萧斯，零露漙兮。既见君子，我心写兮。燕笑语兮，是以有誉处兮。
蓼彼萧斯，零露瀼瀼。既见君子，为龙为光。其德不爽，寿考不忘。
蓼彼萧斯，零露泥泥。既见君子，孔燕岂弟。宜兄宜弟，令德寿岂。
蓼彼萧斯，零露浓浓。既见君子，俴革忡忡。和鸾雍雍，万福攸同。

Abrotanoj

Regalado al feŭdestroj.

Sur folioj de abrotanoj
glimas matenroso kun brilo.

Vidante lordon en festeno,
mi naskas ĝojon en jubilo.
Ni manĝas, drinkas kun plezuro
gaje en libera babilo.

Sur folioj de abrotanoj
brile glimas roso matene.
Vidante lordon en festeno,
mi sentas koran gloron plene.
Li kun morala bonvirteco
ĝuas longan vivon serene.

Sur folioj de abrotanoj
matene glimas roso klare.
Mi vidas lordon en festeno,
ni sidas kiel fratoj kare.
Ni ja orgie drinkas kune
kaj babiladas joviale.

Sur folioj de abrotanoj
matenroso briletas pure.
Mi vidas lordon en festeno
oraĵoj liaj sonas nure.
Kaleŝo lia lukse brilas,
benojn falas sur lin sekure.

湛露

湛湛露斯，匪阳不晞。厌厌夜饮，不醉无归。
湛湛露斯，在彼丰草。厌厌夜饮，在宗载考。
湛湛露斯，在彼杞棘。显允君子，莫不令德。
其桐其椅，其实离离。岂弟君子，莫不令仪。

Densa roso

Nokta festeno de nobeloj.

Grasaj gutoj da densa roso
ne sekiĝas sen suna helo.
Festeno daŭras ĝis la nokto
oni ne disas kun prefero.

Grasaj gutoj da densa roso
falas sur herboj en prospero.
Festeno daŭras en la nokton,

oni disas post kult-ofero.

Grasaj gutoj da densa roso
restas sur veproj en mateno.
Niaj gastoj noblaj, honoraj
konduktas bone en festeno.

Sur jujubarboj kaj prunarboj
fruktoj pendas pezaj kaj grandaj.
Niaj gastoj dece ĝentilas
kun manieroj elegantaj.

彤弓

彤弓弔兮，受言藏之。我有嘉宾，中心貺之。钟鼓既设，一朝飧之。
彤弓弔兮，受言载之。我有嘉宾，中心喜之。钟鼓既设，一朝右之。
彤弓弔兮，受言櫜之。我有嘉宾，中心好之。钟鼓既设，一朝酬之。

Ruĝa pafarko

Regalado al feŭdestroj kun meritoj.

Akceptu ruĝan arkon nestreĉitan
kaj ĝin konservu ja en bona stato.
mi al la nobla gasto ĉe l' festeno
prezentas ĉi donacon en privato.
Muzike bele sonas tamburado,
ni kune drinku kaj manĝu ĝis sato.

Akceptu ruĝan arkon nestreĉitan
ĝin konsideru aĵo de valoro.
Kun honorindaj gastoj ĉe l' festeno,
mi ja ekstazon naskas en la koro.
Muzike bele sonas tamburado,
ni kune tostu jen al la Sinjoro.

Akceptu ruĝan arkon nestreĉitan
kaj zorge metas ĝin en sakon bone.
Kun honorindaj gastoj ĉe l' festeno,
mi ĝojas, li prizorgas min patrone.
Muzike bele sonas tamburado,
mi tostu al la gastoj laŭtasone.

菁菁者莪

菁菁者莪，在彼中阿。既见君子，乐且有仪。
菁菁者莪，在彼中沚。既见君子，我心则喜。
菁菁者莪，在彼中陵。既见君子，锡我百朋。
泛泛杨舟，载沉载浮。既见君子，我心则休。

Densaj abrotanoj

Regalado al gastoj.

Abrotanoj densas en prospero
sur la tero de la granda monto.
Mi jam vidas lordojn en festeno,
mi salutas ilin ĉe renkonto.

Abrotanoj densas en prospero
sur la tero de la insuleto.
Mi jam vidas lordojn en festeno,
mi salutas ilin sen koketo.

Abrotanoj densas en prospero
sur la tero de la ronda duno.
La lordoj ĉeestas al festeno,
ili donas al mi la monsumon.

La boato el cipreso flosas
tie kaj ĉi tien sur rivero.
Mi la lordojn vidas ĉe l' festeno,
mi ĝojegas vere kun fiero.

六月

六月栖栖，戎车既饬。四牡騤騤，载是常服。玁狁孔炽，我是用急。王于出征，以匡王国。
比物四骠，闲之维则。维此六月，既成我服。我服既成，于三十里。王于出征，以佐天子。
四牡修广，其大有颙。薄伐玁狁，以奏肤公。有严有翼，共武之服。共武之服，以定王国。
玁狁匪茹，整居焦获。侵镐及方，至于泾阳。织文鸟章，白旆央央。元戎十乘，以先启行。
戎车既安，如轻如轩。四牡既佺，既佺且闲。薄伐玁狁，至于太原。文武吉甫，万邦为宪。
吉甫燕喜，既多受祉。来归自镐，我行永久。饮御诸友，炰鼈脍鲤。侯谁在矣？张仲孝友。

En la sesa lunmonato

Laŭdo al generalo Yin Jifu (852-775 a.K.), kiu militiris kontraŭ hunoj en la nordo.

En la sesa oni anksias,
jam militĉaroj bone pretas.

Kvar stalonoj kuras impone,
flagoj kaj standardoj koketas.
Minacas hunoj tre feroce,
la regno dronas en danĝero.
La regnestro ordonas urĝe
por nin defendi per konkero.

Miaj kvar stalonoj fortikas
trejnitaj bone por batalo.
En ĉi sesa monat' somera
kiraso estas en preparo.
Kun la kiraso sur la korpo
mi iras tri dek liojn tage.
Sub edikto de la regnestro
batalos brave ni kunage.

La kvar stalonoj tre fortikas
kun levita kapo fiera.
Ni impetus bati la hunojn
por teni regnon senmizera.
Ni defendu bone la regnon
brave luktu en militiro.
Ni brave luktu bataleje
por savi regnon el disŝiro.

La hunoj ankaŭ ne malfortas,
kaj urbon kaptis ĉe rivero.
Invadas ili multajn lokojn,
minacas regnon per danĝero.
Kun flagoj ni rapidas norden,
falke plonĝas al malamikoj.
Dek grandaj ĉaroj antaŭiras
por bati hunojn en paniko.

La militĉaroj iras glate
sur la vojo longa senbare.
La kvar stalonoj ja fortikas
kun kap' levita temerare.
Ni nun rapidas veturadon
kaj tuj atingas bordon nordan.
Ji Fu lertas verke, batale,
li faras meriton rekordan.

Li aranĝas festenon ĝoje

regnestro lin donacas multe.
Li revenas de malproksimo,
kaj ja triumfas bonrezulte.
Li regalias amikojn bone
per fiŝoj, vin' kaj ambrozio.
Liaj bonaj amikoj kune
manĝas kaj drinkas en orgio.

采芑

薄言采芑，于彼新田，呈此菑亩。方叔涖止，其车三千。师干之试，方叔率止。乘其四骐，四骐翼翼。路车有奭，簟茀鱼服，钩膺鞶革。
薄言采芑，于彼新田，于此中乡。方叔涖止，其车三千。旂旐央央，方叔率止。约軹错衡，八鸾玼玼。服其命服，朱芾斯皇，有珌葱珩。
馭彼飞隼，其飞戾天，亦集爰止。方叔涖止，其车三千。师干之试，方叔率止。鉦人伐鼓，陈师鞠旅。显允方叔，伐鼓渊渊，振旅闐闐。
蠢尔蛮荆，大邦为仇。方叔元老，克壮其犹。方叔率止，执讯获丑。戎车啍啍，啍啍焯焯，如霆如雷。显允方叔，征伐玁狁，蛮荆来威。

Laŭdo al generalo Fang

Odo al generalo Fang Shu, kiu gvidis ekspedicion por konkerti tribojn en la sudo en 825 a.K.

Sovaĝlegomojn ni kolektas ŝire
sur la nove kultivita kampetero.
Generalo Fang venas al ĉi-loko
por garnizoni pro l' triba ribelo.
Alvenas tri mil ĉaroj al la sudo,
kaj gvidas grandan trupon li persone,
komandas la soldatojn en batalo.
La kvar stalonoj trotras tre impone
antaŭ la armeo al batalejo.
Flagoj ruĝaj staras sur militĉaroj,
bambukurtenoj frapas la ĉarpordojn,
kaj silkaj bridoj brilas sur ĉevaloj.

Sovaĝlegomojn ni kolektas ŝire
sur la nove kultivita bieno.
Generalo Fang venas al ĉi-loko
ĉevalojn stopas li per brid-rimeno.
Alvenas tri mil ĉaroj al la sudo,
kun standardoj flirtantaj en ventpelo.
La generalo stiras sian ĉaron
kun spokoj farbitaj en ruĝa helo
kaj kun ok sonoriloj tintadantaj.

Li vestas sin laŭ l' regnestra ordono,
kun orflavaj jadpendaĵoj sonantaj
sur sia verdkolora talizono.

Rapide falko flugas kun elano
kaj soras rekte ja al la ĉielo,
sed kiam falas teren ĝi aplombas.
Generalo Fang venas al ĉi-tero,
kun tri mil militĉaroj sub la gvido
kaj soldatoj trejnitaj en bonordo.
Li direktas siajn trupojn zorgeme,
la trupoj ĵuras pri akorda forto
en batado de gongoj kaj tamburoj.
Kun sagaco kaj fidinda renomo,
soldatojn li kuraĝigas por batalo
en ĉielskua muzika impono.

Tribanoj stultaj en la suda tero
invadas nian regnon kun aŭdaco.
La generalo, saĝa, talentplena,
konkeras malamikojn por la paco.
Li gvidas trupojn sturmi batalejen,
soldatojn multajn kaptas sen kompatato.
Ĉevaltirataj ĉaroj marŝas brave,
antaŭen kuras por severa bato,
la batalkrioj tondras en aero.
Komandas soldatojn la generalo
subigi malamikajn trupojn vere,
tribanoj sudaj malvenkas en falo.

车攻

我车既攻，我马既同。四牡庞庞，驾言徂东。
田车既好，四牡孔阜。东有甫草，驾言行狩。
之子于苗，选徒嚣嚣。建旄设旆，搏兽于敖。
驾彼四牡，四牡奕奕。赤芾金舄，会同有绎。
决拾既饮，弓矢既调。射夫既同，助我举柴。
四黄既驾，两骖不猗。不失其驰，舍矢如破。
萧萧马鸣，悠悠旆旌。徒御不惊，大庖不盈。
之子于征，有闻无声。允矣君子，展也大成。

Ĉasado

Ĉasado de nobeloj.

Mia ĉaro tre solidas,
plenas ĉevaloj je forto.
Kvar ĉevaloj kuras glate
al kamparo de ĉas-sporto.

La ĉas-ĉar' en bona stato
tiratas de kvar ĉevaloj.
Sin etendas verda stepo,
tie kuras la ĉas-varoj.

Lordo por ĉasada celo
vokas soldatojn kun bruo.
Li ekiras al la monto
kun vasaloj kiel fluo.

Kvar ĉevaloj tiras ĉaron
jen rapide jen tre lante.
Kun ruĝ-ŝuoj li vicaron
gvidas fiere ridante.

Kun ledŝildo sur la korpo
li ekstreĉas arkon prete.
Ĉiuj vete ĉasas predojn,
la ĉasaĵoj montas ete.

Kvar ĉevaloj tiras ĉaron,
flankaj brutoj iras glate.
Li arkpafas al la celo
kaj la pred' tuj falas plate.

La ĉevaloj henas laŭte,
flagoj flirtas en ventpelo.
La sekvantoj restas mutaj,
kuirist' do kun ridhelo.

Li veturas sur la vojo
nur aŭdiĝas ĉara bruo.
Li kapablas ĉasi vere
li rikoltas por manĝ-ĝuo.

吉日

吉日维戊，既伯既祷。田车既好，四牡孔阜。升彼大阜，从其群丑。
吉日庚午，既差我马。兽之所同，麀鹿麀麀。漆沮之从，天子之所。
瞻彼中原，其祁孔有。儻儻俟俟，或群或友。悉率左右，以燕天子。
既张我弓，既挟我矢。发彼小豸，殪此大兕。以御宾客，且以酌醴。

Bonaŭgura tago

Festeno post ĉasado.

En bonaŭgura tago de printempo
ni preĝas pri ĉasado per ofero.
Ĉas-ĉaron ni jam bonorde preparas,
jam pretas kvar stalonoj kun brilhelo.
Ascendas ni jen sur la grandan dunon
por ĉasi bestojn per enferma pelo.

En bonaŭgura tago de printempo
ni zorge elektas ĉevalojn prete.
Ni ĉasas diversajn specojn de predoj:
leporojn, cervojn kapti paf-rimede.
Ekiras ni kaj reĝ' ĉe l' riverbordo
jen rekte al la ĉasejo impete.

Rigardu l' stepon en situo alta,
tie vivas multaj bestoj sen ĝeno.
Triope aŭ duope kuras ili
por eskapi aŭ sin kaŝi kun peno.
Ni kunpelas ilin dekstren aŭ liven,
pafas ilin la lord' sur la tereno.

Mi streĉas la pafarkon jen plenforte
kaj pafas sagon rekte al la predo.
mi pafmortigas apridon per sago
kaj poste rinoceron kun diskreto.
Per tiuj bongustaĵoj ni regalas
la gastojn kaj drinkas vinon sen tedo.

鸿雁

鸿雁于飞，肃肃其羽。之子于征，劬劳于野。爰及矜人，哀此鰥寡。
鸿雁于飞，集于中泽。之子于垣，百堵皆作。虽则劬劳，其究安宅？
鸿雁于飞，哀鸣嗷嗷。维此哲人，谓我劬劳。维彼愚人，谓我宣骄。

Damninda servuto

Plebanoj malbenas la mizerigan servuton de la reganta klaso.

Sovaĝanseroj flugas alte
kun pluma siblo en aero.
Ili sin trovas en servuto
sur la dezerta kampa tero.
Ili 'stas senhejmaj povruloj
vivantaj vere en mizero.

Sovaĝanseroj flugas alte
kaj falas al marĉa tereno.
Konstruas murojn en servuto
senhalte ili kun fortpeno.
Konstruas ili multajn domojn,
sendomas ili kun ĉagreno.

Sovaĝanseroj flugas alte
kun tristaj gakoĵ en aero.
Nur saĝuloj montras kompaton
al ni penantaj en sufero.
Dum malsaĝuloj diras al ni,
ke ni trompas ja per malvero.

庭燎

夜如何其？夜未央，庭燎之光。君子至止，鸾声将将。
夜如何其？夜未艾，庭燎晰晰。君子至止，鸾声嘒嘒。
夜如何其？夜乡晨，庭燎有辉。君子至止，言观其旂。

Matena aŭdienco

Laŭdo al laborema lordo.

Kiel iras nokto en ĉi horo?
Estas longa tempo ĝis tagiĝo,
en la hal' vidiĝas kandelgloro.
Kiam korteganoj jen alvenos,
sonos tintilego ĉe aŭroro.

Kiel iras nokto ĉi-momente?
Ĝi ankoraŭ ne finiĝas jame,
lampoj brilas en la hal' silente.
Kiam korteganoj jen alvenos,
sonos tintilegoj senatende.

Kiel iras nokt' en ĉi tempeto?
Proksimiĝos jam tuj la mateno,
en la hal' lampbrilas kun koketo.
Kiam korteganoj jen alvenos,
ĉie flagoj flirtos sen kvieto.

沔水

沔彼流水，朝宗于海。馱彼飞隼，载飞载止。嗟我兄弟，邦人诸友。莫肯念乱，谁无父母？
沔彼流水，其流汤汤。馱彼飞隼，载飞载扬。念彼不迹，载起载行。心之忧矣，不可弭忘。
馱彼飞隼，率彼中陵。民之讹言，宁莫之惩？我友敬矣，谗言其兴。

Rivero ŝvelas

Oni zorgas pri tumulto kaj malkonduto en la socio.

Rivero la ŝvelinta fluas
torente rekte al la maro.
La falkoj flugas en aero
jen halte jen supren en paro.
Ho, miaj fratoj kaj amikoj,
parencoj kaj egalularo,
nek zorgetas pri la gepatroj
nek pri tumulto de letalo.

Rivero la ŝvelinta fluas
torente larĝe en libero.
La falkoj flugas jen malsupren
jen supren ronde kun leĝero.
Ve, ili kondutas arbitre,
kaj kapricas en kariero.
Disrompas tio mian koron,
mi afliktiĝas en despero.

la falkoj flugas jen rapide
al la verdkolora montaro.
Cirkulas onidiroj ĉie,
ni forigu per kontraŭstaro
tiujn absurdaĵojn, ho, gardu
vin, agu laŭ bona moralo.

鹤鸣

鹤鸣于九皋，声闻于野。鱼潜在渊，或在于渚。乐彼之园，爰有树檀，其下维萐。它山之石，

可以为错。

鹤鸣于九皋，声闻于天。鱼在于渚，或潜在渊。乐彼之园，爰有树檀，其下维穀。它山之石，可以攻玉。

Gruoj krias

Laŭdo al la ĝardeno de nobelo.

La gruo krias en marĉa sfero,
ĝiaj krioj ŝvebas al la foro.
Fiŝoj naĝas en laga malhelo
aŭ ludas ĉe insulet' kun folo.
En la ĝarden' kun vidaĵa belo
santalarbo staras en izolo,
sub ĝi herboj kreskas en prospero.
El alia monto la marmoro
povas tajli facon de juvelo.

La gruo krias en marĉa valo,
ĝiaj krioj ŝvebas en aero.
Fiŝoj naĝas ĉe insul' en paro
aŭ ludas en lago kun leĝero.
En la ĝardeno jen kun flormaro
santalarbo staras en ventpelo,
herboj kreskas sub ombrovualo.
Ŝtonoj el la monto ĉe rivero
povas tajli jadon de helpalo.

祈父

祈父，予王之爪牙。胡转予于恤，靡所止居？
祈父，予王之爪士。胡转予于恤，靡所底止？
祈父，亶不聪。胡转予于恤？有母之尸饔。

Demande al milita ministro

Pro longa militiro soldato riproĉas la militan ministron.

Ho, vi milita ministro!
Mi 'stas defendanto de l' regnestro,
Kial mizerigi min en militiro,
ke mi ne kapblas loĝi kun trankvilo?

Ho, vi milita ministro!
Mi 'stas gardanto de l' regnestro.
Kial suferigi min en la batalo,

ke mi ne kapablas loĝi sen amaro?

Ho, vi milita ministro,
vi 'stas stulta kaj malsaĝa.
Kial min drivigi jen de lok' al loko,
ke mi ne eltenas panjon per apogo?

白驹

皎皎白驹，食我场苗。繄之维之，以永今朝。所谓伊人，于焉逍遥？
皎皎白驹，食我场藿。繄之维之，以永今夕。所谓伊人，于焉嘉客？
皎皎白驹，贲然来思。尔公尔侯，逸豫无期？慎尔优游，勉尔遁思。
皎皎白驹，在彼空谷。生刍一束，其人如玉。毋金玉尔音，而有遐心。

Blanka poneo

Satiro al la regnestro, kiu ne povas retenigi talentulojn.

Poneo blanka en ĝardeno mia
mordmanĝas fabplantaĵojn kun satĝuo.
Mi ligas ĝin al la fosto per ŝnuro
por lasi resti tie ĝin sen bruoj,
ke l' gasto kun mi senĝene babilas,
trankvile kvazaŭ sur aera fluo.

Poneo blanka en ĝardeno mia
foliojn fabajn manĝas en libero.
Mi ligas ĝin al la fosto per ŝnuro
por lasi resti pace sen sufero.
La rajdant-gast' honoras mian hejmon,
li sentas sin plezura en korĉelo.

Poneo blanka en ĝardeno mia
alportas al ni ĝojon sen komparo.
Nobelaj gastoj miaj en la domo
tostas reciproke per vinpokalo.
Pli longe restu, ludu en festeno,
ne retiriĝu frue el la halo.

Poneo blanka bela kaj sagaca
promenas lante en profunda valo.
Poneon li manĝigas per freŝherboj,
kiel li agas kun sentimentalaj!
Min lasu koni vian informaron,
ne fremdiĝu de mi kun mava galo.

黄鸟

黄鸟黄鸟，无集于穀，无啄我粟。此邦之人，不我肯穀。言旋言归，复我邦族。
黄鸟黄鸟，无集于桑，无啄我梁。此邦之人，不可与明。言旋言归，复我诸兄。
黄鸟黄鸟，无集于栩，无啄我黍。此邦之人，不可与处。言旋言归，复我诸父。

Oriolo

Kanto pri tiuj, kiuj estas mistraktitaj en alia regno.

Aŭskultu al mi, oriollo:
ne nestu sur ĉi arbo alta
nek beku grenon mian salta.
Ĉi homoj traktas min malbone
kaj diras al mi akratone.
Mi reiru al mia lando,
kaj al mia kunula bando.

Aŭskultu al mi, oriollo:
ne nestu jen sur morusarbo
nek beku sur mia sorg-garbo.
Popolanoj de ĉi nacio
konduktas mave sen konscio.
Mi reiru al mia tero,
al miaj fratoj en libero.

Aŭskultu al mi, oriollo:
ne nestu sur kverk' plezure
nek beku mian rizon nure.
Ĉi homoj kunas malfacile
kaj agas krude, malĝentile.
Mi reiru al hejmvilaĝo,
al mia patro en grandaĝo.

我行其野

我行其野，蔽芾其樗。昏姻之故，言就尔居。尔不我畜，复我邦家。
我行其野，言采其蓫。昏姻之故，言就尔宿。尔不我畜，言归斯复。
我行其野，言采其藟。不思旧姻，求尔新特。成不以富，亦祗以异。

Forlasita edzino

Plendo de forlasita edzino, kiu edziniĝis al alia regno.

Mi paŝas sola sur la sovaĝejo,
kie cedreloj ŝosas en prospero.
Pro nia geedziĝ' en via regno
ni ambaŭ vivis kune kun sincero.
De nun vi ne plu volas min subteni,
mi nur reiru al mia hejmltero.

Mi paŝas sola sur la sovaĝejo,
kie mi plukas arbofoliojn ŝire.
Pro nia geedziĝ' en via regno
mi loĝis ĝoje ĉe vi laŭdezire.
De nun vi ne plu volas min subteni,
mi triste hejmeniru nur suspire.

Mi paŝas sola sur la sovaĝejo,
kie kolektas mi legomojn pene.
Ignoras vi ja nian geedziĝon
por serĉi novan inon nekonvene,
ne pro riĉec' de ŝia familio,
sed pro freŝeco ŝia abomene.

斯干

秩秩斯干，幽幽南山。如竹苞矣，如松茂矣。兄及弟矣，式相好矣，无相犹矣。
似续妣祖，筑室百堵，西南其户。爰居爰处，爰笑爰语。
约之阁阁，椽之橐橐。风雨攸除，鸟鼠攸去，君子攸芋。
如跂斯翼，如矢斯棘，如鸟斯革，如翬斯飞，君子攸跻。
殖殖其庭，有觉其楹。哻哻其正，嘒嘒其冥。君子攸宁。
下莞上簟，乃安斯寝。乃寝乃兴，乃占我梦。吉梦维何？维熊维罴，维虺维蛇。
大人占之：维熊维罴，男子之祥；维虺维蛇，女子之祥。
乃生男子，载寝之床。载衣之裳，载弄之璋。其泣喤喤，朱芾斯皇，室家君王。
乃生女子，载寝之地。载衣之褐，载弄之瓦。无非无仪，唯酒食是议，无父母诒罹。

Finkonstruado de nova palaco

Odo al finkonstruado de nova palaco, kie oni povas vivi feliĉe.

Zigzage fluas riverakvo klara,
arbaro sur la monto verdas dense.
Bambuoj staras sur la tero vala,
densdensas pinoj verdaj en prospero.
Frataro sanga devas esti kara,
kaj traktas sin egale kun sincero,
ne kontraŭstaras kiel la barbara.

Laŭ plano de prapatroj kun deziro
ni ekkonstruas cent domegojn pene
kaj ili atingeblas kun facilo.
Familianoj ĉiuj loĝas kune,
kaj vivas harmonie en trankvilo.

Ni kunligas domoframojn solide,
kaj ramu firme la koton sur muro,
por rezisti venton, pluvon memfide.
Sen pesto de la ratoj kaj birdaĉoj,
ni ĉiuj vivas en akordo spite.

La domo staras firme kaj perfekte,
kiel sagpinto akra kaj celpreta;
la tegmento iom kurbas aspekte,
kiel flugiloj birdaj jen flugontaj.
Ni enloĝigu lordon plenrespekte.

La hala planko estos ja ebena,
la kolonoj altas, rektas impone,
la dormoĉambro estas spacoplena
kaj glimas en malhelaj muranguloj.
La lordo loĝas sen sento ĉagrena.

Sur pajloj kuŝas la komforta mato,
la lito donas senzorgeman dormon.
Ellitiĝas la lord' post dorma sato,
konsultas l' aŭguriston ĉu la sonĝo
favoras aŭ male sur viva pado.
Li sonĝis pri la urso kaj ursido,
vesperto kaj serpento en nomado.

La aŭguristo diras ja profete:
“Vi sonĝis pri la urso kaj ursido,
naskiĝos knabo-bebo jam tuj prete.
Se sonĝi pri vesperto kaj serpento,
naskiĝos knabin' ridanta kokete.”

“Se knab' naskiĝos al la familio,
kuŝigu lin en liton kaj lin volvu
per robo kaj littuko sen ansio,
kaj doni al li jadon en la manon.
Sonoras tintile lia plorkrio.
Kun pompe ruĝa vesto sur la korpo,

li certe estos reĝo de l' nacio.”

“Se al vi filino naskiĝos vere,
ŝin metu sur la teron jen volvata
per luksaj vandoj tolaj ja prefere,
spindelon donu al ŝi por ekludi.
Ŝi onte agos dece kaj libere,
nur kudros kaj kuiros laŭpostule,
gepatroj ŝin prizorgos kunserene.

无羊

谁谓尔无羊？三百维群。谁谓尔无牛？九十其犝。尔羊来思，其角湏湏。尔牛来思，其耳湿湿。

或降于阿，或饮于池，或寝或讹。尔牧来思，何蓑何笠，或负其鬴。三十维物，尔牲则具。尔牧来思，以薪以蒸，以雌以雄。尔羊来思，矜矜兢兢，不蹇不崩。麾之以肱，毕来既升。牧人乃梦，众维鱼矣，旐维旗矣，大人占之：众维鱼矣，实维丰年；旐维旗矣，室家溱溱。

Kanto de paŝtisto

Kanto de paŝtisto laŭdanta pri abundo de ŝafoj kaj bovoj.

Kiu diras, ke vi ne havas kaprojn?
Tri cent kaprojn vi havas efektive.
Kiu diras, ke vi ne havas bovojn?
Viaj naŭdek bovoj sin paŝtas vive.
Kiam viaj kaproj venas amase,
videblas kapraj kornoj en pelmelo.
Kiam viaj bovoj venas en grego,
videblas bovaj frapantaj oreloj.

Kelkaj bovoj sin paŝtas sur deklivo,
kelkaj trinkas akvon ĉe la lageto,
jen kelkaj dormas, dum sin movas kelkaj.
Paŝtistoj viaj ekpaŝtos en preto,
kun bambuaj mantelo kaj ĉapelo
kaj manĝaĵoj sekaj en dorsosako.
Tri dek bovoj estas koloraj same,
jam sufiĉas por la ofera ago.

Antaŭ ol veni, paŝtistoj survoje
kolektis branĉojn por brulligno pene
kaj ĉasadis predojn por viand-ĝuo.
Alvenas viaj kaproj interpreme,
kapo ĉe kapo en liniaj vicoj,

okazas nek malpliig' nek forkuro.
por regi kaprojn svingu vian brakon,
ke ili enstaliĝos kun plezuro.

En nokto la paŝtistoj faras sonĝon,
ke lokustoj fariĝas fiŝoj mire
kaj testudoj fariĝas birdoj strange.
Jen aŭguristo klarigas admire,
ke ĉar, nu, lokustoj fariĝas fiŝoj,
vi havos riĉrikolton venontjare;
ke, ĉar testudoj ja fariĝas birdoj,
pliĝos viaj posteuloj are.

节南山

节彼南山，维石岩岩。赫赫师尹，民具尔瞻。忧心如惓，不敢戏谈。国既卒斩，何用不监！
节彼南山，有实其猗。赫赫师尹，不平谓何。天方荐瘥，丧乱弘多。民言无嘉，憯莫惩嗟。
尹氏大师，维周之氏；秉国之钧，四方是维。天子是毗，俾民不迷。不吊昊天，不宜空我师。
弗躬弗亲，庶民弗信。弗问弗仕，勿罔君子。式夷式己，无小人殆。琐琐姻亚，则无牖仕。
昊天不佣，降此鞠讟。昊天不惠，降此大戾。君子如届，俾民心阕。君子如夷，恶怒是违。
不吊昊天，乱靡有定。式月斯生，俾民不宁。忧心如醒，谁秉国成？不自为政，卒劳百姓。
驾彼四牡，四牡项领。我瞻四方，蹙蹙靡所骋。
方茂尔恶，相尔矛矣。既夷既怿，如相酬矣。
昊天不平，我王不宁。不惩其心，覆怨其正。
家父作诵，以究王讟。式讹尔心，以畜万邦。

Al kortegano Yin

Riproĉado al kortegano Yin, kiu ignoras siajn devojn kaj endanĝerigas la popolon.

Imponas kaj apikas Suda Monto
kun rokoj super rokoj jen en splendo.
Al vi fifama kortegan' insida
la regnantoj brulas de malkontento.
Sed ni nun dronas en tro granda timo.
por prikomenti l' aferojn de l' ŝtato.
La regna sort' jam iras al la fino,
Kial ni ne zorgas pri l' aĉa stato?

Imponas kaj apikas Suda Monto
kun la herbaĉoj densaj en prospero.
Fifama kaj insida kortegano,
vi nenifaras pri l' regna pelmelo.
Ja multegas plagoj kaj katastrofoj,
sin banas popolanoj en sufero.

Riproĉoj kaj plendado ja abundas,
punindas vere li de la Ĉielo!

Vi kortegano — ŝtata piliero,
donas servon kaj helpon al la trono.
Vi taskas teni sceptron de la regno,
defendi l' regnon laŭ reĝa ordono,
asisti la regnestron en regado,
kaj gvidas la popolon al feliĉo.
Ho ve, l' Ĉielo, vere bedaŭrinde,
ni dronas en manĝaĵa nesufiĉo!

Vi zorgas pri la regno ne persone,
regnanoj ne vin fidas kun sincero.
Vi nek enketas nek inspektas ronde,
kaj trompas la popolon laŭ libero.
Por korekti erarojn viajn tute,
estu fore de tiuj insiduloj,
kaj donu al parencoj nenifaraj
ne favorojn laŭ iliaj postuloj.

Ho, la Ĉielo, estas vi ne justa,
vi sendas katastrofojn al popolo.
Vi vere estas terure kruela,
sufero nin turmentas per doloro.
Se l' lordo farus aferojn persone,
ni kovas ne rankoron kun kolero.
Se li sin tenus justa al popolo,
ni ja obeus al li sen ribelo.

Malfeliĉe, l' Ĉielo ĉiopova!
Tumult' neniel ĉesas ĝis ĉi horo,
kaj furiozas pli kaj pli severe,
plebanoj ja amaras en la koro.
Pri la sufero de la malriĉuloj
neniu el regantoj zorgas bone,
nek malfeliĉon penas jen forigi,
nek konsoladas povrulojn persone.

Veturas mi per kvar ĉevaloj fortaj
kun korpulenta korp' kaj grasa kolo.
Rigardas mi al vasta la kamparo,
sed, ve, ne trovas lokon kun lumgloro.

Kiam pliigās mavo kun temppaso,
oni mortigas reciproke glave.
Kiam kolero moderiĝas grade,
proponas oni vinon kune rave.

Ho, la Ĉielo montras sin maljusta,
la lordo ankaŭ mavas ja serpente.
Li ne sin ekzamenas siajn kulpojn,
sed li riproĉas la popolon plende.

Poemon mia patro verkis cele
al kritikado al la lord' senfara,
por ke li do korektu siajn kulpojn
kaj onte ja fariĝu lord' elstara.

正月

正月繁霜，我心忧伤。民之讹言，亦孔之将。念我独兮，忧心京京。哀我小心，癯忧以痒。父母生我，胡俾我瘠？不自我先，不自我后。好言自口，莠言自口。忧心愈愈，是以有侮。忧心惻惻，念我无禄。民之无辜，并其臣仆。哀我人斯，于何从禄？瞻乌爰止？于谁之屋？瞻彼中林，侯薪侯蒸。民今方殆，视天梦梦。既克有定，靡人弗胜。有皇上帝，伊谁云憎？谓天盖卑，为冈为陵。民之讹言，宁莫之惩。召彼故老，讯之占梦。具曰予圣，谁知乌之雌雄！

谓天盖高，不敢不局。谓地盖厚，不敢不踏。维号斯言，有伦有脊。哀今之人，胡为虺蜴？瞻彼阪田，有苑其特。天之机我，如不我克。彼求我则，如不我得。执我仇仇，亦不我力。心之忧矣，如或结之。今兹之正，胡然厉矣？燎之方扬，宁或灭之？赫赫宗周，褒姒灭之！终其永怀，又窘阴雨。其车既载，乃弃尔辅。载输尔载，将伯助予！无弃尔辅，员于尔辐。屡顾尔仆，不输尔载。终逾绝险，曾是不意。鱼在于沼，亦匪克乐。潜虽伏矣，亦孔之炤。忧心惨惨，念国之为虐！彼有旨酒，又有嘉肴。洽比其邻，婚姻孔云。念我独兮，忧心殷殷。伧伧彼有屋，蔌蔌方有谷。民今之无禄，天天是桮。哿矣富人，哀此惻独。

Lamentoj

Lamentado pri la fiagoj de la regnestro You (795-771 a. K.), kiu endanĝerigis la regnon pro sia diboĉa vivo kun la kromedzino Bao Shi.

Eĉ prujnas en varmega la vetero,
mi vere ĉagreniĝas kun anksio.
Cirkulas onidiroj nekredeblaj
al diversaj lokoj kun laŭta krio.
Mi sola dronas en zorgemo tia,
des pli doloras mia trista koro.
Pro mia delikata sent' tuŝita
mi kvazaŭ morbas en malbonhumoro.

Kiam min naskis mia kara panjo,
min trafas tia morb' sentimentala.
De tiam mi tuj falis en suferon
de mokoĵ, kalumnio malmorala.
Ĉu bonaj vortoj ĉu malbonaj vortoj
venas el via buŝo kiel fluo.
Timego kaj zorgemo miaj pezas
kaj mia memfidemo 'stas en skuo.

Min firme kaptas tristo kaj ĉagreno
ja pro rezignacia mia sorto.
La homoj origine 'stas senkulpaj,
sed ili trovas sin en sufermordo.
La kompatindaj homoj malfeliĉe
ricevi bonon povas el nenie.
Kornikoj flugas suben, volas fali
sur kiun arbobranĉon ja nescie.

Rigardas mi al la arbaro densa,
interplektiĝas branĉoj en prospero.
Sed nun regnantoj flosas en mizero,
kaj la ĉielo nubas en malhelo.
Kiam nigriĝas la ĉielo alta,
neniu povus igi ĝin pli klara.
Kiu ĝin povus humuligi pene
per la rimedo hommonda vulgara?

Oni diras, ke l' mont' fariĝas basa
kaj altiĝas la first' de la montaro.
Leviĝas onidiroj el nenio
kaj senbride cirkulas ar' post aro.
La lordoj invititas por konsulto,
ĉar ili estas majstroj en aŭguro.
Sed ili eĉ ne povas fari juĝon
en distingado de muŝo kaj kulo.

Do, kial la ĉielo tiom altas?
Sed oni devas klini sin por kulto.
Kial la tero tiom dikas vere?
Sed oni faras paŝojn sen tumulto.
Mi volas diri tiujn verojn voĉe
al la publiko klare kaj kristale.
Sed nunaj homoj min atakas mave

kiel serpento kaj skorpi' letale.

Sur verdaj kampoj de la montdeklivo
la herboj freŝas, densas en prospero.
Sub la ĉielo tondr' kaj vent' min skuas,
por min subigi preme per kruelo.
Kiam mi ne obeas lian volon,
li petas al mi sekvi servoprete.
Sed kiam mi lin sekvas obeeme,
li min ignoras tute flankenmete.

Mi ĉagreniĝas en la kor' nuntempe,
kvazaŭ ŝtopitas mi per ĝenoj plene.
Nun la regantoj en kortego luksa
faradas multajn krimojn jen refrêne.
Fajregoj jam nun flamas en brulardo,
kiu povus ĝin estingi facile?
La forta, granda regno nia tamen
do ruiniĝas de ŝi senkonsile.

Kun longatempa tristo en la koro,
mi trafas fortan pluvon dum vojiro.
La ĉaro plena je meblar' paneas,
difektaj radoj haltas sen utilo.
La varoj falos tuj en la momento,
min helpu, fratoj, venu sen suspiro.

Tenu ĉarajn radojn en bona stato,
ke iru via ĉaro kun facile.
Kaj ofte zorgu pri l' ĉaristo bone,
ke l' varoj restu pace en trankvilo.
Post kiam vi transpasis la danĝeron,
vi eĉ ne konas krizon en jubilo.

La fiŝoj naĝas en akvaro vasta,
sed ili ne ludadas kun libero.
Kaŝante sin en angulo malhela,
ne vidatas ili de sur la tero.
Plenŝarĝita per ĉagreno pri l' regno,
mi ĉiam pensas pri ĝi en sufero.

En lia hejmo pretas bona vino
nutraĵoj kaj frandaĵoj por festeno.
Mi tenas bonan ligon kun najbaroj

kaj la parencoj en interkompreno.
Mi tamen sola vivas senkonsole,
mi en la koro brulas de ĉagreno.

En sian domon oficistoj loĝas,
enspezas eĉ aĉuloj kun fiero.
Povruloj tamen trafas mavan plagon
kaj vivas hunde sen ajna espero.
Ho, ve! la riĉaj ĝuas la plezuron,
dum la malriĉaj naĝas en sufero.

十月之交

十月之交，朔月辛卯。日有食之，亦孔之丑。彼月而微，此日而微；今此下民，亦孔之哀。日月告凶，不用其行。四国无政，不用其良。彼月而食，则维其常；此日而食，于何不臧。烨烨震电，不宁不令。百川沸腾，山冢卒崩。高岸为谷，深谷为陵。哀今之人，胡憯莫惩？皇父卿士，番维司徒。家伯维宰，仲允膳夫。聚子内史，蹇维趣马。楛维师氏，醯妻煽方处。抑此皇父，岂曰不时？胡为我作，不即我谋？彻我墙屋，田卒污莱。曰予不戢，礼则然矣。皇父孔圣，作都于向。择三有事，亶侯多藏。不憯遗一老，俾守我王。择有车马，以居徂向。黽勉从事，不敢告劳。无罪无辜，谗口嚣嚣。下民之孽，匪降自天。噂沓背憎，职竞由人。悠悠我里，亦孔之瘁。四方有羡，我独居忧。民莫不逸，我独不敢休。天命不彻，我不敢效我友自逸。

En la deka monato

Oficiro lamentas pri ruiniĝo de Zhou-dinastio pere de la ĉielaj fenomenoj.

En la deka monato alternas
sun' kaj luno je l' unua tago.
Ĉe tagmez' aperis sun-eklipso,
ĝi omenas alvenon de plago.
Nokte l' luno malheliĝis pale
kaj la sun' ne brilis kun lumgloro.
Tio kaŭzas al popol' panikon,
ĉiuj afliktiĝas en la koro.

La omen' sur la ĉiel' aperas
neniam laŭ l' kutima rutino.
En regad' de l' regno sur la trono
sidas reĝ' ne kun bona domino.
Nokte lun-eklipso jen aperas,
tio estas fenomen' normala.
Sed la sun-eklipso dum la tago
puŝas plebon al plago fatala.

Fulmas, tondras jen sur la ĉielo,
popolanoj dronas en paniko.
Mil riveroj bolas de kolero,
montoj ja skuiĝas kun ciniko.
La altaĵoj jen fariĝas valo
valo turniĝas al alta tero.
La regantoj nunaj, ho, damnindaj,
ĉiam malbonfaras sen modero.

Patro de l' regnestro regas ŝtaton,
Fan ministras mave en libero,
Jia Bo aĉe gvidas korteganojn,
Zhong Yong jen ministras kun prefero,
Zou responsas pri personoj reĝaj,
Gui sin donas al ĉeval-bredado,
Yu 'stas ĉefo de la instruistoj,
Bao Si reĝon allogas per flato.

Veon al la patro de l' regnestro,
ĉu li ja ne scias pri l' danĝero?
Kial li min sendas al servuto
kaj arbitre agas per forpelo?
Kial li detruas mian domon
kaj igas mian kampon dezerta?
Kaj li eĉ diris: "Mi ne vin vundas,
sed mi agas laŭ la leĝ' averta."

Li 'stas vere saĝa la reganto,
li konstruas la ĉefurbon cele
al regad' per liaj fideluloj,
kaj proprigas gemojn al si ŝvele.
Li ne lasas sindonemajn homojn
por defendi l' reĝon sur la trono.
Li elektas homojn kun kaleŝoj
kaj loĝigas ilin laŭ dispono.

Ni laboras pene kun klopodo
sen ĉikanaj vortoj kaj sen plendo.
Sed aĉuloj dissemadas klaĉojn
kaj min kalumnias kun ofendo.
La sufero de l' popol' malriĉa
ne nature falas el ĉielo.
Tiuj aĉuloj akuzas false,
kaj tumulton levas en ribelo.

Kun malsana korpo tre malforta
ĉagreniĝas mi en malbon-stato.
La aliaj homoj ĝoje gajas,
sed mi ja suferas de sortbato.
Ĉiuj homoj vivas en libero,
mi malhavas tempon por ripozo.
Jen maljusta estas la ĉielo,
mi ne rajtas ĝui en sid-pozo.

雨无正

浩浩昊天，不骏其德。降丧饥馑，斩伐四国。旻天疾威，弗虑弗图。舍彼有罪，既伏其辜。若此无罪，沦胥以铺。
周宗既灭，靡所止戾。正大夫离居，莫知我勩。三事大夫，莫肯夙夜。邦君诸侯，莫肯朝夕。庶曰式臧，覆出为恶。
如何昊天，辟言不信。如彼行迈，则靡所臻。凡百君子，各敬尔身。胡不相畏，不畏于天？戎成不退，饥成不遂。曾我僭御，憯憯日瘁。凡百君子，莫肯用讯。听言则答，谰言则退。哀哉不能言，匪舌是出，维躬是瘁。哿矣能言，巧言如流，俾躬处休！
维曰予仕，孔棘且殆。云不可使，得罪于天子；亦云可使，怨及朋友。
谓尔迁于王都。曰予未有室家。鼠思泣血，无言不疾。昔尔出居，谁从作尔室？

Malfrua pluvo

Versoj pri la menskonfuzita kaj kruela reĝo You de la dinastio Zhou.

El la ĉielo vasta kaj lazura
ne falas plu la benoj kaj favoro,
sed malsatego trafas la povrulojn
kaj falĉas la hom-mondon per strangolo.
Maljusta la ĉielo en kruelo
ne zorgas pri la vivo de l' popolo.
Pekulojn ĝi forlasas jen sen puno,
kaj kaŝas veron per falsa dekorado.
Senkulpaj homoj tamen sendistinge
suferas de l' akuzo en angoro.

Post okupado de l' ĉefurbo de Zhou
kie mi povus loĝi kun trankvilo?
La korteganoj forlasis postenon,
laboras mute mi en malfacilo.
La lordoj retiriĝis kun pretekstoj,
kaj ne servas ĉe l' reĝo kun korŝiro.
Feŭdestroj jam ne partoprenas vole
en l' aŭdienc' pro l' ŝtata malstabilo.

La situaci' ne pliboniĝas, ve,
serioziĝas male kun temp-iro.

Ho, la ĉielo vasta, ĉiopova,
kial vi ne kompatas nin sincere?
Vojaĝantoj ja scias kien iri,
sed ne sendirekte paŝas sencele.
La lordoj en palaco sin protektas
sed ne al la regnestro sinofere,
nek montras reciprokan respekteton
nek obeas la ĉielon fidele?

Milita plago minacas popolon,
malsat' inundas kiel riverfluo.
Mi 'stas nur kuracisto ĉe la reĝo,
mi pene servas zorgeme sen bruo.
Raportas mi konsilojn al la reĝo,
evitas mi la vortojn de detruo.
La reĝo ŝatas la parolon bonan,
malamas mavan diron de konstruo.

Tristindas ne la veron ja eldiri
ne pro mia stulta lango balbuta
sed pro implikiĝo en la sufero.
Aĉuloj plaĉas en farso vortluda,
ili nur diras bonajn vortojn flue,
ke ili altarangu sendispute.

Ja malfacilas esti oficiro,
ĉar rango basas kaj postulo altas.
Se vi ne kontentigas la regnestron,
vi la amaran karieron startas.
Se vi obeas lin laŭ lia koro,
amikoj vin jen flatulo rigardas.

Mi vin admonas loĝi en ĉefurbo,
vi diras, ke l' dom' 'stas en konstruado.
Eldiro via pikas mian koron,
ĉar, kiam vi eskapis el la ŝtato,
kiu jam bone por vi ekkonstruis
domegon luksan tie kun kompato?

小旻

旻天疾威，敷于下土。谋犹回遹，何日斯沮？谋臧不从，不臧覆用。我视谋犹，亦孔之邛。滄滄訖訖，亦孔之哀。谋之其臧，则具是违。谋之不臧，则具是依。我视谋犹，伊于胡底。我龟既厌，不我告犹。谋夫孔多，是用不集。发言盈庭，谁敢执其咎？如匪行迈谋，是用不得于道。

哀哉为犹，匪先民是程，匪大犹是经。维迓言是听，维迓言是争。如彼筑室于道谋，是用不溃于成。

国虽靡止，或圣或否。民虽靡盬，或哲或谋，或肃或艾。如彼泉流，无沦胥以败。

不敢暴虎，不敢冯河。人知其一，莫知其他。战战兢兢，如临深渊，如履薄冰。

Plendo de konsilisto

Satiro al la regnestro, kiu utiligas malsaĝajn lordojn por planado en la regado de la regno.

La Ĉielo senkompate kruela
faligas plagon al nia regn-tero.
La reĝaj politikoj vere mavas,
kiam formortos ili en malhelo?
Rimedojn bonajn li ne zorge uzas,
sed la malbonajn ŝatas kun favoro.
Do, laŭ mi tiuj mavaj politikoj
ne indas aplikiĝi kun frivolo?

La malnobluloj ne toleras dirojn
kontraŭajn, kiel tristinda afero!
Ili staras kontraŭ brila planado,
sed ne observas planon kun fidelo.
Konsentas ili pri l' malbona plano
kaj strebas ĝin plenumi kun fervoro.
Strangaĵo tia en palaco daŭras
ĝis kiam? Afliktiĝas mi en koro.

Testudo mia jam enuas vere
kaj ne profetas plu en seriozo.
Abundas saĝaj konsilistoj reĝaj,
sed ne naskiĝas plan' kun grandiozo.
Malsamaj voĉoj bruas en palaco,
racio tamen ne 'stas en apero.
Similas tio vojaĝon survojan,
ekiri oni devas jen kun celo.

Ho ve, la regno dronas en kaoso,
neniun leĝon sekvas la regantoj,
observas nek regulojn de prauloj.

Al la reĝo tre plaĉas flataj kantoj,
disputoj ja aperas en amaso.
Kiel domkonstruo, ju pli sugestoj,
des pli oni fuŝas en embaraso.

En nia eta regn' sen forta leĝo
saĝec' de homoj estas ne egala.
Kvankam popolo ne sufiĉe riĉas,
kelkaj tamen estas kun penso klara,
kaj kapablas regi la regnon bone.
Simile al la fluo el la fonto,
konduiti oni povas ja bontone.

Ne batu tigron per la nuda mano
nek la riveron vadu sen boato.
Oni konas la danĝeron en tio,
sed ne la urĝan krizon en la ŝtato.
Fronte al l' adversa situacio,
mi sentas kvazaŭ stari ĉe abismo,
kvazaŭ paŝi sur maldika glacio.

小宛

宛彼鸣鹄，翰飞戾天。我心忧伤，念昔先人。明发不寐，有怀二人。
人之齐圣，饮酒温克。彼昏不知，壹醉日富。各敬尔仪，天命不又。
中原有菽，庶民采之。螟蛉有子，蜾蠃负之。教诲尔子，式穀似之。
题彼脊令，载飞载鸣。我日斯迈，而月斯征。夙兴夜寐，毋忝尔所生。
交交桑扈，率场啄粟。哀我填寡，宜岸宜狱。握粟出卜，自何能穀？
温温恭人，如集于木。惴惴小心，如临于谷。战战兢兢，如履薄冰。

Malgranda birdo

Pensoj de lordo, kiu sin trovas en amara situacio.

Ĉirpanta turto facilmovi
soras al la blua ĉielo.
Mi ĉagreniĝas en la koro,
vee al gepatroj sub tero.
Maldormas mi jen ĝis aŭroro,
sopiras ilin kun tenero.

Drinkante tiuj kun saĝeco
povas teni sin neebriaj,
tiuj kun konfuzita penso
drinkas ĝis stato senraciaj.

Kondutu bone kaj laŭdece,
ĉar sortoj estas senvariaj.

Faboj kreskas sur ebenaĵo,
oni plukas ilin konkure.
Insektoj naskas junajn idojn,
vespoj portas ilin plezure.
Eduku viajn filojn bone
heredi bonvirton sekure.

Motaciloj alflugas glise
kun siblaj pepoj en aero.
Mi ĉiutage penas strebe
kaj klopodas kun sinofero
de mateno ĝis nokt' senĉese
por glorigi patron sub tero.

Ĉirpantaj verdaj fringoj bekas
grajnojn sur draŝeja tereno.
Denaske estis mi povrulo,
nun dronas en procesa ĝeno.
Mi ŝutu manplenon da rizo
por sortodiveni mem kun peno.

Li, diskretema kaj bonkora,
staras kvazaŭ sur arbo alta.
Li, singardema kaj zorgema,
staras kvazaŭ en val' smeralda,
timema kun anksi' en koro
sur la glacio paŝo-halta.

小弁

弁彼鸛斯，归飞提提。民莫不穀，我独于罹。何辜于天？我罪伊何？心之忧矣，云如之何？
踯躅周道，鞠为茂草。我心忧伤，惄焉如捣。假寐永叹，维忧用老。心之忧矣，疢如疾首。
维桑与梓，必恭敬止。靡瞻匪父，靡依匪母。不属于毛？不罹于里？天之生我，我辰安在？
菀彼柳斯，鸣蜩嘒嘒，有漙者渊，萑苇淠淠。譬彼舟流，不知所届，心之忧矣，不遑假寐。
鹿斯之奔，维足伎伎。雉之朝雊，尚求其雌。譬彼坏木，疾用无枝。心之忧矣，宁莫之知？
相彼投兔，尚或先之。行有死人，尚或墮之。君子秉心，维其忍之。心之忧矣，涕既陨之。
君子信谗，如或酬之。君子不惠，不舒究之。伐木掎矣，析薪拙矣。舍彼有罪，予之佗矣。
莫高匪山，莫浚匪泉。君子无易由言，耳属于垣。无逝我梁，无发我笱。我躬不阅，遑恤我后。

Plendo de ekzilito

Versoj pri trista plendo de ekzilito.

Korvoj gaje svingas flugilparon
kaj revenas nesten en arbaro.
Ĉiuj homoj havas bonan ŝancon,
nur mi triste dronas en amaro.
Ĉu mi ja ofendas la ĉielon?
Ĉu mi kulpas multe sen mezuro?
Mi en koro kovas ĉagreniĝon,
ne foriĝas ĝi eĉ per plezuro.

L' ebenaj kaj larĝaj vojoj plenas
jam de herboj sen ajna trafiko.
Mia kor' nereteneble naskas
grandan maltrankvilon de tragiko.
Veas mi en dormo sen malvesti
pro oldiĝo tuja kun temp-paso.
La dolor' profunde en la koro
ankaŭ l' kapon pikas per frakaso.

Antaŭ morusarboj de gepatroj
plantitaj mi staras kun respekto.
Mi nur sekvas la patrajn konsilojn,
kun mi restas panj' de belaspekto.
Ni ne interligas per korp-haroj
nek kroĉiĝas kune per sang-fluo.
Ho, Ĉielo, vi min enmondigis,
sed kie estas mia viv-ĝuo?

Plorsalikoj verdas ĉe la lago,
ĉirpas laŭtaj cikadoj senĉese.
En profunda akvo klara, pura
kreskas densaj fragmitoj ekscese.
Drivas mia koro ja boate,
flosas laŭ akvfluo ĝi sencele.
Mi tre afliktiĝas en la koro,
mi ja povas dormi neniele.

Cervo kuras sur la sovaĝejo
per kvar kruroj facilmovaj lerte.
Fazano krias en frumateno
por alvoki inon jen averte.
Mia kor' velkinta arbo ŝajnas

falis ĝiaj branĉoj sen vivpleno.
Mi jam falas en ĉagrenon grandan,
kiu scias pri mi kun kompreno?

La leporo ret-kaptita eble
estus savita de hom' favora.
La mortinto sur la vojo eble
enterigitus de hom' bonkora.
Kia malmolkora, mia lordo,
vi eĉ min rigardas kun kruelo.
Mia koro plenas je tristsento,
miaj larmoj falas en mizero.

Mia lordo, vi aŭskultas klaĉojn,
kaj ebrias de falsaj mensogoj.
Vi ja min ignoras sen atento,
male kredas klaĉojn per apogoj.
En arbhak' vin gardu ne en ombro,
kaj haku lignon laŭ ĝia vejno.
Vi kulpulon lasas kun libero,
sed metiĝas sur min la ĉagreno.

Ne alia mont' pli altas ol vi,
nek ja pli profundas ajna fonto.
Vi ne plu akceptu tiujn klaĉojn,
fine vin konkeros desaponto.
Ne iru al la fiŝhoka loko,
ne fiŝkorbon mian ovru vole.
Mi jam ŝarĝas per ĉagrenoj plene,
ĉu mi pensus pri mi mem enfole?

巧言

悠悠昊天，曰父母且。无罪无辜，乱如此幬。昊天已威，予慎无罪。昊天大幬，予慎无辜。
乱之初生，僭始既涵。乱之又生，君子信谗。君子如怒，乱庶遄沮。君子如祉，乱庶遄已。
君子屡盟，乱是用长。君子信盗，乱是用暴。盗言孔甘，乱是用餗。匪其止共，维王之邛。
奕奕寝庙，君子作之。秩秩大猷，圣人莫之。他人有心，予忖度之。跃跃兔，遇犬获之。
荏染柔木，君子树之。往来行言，心焉数之。蛇蛇硕言，出自口矣。巧言如簧，颜之厚矣。
彼何人斯？居河之麋。无拳无勇，职为乱阶。既微且幬，尔勇伊何？为犹将多，尔居徒几何？

Malordo kaj onidiro

Satiro al la regantoj, kiuj aŭskultas onidirojn kaj malordigas la regnon.

La ĉielo vasta kaj profunda

ŝajnas gepatroj kun bona koro.
La popol' senkulpas kaj senpekas,
kial plagi ilin sen favoro?
Vi ne devus malordigi l' mondon,
ĉar plebanoj vivus harmonie.
Vi Ĉielo regas supre alte,
maltrankvile vivas ni anksie.

Ĉe la komenco de la malordo
onidiroj disvastiĝas ĉie.
Kaj tumult' leviĝas en la regno,
klaĉojn kredas la regnestro fie.
Se li ja rifuzas klaĉojn firme,
la malord' tuj irus al la fino.
Se li estus saĝa kaj prudenta,
mortus la tumult' en elimino.

La regnestro ĵuras multafoje,
la tumulto kreskas jen des plie.
li plenkredas la tumultan bandon,
la malordo diskuras rabie.
Trompoj kaj mensogoj estas dolĉaj,
plagoj falas kaj minacas ĝene.
Katastrofo kaŭzas al la regno
la suferon grandan ja malbene.

La imponajn templon kaj palacon
pra-regnestroj konstruigis pene.
La perfektajn leĝojn por la ŝtato
formis la saĝuloj entreprene.
Se okazas io trompanta vere,
ni travidi povas ĝin tutcerte.
La ĉashund' sukcesas kapti predon
furioze forkurante lerte.

La arbidon la regnestro plantas
dum ĝi estas juna kaj malforta.
Ĉu la klaĉoj bonas aŭ malbonas,
juĝi povas via menso orda.
La mielaj vortoj fluas lirle
el la buŝo de klaĉuloj vere.
Ili fanfaronas kun mensogoj,
ne konante honton malsincere.

Kia homo estas tiu, kiu
loĝas sur herbejo ĉe l' rivero?
Havas li nek forton nek saĝecon,
sed li estas font' de plagsufero.
Li kun putraj kaj ulceraj kruroj
kiel montras forton kun kuraĝo?
Multajn artifikaĵojn li elfaras,
sed vin sekvas homoj kun malsaĝo.

何人斯

彼何人斯？其心孔艰。胡逝我梁，不入我门？伊谁云从？维暴之云。
二人从行，谁为此祸？胡逝我梁，不入唁我？始者不如今，云不我可
彼何人斯？胡逝我陈？我闻其声，不见其身。不愧于人？不畏于天？
彼何人斯？其为飘风。胡不自北？胡不自南？胡逝我梁？祇搅我心。
尔之安行，亦不遑舍。尔之亟行，遑脂尔车。壹者之来，云何其吁。
尔还而入，我心易也。还而不入，否难知也。壹者之来，俾我祇也。
伯氏吹埙，仲氏吹篪。及尔如贯，谅不我知，出此三物，以诅尔斯。
为鬼为蜮，则不可得。有靦面目，视人罔极。作此好歌，以极反侧。

Ĉu amiko aŭ malamiko

Plenda kanto de tiu, kiu malvenkas en la konflikto inter la lordoj.

Kiu estas tiu alvenanto?
Li insidan penson kovas vere.
Kial iris al la digo li, sed
ne vole vizitis min sincere?
Kiun li obeas kun kapklino?
Nur tiran' lin subigas libere.

Vi du paŝas kune al palaco,
kiu el vi pekas kun insido?
Kial iris al la digo li, sed
ne min vole vidis per vizito?
Ni amikoj estis ja antaŭe,
sed nun li min rigardas sen rido.

Kiu estas tiu alvenanto?
Preteriris li la halon haste,
nur aŭdiĝis lia paŝobruo,
tamen li ne min vizitis gaste.
Li ne sentas honton antaŭ l' mondo,
nek Ĉielon timas tiom draste.

Kiu estas tiu alvenanto?
Li ja ŝajnas vento de leĝero.
Kial li ne blovas de la nordo?
Kial li ne venas el sud-tero?
Ŝtele li ascendas sur la digon,
li min kirlas ja per kor-sufero.

Li veturas jen antaŭen lante
sen ripozi eĉ dum momenteto.
Li galopas sur la voj' antaŭen,
sen lubriki l' ĉaron kun diskreto.
Kial li ne venas al mi foje
por konsoli bone min laŭpete.

Se revenas li kaj min vizitas,
mia koro plenas de delico.
Se revenas li sen min viziti,
mi plenplenas je amara spico.
Do li venu al mi unufoje,
ke trafas mian koron feliĉo.

Tiam li ekblovis kotfajfilon
kaj mi ludis fluton akompane.
Ŝajne ni satĝuis en akordo,
fakte li min traktas ja ĉikane.
Antaŭ oferaĵ' ni ĵuris frate,
li promesis nian ligon vane.

Se li estus vulpo aŭ fantomo,
ni ne plu intervidiĝus vole.
Nun li aĉe agas kun kaprico,
li simulas agi ja bonkore.
Mi komponas nun ĉi tiun kanton,
ke li ne molestu min dolore.

巷伯

萋兮斐兮，成是贝锦。彼谮人者，亦已大甚！
哆兮侈兮，成是南箕。彼谮人者，谁适与谋。
缉缉翩翩，谋欲谮人。慎尔言也，谓尔不信。
捷捷幡幡，谋欲谮言。岂不尔受？既其女迁。
骄人好好，劳人草草。苍天苍天，视彼骄人，矜此劳人。
彼谮人者，谁适与谋？取彼谮人，投畀豺虎。豺虎不食，投畀有北。有北不受，投畀有昊！
杨园之道，猗于亩丘。寺人孟子，作为此诗。凡百君子，敬而听之。

Voĉo de eŭnuko

Plendaj versoj de suferanto de palacaj klaĉoj.

Fadenoj de koloroj jen teksitas
al broditaĵo okulplaĉa brile.
Vi faras famojn kun insida koro
kaj oni jam sin sentas maltrankvile.

Vi elvomas kaluminiojn, klaĉojn,
vi jam fariĝis malfavora stelo.
Vi faras famojn kun insida koro,
kiu vin vole helpas kun prefero?

Parolas vi miele dolĉajn vortojn
por mave trompi homojn al kaptilo.
Vin gardu en fam-fabrikado zorge,
alie vi ne trompos kun facile.

Vi havas lertan langon por mensogi,
kaj ĉiel trompas homojn artifike.
Trompitoj venos fine al la lumo,
vi certe trafos punon elradike.

Klaĉuloj tiuj ĝojas kun fiero,
dum honestuloj dronas en tristeco.
Ho, la ĉielo, vasta la ĉielo!
Rigardu tiujn klaĉulojn fierajn
kaj tiujn honestulojn en mizero.

Ho, vi malbona fam-farant' insida,
kiu 'stas via instiganto vera?
Mi ĵetu lin al ŝakalo por manĝo,
se ĝi ne volas vori lin kruela,
mi ĵetu lin al la nordo en frosto.
Se la malvarma loko lin rifuzas,
mi ĵetu ĝin al la ĉiela lando,
ke la ĉiela dio lin akuzas.

Al la ĝardeno unu voj' kondukas
najbare al la enkampara duno.
Mi estas ja eŭnuko olda Mengzi,
kaj verkis ĉi poemon en maljuno.
Ho, korteganoj volu legi zorge,

kaj portu l' faktojn al la brila lumo.

谷风

习习谷风，维风及雨。将恐将惧，维予与女。将安将乐，女转弃予。
习习谷风，维风及颓。将恐将惧，置予以怀。将安将乐，弃予如遗。
习习谷风，维山崔嵬。无草不死，无木不萎。忘我大德，思我小怨。

Vento el la valo

Lamentado de forlasita edzino.

Vento el la valo blovas
en senĉesa pluvopelo.
Tiujare en danĝero
ni nin ligis kun sincero.
Nun ni vivas en trankvilo,
vi foriras sen fidelo.

Vento el la valo blovas
ja senhalte kun susuro.
Tiujare en danĝero
ni brakumas kun sang-ĵuro.
Nun ni vivas en trankvilo,
vi forlasas min sen spuro.

Vento el la valo blovas
trans montaro ĝis la foro,
velkiginte dekmil herbojn
kaj la arbojn en angoro.
Vi forgesas miajn bonojn,
naskas haton en la koro.

蓼莪

蓼蓼者莪，匪莪伊蒿。哀哀父母，生我劬劳。
蓼蓼者莪，匪莪伊蔚。哀哀父母，生我劳瘁。
瓶之罄矣，维罍之耻。鲜民之生，不如死之久矣。无父何怙？无母何恃？出则衔恤，入则靡至。
父兮生我，母兮鞠我。抚我畜我，长我育我，顾我复我，出入腹我。欲报之德。昊天罔极！
南山烈烈，飘风发发。民莫不穀，我独何害！
南山律律，飘风弗弗。民莫不穀，我独不卒！

Sopiro al gepatroj

Kanto pri servutuloj, kiuj sopiras al siaj mortintaj gepatroj.

Abrotanoj kreskas en prospero,
ili ne 'stas herboj de valoro.
Ve, gepatroj miaj mortis frue,
ili vartis min jen kun favoro.

Abrotanoj kreskas en abundo,
ili estas herboj kun vivpleno.
Ve, gepatroj miaj mortis triste,
ili flegis min kun granda peno.

La ĉerpilo malplenas je akvo,
ankaŭ mankas akvo al la ĵaro.
La gepatroj formortis mizere,
nia vivo dronas en amaro.
De kiu sen patro ni dependas?
al kiu sen panj' ni vivas cele?
Sur la voj' ni iras kun suspiro,
en la hejm' ni restas ensufere.

Ho, gepatroj, vi min naskis, nutris
plenkreskigis jen kun granda peno.
Vi prizorgas min ĝis adoltiĝo
kaj edukis min per komprenemo.
Vi protektis min en ajna loko,
kaj min portis en via brakumo.
Volas mi vin renkompenci ame
sed vi trenis vin al vivkonsumo.

Suda Monto staras jen impone,
vento blovas sablon al ĉielo.
Ĉiuj sindonemas al gepatroj,
nur mi plene dronas en mizero.

Suda Monto staras jen majeste,
vento portas sablon al la foro.
Ĉiuj sin dediĉas al gepatroj,
sed mi sola veas en la koro.

大东

有饌簋飧，有捄棘匕。周道如砥，其直如矢。君子所履，小人所视。眷言顾之，潜焉出涕。
小东大东，杼柚其空。纠纠葛屨，可以履霜。佻佻公子，行彼周行。既往既来，使我心疚。
有冽洧泉，无浸获薪。契契寤叹，哀我憊人。薪是获薪，尚可载也。哀我憊人，亦可息也。

东人之子，职劳不来。西人之子，粲粲衣服。舟人之子，熊罴是裘。私人之子，百僚是试。或以其酒，不以其浆。韞韞佩璲，不以其长。维天有汉，监亦有光。跂彼织女，终日七襄。虽则七襄，不成报章。皖彼牵牛，不以服箱。东有启明，西有长庚。有捄天毕，载施之行。维南有箕，不可以簸扬。维北有斗，不可以挹酒浆。维南有箕，载翕其舌。维北有斗，西柄之揭。

Eosto kaj uesto

Dum la dinastio Zhou, la regantoj donis neegalan traktadon al la regnantoj en eosto kaj uesto. Tiu ĉi odo estas priskribo pri la plendoj de la eostaj regnantoj.

La manĝskatolo plenas je manĝaĵoj,
kaj ili manĝas per ligna kulero.
La regnaj vojoj platas kaj ebenas,
kaj sage rektas sur glata nivelo.
La noblaj lordoj rajtas iri tie,
plebanoj ne licas vojiri vole.
Pensante pri pasintaj tagoj ĝojaj,
mi larmas kaj sentas triston enkore.

En eostaj regnoj, etaj kaj egaj,
teksiloj ĉiuj ne funkcias bone.
Kun par' da ŝuoj el lianaj fibroj
ni tretas sur glacio jen kraksone.
Sur largaj vojoj tiuj dandoj iras
parade kaj triumfe kun rideto.
Vidante ilin iri kaj reiri,
mi sentas triston kun moroz-obsedo.

La frida akvo el la monta fonto
ne malsekigu la brulignon plene.
Vekiĝas mi el sonĝo kaj suspiras
pri mi mem povra kaj malsana ĝene.
Mi povas porti la brulignon hejmen
por hejti kaj kuiri tra la vivo.
Lamentas kaŝe mi pri l' morba korpo,
mi devas resti iom en vivdrivo.

Regnantoj en l' eost' laboras pene,
neniu venas al ni por konsolo,
dum lordoj kaj nobeloj en l' uesto
sin vestas lukse en brila koloro.
Eĉ boatistoj en l' uesto pavas
per palt' el urso kaj pantera felo.
Eĉ filoj de la sklavoj en palaco

ja oficiras kiel kuriero.

Se ni prezentas bonan alkoholon,
ne konsideras ili ĝin nektaro.
Se ni donacas jadon kaj smeraldon,
ili prenas ilin por fi-kristalo.
Rivero la Arĝenta* sur ĉielo
trembrilas jen en vasta galaksio.
Tri Teksistinaĵoj jen tagnokte
moviĝas cikle en tri-kompanio.

Kvankam moviĝas ili ja tagnokte,
brodaĵon ili eltekxi ne povas.
Bovista stelo, kvankam ege brilas,
ĝi ne laŭpove ajnan ĉaron movas.
Matena stel' aperas en l' eosto,
en okcident' elvenas vesperstelo.
La Lir-konstelaciaĵoj sidas
ĉirkaŭe de Arĝenta la Rivero.

En sudo la Kribrila stelo brila
ne povas ja trakribri branon vere.
En nordo la Ĉerpila stelo glima
ne povas ĉerpi akvon ja kulere.
En sudo la Kribrila stelo brila
nur montras la longan langon apere.
En nordo la Ĉerpila stelo glima
uesten anson ŝovas surĉiele.

**la Arghenta rivero estas Lakta Vojo.*

四月

四月维夏，六月徂暑。先祖匪人，胡宁忍予？
秋日凄凄，百卉具腓。乱离瘼矣，爰其适归？
冬日烈烈，飘风发发。民莫不穀，我独何害？
山有嘉卉，侯栗侯梅。废为残贼，莫知其尤！
相彼泉水，载清载浊。我日构祸，曷云能穀？
滔滔江汉，南国之纪。尽瘁以仕，宁莫我有？
匪鶉匪鸛，翰飞戾天。匪鱣匪鮪，潜逃于渊。
山有蕨薇，隰有杞桋。君子作歌，维以告哀。

Lamentado de ekzilito

Palaca oficisto plendas pri sia ekzilo pro kaptiteco en la komploto.

La kvara lunmonato eksomeras,
en la sesa venas la varma vetero.
Prapatroj ne 'stas homoj la bonkoraj,
eĉ ili min dronigas en sufero.

Aŭtune frida vent' ululas triste,
cent floroj velke falas al la tero.
Disiĝas ĉiuj homoj en tumulto,
kie, do, estas ilia loĝa sfero?

En vintro blovas furioze l' vento
minace penetranta en severo.
Jen oni vivas ĝoje kaj kontente,
kial mi solas dronas en sufero?

Surmonte pompe kreskas bonaj arboj:
kaŝtanoj kaj umeoj intere.
Nun ili velkas kaj foriĝas branĉoj,
kiu vundas ilin tiom kruele?

La akvo fluas el tiu montfonto
jen klare jen malklare en vario.
Mi en solec' eltenas la suferon,
kiam mi vivos pace sen anksio?

Riveroj jen torentas kun ondopelo
kaj prenas la sudlandon en brakumo.
Plenumas mi la taskon ja perfekte,
kial la reĝ' ne traktas min sen puno?

Surmonte la filikoj vaste kuŝas,
vegetas liĉiberoj en la valo.
Ho ve, mi verkas tiun ĉi kanzonon
por konsoli la koron en amaro.

北山

陟彼北山，言采其杞。偕偕士子，朝夕从事。王事靡盬，忧我父母。
溥天之下，莫非王土；率土之滨，莫非王臣。大夫不均，我从事独贤。
四牡彭彭，王事傍傍。嘉我未老，鲜我方将。旅力方刚，经营四方。
或燕燕居息，或尽瘁事国；或息偃在床，或不已于行。
或不知叫号，或惨惨劬劳；或栖迟偃仰，或王事鞅掌。
或湛乐饮酒，或惨惨畏咎；或出入风议，或靡事不为。

Maljusteco

Satiro al la regantoj, kiuj donas neegalajn taskojn al subuloj.

Mi grimpas sur la nordan monton
por pluki ruĝajn berojn pene.
Estiel forta oficisto
mi okupitas tage ĝene.
Aferoj reĝaj venas multe,
gepatroj tristas jen ĉagrene.

La lando vastas sub ĉielo,
ĝi estas sub reĝa domino,
kaj ĉiuj homoj en la regno
estas vasaloj laŭ destino.
Regantoj agas neegale,
nur mi laboras kun deprimio.

Ĉevaloj kvar galopas vente,
ankaŭ urĝas ŝtata afero.
Ili laŭdas ke mi ja junas,
kun korpo forĝita de fero,
mi povas peni kun fortpleno
kaj kuri ĉien en libero.

Kelkaj restas hejme komforte,
aliaj ja klopodas pene;
kelkaj kuŝas morbe sur lito,
aliaj hastas taskoplene.

Ne konas kelkaj hom-suferon,
aliaj penas ja dumvive;
trankvile kelkaj ĝuas ĉion,
aliaj blinde vagas drive.

Drinkadas kelkaj en orgio,
aliaj dronas en sufero.
kelkaj parolas fanfarone,
aliaj vivas en despero.

无将大车

无将大车，祇自尘兮。无思百忧，祇自疚兮。
无将大车，维尘冥冥。无思百忧，不出于颍。
无将大车，维尘雍兮。无思百忧，祇自重兮。

Ne ĝenu vin mem

Tristaj pensoj de servutulo.

Ne puŝu bov-tiratan ĉaron,
kovriĝos vi per polvo ĝene.
vi vin afliktos ja ĉagrene.

Ne puŝu bov-tiratan ĉaron,
vi levos polvon en aero.
Ne tedu vin per vanta penso,
vi triste dronos en despero.

Ne puŝu bov-tiratan ĉaron,
la polv' blindigas vin sur vojo.
Ne tedu vin per vanta penso,
vi vivas pene kun malĝojo.

小明

明明上天，照临下土。我征徂西，至于艮野。二月初吉，载离寒暑。
心之忧矣，其毒大苦。念彼共人，涕零如雨。岂不怀归？畏此罪罟！
昔我往矣，日月方除。曷云其还？岁聿云莫。念我独兮，我事孔庶。
心之忧矣，惮我不暇。念彼共人，眷眷怀顾！岂不怀归？畏此谴怒。
昔我往矣，日月方奥。曷云其还？政事愈蹙。岁聿云莫，采萧获菽。
心之忧矣，自诒伊戚。念彼共人，兴言出宿。岂不怀归？畏此反覆。
嗟尔君子，无恒安处。靖共尔位，正直是与。神之听之，式穀以女。
嗟尔君子，无恒安息。靖共尔位，好是正直。神之听之，介尔景福。

Hejmsopiro

Oficialulo, kiu longe militiras en la foro, naskas sopiremon.

La ĉielo klara ĵetas lumon
suben al la vasta regna tero.
Mi uesten militiras longe
sur la sovaĝejo jen en gelo.
Tiam estis ĉirkaŭ la jarfino,
nun forpasis frosta la vetero.

Mia koro tristas kun ĉagreno,
kvazaŭ mi mergiĝus en amaro.
Mi pripensas tiujn samsortulojn,
larm' verŝiĝas kiel pluvofalo.
Ĉu mi ne reiri hejmen volas?

Min retenas la ordondeklaro.

Kiam mi forlasis hejmon mian,
fridaj tagoj venis al la fino.
Kiam mi reiros hejmon karan?
Nova jar' videblas en proksimo.
Mi solece vivas en la foro,
reĝaj taskoj venas kun obstino.

Mi laboras pene en ĉagreno,
taskoj min subpremas sen ripozo.
Mi pripensas tiujn en laboro,
mi kompaton naskas kun nervozo.
Ĉu mi ne reiri hejmen volas?
Min timigas reĝa furiozo.

Kiam mi forlasis hejmon mian,
varme 'stis kun serena ĉielo.
Kiam mi reiros hejmon karan?
Taskoj des pli urĝas sen modero.
Tuj finiĝos jara la tempdaŭro,
ĉiuj grenoj jam 'stas en grenĉelo

Mia koro tristas kun ĉagreno,
eble mi min ĝenas nenecese.
Mi pripensas tiujn bonkorulojn,
nokte dormas mi ja malsukcese.
Ĉu mi ne reiri hejmen volas?
Reĝ' koleros kontraŭ mi agrese.

Ho, kolegoj miaj en deĵoro,
ĉasu ne profiton nek komforton.
Sur posteno via estu justa,
kun atento streĉu vian forton.
Se Ĉiel' vin vidas agi tiel,
certe li faligos laŭdan vorton.

Ho, kolegoj miaj en deĵoro,
ĉasu ne profiton, sed fidele
faru vian devon laŭ ordono
kaj vin donu al labor' sincere.
Se Ĉielo scias pri l' bonfaro,
certe li vin benos ja prefere.

鼓钟

鼓钟将将，淮水汤汤，忧心且伤。淑人君子，怀允不忘。
鼓钟喈喈，淮水湔湔，忧心且悲。淑人君子，其德不回。
鼓钟伐鼗，淮有三洲，忧心且妯。淑人君子，其德不犹。
鼓钟钦钦，鼓瑟鼓琴，笙磬同音。以雅以南，以箫不僭。

Sonoriloj kaj tamburoj

Riproĉo al la nunaj regantoj, kiuj diboĉe vivas, forgesante la bonajn virtojn de siaj prapatroj.

Sonas sonoriloj kaj tamburoj,
vaste onde fluas la rivero.
Mi anksion naskas sen plezuro,
ekpensante pri la bonaj virtoj
de antaŭaj reĝaj la sanktuloj.

Muzikiloj sonas ĝoje brue,
la river' torentas jen senhalte.
Afliktiĝas mi enkore plue,
ekpensante pri la bonkvalitaj
reĝoj, kiuj agis kontribue.

Muzikiloj sonas kun fervoro,
tri insuloj staras en rivero.
Ĉagreniĝas mi ja en la koro,
sopirante al antaŭaj reĝoj,
kiuj bonkondukas sen frivolo.

Ili frapas la tamburojn bone,
kaj liuton, fluton ludas bele.
La muzik' aŭdiĝas plezurdone,
akompane de kordinstrumentoj,
tonoj ŝvebas en aer' belsone.

楚茨

楚楚者茨，言抽其棘。自昔何为，我艺黍稷。我黍与与，我稷翼翼。
我仓既盈，我庾维亿。以为酒食，以享以祀。以妥以侑，以介景福。
济济跄跄，絜尔牛羊，以往烝尝。或剥或亨，或肆或将。
祝祭于祊，祀事孔明。先祖是皇，神保是飨。孝孙有庆，报以介福，万寿无疆。
执爨蹠蹠，为俎孔硕。或燔或炙，君妇莫莫。为豆孔庶，为宾为客。
献酬交错，礼仪卒度，笑语卒获。神保是格，报以介福，万寿攸酢。
我孔熯矣，式礼莫愆。工祝致告，徂赉孝孙。苾芬孝祀，神嗜饮食。
卜尔百福，如畿如式。既齐既稷，既匡既敕。永锡尔极，时万时亿。

礼仪既备，钟鼓既戒。孝孙徂位，工祝致告。神具醉止，皇尸载起。
鼓钟送尸，神保聿归。诸宰君妇，废彻不迟。诸父兄弟，备言燕私。
乐具入奏，以绥后禄。尔肴既将，莫怨具庆。既醉既饱，小大稽首。
神嗜饮食，使君寿考。孔惠孔时，维其尽之。子子孙孙，勿替引之。

Kulta ceremonio

Priskribo pri kultado al prapatroj kaj ĉielo por benoj en la venonta jaro.

Ni forigu dornplantojn pure
el la kampoj jen por grenplantado.
Kiel faris tion la prapatroj,
sorgon kaj milion ja laŭ ŝato
ni kultivas kaj rikoltas multe.
La grenplantoj kreskas en prospero,
plenas la tenej' je rikoltaĵo,
grenoj orde staplitas ĝis ŝvelo.
Ni preparas vinon kaj frandaĵojn
por niaj prapatroj kaj l' Ĉielo.
Ni invitu ilin al sidiĝo
kaj ricevu benojn en ofero.

Ni paŝadas urĝe kun soleno,
lavpurigas bovojn en bonordo,
senfeligas kaj kuiras mole
por kultad' sub gvido de la lordo.
Oferaĵojn metas ni sur tablon,
ceremoniestr' ĉe l' pordo staras.
Ja imponas la kultceremonio,
ĉiuj feoj veni avataras.
La prapatroj ĝuas vinon, manĝon,
ili diras al pranepoj bene:
“Nu, akceptu la feliĉon vole,
vivu longe, longe, senĉagrene!”

Kuiristoj agas tre rapide,
ili bakas, fritas vere lerte
kaj preparas grandajn ujojn, pladojn.
inoj verve helpas ilin sperte.
Per abund' da pladoj de manĝaĵoj
mastr' regas gastojn ja zorgeme.
Li proponas vinon al gegastoj,
observante l'riton ridmiene.
Ili brue ridas dum babilo,
la gepatroj venas kaj deklaras:

“Jen akceptu benojn el ĉielo,
longe vivu dum vi firme staras!”

Kun respektemo al la prapatroj,
ni laŭdece faras riton orde.
Komunikas la estro diktadon:
“Donu benojn al pranepoj vorte.
L’ oferitaj vino kaj manĝaĵoj
plaĉas al spiritoj ĝis ekstazo.
Ili ĝoje feliĉigas vin mem
dum ĉi tiu kultada okazo.
Vi observas strikte rit-procezon,
kun kondukt’ respekta kaj ĝentila.
Vi feliĉon trafas milofoje
kaj eterne restu l’ viv’ trankvila!”

Jam la rito iris al la fino,
muzikiloj sonas kun ĝojsento.
La pranep’ revenas al sidloko,
la estro anoncas kun kontento:
“La spiritoj ĉiuj ebriiĝas!”
La spirit-roluloj disi pretas.
La muzik’ eskortas ilin supren
al ĉielo, kie ili restas.
Kuiristoj kaj virinoj ĉiuj
jam formovas pladoj sen prokrasto.
Onkloj, nevoj kunas por manĝado
dum babilas ili jen sen hasto.

Oni ludas muzikilojn nune,
ni kunmanĝas post spirita iro.
Tiuj pladoj ja bongustas vere,
ni kunĝuas manĝon dum babilo.
Post satmanĝo de manĝaĵoj riĉaj,
ni salutas reciproke kore.
“La spiritoj ŝatas la manĝaĵojn,
certe ili benas nin favore.
La kultado iris glate, flue,
ĉio farinda faritas bone.
Niaj posteuloj ja daŭrigu
la ceremonion tre impone!”

信南山

信彼南山，维禹甸之。畇畇原隰，曾孙田之。我疆我理，南东其亩。
上天同云。雨雪雰雰，益之以霡霂。既优既渥，既沾既足。生我百谷。
疆場翼翼，黍稷彧彧。曾孙之穡，以为酒食。畀我尸宾，寿考万年。
中田有庐，疆場有瓜。是剥是菹，献之皇祖。曾孙寿考，受天之祜。
祭以清酒，从以騂牡，享于祖考。执其鸾刀，以启其毛，取其血膋。
是烝是享，苾苾芬芬。祀事孔明，先祖是皇。报以介福。万寿无疆。

Kultado piede de la Suda Monto

Odo al ofera ceremonio.

La Suda Monto sin etendas onde,
ĉi tie kuŝas la plata tereno.
Sur la bonordigita ebenaĵo
la posteuloj plugas ja sen ĝeno.
Ni elhakadas virgan teron tie
kaj plivastiĝas nun nia bieno.

Sur la ĉiel' amasas grizaj nuboj,
neĝeroj dance flirtas kun leĝero
en la pluveto senĉese falanta.
Pluvakvon sorbas la kampara sfero,
humida grundo taŭgas por kreskado
de grenplantoj en agrabla vetero.

Sur la fekundaj kampoj en bonordo
milio, sorgo kreskas en prospero.
Pranepoj enkolektas grenon bone
por fari vinon preta por ofero
kaj ĝin dediĉi al spiritoj sanktaj
kiuj avataras el la ĉielo.

Meze de kampoj staras pajla ĥato,
plantitas kalabaso en vicaro.
Pranepoj senŝeligas ilin pure
kaj peklas ilin por prapatroj.
Tiel ili ricevos benojn graciajn
kaj sin mem feliĉigos dum mil jaroj.

Surtablen klaran vinon oni metas,
kaj bovo oferitas sur l' altaro,
por la prapatroj sur la ĉielo.
Per la tranĉilo jen kun luma palo

distranĉas ni la felon kaj elprenas
grason kaj sangon de la animalo.

Oferas ni manĝaĵojn, klaran vinon
al la prapatroj karaj kun sincero.
Kultado plenumiĝis tre perfekte,
ĝin ili laŭdas vere kun prefero.
Repagos ili al ni multajn benojn
kaj la longlongan vivon sen sufero.

甫田

倬彼甫田，岁取十千。我取其陈，食我农人。自古有年。今适南亩，或耘或耔。黍稷薿薿，攸介攸止，烝我髦士。

以我齐明，与我牺羊，以社以方。我田既臧，农夫之庆。琴瑟击鼓，以御田祖。以祈甘雨，以介我稷黍，以穀我士女。

曾孙来止，以其妇子。饁彼南亩，田峻至喜。攘其左右，尝其旨否。禾易长亩，终善且有。曾孙不怒，农夫克敏。

曾孙之稼，如茨如梁。曾孙之庾，如坻如京。乃求千斯仓，乃求万斯箱。黍稷稻粱，农夫之庆。报以介福，万寿无疆。

Riĉrikolto

Laŭdkanto de oficialulo pri la riĉrikolto de kampuloj sub lia regado.

Sur la vastaj kampoj ĉiujare
rikoltiĝas granda kvant' da greno.
Mi elprenas intan grenostokon
por la kampulojn nutri sen ĝeno.
Ni antaŭe havis riĉrikoltojn,
nun mi iras al la sud' por vido.
Ili sarkas kampojn, ŝutas semojn,
la grenplantoj kreskas kun rapido.
Al mi sendos la kamp-intendanto
grenon la rikoltitan sen lanto.

Mi plenigas l' ujojn per milio,
metas bovon, ŝafon por ofero
al gepatroj kaj tero-spiritoj.
La grenplantoj kreskas en prospero,
ke kampuloj ĝojas en la koro.
Ili flutas kaj frapas tamburon
por voki kamp-dion kun dankemo,
peti de li pluvfalan postulon,
helpi plantojn kreski kun favoro

kaj vivteni nin sub lia gloro.

La regnestro venas ja inspekti
kune kun edzino, filoj siaj
kaj per manĝ'regali la kampulojn,
vokto ĝojas kun rido radia.
Tiu kunvokas kampulojn kune
kaj kunĝuas la frandaĵojn vere.
La grenplantoj bone kreskas nune,
Riĉrikolto alvenos espere.
La regnestro gajas sen kolero,
la kampuloj penas kun fort-ŝvelo.

Lia greno amasiĝas alte
kiel domo kaj nubtuŝa turo.
La tenejoj plenas je nutraĵoj
kaj abundas greno sen mezuro.
Ni bezonas mil tenejojn pliajn
kaj mil larĝajn ĉarojn por gren-porto.
Ĉiujaraj riĉrikoltoj igas,
ke l' popolo vivu en komforto.
Preĝu ni mil benojn el Ĉielo
al la regno ĉiam en prospero.

大田

大田多稼，既种既戒，既备乃事。以我覃耜，俶载南亩。播厥百谷，既庭且硕，曾孙是若。
既方既皂，既坚既好，不稂不莠。去其螟螣，及其蟊贼，无害我田稚。田祖有神，秉畀炎火。
有渰萋萋，兴雨祈祈。雨我公田，遂及我私。彼有不获穰，此有不斂穧，彼有遗秉，此有滞穗，伊寡妇之利。

曾孙来止，以其妇子。饁彼南亩，田峻至喜。来方禋祀，以其騂黑，与其黍稷。以享以祀，以介景福。

Kamplaboro

Odo al kultado al riĉrikolto kaj spiritoj.

Sur vastaj kampoj kreskas multaj plantoj,
por komenciĝo de la kamplaboro
ni semojn elektas, riparas ilojn.
Mi per akra plugilo kun fervoro
platigas kampojn en la suda parto.
Ni ŝutas semojn de diversaj grenoj,
la plantoj kreskas altaj kaj fortikaj,
la regnestro ĝojegas sen ĉagrenoj.

Rizgrajnoj montras ŝelojn delikatajn,
la tigoj dikas kaj fortikas vere.
T troviĝas nek herbaĉoj nek insektoj
ĉar kampuloj laboras tre severe.
Radik-manĝantaj vermoj ne detruu,
ne faru ion mavan al kamptero.
Kampdio benu nian kamplaboron,
bruligu la insektojn per fajr-pelo.

Sur la ĉielo grizaj nuboj densas,
pluveto dance flirtas kun leĝero.
Ĝi ŝprucas super kampoj la publikaj
kaj la privataj kampoj en libero.
T troviĝas tie nematuraj plantoj,
nekolektitaj tigoj sur kamptero,
garboj da pajlaj tigoj dismetitaj
kaj spikoj nelevitaj en pelmelo.
Lasu tion al povraj en mizero.

La regnestro venas ĉi tien vidi
kune kun edzino kaj filoj siaj,
kaj per manĝaĵoj regali la kampulojn,
la vokto ĝojas kun rido radia.
La reĝo venas kulti al ĉielo
per vivaj oferaĵoj religiaj
kaj rikoltitaj rizo kaj maizo,
peti diojn ĝui en manĝ' orgia
kaj, ho, sin bani per la benoj diaj.

瞻彼洛矣

瞻彼洛矣，维水泱泱。君子至止，福禄如茨。韎韐有奭，以作六师。
瞻彼洛矣，维水泱泱。君子至止，韉琫有珌。君子万年，保其家室。
瞻彼洛矣，维水泱泱。君子至止，福禄既同。君子万年，保其家邦。

Ĉe rivero Luo

Laŭdkanto pri la regnestro.

Torentas larĝa la rivero,
plenŝvelas akvo en ondpelo.
La reĝo venas ĉe la bordon,
radias benoj en lumhelo.
Kun al genuŝirmiloj ruĝaj

paradas trupoj sen pelmelo.

Torentas larĝa la rivero,
plenŝvelas akvo en ondskuo.
La reĝo venas ĉe la bordon,
lia glavo brilas je bluo.
Li longe vivu por eterne,
restu lia dom' sen detruo.

Torentas larĝa la rivero,
plenŝvelas akvo en impono.
La reĝo venas ĉe la bordon,
surkape jen kun glora krono.
Li longe vivu por eterne,
li ĉiam regu sur la trono.

裳裳者华

裳裳者华，其叶湑兮。我覯之子，我心写兮。我心写兮，是以有誉处兮。
裳裳者华，芸其黄矣。我覯之子，维其有章矣。维其有章矣，是以有庆矣。
裳裳者华，或黄或白。我覯之子，乘其四骆。乘其四骆，六轡沃若。
左之左之，君子宜之。右之右之，君子有之。维其有之，是以似之。

Nobla lordo

Laŭdo al la lordo, kiu kondutas dece kun saĝeco.

Floroj bunte pompas en splendo,
folioj densas en prospero.
Kun la lordo en mia vido
mi plezuriĝas en ĝojhelo.
Mi plezuriĝas en ĝojhelo,
ĉar li kondutas kun sincero.

Floroj bunte pompas en splendo,
petaloj flavas en sunbrilo.
Kun la lordo en mia vido
mi sentas ĝojon en jubilo.
Mi sentas ĝojon en jubilo,
ĉar li kondutas kun ĝentilo.

Floroj bunte pompas en splendo,
blankaj kaj flavaj en muaro.
Mi vidas tiun noblan lordon
veturi per ĉevala ĉaro,

veturi per ĉevala ĉaro,
li tiras bridojn de ĉevalo.

De live venas helpo al li,
li takte traktas kun talento,
kaj de dekstre venas asisto,
li agas ja kun diligento.
Ĉar li havas veran kapablon,
li regas kun inteligento.

桑扈

交交桑扈，有莺其羽。君子乐胥，受天之祜。
交交桑扈，有莺其领。君子乐胥，万邦之屏。
之屏之翰，百辟为宪。不戢不难，受福不那。
兕觥其觶，旨酒思柔。彼交匪敖，万福来求。

Tosta kanto

Tosta kanto de la regnestro laŭdanta korteganojn.

Fringeloj verdaj kun plumaro bela
ĉirpante flugas ĉirkaŭ la palaco.
Mi tostu al vi ĝoji kun mil benoj
kaj falu sur vin la ĉiela graco.

Fringeloj verdaj flugas jen ĉirpante
kun kolorriĉaj plumoj sur la kolo.
Mi tostu al vi ĝoji kun mil benoj
kaj vin duŝu la ĉiela favoro.

Vi starigu modelon bonan,
estu la regna piliero.
Feliĉo estu ĉe vi lordoj,
homoj kun mildo kaj tenero.

Nun la pokalo korna plenas
je dolĉa, plaĉa vin' al lango.
Ne blufu nek fieru iam,
venos al vi popola danko!

鸳鸯

鸳鸯于飞，毕之罗之。君子万年，福禄宜之。
鸳鸯在梁，戢其左翼。君子万年，宜其遐福。

乘马在厩，摧之秣之。君子万年，福禄艾之。
乘马在厩，秣之摧之。君子万年，福禄绥之。

Ambirdoj

Kanto al genovedzoj.

Jen ambirdoj flugas pare
preter reto kaj kaptilo.
Vi pasigu dekmil jarojn
kaj vi vivu kun trankvilo.

Staras ambirdoj sur digo,
kun bek' kaŝita en sino.
Vi pasigu dekmil jarojn
benu vin bona destino.

Kvar ĉevaloj en la stalo
manĝas fojnon jen kun ĝuo.
Vi pasigu dekmil jarojn
kiel riverakv' en fluo.

Kvar ĉevaloj en la stalo
manĝas fojnon jen ĝis sato.
Vi pasigu dekmil jarojn
mil benoj 'stas via ŝato.

頍弁

有頍者弁，实维何何？尔酒既旨，尔肴既嘉。岂伊异人？兄弟匪他。
芩与女萝，施于松柏。未见君子，忧心奕奕；既见君子，庶几说懌。
有頍者弁，实维何期？尔酒既旨，尔肴既时。岂伊异人？兄弟具来。
芩与女萝，施于松上。未见君子，忧心忡忡；既见君子，庶几有臧。
有頍者弁，实维在首。尔酒既旨，尔肴既阜。岂伊异人？兄弟甥舅。
如彼雨雪，先集维霰。死丧无日，无几相见。乐酒今夕，君子维宴。

La palaca bankedo

Reganto regas siajn amikojn kaj parencojn en la palaco.

Por kio lordoj portas peltan ĉapon
el bela cerva fel' en ĉi okazo?
Jen via vino puras kaj dolĉetas,
manĝaĵoj viaj bongustas en vazo.
Neniu gasto 'stas en la bankedo,
krom fratoj kaj parencoj en intimo.

Lianoj kaj grimpplantoj ja vegetas
volvante ĉirkaŭ cipreso kaj pino.
Ne vidas mi la respektplenan lordon,
mi naskas ĉagreniĝon en la koro.
Kiam mi vidas lin en homamaso,
mi grade plezuriĝas kun adoro.

Por kio lordoj portas peltan ĉapon
el bela cerva fel' en ĉi bankedo?
Ni venas drinki vian bonan vinon
kaj bongustajn frandaĵojn jam en preto.
Neniu gasto 'stas en la bankedo,
Jam ĉiuj fratoj venas por orgio.
Lianoj kaj grimpplantoj ja vegetas
volvante ĉirkaŭ pin' en harmonio.
Ne vidas mi la elegantan lordon,
mi afliktiĝas triste kun anksio.
Kiam mi vidas lin en ĉeestantoj,
mi ekĝojegas ja kun simpatio.

Por kio lordoj portas peltan ĉapon
el bela cerva felo en ĉi horo?
Ni vian bonan vinon venas drinki
kaj bongustaĵojn al nia honoro.
Troveĝas ne fremdulo en festeno,
krom fratoj kaj parencoj en la halo.
Similas ni al pluv' aŭ neĝo flirta,
finfine ni disiĝos en separo.
Alvenos certe l' morto iutage,
ne multos la tagoj de rekuniĝo.
Ni drinku kiel eble ja plej multe
ĉi-nokte jen ĝis ebria vertiĝo.

车 辇

间关车之辇兮，思变季女逝兮。匪饥匪渴，德音来括。虽无好友？式燕且喜。
依彼平林，有集维鷖。辰彼硕女，令德来教。式燕且誉，好尔无射。
虽无旨酒？式饮庶几。虽无嘉肴？式食庶几。虽无德与女？式歌且舞？
陟彼高冈，析其柞薪。析其柞薪，其叶湑兮。鲜我觐尔，我心写兮。
高山仰止，景行行止。四牡騤騤，六轡如琴。觐尔新婚，以慰我心。

Survoje al novedzina hejmo

Festado al geedziĝo.

La ĉaro ruliĝas kun knaro,
tuj edziniĝos la knabino.
Mankas nek akvo nek manĝaĵo,
mi nur ŝin volas kun intimo.
Amikojn multajn mi ne havas.,
ni festu nunton sen deprimi.

En la arbaro kun prospero
staras fazan' kun plumaro bela.
Kondutas la knabino bone,
ŝi helpas jen per scio klera.
Ni festu l' nunton kun ĝojego
kaj vivadu en am' miela.

Kvankam mankas bona vin' al mi,
ni drinku por nia futuro.
Kvankam frandaĵoj mankas ĉe mi,
ni manĝu iom kun plezuro.
Bonvirton vian mi ne havas,
mi dancu, kantu en ambrulo.

Sur alta monto kun arbaro
brullignon mi dehakas pene.
Branĉetojn mi elektas inter
prosperaj frondoj zorgoplene.
Kun vi en mia vido klara
mi ĝojas en la kor' ekstreme.

Al alta monto mi rigardas,
sur vojo larĝa kaj ebena.
Galopas miaj kvar ĉevaloj,
bridoj ŝvebas en kant' senĝena.
Rigardante la novedzinon
mi sentas la koron ĝojplena.

青蝇

营营青蝇，止于樊。岂弟君子，无信谗言。
营营青蝇，止于棘。谗人罔极，交乱四国。
营营青蝇，止于榛。谗人罔极，构我二人。

Verdaj muŝoj

Satiro al la regantoj, kiuj kredas klaĉojn.

Kun zumo verdaj muŝoj flugas
kaj falas sur heĝon en korto.
Vi bona, komprenema lordo,
ne kredu klaĉojn de fakt-tordo.

Kun zumo verdaj muŝoj flugas
kaj falas sur vepron rapide.
La klaĉoj konfuzas kvar regnojn,
dissemas diskordon inside.

Kun zumo verdaj muŝoj flugas
kaj falas sur kverkon leĝere.
La klaĉoj venenas rilaton
inter ni du ja netolere.

宾之初筵

宾之初筵，左右秩秩。筵豆有楚，殽核维旅。酒既和旨，饮酒孔偕。钟鼓既设，举酬逸逸。
大侯既抗，弓矢斯张。射夫既同，献尔发功。发彼有的，以祈尔爵。
籥舞笙鼓，乐既和奏。烝繄烈祖，以洽百礼。百礼既至，有壬有林。锡尔纯嘏，子孙其湛。
其湛曰乐，各奏尔能。宾载手仇，室人入又。酌彼康爵，以奏尔时。
宾之初筵，温温其恭。其未醉止，威仪反反。曰既醉止，威仪幡幡。舍其坐迁，屡舞仙仙。
其未醉止，威仪抑抑。曰既醉止，威仪怱怱。是曰既醉，不知其秩。
宾既醉止，载号载呶。乱我筵豆，屡舞僛僛。是曰既醉，不知其邮。侧弁之俄，屡舞傴傴。
既醉而出，并受其福。醉而不出，是谓伐德。饮酒孔嘉，维其令仪。
凡此饮酒，或醉或否。既立之监，或佐之史。彼醉不臧，不醉反耻。式勿从谓，无俾大怠。
匪言勿言，匪由勿语。由醉之言，俾出童羖。三爵不识，矧敢多又。

Orgio

Priskribo pri orgio dum palaca festeno.

Eniras gastoj en festenan halon
kun bonkonduco en la bona ordo.
Teleroj kaj pokaloj vice staras,
bongustaj pladoj sidas en akordo.
Per rafinita vino kun aromo
la gastoj tostar en ĝojplena bruo.
Tamburoj, sonoriloj jam nun pretas,
proponas oni vinon en plenkato.
La celtabulo pendas en aero
por amuza sag-arkpafada ludo.

Elektas la pafistoj la rivalojn.
Se oni trafas l' celon sen disputo,
ricevas la punvinon la rivaloj,
kaj ĉiuj saltetas kun jovialo.

Nun ili dancas ĝoje en muziko
de fluta kaj tambura akompano.
Dediĉas ni dancadon al prapatroj
kaj ritoj plenumitas per peano,
alian sekvas unu jen senĉese
en ĝojplena, solena atmosfero.
Vin benas la spiritoj per feliĉo
kaj posteuloj daŭros sen sufero.
Kun ĝoja kaj kontenta animstato
la gastoj lertas en pafado vere.
Elektas ili la rivalojn al si
kaj mastro volas ludi ja prefere.
Per bona vino en granda pokalo
premieras ni l' gajnanton sen komparo.

Kiam al la festeno gastoj venas,
ili bonkondukas kaj tre ĝentilas.
Post la unua rond' de vinpropono
iliaj movoj laŭdece facilas.
Sed multaj vinproponoj ilin venkas,
kaj ili ĉiuj dronas en ebrio.
Ŝancelpaŝas ili tien kaj tien,
agadas ili preskaŭ sen racio.
Kiam ili sobre festenis dece,
sin tenis ili ĝentilaj bonorde.
Sed en ebri' frivole ili agas,
kaj jam deliras balbute vort-torde.
La alkoholo batas ilin ĝene,
iradas la festeno ja ĉagrene.

La gastoj vere malsobriĝas tute,
aŭdiĝas deliraĵoj kaj kri-bruoj.
Jam renversiĝas tasoj kaj teleroj,
drinkantoj staras kun tremaj genuoj.
Kun forta vino jen en la stomako
ne ili konas pravon de malpravo.
Oblikve sidas ĉapo sur la kapo,
ankoraŭ ili dancas ja en ravo.
Se ili foriras ebriaj plene,

la mastro sentas ĝojon en la koro.
Se ili ne foriras pro ebrio,
li sin ĝenas pro lia malfervoro.
Drinkado ĉeestantojn vere ravas,
sed la konduto de drinkantoj gravas.

Kiam ajn oni drinkas en libero,
kelkaj sobras kaj kelkaj en ebrio.
Oni supervidas la drinkprocezon
kaj notas pri drinka situacio.
Drinkemuloj ne nur ne sentas honton,
sed nomas nedrinkantojn sentaŭguloj.
Ne spronu ilin plu al pli da vino,
ke ili iras ja trans decreguloj.
Ne diru, kion vi ne devas diri,
ne faru mavon en drinkada sceno.
Deliro post drinkado 'stas absurda,
eĉ ŝafo povus fariĝi azeno.
Vi povas drinki tri tasojn da vino,
ne glutu plu plimulte kun obstino.

鱼藻

鱼在在藻，有颁其首。王在在镐，岂乐饮酒。
鱼在在藻，有莘其尾。王在在镐，饮酒乐岂。
鱼在在藻，依于其蒲。王在在镐，有那其居。

Fiŝo inter akvoherboj

Satiro pri la suvereno en diboĉa vivo.

La fiŝo naĝas inter akvoherboj,
skuante sian kapon kun leĝero.
La suvereno loĝas en ĉefurbo,
li vivas kaj diboĉas en ĝojhelo.

La fiŝo naĝas inter akvoherboj,
svingante sian voston en libero.
La suvereno loĝas en ĉefurbo,
li drinkas kaj disipas sen modero.

La fiŝo naĝas inter akvoherboj,
flosante tuj apud la alga sfero.
La suvereno loĝas en ĉefurbo,
senĝene li vivadas sen sufero.

采菽

采菽采菽，筐之莛之。君子来朝，何锡予之？虽无予之？路车乘马。又何予之？玄衮及黼。觶沸檻泉，言采其芹。君子来朝，言观其旂。其旂淠淠，鸾声嘒嘒。载骖载驷，君子所届。赤芾在股，邪幅在下。彼交匪纾，天子所予。乐只君子，天子命之。乐只君子，福禄申之。维柞之枝，其叶蓬蓬。乐只君子，殿天子之邦。乐只君子，万福攸同。平平左右，亦是率从。汎汎杨舟，绋纆维之。乐只君子，天子葵之。乐只君子，福禄膍之。优哉游哉，亦是戾矣。

Aŭdienco de la regnestro

Feŭdestroj venas al la palaca aŭdienco.

Ni kolektu fabojn kun penego,
enkorbigu ilin orde vere.
Venas feŭdestroj al aŭdienco,
kion donas la regnestr' prefere
al ili? Sed nenion tut-tute.
Ĉu kaleŝo taŭgas por veturo?
Kaj krome ili tre ŝatas robon
kun desegno draka laŭ mezuro.

Ni kolektu celerion pene
apud fonto kun lirlanta fluo.
Venas feŭdestroj al aŭdienco,
ili vidas flagojn jen en skuo.
La drakflagoj flirtas en zefiro,
sonoriloj tintas kun sonbelo.
La ĉevaloj kvarope galopas,
ili tuj alvenos sub vip-pelo.

Ruĝaj tukoj kovras la genuojn,
vindoĵ volvas krurojn en bonstato.
Ili vestas sin zorgeme dece
per donacoj de la reĝa ŝtato.
Ili kovas ĝojon en la koro
por asisti l' reĝon kun plezuro.
Ili kovas ĝojon en la koro
por akiri benojn en futuro.

Kverk' etendas siajn longajn branĉojn,
la folioj densas en prospero.
Ili kovas ĝojon en la koro
kaj komforte vivas kun gajŝvelo.
Ili naskas ĝojon en la koro

kaj satĝuas benojn en libero.
La sekvantoj obeeme agas,
observas ordonojn kun severo.

Flosas cipresa boat' laŭ fluo,
kanab-ŝnur' ligitas al la pruo.
La feŭdestroj ĝojas kaj delicas,
benoj falas por ilia ĝuo.
Ili vivas la komfortan vivon,
benoj venas el la suvereno.
En senĝena vivo ili naĝas
kaj pasigas tagojn sen ĉagreno.

角弓

骍骍角弓，翩其反矣。兄弟婚姻，无胥远矣。
尔之远矣，民胥然矣。尔之教矣，民胥效矣。
此令兄弟，绰绰有裕。不令兄弟，交相为愈。
民之无良，相怨一方。受爵不让，至于已斯亡。
老马反为驹，不顾其后。如食宜飮，如酌孔取。
毋教猱升木，如涂涂附。君子有徽猷，小人与属。
雨雪瀼瀼，见晛曰消。莫肯下遗，式居娄骄。
雨雪浮浮，见晛曰流。如蛮如髦，我是用忧。

Admonoj

Oni admonas al la regnestro, ke li ne fremdiĝu de siaj parencoj nek kedu la klaĉojn de aĉuloj.

Pafarko kun streĉita ŝnuro
aspektas bele per konturo.
Ne fremdigu fratojn, parencojn
per nevidebla alta muro.

Se vi fremdiĝas de la fratoj,
plebanoj vin imitas vere.
Se vi bonkonduktas modele,
ili agas sammaniere.

Akordo inter fratoj gravas,
ne manku tolerema koro.
Se inter si konflikta ili,
naskiĝas ĝenoj kaj rankoro.

Se homoj kovas mavan senton,
riproĉas ili reciproke,

akirias strebe altan rangon,
kaj ilin tiros mort' alvoke.

Ĉevalo olda zorgas pri si,
sed ne pri l' ido nematura.
Simile ĝi bezonas manĝon
kaj vinon kun sento plezura.

Simion ne instruu grimpi,
nek ŝirmu koton sur la muro.
Se vi kondutas decregule,
vin sekvas oni kun plezuro.

Neĝflokaj flirtas sur ĉielo
kaj malaperas en sunlumo.
Ne arogantu kun fiero,
nek sakru kun riproĉa zumo..

Neĝeroj dancas en aero
kaj jam degelas sub sunbrilo.
Tiuj barbaraj agoj vere
min igas ĝena sen trankvilo.

菀柳

有菀者柳，不尚息焉。上帝甚蹈，无自暱焉。俾予靖之，后予极焉。
有菀者柳，不尚愒焉。上帝甚蹈，无自瘵焉。俾予靖之，后予迈焉。
有鸟高飞，亦傅于天。彼人之心，于何其臻。曷予靖之，居以凶矜。

Maljusta tirano

Lordo satiras pri la suvereno, kiu kaprice agas.

Folioj de saliko ombre densas,
kiu ne volus resti sub ĝi vere?
La suvereno agas tre kaprice,
ne intimiĝu kun li tre modere.
Li volis, ke mi lin asistu regi,
sed, ve, nun li mortigas min prefere.

Salikfolioj donas densan ombron,
nepre ne ŝirmu vin sub ĝi libere.
La suvereno agas tre arbitre,
ne alproksimiĝu al li leĝere.
Li ordonis, ke mi lin helpu regi,

sed nun li min molestas tre severe..

Flugilojn svingas birdoj kun pepado.
ĉe l' horizonto de alta ĉielo.
La suvereno kun dezir' senlima
min forpuŝas ĝis ekstrema malhelo.
Kial li min ordonis helpi regi,
sed nun li premas min jen al mizero?

都人士

彼都人士，狐裘黃黃。其容不改，出言有章。行歸于周，萬民所望。
彼都人士，台笠緇撮。彼君子女，綢直如髮。我不見兮，我心不说。
彼都人士，充耳琇實。彼君子女，謂之尹吉。我不見兮，我心苑結。
彼都人士，垂帶而厲。彼君子女，卷髮如蜃。我不見兮，言從之邁。
匪伊垂之，帶則有余。匪伊卷之，髮則有旃。我不見兮，云何盱矣。

Homo de l' ĉefurb' malnova

Post la tumulto de la regno, lordoj sopiras al homoj de la malnova ĉefurbo.

Homo de l' ĉefurb' malnova
vestas sin en flavo brila.
Li kondutas decregule
kaj sin montras tre ĝentila.
En malnova la ĉefurbo
al li iras laŭdo mira.

Homo de l' ĉefurb' malnova
portas la ĉapon el pajlo.
Tiu nobla belulino
pavas kun nigra hararo.
Se mi ŝin ne vidus longe,
mi ja dronus en amaro.

Homo de l' ĉefurb' malnova
portas jadon ĉe l' orelo.
Tiu nobla belulino
bonkodutas sen leĝero.
Se mi ŝin ne vidus longe,
min ja trafus amsufero.

Homoj de l' ĉefurb' malnova
portas silkubandon fale.
Tiu nobla belulino

jen allogas buklo-hare .
Ĉar mi ŝin ne vidus longe,
volus ŝin mi ĉei stare.

Lia silkrubando bone
sidas jen sur robo lia.
Ŝia buklo alt-turnita
flirtas en vento defia.
Se mi ŝin ne vidus longe,
kaptus min sopir' pasia.

采绿

终朝采绿，不盈一掬。予发曲局，薄言归沐。
终朝采蓝，不盈一襜。五日为期，六日不詹。
之子于狩，言韞其弓。之子于钓，言纶之绳。
其钓维何？维鲂及鱮。维鲂及鱮，薄言观者。

Atendo al lia reveno

Edzino sopiras al sia edzo, kiam la tago de lia reveno estas prokrastita.

Mi plukas la reĝ-herbojn dum mateno,
sed ili kolektiĝas en manpleno.
Hararo mia gluiĝas malpure,
mi volas lavi ĝin hejmenveture.

Mi plukas indig-plantojn dum mateno,
sed ili pokas nur en tukoteno.
Li post kvin tagoj hejmen ne revenas,
je l' sesa lia nereveno ĝenas.

Se iras ĉasi li en la arbaro,
sagujon mi ordigas en preparo.
Se li fiŝadi iras ĉe l' rivero,
pretigas mi la reton kun prefero.

Kiajn fiŝojn li kaptas per la reto?
Bramojn kaj karpajn el akva kvieto.
Bramojn kaj karpajn el akva kvieto
li ne enuas kapti per la reto.

黍苗

芄芄黍苗，阴雨膏之。悠悠南行，召伯劳之。

我任我輶，我车我牛。我行既集，盖云归哉。
我徒我御，我师我旅。我行既集，盖云归处。
肃肃谢功，召伯营之。烈烈征师，召伯成之。
原隰既平，泉流既清。召伯有成，王心则宁。

Reveno post konstruado

Laŭdo pri sukcesa finkonstruado de la lordo Mu.

Grenplantoj kreskas en prospero
sub pluv' subtila el ĉielo.
Ni suden marŝas sur la vojo,
la lord' nin spronas kun sincero.

Ni puŝas ĉarojn kun penego
kaj tiras bovojn per vip-pelo.
Jam mia konstruad' finiĝis,
ni hejmeniras kun ĝoj-ŝvelo.

Ni piediras aŭ veturas
en tute ĝoja atmosfero.
Jam nia konstruad' finiĝis,
ni hejmeniras en sunhelo.

La turo de Xie staras firme,
dank' al la lorda sinofero.
Ni marŝas orde kaj impone,
li gvidas nin ja kun fiero.

La basa loko jam leviĝas,
fontakvo lirlas en leĝero.
La lordo finis jam la vorkon,
la reĝo ĝojas en korĉelo.

隰桑

隰桑有阿，其叶有难。既见君子，其乐如何。
隰桑有阿，其叶有沃。既见君子，云何不乐。
隰桑有阿，其叶有幽。既见君子，德音孔胶。
心乎爱矣，遐不谓矣？中心藏之，何日忘之！

Morusarbo

Junulino esprimas sian amsenton al sia karulo.

Morusarbo staras en la valo

kun folioj densaj en prospero.
Kiam mi vin vidas, mia kara,
mia koro plenas je ĝoj-helo.

Morusarbo staras en la valo
kun folioj densaj en abundo.
Kiam mi vin vidas, mia kara,
la ĝojisento svarmas al korfundo.

Morusarbo staras en la valo
kun folioj en verda koloro.
Kiam mi vin vidas, mia kara,
vi aspektas virte en favoro.

Mi lin amas kaŝe en la koro,
kial ne al li eldiri klare?
Kovas mi la senton ja interne,
kaj mi kaŝas ĝin ĝis amdeklare.

白华

白华菅兮，白茅束兮。之子之远，俾我独兮。
英英白云，露彼菅茅。天步艰难，之子不犹。
漣池北流，浸彼稻田。嘯歌伤怀，念彼硕人。
樵彼桑薪，烝烘于燧。维彼硕人，实劳我心。
鼓钟于宫，声闻于外。念子懆懆，视我迈迈。
有鹳在梁，有鹤在林。维彼硕人，实劳我心。
鸳鸯在梁，戢其左翼。之子无良，二三其德。
有扁斯石，履之卑兮。之子之远，俾我疢兮。

Blankaj floroj

Lamentado de forlasita virino.

Junkoj blanke floras en prospero
inter blankaj herboj sur val-tero.
Li forlasis min kaj iris foren,
mi solece vivas en sufero.

Blankaj nuboj flosas sur ĉielo,
herboj humidigas en prujn-pelo.
Mia sorto batas min minace,
li forlasis min kun malfidelo.

Lante fluas l' akvo de l' rivero,

al grenplantoj verdaj sur kamp-tero.
Mi plorante kantas kun ĉagreno,
sed mi lin sopiras en mizero.

Mi kolektas branĉojn sur mont-sfero,
mi bruligas ilin por fajr-ŝvelo.
Mi ekpensas pri li en la menso,
mia kor' pikiĝas per despero.

Sonoj de l'tambur' el palac-halo
flugas ŝvebe ĉien en spiralo.
Mi sopiras al li en la koro,
sed forgesas li min en amaro.

Falko glutas fiŝon ĉe kanalo,
gruo jen malsatas en arbaro.
Sopiremo al li en la koro
vere pikas min en buduaro.

Staras sur la dig' ambirda paro
kun beko ŝovita en plumaro.
Kun malbona kor' li min forgesas,
mi ja dronas en la sufer-mar.

Piedtena-ŝtono por ĉevalo
kuŝe platas en stabila staro.
Li forlasis min mem al la foro,
mi min sentas trista en separo.

绵蛮

绵蛮黄鸟，止于丘阿。道之云远，我劳如何。饮之食之，教之诲之。命彼后车，谓之载之。
绵蛮黄鸟，止于丘隅。岂敢惮行，畏不能趋。饮之食之。教之诲之。命彼后车，谓之载之。
绵蛮黄鸟，止于丘侧。岂敢惮行，畏不能极。饮之食之，教之诲之。命彼后车，谓之载之。

Malfacila vojiro

Malsuperulo plendas pri malfaciloj dum la vojo.

Birdeto kun lanugo mola
nestas sur la monta deklivo.
Sur longa vojo piediras
mi malfacile kun soifo.
Mi nutras kaj trinkigas ĝin, kaj
instruas ĝin konduki pene.

Mi volas, ke la posta ĉaro
ĝin portas pace kaj solene.

Birdeto kun lanugo mola
nestas en la monta angulo.
Ĉu mi timas longan vojiron?
Mi timas tardon dum veturo.
Mi nutras kaj trinkigas ĝin, kaj
instruas ĝin kondukti bone.
Mi volas, ke la posta ĉaro
ĝin portas pace kaj impone.

Birdeto kun lanugo mola
nestas en la monta talio.
Ĉu mi timas longan vojiron?
Mi timas tardon kun anksio.
Mi nutras kaj trinkigas ĝin, kaj
instruas ĝin kondukti brile.
Mi volas, ke la posta ĉaro
ĝin portas pace kaj trankvile.

瓠叶

幡幡瓠叶，采之亨之。君子有酒，酌言尝之。
有兔斯首，炮之燔之。君子有酒，酌言献之。
有兔斯首，燔之炙之。君子有酒，酌言酢之。
有兔斯首，燔之炮之。君子有酒，酌言酬之。

Regalo en la hejmo

Gastiganto regalas gastojn per ordinara manĝo.

Kalabast-folioj plukitaj
'stas kuiritaj por festeno.
Li jam preparas bonan vinon,
ni drinku ĝisrande sen ĝeno.

Leporojn grasajn kaj tre grandajn
ni baku ilin kun zorgemo.
Li jam preparas bonan vinon,
ni tostu ĝoje sen ĉagreno.

Leporojn grasajn kaj tre grandajn
ni stufu aŭ brogi en supo.
Li jam pretigas fajnan vinon,

ni drinku glute kiel lupoj.

Leporojn grasajn kaj tre grandajn
ni fritu bone sur fajrbrulo.
Li jam pretigas dolĉan vinon,
ni tostu kune kun plezuro.

渐渐之石

渐渐之石，维其高矣。山川悠远，维其劳矣。武人东征，不皇朝矣。
渐渐之石，维其卒矣。山川悠远，曷其没矣？武人东征，不皇出矣。
有豕白蹄，烝涉波矣。月离于毕，俾滂沱矣。武人东征，不皇他矣。

Ekspedicio eosten

Soldatoj en ekspedicio plendas pri malfacila vojirado.

Impone montaj rokoj staras,
skrapante nubojn sur ĉielo.
Montpintoj altas, akvo foras,
nin ĝenas dure la voj-tero.
En ekspedicio eosten
soldatoj dronas en sufero.

Impone montaj rokoj staras,
tuŝante nubojn de leĝero.
Montpintoj altas, akvo foras,
nin hardas vojira severo.
En ekspedicio eosten
soldatoj veas en mizero.

Porkidoj jen kun blankaj hufoj
riveron vadas en konkuro.
La lun' moviĝas en nebulon,
jen pluvas kiel akvokuro.
En ekspedicio eosten
soldatoj plendas kun murmuro.

苕之华

苕之华，芸其黄矣。心之忧矣，维其伤矣！
苕之华，其叶青青。知我如此，不如无生！
牂羊坟首，三星在罍。人可以食，鲜可以饱！

Floroj de begonio

Priskribo pri malsatego.

Disfloras pompe begonio,
petaloj flavas kun brilhelo.
Doloras triste mia koro,
min ja afliktas malsat-pelo.

Disfloras pompe begonio,
folioj verdas kun palbrilo.
Se konus mi ĉi tristan vivon,
mi ne naskiĝus en humilo.

Ŝafino havas grandan kapon,
fiŝ-naso glimas je arĝento.
Kvankam oni ja manĝas fiŝojn,
ne satas ili ĝis kontento.

何草不黄

何草不黄？何日不行？何人不将？经营四方。
何草不玄？何人不矜？哀我征夫，独为匪民。
匪兕匪虎，率彼旷野。哀我征夫，朝夕不暇。
有芃者狐，率彼幽草。有栈之车，行彼周道。

Peza servuto

Plendo pri senĉesa kaj rigora servuto.

Ne herb' ne velkas flaviĝinte,
ne hom' eskapi el servuto.
Ne hom' ne marŝas sur la vojo,
sed vagas vere kiel brutoj.

Ne herboj ne putras en koto,
ne hom' ne vivas en sufero.
Ve, ni povruloj en doloro
profunde dronas en mizero.

Nek apro nek tigro ni estas,
sed iras nur sur sovaĝ-tero.
Ve, ni povruloj en amaro
laboras ĉiam sen libero.

La vulp' kun mola, longa vosto

sin kaŝas en herboza loko.
En granda ĉaro kun kovrilo
ni penas ŝvite en sufoko.

大雅

Parto de epopeoj

文王

文王在上，於昭于天。周虽旧邦，其命维新。有周不显，帝命不时。文王陟降，在帝左右。亶亶文王，令闻不已。陈锡哉周，侯文王孙子。文王孙子，本支百世，凡周之士，不显亦世。世之不显，厥犹翼翼。思皇多士，生此王国。王国克生，维周之桢；济济多士，文王以宁。穆穆文王，于缉熙敬止。假哉天命，有商孙子。商之孙子，其丽不亿。上帝既命，侯于周服。侯服于周，天命靡常。殷士肤敏，裸将于京。厥作裸将，常服黼黻。王之荅臣，无念尔祖。无念尔祖，聿修厥德。永言配命，自求多福。殷之未丧师，克配上帝。宜鉴于殷，骏命不易！命之不易，无遏尔躬。宣昭义问，有虞殷自天。上天之载，无声无臭。仪刑文王，万邦作孚。

Regnestro Wen

Epopoeo dediĉita al Regnestro Wen dum kultado.

Regnestro Wen restas sur ĉielo,
brilas lia anim' kun lumgloro.
Kvankam Regn' Zhou estas olda ŝtato,
ĝi l' nova fariĝos kun honoro.
i jen havos brilan estontecon,
Destinon bonan dotas Ĉielo.
Regnestr' Wen ascendis ĉielmonden
kaj restas kun Di' en viv-mielo.

Regnestro Wen, saĝa, asidua,
diskuras lia reputacio.
La Ĉielo helpas lian regon
kaj tronigon tra generacioj.
Liaj posteuloj kaj parencoj
mil mil jarojn viglu en prospero.
Liaj korteganoj, oficistoj
gloru ja en sia kariero.

Korteganoj, konsilistoj saĝas
kaj sagacas ĉiuj ĉe la trono;
ili servas kun diligenteco
kiel ŝtataj fortikaj kolonoj.
En la regn' naskiĝas talentuloj
por apogi l' ŝtaton kun fidelo.
Multas ja tiaj kompetentuloj,
li trankvilas kalme sur ĉielo.

Regnestro Wen montris afablecon
kun akordiĝem' kaj sinofero.

Providenco estas ĉiopova,
eĉ pranepoj de Shang kun sincero
venas servi jen al lia regno
por subteni la regadon kune
kaj konstrui Regnon Zhou prospere,
por forte vigligi ĝin komune.

Submetiĝo al Zhou estas nepra
ĉar ĝi estas ĉiela ordono.
Ili estis asistantoj de Shang,
sed nun staras en Zhou sub dispono.
Dum ritado en Regno Zhou ili
vestas sin ja en Shang-a kostumo.
Kvankam kiel korteganoj de Zhou,
ili obeas en taskplenumo.

Ne forgesu viajn praprapatrojn,
daŭrigu l' aferon kun fervoro.
Penu serĉi mil feliĉojn por vi,
ne staru kontraŭ l' ĉiela volo.
Kiam Yin ne perdis la popolon,
ĝi funkciis laŭ l' ĉiel-ordono.
Ne forgesu l' falon de Yin-regno,
ĝi ja estas tragika leciono.

Ne facilas teni providencon,
ne detruu l' regnon laŭ bontrovo.
Gloru la renomon por eterne,
ruinigon kaŭzas ĉiela povo.
Providenco estas nesondebla,
nek per bonodoro nek per sono.
Regnestro Wen starigas modelon,
lernu ni de li sen fanfaron.

大明

明明在下，赫赫在上。天难忱斯，不易维王。天位殷适，使不挾四方。
摯仲氏任，自彼殷商，来嫁于周，曰嫔于京。乃及王季，维德之行。
大任有身，生此文王。维此文王，小心翼翼。昭事上帝，聿怀多福。厥德不回，以受方国。
天监在下，有命既集。文王初载，天作之合。在洽之阳，在渭之涘。
文王嘉止，大邦有子。大邦有子，倪天之妹。文定厥祥，亲迎于渭。造舟为梁，不显其光。
有命自天，命此文王。于周于京，缵女维莘。长子维行，笃生武王。保右命尔，燮伐大商。
殷商之旅，其会如林。矢于牧野，维予侯兴。上帝临女，无贰尔心。
牧野洋洋，檀车煌煌，騂駟彭彭。维师尚父，时维鹰扬。凉彼武王，肆伐大商，会朝清明。

Tri regnestroj de Zhou-dinastio

Oni diras, ke, helpate de la Ĉielo, Regnestro Wen kaj Regnestro Wu sukcesis en sia regado.

De alte la Ĉiel' rigardas suben,
sur tero brilas glor' de l' suvereno.
La Providenc' kapricas nekredeble,
tre malfacilas regi per povpleno.
Yin-Shang dominis la potencon regnon ,
sed fine ĉio falis en forsveno.

Princino Ren, devenanta de Yin-Shang,
edziniĝis al Zhou-regno en foro,
kaj loĝis en ĉefurbo de la lando
kiel edzin' de Reĝo Ji kun gloro.
Ŝi faris multajn bonojn en la regno,
renomo ŝia flugis kun honoro.

Nelonge poste ŝi jen gravediĝis
kaj naskis filon Wen por reĝa trono.
Kiam li surtroniĝis kiel reĝo,
li montris diskretecon kun impono.
Li konstante sekvis la Providencon,
kaj benojn li rikoltis el Ĉielo.
Li sekvis decregulojn vere strikte,
plebanoj lin respektis kun sincero.

La Ĉielo konis la homan mondon,
Wen enkorpigis volon de l' Ĉielo.
Dum lia eka tempo de regado,
dotis al li Di' edzinon kun belo.
Ŝi devenis de riĉa familio
loĝanta fore trans la Wei-rivero.

La nupton Wen preparis en ekstazo
por edzinigi ŝin jen kun soleno.
Ŝi belis kiel ĉiela feino,
unika en la mondo kun ĉarmpleno.
Elektis li la bonaŭguran tagon,
li ŝin renkontis ĉe la Wei-rivero.
Sur pont' ĉenita per ŝipoj sur akvo
li ŝin akceptis kore kun sincero.

Ordono venis jen el la ĉielo,

ke surtroniĝu li en la Zhou-ŝtato.
Establis li ĉefurbon de la regno,
kaj edzinigis Xin laŭ ŝia ŝato.
Kvankam la unua naskito mortis,
ŝi naskis bebon Wu por reg' futura.
Lin benis Dio en ekspedicio,
por venki en batalo aventura.

Armeo de Shang-regn' defendis brave,
la flagoj flirtis kvazaŭ la arbaro.
La Regnestro Wu ĵuris al la trupoj:
"Ni estas bravaj trupoj sen komparo.
Nin benas Dio alte sur ĉielo,
ni efektive gajnos en batalo!"

La batalejo vastas kaj ebenas,
santalaj ĉaroj sturmas en konkuro,
galopas la ĉevaloj al rivaloj
sub saĝa komandado de stimulo.
La komandanto Jiang, sagaculo,
asistis Regneston Wu en milito.
Li venkis ĉiujn regnojn ja komplete,
la mondo kalmis pro lia merito.

縣

縣縣瓜瓞。民之初生，自土沮漆。古公亶父，陶复陶穴，未有家室。
古公亶父，来朝走马。率西水浒，至于岐下。爰及姜女，聿来胥宇。
周原膴膴，堇荼如飴。爰始爰谋，爰契我龟，曰止曰时，筑室于兹。
迺慰迺止，迺左迺右，迺疆迺理，迺宣迺亩。自西徂东，周爰执事。
乃召司空，乃召司徒，俾立室家。其绳则直，缩版以载，作庙翼翼。
揀之阨阨，度之薨薨，筑之登登，削屡冯冯。百堵皆兴，鼙鼓弗胜。
迺立皋门，皋门有伉。迺立应门，应门将将。迺立冢土，戎丑攸行。
肆不殄厥愠，亦不陨厥问。柞械拔矣，行道兑矣。混夷駟矣，维其喙矣！
虞芮质厥成，文王蹶厥生。予曰有疏附，予曰有先后。予曰有奔奏，予曰有御侮！

Migrado kaj fiksloĝado

La epopeo priskribas la mirgradon sub gvido de la praregnestro Dan al la piedo de la Monto Qi kaj sekvantan konstruadon de la regno Zhou.

Senĉese kalabasoj produktiĝas,
popolo nia vivas sur ĉi tero.
De Qi al la rivero Ju migradis
ili gvide de Dan Fu tra sufero.

Fosadis ili kavojn kaj kavernojn,
jen por konstrui hejmojn kun prefero.

La Duko Dan Fu iradis senĉese.
Li sur ĉevalo rajdis frumatene
laŭ la uesta bord' de Wei-rivero
ĝis la piedo de Qi-monto pene.
Kun lia edzino Jiang li serĉadis
la lokon kiel hejmon ja zorgeme.

Ebenejo Zhou vastas kaj fekundas,
eĉ dolĉas gusto de l' legom' amara.
li konsiliĝis kun sekvantoj, petis
la testudŝelon pri klarigo klara.
La orakolo diris, ke ĉi loko
ja taŭgas por loĝejo ideala.

Trankvile ili setlis en ĉi loko.
Dividis agron ili jen egale,
difinis demarkaciojn de l' kampoj,
kaj ordigis la grundon solidare.
De oriento al uest' aferojn
faradis Duko Dan Fu temerare.

Li petis du personojn respondi
pri l' tero kaj plebanoj en laboro,
ordonis ilin finkonstrui domojn
laŭ ekzakta mezuro de esploro.
La templo kun argilaj muroj staris
impone kaj fortike laŭ nov-moro.

Korbplenoj da argilo enverŝiĝis
en la muroframojn kaj per martelo
ramis ilin oni kun laborkrioj,
platigis kotajn murojn ĝis brilbelo.
Cent muroj 'stis en konstruad' samtempa,
tamburfrapoj dronis en krio-ŝvelo.

Starigis oni grandan urban pordon
imponan kaj majestan en staturo,
kaj ankaŭ la palacan pordon altan,
solenan kun okulplaĉa mezuro.
Altaro konstruiĝis sur terduno,
soldatoj aris antaŭ ĝi kun ĵuro.

malamo al barbaroj restis dura,
prestigon propran oni tenis vere.
forigis oni kverkojn kaj dornveprojn
jen por elhaki l' vojojn sendanĝere.
Barbaroj jam eskapis el ĉirkaŭe,
timante la potencon kundespere.

La regno senrivalas inter regnoj,
Persistis ĉiam Reĝ' Wen je la paco.
Vasalaj landoj venis por protekto,
asistas reĝon homoj kun sagaco,
kaj talentuloj ĉien iris pledi,
soldatoj staris kontraŭ fi-minaco.

械朴

芄芃械朴，薪之樵之。济济辟王，左右趣之。
济济辟王，左右奉璋。奉璋峨峨，髦士攸宜。
淠彼泾舟，烝徒楫之。周王于迈，六师及之。
倬彼云汉，为章于天。周王寿考，遐不作人？
追琢其章，金玉其相。勉勉我王，纲纪四方。

Reĝo Wen kaj liaj talentuloj

Laŭdkanto pri Reĝo Wen, kiu ŝatis talentulojn kaj uzis ilin en regado.

Kverkoj kaj arbustoj jen abundas,
oni hakas ilin por hejtbrulo.
Sin montras Reĝo Wen grandanima.
ĉirkaŭ li servpretas talentuloj.

Sin montras Reĝo Wen grandanima,
korteganoj levas tason kulte.
Oferado okazas solene,
ofervino fluas ja tre multe.

Ŝipo flosas sur la Jin-rivero,
oni remas la pagajon forte.
Li ordonas al ekspedicio,
ses armeoj batalas ĝismorte.

Lakta vojo brilas ja en splendo,
ĝia lumo iras tra l' ĉielo.
Suvereno de Zhou vivu longe,

saĝon tenu por sekura tero.

Kiel cizelita la trezoro,
kiel or' aŭ jado de valoro,
nia reĝo kun diligenteco
regas landon bone kun honoro.

旱麓

瞻彼旱麓，榛楛济济。岂弟君子，干禄岂弟。
瑟彼玉瓚，黄流在中。岂弟君子，福禄攸降。
鸢飞戾天，鱼跃于渊。岂弟君子，遐不作人？
清酒既载，骍牡既备。以享以祀，以介景福。
瑟彼柞械，民所燎矣。岂弟君子，神所劳矣。
莫莫葛藟，施于条枚。岂弟君子，求福不回。

Benoj en kultado

Laŭdkanto pri Reĝo Wen, kiu heredis bonvirtojn de prareĝoj.

Ĉe l' piedo de tiu monto
la kverkoj kreskas en prospero.
Akordiĝema nia reĝo
jen petas benojn kun sincero.

Tas' el jado plenas je vino
flavkolora kun bonodoro.
Akordiĝema nia reĝo
ricevu benojn de favoro.

La falkoj flugas en ĉielo,
la fiŝoj saltas el profundo.
Akordiĝema nia reĝo
kultivas homojn en abundo.

La vino jam metitas orde,
kaj pretas bovo por ofero.
Prapatrojn oni kultas pie,
preĝante por feliĉa helo.

Arbaron vastan de la kverkoj
bruligas oni en kultado.
Akordiĝema nia reĝo
baniĝu en dia beato.

Sovaĝaj vitoj en denseco
alvolvas arbojn en spiralo.
Akordiĝema nia reĝo
jen sidas sub feliĉ-vualo.

思齐

思齐大任，文王之母，思媚周姜，京室之妇。大姒嗣徽音，则百斯男。
惠于宗公，神罔时怨，神罔时恫。刑于寡妻，至于兄弟，以御于家邦。
雍雍在宫，肃肃在庙。不显亦临，无射亦保。
肆戎疾不殄，烈假不瑕。不闻亦式，不谏亦入。
肆成人有德，小子有造。古之人无斁，誉髦斯士。

Bonvirtoj daŭras

Odo laŭdanta pri la bonvirtoj de Reĝo Wen, liaj avino Jiang, patrino Ren kaj edzino Si.

Ren kondutas elegante,
la patrin' de l' suvereno.
Jiang afabla kun tenero
loĝas en ĉefurb-tereno.
Si, modelo de bonvirtoj,
naskis principojn kun peno.

Wen respektas la prapatrojn.
la spiritoj ĝojas kore,
kaj ne tristas kun doloro.
Li l' edzinon traktas mole,
same al parencoj, fratoj,
kaj l' regnon regas rigore.

En palaco li afablas,
en rito li agas dece.
Lin protektas la spirito,
li vivĝuas sekurece.

Ne barbaroj nun invadas,
nek plebanojn trafas plago.
Li akceptas bonajn pensojn,
ankaŭ vortojn de atako.

Plenkreskuloj nun bonvirtas,
la infanoj bonkondutas.
Sub regado de l' Reĝo Wen
talentuloj jam debutas.

皇矣

皇矣上帝，临下有赫。监观四方，求民之莫。维此二国，其政不获。维彼四国，爰究爰度。上帝耆之，憎其式廓。乃眷西顾，此维与宅。

作之屏之，其菑其翳。修之平之，其灌其榦。启之辟之，其怪其裾。攘之剔之，其罔其柘。帝迁明德，串夷载路。天立厥配，受命既固。

帝省其山，柞械斯拔，松柏斯兑。帝作邦作对，自大伯王季。维此王季，因心则友。则友其兄，则笃其庆，载锡之光。受禄无丧，奄有四方。

维此王季，帝度其心。貊其德音，其德克明。克明克类，克长克君。王此大邦，克顺克比。比于文王，其德靡悔。既受帝祉，施于孙子。

帝谓文王：无然畔援，无然歆羨，诞先登于岸。密人不恭，敢距大邦，侵阮徂共。王赫斯怒，爰整其旅，以按徂旅。以笃于周祜，以对于天下。

依其在京，侵自阮疆。陟我高冈，无矢我陵。我陵我阿，无饮我泉，我泉我池。度其鲜原，居岐之阳，在渭之将。万邦之方，下民之王。

帝谓文王：予怀明德，不大声以色，不长夏以革。不识不知，顺帝之则。帝谓文王：詢尔仇方，同尔弟兄。以尔钩援，与尔临冲，以伐崇墉。

临冲闲闲，崇墉言言。执讯连连，攸馘安安。是类是禡，是致是附，四方以无侮。临冲弗弗，崇墉仡仡。是伐是肆，是绝是忽。四方以无拂。

Leviĝo de Zhou-regno

La epopeo priskribas la historieton de leviĝo de la familio Zhou ĝis la suverena ŝtato, kaj atingojn de Reĝo Tai, lia filo Reĝo Ji kaj lia nepo Reĝo Wen kiu konkeris la Mi tribon kaj Chong-regnon en 1135 a.K.

La Dio ja sagacas kun prudento,
Li supervidas ĉion sur la tero.
Li konas kio nun okazas sube,
kaj senigas ĉiujn ja je sufero.
Li malkontentas tre pri la regado
de Xia kaj Shang du regnoj en fuŝ-stato.
Cerbumas li pri kiu regno povos
regadi mondon kiel granda ŝtato.
Li simpatias al nia regno Zhou
kaj volas, ke potenco pli la lando.
Li kovas amon kun favor' kaj donas
Qi-monton al li por la regna granda.

Forhakas oni putrajn arbojn plene,
kaj forbalaas velkajn branĉojn pure.
Pritondas arbojn oni ja zorgeme,
arbustoj freŝe ŝosas jen konkure.
Forhakas morusarbojn ni laŭ l' bordo
por ebenigi grundon por vojiro.

post forigado de la putraj arboj
la kverkoj dense kreskas en spaliro.
La Dio benas homojn kun bonvirtoj,
barbaroj tuj eskapis en pelmelo.
Ekregas Reĝ' Tai laŭ ĉiela volo,
la regn' stabilas firme sen danĝero.

La Dio rondinspektas la monton Qi,
dornveproj eltiritas tute vere,
nur pinoj kaj cipresoj kreskas alte.
La Di' establis regnon Zhou prefere.
Tai-n Li elektis reĝo de la regno,
Ji sukcedis Tai-n super vasta tero,
li regis kun afabla karaktero.
al la pleb' li kondukis kun tenero,
pro tio li ricevis mil feliĉojn
kaj l' regno vualiĝis per bengloro.
La regno Zhou eterne ĝuis pacon,
el ĉielo falas graca favoro.

La Dio sendis lian animstaton:
li traktas la plebon kun bona koro,
Lia famo diskoniĝas tra l' mondo.
Li konas amon disde la rankoro,
kaj la bonulon disde l' malbonulo;
li povas gvidi l' ŝtaton kun memfido,
la plebo obeemas kaj subuloj
lin sekvas liajn paŝojn kun konfido.
Ĝis la regad' de lia filo Reĝ' Wen
lin laŭdas plebo pro lia bonfaro.
La benojn satĝuas li kaj transdonas
al posteuloj vere sen eraro.

Admonis Dio sincere al Reĝ' Wen:
"Ne ŝancelpaŝu iom kun hezito,
nek la aliajn enŝanĝu jen blinde.
Fortigu vin per via saĝa gvido."
La tribo Mi minacis per la forto
kaj eĉ invadis la regnon Zhou pene;
regnoj Yuan kaj Gong ankaŭ ĝin atakis,
Reĝ' Wen pri tio koleregis plene.
Ordonis li al trupoj al la fronto
por la invadon bridi ĉe la limo.
Potenc' Zhou manifestis sian forton

kaj batis malamikojn kun obstino.

La trupoj de Zhou estis vere fortaj,
revenis ili el Yuan kun fiero.
Sur alta mont' observis zorge ili.
“Ne licas kapti montojn per konkero,
montar' kaj holmoj niaj ja imponas,
Ne licas trinki akvon el la fontoj,
ĉar tiuj fontoj certe estas niaj.”
Reĝo Wen jen esploris kun volonto
kaj decidis fiksloĝi ĉe Monto Qi,
la loko estis apud Wei-rivero.
Starigis li modelon por la mondo,
kaj l' plebo obeos lin kun fidelo.

La Dio voĉe konsilis al Reĝ' Wen:
“Aprezas mi bonvirton vian vere,
neniam vi koleras kun fi-vortoj,
nek punas vian subulojn severe.
Kondutu vi sen laŭta voĉo sakra,
nur sekvu min laŭ la ĉiela volo.”
La Dio voĉe konsilis al Reĝ' Wen:
“Konsultu regnojn najbarajn el koro,
kunigu fratajn regnojn en batalo.
Pretigu grimp-ŝtuparojn, hokojn bone
kaj atak-ramojn por disrompi murojn,
ke kaptu vi Chong-regnon senpardone.”

Soldatoj sturmis brave kun impono,
kaj l' altajn murojn ramis kun fervoro.
Kaptitoj iris en longlongaj vicoj,
revenis ili kun triumf' en gloro.
Ĵurad' okazis antaŭ militiro
por venki malamikojn tute certe
neniu malamiko ne invados.
Soldatoj ramis kaj batalis lerte,
la altaj muroj disrompiĝis pece.
La trupoj sturmis antaŭen senbare,
la armeon de Chong-regno ekstermis,
Reĝo Wen ja potencis senkompare.

灵台

经始灵台，经之营之。庶民攻之，不日成之。经始勿亟，庶民子来。

王在灵囿，麀鹿攸伏。麀鹿濯濯，白鸟翯翯。王在灵沼，於物鱼跃。
虞业维枏，赉鼓维镛。於论鼓钟，於乐辟廱。
於论鼓钟，於乐辟廱。鼉鼓逢逢。蒙瞍奏公。

Mirinda parko

Odo pri maroto de Reĝo Wen en la vivo.

Dum mirinda parko en projekto
Ĉio zorge aranĝitas bone.
Pleb' kunigis fortojn por la vorko,
baldaŭ konstruiĝis ĝi impone.
Kvankam tiel urĝis ne la vorko
pleb' la parkon finis ja sindone.

Reĝo Wen rondiris en la parko:
cervoj jen ripozas en trankvilo
kun graseta korp' kaj glita felo,
blankaj birdoj kantas jen kun trilo.
Li ĉe la lageto rigardadis
fiŝojn ĝoje saltas kun facilo.

Sonoriloj kaj tamburoj pendas
de eburaj bretoj ĉe alero.
La muziko bela plezurigas
la reĝon kvazaŭ el la ĉielo.

La muziko bela ja gajigas
la reĝon kvazaŭ el la ĉielo.
Muzikisto batas la tamburon,
sonoj ŝvebas flirte en aero.

下武

下武维周，世有哲王。三后在天，王配于京。
王配于京，世德作求。永言配命，成王之孚。
成王之孚，下土之式。永言孝思，孝思维则。
媚兹一人，应侯顺德。永言孝思，昭哉嗣服。
昭兹来许，绳其祖武。於万斯年，受天之祜。
受天之祜，四方来贺。於万斯年，不遐有佐。

Reĝo Wu

Laŭdo pri Reĝo Wu, kiu heredis la bonajn virtojn de Reĝo Ji kaj Reĝo Wen, kaj starigis modelon por siaj posteuloj.

Zhou-regno prosperas en talentuloj,
aperas reĝoj saĝaj por nacio.
Tri reĝo restas nun en la ĉielo,
Reĝo Wu jam sukcedas laŭ l' linio.

Reĝo Wu jam sukcedas laŭ l' linio,
heredas li bonvirtojn de prapatroj,
kaj sekvas la ordonon de l' Ĉielo,
li ja fidindas en la reĝa kadro.

Li ja fidindas en la reĝa kadro,
starigas li modelon por popolo.
Li bonkondukas imite prapatrojn
kaj ĉiam sindonemas laŭ la volo.

Plebanoj amas Reĝon Wu respektive,
ĉar li obeas al la leĝ' natura,
kaj tenas sindonemon en la koro,
li noblas kun la koro senmakula.

La sukcedantoj montras sin bonvirtaj,
prapatrojn sekvas en regad' prudenta.
Mil kaj mil jarojn ili ĝuas benojn
kaj sidas trone kun la kor' kontenta.

Ili sidas trone kun kor' kontenta,
alvenas tributuloj por gratulo.
Mil kaj mil jarojn ili ĝuas benojn
kaj havas asistadon kun plezuro.

文王有声

文王有声，遘骏有声。遘求厥宁，遘观厥成。文王烝哉！
文王受命，有此武功。既伐于崇，作邑于丰。文王烝哉！
筑城伊洹，作丰伊匹。匪棘其欲，遘追来孝。王后烝哉！
王公伊濯，维丰之垣。四方攸同，王后维翰。王后烝哉！
丰水东注，维禹之绩。四方攸同，皇王维辟。皇王烝哉！
镐京辟雍，自西自东，自南自北，无思不服。皇王烝哉！
考卜维王，宅是镐京。维龟正之，武王成之。武王烝哉！
丰水有芑，武王岂不仕？诒厥孙谋，以燕翼子。武王烝哉！

Reĝoj Wen kaj Wu

Panegiro al Reĝoj Wen kaj Wu pro iliaj meritoj en regado.

Tronas Reĝo Wen kun bona famo,
ĉiuj lin prilauĝas tra la regno.
Por la pleb' en paco kaj balzamo,
li sukcesas fondi l' bonan regnon.
Kia bona suveren' kun amo!

Sub ordono jen el la Ĉielo,
li sukcesis akiri meritojn.
Regno Chong malvenkis sub konkero,
kaj li fondis la ĉefurbon ĉe Feng.
Kia brava reĝo sur la tero!

Konstruigis li kontraŭ invado
durajn murojn ĉirkaŭ la ĉefurbo.
Li ne ĉasis profitojn laŭ ŝato,
sed modelon de prapatroj sekvis.
Kia nobla reĝo de la ŝtato!

Estas granda ja lia merito,
granda kiel larĝa la urb muro.
Ĉiuj regnoj venis sen hezito
por tributo al Regno Zhou kune.
Kiel li sagacis en milito!

Orienten fluas Wei-rivero,
ni Yu-n dankas tre pro akvo-rego.
Ĉiuj regnoj venis kun prefero
jen por imiti modelon lian.
Kiel penis li kun sinofero!

Reĝo Wen defendis per akv-zono
la ĉefurbon ĉirkaŭ la tereno
de direktoj kvar laŭ la bezono
por ja sekurigi l' vastan regnon.
Kiel granda estis li sur trono!

Reĝo Wu, laŭ la ĉiela volo,
jen establis la ĉefurbon ĉe Hao.
li eklaboris laŭ l' orakolo,
ĉio iris glate kaj sukcese.

Kiel li perfektis kun bonkoro!

Ĉe river' Feng herboj kreskas dense,
Reĝo Wu klopodis por la regno.
Li ŝpinadis planojn ja enpense
por feliĉojn krei por la idoj.
Kiel skizis l' onton li klarmense!

生民

厥初生民，时维姜嫄。生民如何？克禋克祀，以弗无子。履帝武敏，歆攸介攸止，载震载夙。载生载育，时维后稷。

诞弥厥月，先生如达。不坼不副，无菑无害，以赫厥灵。上帝不宁，不康禋祀，居然生子。诞寘之隘巷，牛羊腓字之。诞寘之平林，会伐平林。诞寘之寒冰，鸟覆翼之。鸟乃去矣，后稷呱矣。实覃实訐，厥声载路。

诞实匍匐，克岐克嶷，以就口食。蓺之荏菹，荏菹旆旆。禾役穰穰，麻麦幪幪，瓜瓞唼唼。诞后稷之穉，有相之道。弗厥丰草，种之黄茂。实方实苞，实种实褰。实发实秀，实坚实好。实颖实栗，即有邰家室。

诞降嘉种，维秬维秠，维糜维芑。恒之秬秠，是获是亩。恒之糜芑，是任是负，以归肇祀。诞我祀如何？或舂或揄，或簸或蹂。释之叟叟，烝之浮浮。载谋载惟，取萧祭脂。取羝以軋，载燔载烈，以兴嗣岁。

卬盛于豆，于豆于登，其香始升。上帝居歆，胡臭亶时。后稷肇祀，庶无罪悔，以迄于今。

Hou Ji, la Lordo de Greno

La odo laŭdas Hou Ji, la legendan Lordon de Greno kaj la kreinton de la linio de la familio Zhou.

Kiu naskis la lordon de Greno?
Jiang Yuan 'stis lia kara patrino.
Por la idojn naski en Zhou-domo,
ŝi kultadon faris kun kapklino,
do, ne mankis filoj en la domo.
Tretante l' piedsignon de l' Dio,
ŝi ripozos longe sen moviĝo,
kaj eksentis feton kun konscio.
Poste ŝi la filon naskis glate,
li 'stis Hou Ji en Zhou-familio.

Ŝi gravedis tutajn dek monatojn,
ŝi finfine naskis lin sukcese.
Nenian doloron ŝi suferis,
filonasko sekuras impreso.
Jam eligis la filo magi-lumon,
Sentis sin la Dio ja trankvile,
ĉar ŝi kultis al la Dio pie,

ŝi akiris filon laŭdezire.

La bebo en straton forlasitis,
lin mamnutris bovo kaj ŝafino;
li jen forĵetiĝis en arbaron,
arbhakist' lin savis kun intimo;
li metitis sur glacio frosta,
lin varmigis birdoj per plumaro.
Birdoj jen forflugis post momento,
Hou Ji larme ploris kun amaro.
La plorsono laŭtis kaj sonoris,
oni aŭdis defore en valo.

Hou Ji povis rampi sur la manoj,
li kaj saĝis kaj tre lertis vere,
baldaŭ povis li sin mutri sata.
Li eklernis planti jen surtere,
la grenplantoj kreskis en prospero,
la milioj staris en sparilo.
la tritiko kovris kampojn plene,
la melonoj ridis en zefiro.

La Lordo de Greno konis bone
kiel planti per bona metodo.
Li unue sarkis herbojn plene,
kaj disŝutis semojn al la koto.
La plantidoj vicis en linioj,
alte kaj fortike en prospero.
Ĝis spikiĝis ili kun plengrajnoj,
komplaboris li kun sinofero.
Kiam riĉrikolto akiritis,
Li ekloĝis en Tai kun prefero.

La Ĉiel' donacis bonajn semojn
nigrajn en du specoj de milio
kaj de ruĝaj kaj blankaj rizgrajnoj.
La milio blanka kovris kampojn,
la nigra kreskis jen en linio.
Kiam venis grena riĉrikolto,
oni ja transportis ilin hejmen
kaj al Dio kultis por raporto.

Kiel la kultad' okazis tiam?
Oni pistis, kribris rizon pene,

kaj forkribris branojn el la rizo,
kaj lavpurigis rizon zorgeme.
Oni vaporumis rizon mole,
kaj ideo bona venis vere.
Oni abrotanojn ekbruligis,
grasan ŝafon buĉis por-ofere
kaj ĝin bakis kaj kuiris bone,
por ke kresku grenplantoj prospere.

Oni metis fabojn en bovlegon,
lignajn pelvojn antaŭ la altaro.
Bonodor' leviĝis al ĉielo,
Dio ĝin satĝuis per nazflaro,
kaj delicis pro la oferaĵoj.
Hou Ji kreis ritojn la unua,
ne okazis plu la katastrofo,
viv' trankvilas kiel akvo flua.

行苇

敦彼行苇，牛羊勿践履。方苞方体，维叶泥泥。戚戚兄弟，莫远具尔。或肆之筵，或授之几。肆筵设席，授几有缉御。或献或酢，洗爵奠斝。醕醑以荐，或燔或炙。嘉肴脾臄，或歌或嘏。敦弓既坚，四鍬既钩，舍矢既均，序宾以贤。敦弓既句，既挟四鍬。四鍬如树，序宾以不侮。曾孙维主，酒醴维醑，酌以大斗，以祈黄耇。黄耇台背，以引以翼。寿考维祺，以介景福。

Reĝa festeno

Versoj pri festeno aranĝita de la reĝo al liaj parencoj.

Ne lasu bovojn, ŝafojn treti kanojn
la tufiĝantajn dense ĉe la pado,
ĉar ili ĵus eligas freŝajn ŝosojn,
folioj molas ja en delikato.
Fremdiĝu ne de l' fratoj kun samsango,
nek de parencoj karaj malsincere.
Al ili donu la festenon ĝojan
aŭ kunan tetrinkadon tre prefere.

Festeno aranĝita sekvas decon,
la gastoj sidas laŭ la decreguloj.
La maestr' proponas vinon al la gastoj,
kaj l' gastoj reciprokas per gratuloj.
Viandaj pladoj metitas sur tablojn,
frandaĵoj venas al la gasta ŝato,
langoj de bovoj kun bongusto plaĉas,

muziko eksonas per orel-grato.

Arkpafa ludo plezurigas gastojn,
kvar akraj sagoj estas sub dispono.
Arkpafas gastoj al la celtabulo,
ekprovas ĉiuj ja sen fanfaron.
Streĉita ark' eligas sagojn trafe,
la gastoj pafas sagojn en atendo.
La mastro bone juĝas la pafadon,
la gastoj ĝuas ludon kun kontento.

La mastro 'stas pranepo de prareĝo,
regalas gastojn li per bona vino.
Per granda taso li proponas vinon
kaj tostas, ke gastoj vivu sen fino.
La maljunulo kun hararo flava,
helpate de l' junulo, rekte staras.
Deziras mastro al li longan vivon,
kaj benoj el ĉielo sur lin falas.

既醉

既醉以酒，既饱以德。君子万年，介尔景福。
既醉以酒，尔肴既将。君子万年，介尔昭明。
昭明有融，高朗令终，令终有俶。公尸嘉告。
其告维何？笾豆静嘉。朋友攸摄，摄以威仪。
威仪孔时，君子有孝子。孝子不匮，永锡尔类。
其类维何？室家之壶。君子万年，永锡祚胤。
其胤维何？天被尔禄。君子万年，景命有仆。
其仆维何？釐尔女士。釐尔女士，从以孙子。

Ebriiĝo en drinkado

Festenado post kulto.

Ebriiĝas ni de dolĉa vino,
vi gastama montras vin sincere.
Ni deziras al vi longan vivon
kaj feliĉojn ĝuos vi espere.

Ebriiĝas ni de bona vino,
viaj pladoj 'stas bongustaj vere.
Ni deziras al vi longan vivon,
kaj vi vivos komforte brilhele.

Via perspektivo vere belas,
pro saĝeco via lume brila.
Bona ek' al bona fino iras,
aŭskultu al dia vort' konsila.

Kion Dio voĉe diris al vi?
L'oferaĵoj taŭgas por satĝuo.
L' amikaro helpas en kultado,
Rito estas solena kontribuo.

La kultado iras senerare,
vi vin montras sindonema pie.
Pro senlima pia sindonemo,
La Ĉielo benas vin magie.

Kio estas la ĉielaj benoj?
Paco kaj trankvil' en familio.
Ni deziras al vi longan vivon,
viaj benoj iras en serio.

Kio estas benoj el Ĉielo?
Vi feliĉe sidas sur la trono.
Ni deziras al vi longan vivon,
kaj vi havos idojn sub dispono.

Kion dotas al vi la Ĉielo?
Grupo da gefiloj kaj edzinoj.
Grupo da edzinoj kaj gefiloj
vin ĉirkaŭas strikte en intimo.

鳧鷖

鳧鷖在涇，公尸来燕来宁。尔酒既清，尔肴既馨。公尸燕饮，福禄来成。
鳧鷖在沙，公尸来燕来宜。尔酒既多，尔肴既嘉。公尸燕饮，福禄来为。
鳧鷖在渚，公尸来燕来处。尔酒既湑，尔肴伊脯。公尸燕饮，福禄来下。
鳧鷖在潒，公尸来燕来宗，既燕于宗，福禄攸降。公尸燕饮，福禄来崇。
鳧鷖在薺，公尸来止熏熏。旨酒欣欣，燔炙芬芬。公尸燕饮，无有后艰。

Spiritoj de prapatroj

Kanto ĉantata en kultado al prapatroj.

Akvbirdoj kolektiĝas ĉe rivero,
spiritoj avataras al festeno.
Alportas vi la klaran, freŝan vinon

kaj frandaĵojn je ilia alveno.
Jam ili manĝas, drinkas ĝis kontento,
vin feliĉigas ili jen per beno.

Akvbirdoj staras sur la sabla benko,
spiritoj venas al festen' plezure.
Tre multas via vino bonodora
kaj la frandaĵoj bongustaj terure.
Jam ili manĝas, drinkas ĝis kontento,
feliĉoj kuras al vi ja konkure.

Akvbirdoj kolektiĝas sur l' insulo,
spiritoj venas al festen' kontente.
Alkoholaĵo via estas klara,
viandaj pladoj bongustas plen-tente.
Jam ili manĝas, drinkas ĝis kontento,
benoj iras al vi ĉiumomente.

Akvbirdoj nestas ĉe akv-kunfluejo,
spiritoj venas al festen' ĝojplene.
Okazas la festeno en la templo,
Ĉielo feliĉigas ilin bene.
Jam ili manĝas, drinkas ĝis kontento,
senĉesaj benoj iras al vi ĉene.

Akvbirdoj sidas sur la river-gorĝo,
spiritoj jam ebrias ĉe l' festeno.
Aromo vina ŝvebas en la halo,
odor' vianda restas jen sen sveno.
Jam ili manĝas, drinkas ĝis kontento,
neniam venos plagoj de veneno.

假乐

假乐君子，显显令德，宜民宜人。受禄于天，保右命之，自天申之。
千禄百福，子孙千亿。穆穆皇皇，宜君宜王。不愆不忘，率由旧章。
威仪抑抑，德音秩秩。无怨无恶，率由群匹。受福无疆，四方之纲。
之纲之纪，燕及朋友。百辟卿士，媚于天子。不解于位，民之攸暨。

Pri Reĝo Cheng

Kanto laŭdanta Reĝon Cheng, kiu sukcedis Reĝon Wu.

Nian reĝon tre ŝatas la Ĉielo,
li ja renomas kun bonvirta brilo,

amas li la plebanojn kaj subulojn.
Li plenĝuas benojn jen kun facilo,
Lin la Ĉielo helpas kaj subtenas,
dotas al li la tronon en stabilo.

Li posedas mil feliĉojn kaj benojn,
kaj gefiloj, genepoj en dekmiloj.
Li, kun majesto kaj impono, taŭgas
reĝi super la regno en trankvilo.
Neriproĉebla kaj devokonscia,
li sekvas decregulojn kun humilo.

Li, belaspekta kun digneco alta,
konduktas sen kaprica maniero..
Li kovas nek rankoron nek malamon,
konsultas li subulojn sen fiero.
Beate de l' Ĉielo benodona,
modelo li 'stas tra la tuta tero.

Kiel modelo por aliaj regnoj,
li rikoltas laŭdojn de amikaro.
Starigas ĉiuj la dikfingron jese,
kaj amas nian reĝon kun lojalo.
plenumas li la devon por la regno,
plebanoj kuniĝas en solidaro.

公刘

笃公刘，匪居匪康。乃塲乃疆，乃积乃仓；乃裹餼粮，于橐于囊。思辑用光，弓矢斯张；干戈戚扬，爰方启行。

笃公刘，于胥斯原。既庶既繁，既顺乃宣，而无永叹。陟则在巘，复降在原。何以舟之？维玉及瑶，鞞琫容刀。

笃公刘，逝彼百泉。瞻彼溇原，乃陟南冈。乃覲于京，京师之野。于时处处，于时庐旅，于时言言，于时语语。

笃公刘，于京斯依。跼蹐济济，俾筵俾几。既登乃依，乃造其曹。执豕于牢，酌之用匏。食之饮之，君之宗之。

笃公刘，既溥既长。既景乃冈，相其阴阳，观其流泉。其军三单，度其隰原。彻田为粮，度其夕阳。豳居允荒。

笃公刘，于豳斯馆。涉渭为乱，取厉取锻，止基乃理。爰众爰有，夹其皇涧。溯其过涧。止旅乃密，芮鞠之即。

Duko Liu

Tiu ĉi epopeo rakontas la historieton de Duko Liu, la dua legenda heroo de la familio Zhou, kiu transloĝiĝis de Tao al Bin en 1796 a.K.

La honesta kaj bonkora Duk' Liu
transloĝiĝis por trankvila vivo.
Li dividis agron por plebanoj,
grenon konservis por perspektivo.
Li preparis kukojn el faruno,
metis ili en dorssakojn bone,
homojn kolektis por transloĝiĝo.
Jen armitaj per glavo impone,
kun pafark' kaj lanco sur la ŝultro,
ĉiuj marŝis, marŝis laŭordone.

La honesta kaj modesta Duk' Liu
inspektis la kampojn vere pene .
Sekvis homamaso lin rondiri,
kaj diskutis kun li jen senĝene,
sen elverŝi plendojn kaj sen vei.
Jen ascendis ili al mont-tero,
jen descendis al la ebenejo.
Ĉe l' zono lia pendis juvelo,
jadpecoj kaj jaspaj ornamaĵoj
kaj la spad' en ingo kun brilhelo.

La bonkora kaj afabla Duk' Liu
iris al la bordo de l' rivero.
Li rigardis vastan ebenaĵon.
Li suriris monton kun espero,
trovis bonan lokon por ĉefurbo
por plebon loĝigi kun plezuro.
Li planis konstrui l' urbon novan,
novajn domojn en lok' de sekuro.
Pri tio babilis oni ĝoje,
plebo dronis ja en ekstaz-lulo.

La modesta kaj sincera Duk' Liu
medion novan kreis en urbo.
Korteganoj pavis ĉe festeno,
ilin gvidis certe li sen dubo.
Ili kultis al la Di' de Porko,
oni buĉis porkon por ofero.
Ili drinkis vinon en ekstazo
kaj eĉ ĉerpis vinon laŭ prefero.
Post satĝu' de vino kaj manĝaĵoj,
Duk' Liu estu ĉefo pro sincero.

La honesta kaj afabla Duk' Liu
elhakis vastan spacon da tero,
sunmoviĝon esploris sur monto,
observis lokojn de ombr' kaj helo
kaj inspektis fontojn kaj riverojn.
Li aranĝis tri armeojn bone
por mezuri la teron kaj valojn
kaj kampigi ilin laŭbezone.
Mezurado iris al l' uesto,
sin etendis la vastaj' impone.

La sincera kaj honestas Duk' Liu
ekfiksloĝis ĉe Bin kun trankvilo.
Li transiris la riveron porti
ŝtonojn transbordajn sen facilo.
Li difinis limon de la regno,
ĉiuj vivis harmonie ene.
Loĝante sur ambaŭ riverbordoj,
ili vivis, laboris senĝene.
Jen laŭlonge de l' rivera fluo
homoj dense loĝis vere plene.

洞酌

洞酌彼行潦，挹彼注兹，可以饘饠。岂弟君子，民之父母。
洞酌彼行潦，挹彼注兹，可以濯罍。岂弟君子，民之攸归。
洞酌彼行潦，挹彼注兹，可以濯漑。岂弟君子，民之攸暨。

Ĉerpi riverakvon el la foro

Kanto laŭdanta lordon, kiu zorgis pri la plebanoj.

Ĉerpinte riverakvon el la foro,
ĝin en akvujojn verŝas oni pene
por manĝon prepari per ĝi laŭ volo.
La lordo devas montri sin degnema
kaj grandanime zorgi pri l' popolo.

Ĉerpinte riverakvon el la foro,
ĝin en akvujojn verŝas oni pene
por lavi oferpelvojn kun fervoro.
La lordo devas montri sin zorgema,
kaj l' popolo obeas kun favoro.

Ĉerpinte riverakvon el la foro,
ĝin en akvujojn verŝas oni pene
por ŝvabra kaj puriga la laboro.
La lordo devas 'sti akordiĝema,
plebanoj dankas lin ja per la koro.

卷阿

有卷者阿，飘风自南。岂弟君子，来游来歌，以矢其音。
伴矣尔游矣，优游尔休矣。岂弟君子，俾尔弥尔性，似先公酋矣。
尔土宇畷章，亦孔之厚矣。岂弟君子，俾尔弥尔性，百神尔主矣。
尔受命长矣，弗禄尔康矣。岂弟君子，俾尔弥尔性，纯嘏尔常矣。
有冯有翼，有孝有德，以引以翼。岂弟君子，四方为则。
颙颙卬卬，如圭如璋，令闻令望。岂弟君子，四方为纲。
凤凰于飞，翯翯其羽，亦集爰止。蔼蔼王多吉士，维君子使，媚于天子。
凤凰于飞，翯翯其羽，亦傅于天。蔼蔼王多吉人，维君子命，媚于庶人。
凤凰鸣矣，于彼高冈。梧桐生矣，于彼朝阳。萋萋萋萋，雍雍喈喈。
君子之车，既庶且多。君子之马，既闲且驰。矢诗不多，维以遂歌。

Talentuloj bezonatas

La regnestro soife serĉas talentulojn.

Ondantaj montoj belas en apero,
zefiro blovas el la suda foro.
La lordo ja afablas kun sincero,
Li venas distri nin per kanto, danco,
li naĝadas en nia laŭd-rivero.

Vojaĝas li diversloken kun plezuro
aŭ gajnas tempon por ripozi pace.
La lordo ja prudentas kun skrupulo,
klopodas li tutvive por la regno
por ĝin plipotencigi en futuro.

Tre vastas la regna teritorio,
li garantias ĝin per sekureco.
Li bonkoras vere kun simpatio,
atingojn li akiras kun meritoj,
konduito lia plaĉas al cent dioj.

Li agas laŭ l' ordon' el la Ĉielo,
kaj ĝuas pacan vivon kaj feliĉon.
li traktas la plebanojn kun sincero,
pro lia pen' tutviva por la regno,

la regna sort' sin trovas en prospero.

Dependas li de saĝaj talentuloj,
li bonkonduktas kun respekt' al ili.
Asistas ili lin laŭ la postuloj,
kaj laboras fervore por palaco.
li 'stas bona model' de decreguloj.

Aperas li afabla kaj majesta,
kaj bonkonduktas dece senmakule,
prestiĝo lia estas ĉiamresta.
Kun afableco kaj akordiĝemo
li staras kiel la model' modesta.

Fenikso flirte flugas en ĉielo,
cent birdoj strikte sekvas ĝin leĝere,
kaj akompanas ĝin sur alta arbo.
Ĉirkaŭ la lord' saĝuloj restas vere,
proponas ili bonajn politikojn,
obeas laŭordone lin sincere.

Fenikso flirte flugas en aero,
cent birdoj strikte sekvas ĝin gracie,
sor ili ĵetas sin ĝis la ĉielo.
Saĝuloj lin ĉirkaŭas harmonie,
oferas saĝon al li kun prefero,
estimas lin elkore emocie.

Fenikso bele pepas bonaŭgure
starante alte sur montsupra sfero.
Platanoj kreskas sur altaĵo monta,
banante sin en matensuna helo.
Folioj freŝaj densas en prospero,
fenikso kantas bele en libero.

La lordo havas multe da kaleŝoj,
li povas sidveturi laŭ bontrovo.
La lordo havas multe da rajdbestoj,
li povas rajdveturi per la povo.
Laŭdkantoj ja abundas por la lordo,
nun kantas mi al li kun pena provo.

民劳

民亦劳止，汔可小康。惠此中国，以绥四方。无纵诡随，以谨无良。式遏寇虐，慄不畏明。柔远能迩，以定我王。

民亦劳止，汔可小休。惠此中国，以为民逌。无纵诡随，以谨惛恠。式遏寇虐，无俾民忧。无弃尔劳，以为王休。

民亦劳止，汔可小息。惠此京师，以绥四国。无纵诡随，以谨罔极。式遏寇虐，无俾作慝。敬慎威仪，以近有德。

民亦劳止，汔可小愒。惠此中国，俾民忧泄。无纵诡随，以谨丑厉。式遏寇虐，无俾正败。戎虽小子，而式弘大。

民亦劳止，汔可小安。惠此中国，国无有残。无纵诡随，以谨缁绀。式遏寇虐，无俾正反。王欲玉女，是用大谏。

Plebanoj severe subpremataj

Admono al tiranada lordo.

Plebanoj jam severe subprematas,
bezonas ili iom da trankvilo.
Jen amu la plebanojn en ĉefurbo,
kaj regos vi l' aliajn kun facilo.
Vin gardu kontraŭ klaĉoj de fi-homoj,
kaj ne indulgu ties agojn pene.
Haltigu prirabadon kaj perforton,
aĉulojn nepre bridu abomene.
Protektu popolanojn tra la lando
por teni reĝon kaj l' plebon sensplene.

Plebanoj jam severe subprematas,
bezonas ili iom da balzamo.
Jen amu la popolon en ĉefurbo,
vivu kun ali-regnoj sen malamo.
Vin gardu kontraŭ klaĉoj de fi-homoj,
kaj kontraŭ ties rango-uzurpado.
Haltigu prirabadon kaj perforton,
senigu la popolon je trist-bato.
Memoru la meritojn de prareĝoj.
imitu ilin peni por la ŝtato.

Plebanoj jam severe subprematas,
bezonas ili iom da ripozo.
Jen amu la popolon en ĉefurbo,
eltiru ilin plene el ĥaoso.
Vin gardu kontraŭ klaĉoj de fi-homoj,
kaj bridu ilin en malbonkonduco.

Haltigu prirabadon kaj perforton,
forigu l' klikon je agoj de krudo.
Kondutu ja diskrete laŭ la deco,
bone traktu homojn ne per ŝajn-trudo.

Plebanoj jam severe subprematas,
bezonas ili iom da konsolo.
Jen amu la popolon en ĉefurbo,
ne jugu ilin per pli da doloro.
Vin gardu kontraŭ klaĉoj de fi-homoj,
kaj kontraŭ ties agoj de komploto.
Haltigu prirabadon kaj perforton,
bonfaru ĉiam per via klopodo.
Kvankam vi estas juna en regado,
grandas sub via gvid' la konsil-floto.

Plebanoj jam severe subprematas,
bezonas ili iom da komforto.
Jen amu la popolon en ĉefurbo,
ne pelu ilin kaprice per forto.
Vin gardu kontraŭ klaĉoj de fi-homoj,
kaj kontraŭ ties flato kaj kaĵolo.
Haltigu prirabadon kaj perforton,
ne ŝmiru l' regnon jen per malhonoro.
Por nia regn' kaj bonoj de la plebo,
mi vin admonas, granda la sinjoro!

板

上帝板板，下民卒瘁。出话不然，为犹不远。靡圣管管。不实于亶。犹之未远，是用大谏。
天之方难，无然宪宪。天之方蹶，无然泄泄。辞之辑矣，民之洽矣。辞之忤矣，民之莫矣。
我虽异事，及尔同僚。我即尔谋，听我嚣嚣。我言维服，勿以为笑。先民有言，询于刍蕘。
天之方虐，无然谗谄。老夫灌灌，小子蹇蹇。匪我言耄，尔用忧谗。多将熇熇，不可救药。
天之方瘳。无为夸毗。威仪卒迷，善人载尸。民之方殿屎，则莫我敢葵？丧乱蔑资，曾莫惠我师？

天之牖民，如埴如篴，如璋如圭，如取如携。携无曰益，牖民孔易。民之多辟，无自立辟。
价人维藩，大师维垣，大邦维屏，大宗维翰，怀德维宁，宗子维城。无俾城坏，无独斯畏。
敬天之怒，无敢戏豫。敬天之渝，无敢驰驱。昊天曰明，及尔出王。昊天曰旦，及尔游衍。

Kondamnado

Kortegano riproĉas la regnestron pro ties koruptado kaj malutilaj agoj en regado.

La Dio ne benas nian regnon,
la popolo vivas en mizero.

Vi nur buŝe diras, sed ne agas,
via plano 'stas nur sur papero.
Vi ignoras la saĝulojn plene,
kaj deliras blinde en babilo.
Vi ne estas ja malproksimvida,
mi nun kantas per admona diro.

La Ĉiel' minacas per plagfalo,
ne babilu vane pro prospero.
La Ĉiel' faligos la tumulton,
argumentu ne pri vivmielo.
Se regado via irus bone,
la popolo solidarus kune.
Se regado via male putras,
ili dronos en sufero pune.

Kvankam niaj devoj jen malsamas,
ni du servas kune al la ŝtato.
Mi parolas, dum vi fieraĉas,
mi parolas ne laŭ via ŝato.
Mi asertas per realaj faktoj,
ne ĝin prenu jen por infanludo.
Kiel praaj vortoj prave kuras:
"Bonas kun plebanoj la diskuto."

La Ĉielo furiozas forte,
ne ĝin ŝerce prenu kun leĝero.
Arogantas vi fiere al mi,
tamen mi admonas kun sincero.
Mi ne malklarmensas pro oldaĝo,
Sed ne seriozas vi kun folo,
ne facilas ĝustigi la misojn,
vi vin ruinigos sen konsolo.

La Ĉiel' eksplodas per kolero,
ne vin montru mola kun deprimio.
La digneco de palac' perdiĝis,
la saĝuloj mutas kun obstino.
La plebanoj tristaj kun ĝemkrioj
ne kuraĝas dubi pri l' kialo.
La malord' alvokas senrimedon,
Ne asisto venas por regn-falo.

La Ĉiel' misgvidas la plebanojn

kiel flutblovo tiom facila,
kiel jadpecoj tiom tintintaj,
al leŭad' de aĵo jen simila.
Gvidu l' plebon sur la ĝustan vojon,
tenu ilin rekte ne devie.
Nun ĝenaĵoj multas en plebanoj,
ne imagu regi fantazie.

La bonuloj ŝajnas la arbheĝo,
homamas' similas al remparo.
Regno 'stas protekta ekranego,
familio jen la domtrabaro.
La regado celas regn-sekuron,
reĝa parencaro estas muro,
ne toleru ĝian destrudadon,
ne izolu vin mem en obskuro.

Jen obeu al Ĉiel' kolera,
ne infane ludu kun petolo.
Jen subiĝu al Ĉiela plago,
ne vin distru amuze laŭ volo.
Havas la Ĉiel' okulojn brilajn,
gvatas ĝi konduton vian vere.
La Ĉielo vidas mondon klare,
ĝi kun vi plezurvagas prefere.

荡

荡荡上帝，下民之辟。疾威上帝，其命多辟。天生烝民，其命匪谌。靡不有初，鲜克有终。文王曰咨，咨女殷商。曾是彊御？曾是掊克？曾是在位？曾是在服？天降滔德，女兴是力。文王曰咨，咨女殷商。而秉义类，彊御多怱。流言以对。寇攘式内。侯作侯祝，靡届靡究。文王曰咨，咨女殷商。女炰烋于中国。敛怨以为德。不明尔德，时无背无侧。尔德不明，以无陪无卿。

文王曰咨，咨女殷商。天不湏尔以酒，不义从式。既愆尔止。靡明靡晦。式号式呼。俾昼作夜。

文王曰咨，咨女殷商。如蜩如螗，如沸如羹。小大近丧，人尚乎由行。内爨于中国，覃及鬼方。

文王曰咨，咨女殷商。匪上帝不时，殷不用旧。虽无老成人，尚有典刑。曾是莫听，大命以倾。

文王曰咨，咨女殷商。人亦有言：颠沛之揭，枝叶未有害，本实先拨。殷鉴不远，在夏后之世。

Averto al Regnestro Li

Tiu ĉi kanto estis dediĉita al Reĝo Li, kiu puŝis la regnon al la rando de pereco pro siaj violenta opreso, ignoro al fidelaj korteganoj, engaĝigo de maliculoj kaj nuligo de la malnovaj statuto kaj leĝoj de la regno. Pere de la paroloj, kiujn Reĝo Wen komentis pri la ruiniĝo de lasta reĝo de la dinastio Shang, la kanto servas kiel averto al Reĝo Li, ke li ne imitu la lastan reĝon de Shang.

Venenas Reĝ' Li decregulojn,
li l' plebon tiranas severe.
Li punas ilin jen kaprice,
plebanoj vivadas suferi.
Ĉielo nutras plebon bone,
Li tamen trompas ilin vere.
Komencon bonan ĉiuj havas,
trafas mavan finon mizere.

Lamentas Reg' Wen kun suspiro:
"Ve al vi, l' lasta reĝ' de Yin-Shang,
kial vi tiom tiranemas,
kaj premas plebon ĝis humilo?
Kial aĉulo sidas alte,
kaj agas tiom insolente?
Li denature 'stas malica,
sed vin lin helpas evidente."

Lamentas Reg' Wen kun suspiro:
"Ve al vi, l' lasta reĝ' de Yin-Shang,
kial ne uzi la bonkorajn,
sed kaŭzi plendojn en trankvilo?
La famoj iras fulme vasten,
rabistoj agas pli senbride.
La fideluloj mistraktitas
kaj enkaptitas ja inside."

Lamentas Reg' Wen kun suspiro:
"Ve al vi, l' lasta reĝ' de Yin-Shang,
aŭdace malbonfaras troe,
kaŭzas staton de maltrankvilo.
Bonvirtojn vi ne konas vere,
Neniu vi konsili volas.
Vi agas ĉiam tiraneme,
vin ĉiuj evite izolas."

Lamentas Reg' Wen kun suspiro:
"Ve al vi, l' lasta reĝ' de Yin-Shang,

ne abstinis de drinkado
sed inklinas al vin-eltiro.
Vi perdas vian bonkonduton,
drinkante vinon en libero.
Kun krioj, ŝrikoj en la halo,
palaco dronas en pelmelo.”

Lamentas Reg’ Wen kun suspiro:
“Ve al vi, l’ lasta reĝ’ de Yin-Shang.
Jam plendoj plenas tra la tero,
la land’ sin trovas en oscilo.
Aferoj ĉiuj konfuzitas,
Jam ĉio spiras en angoro,
plebanoj brulas de indigno,
kaj jam plenplenas je rankoro.”

Lamentas Reg’ Wen kun suspiro:
“Ve al vi, l’ lasta reĝ’ de Yin-Shang!
Ne la Ĉiel’ vin malfavoras,
vi kontraŭas leĝojn per ŝmiro.
Malhavas vi spertulojn leĝajn,
uzeblas malnova modelo.
Rifuzas vi konsilojn aŭdi,
la regn’ jen dronas en danĝero.”

Lamentas Reg’ Wen kun suspiro:
“Ve al vi, l’ lasta reĝ’ de Yin-Shang!
Kiam surteren arbo falas,
vere laŭ antikvula diro,
ne difektitas la folioj.
radikoj eliĝas el tero.”
Pere’ de Yin estas averta
al vi por bona konsidero.

抑

抑抑威仪，维德之隅。人亦有言：靡哲不愚，庶人之愚，亦职维疾。哲人之愚，亦维斯戾。无竞维人，四方其训之。有觉德行，四国顺之。訏谟定命，远犹辰告。敬慎威仪，维民之则。其在于今，兴迷乱于政。颠覆厥德，荒湛于酒。女虽湛乐从，弗念厥绍。罔敷求先王，克共明刑。

肆皇天弗尚，如彼泉流，无沦胥以亡。夙兴夜寐，洒扫庭内，维民之章。修尔车马，弓矢戎兵，用戒戎作，用遏蛮方。

质尔人民，谨尔侯度，用戒不虞。慎尔出话，敬尔威仪，无不柔嘉。白圭之玷，尚可磨也；斯言之玷，不可为也！

无易由言，无曰苟矣，莫扞朕舌，言不可逝矣。无言不讎，无德不报。惠于朋友，庶民小子。子孙绳绳，万民靡不承。

视尔友君子，辑柔尔颜，不遐有愆。相在尔室，尚不愧于屋漏。无曰不显，莫予云覯。神之格思，不可度思，矧可射思！

辟尔为德，俾臧俾嘉。淑慎尔止，不愆于仪。不僭不贼，鲜不为则。投我以桃，报之以李。彼童而角，实虹小子。

荏染柔木，言缙之丝。温温恭人，维德之基。其维哲人，告之话言，顺德之行。其维愚人，覆谓我僭。民各有心。

於乎小子，未知臧否。匪手携之，言示之事。匪面命之，言提其耳。借曰未知，亦既抱子。民之靡盬，谁夙知而莫成？

昊天孔昭，我生靡乐。视尔梦梦，我心惨惨。诲尔谆谆，听我藐藐。匪用为教，覆用为虐。借曰未知，亦聿既耄。

於乎小子，告尔旧止。听用我谋，庶无大悔。天方艰难，曰丧厥国。取譬不远，昊天不弔。回遹其德，俾民大棘。

Admonoj de Duko Wu

Kortegano Duko Wu en la aĝo de naŭdek jaroj admoni sin kaj la junan Reĝon Ping de Zhou-dinastio.

Aspekto bona kun ĝentilo
 rivelas bonvirtecon vere.
 Kiel asertas oni bone,
 “Saĝeco ŝajnas stult’ apere.”
 Se oni aspektas malsaĝa,
 naskiĝis li kun korp-difekto.
 Se stulte impresas saĝulo,
 li trompas onin per aspekto.

La regn’ prosperas kun saĝuloj,
 feŭdestroj sin submetas vole.
 La reĝ’ kondutas kun bonvirtoj,
 plebanoj obeas enkore.
 Se l’ ŝtata plano estas preta,
 plebanoj devas koni bone.
 Diskrete ni kondutas zorge,
 plebanoj sekvas nin bontone.

La nuna stato de la regno
 jam dronas vere en pelmelo.
 Bonvirtoj venenitas mave,
 volupto regas sen modero.
 Vi scipovas diboĉan vivon,
 sed ne tenas regnon en koro.
 Sen sekvi l’rolon de prareĝoj,

kiel vi regus kun honoro?

Nun la Ĉielo ne vin benas,
kvazaŭ fontakvo fluas vane,
ĝis pere' de vi kaj l' palaco.
leviĝu frue, dormu sane,
balau kaj purigu l' korton,
estu por la plebo modelo.
Pretigu ĉaron kaj ĉevalon,
armilojn por batala celo.
Por invadantojn ja ekstermi,
vi brave sturmu por konkero.

Por la popolon sekurigi
gravas sekvi leĝojn plenkrede.
Por eviti ĝenaĵojn bone
gravas paroli ja diskrete.
Kondutu laŭ la decreguloj,
Estu afabla kun tenero.
Se blanka jad' makulon havas,
ĝin oni igas al brilhelo.
Se la parolo havas mison,
ne eblas viŝi ĝin per belo.

Ne parolu ion laŭvole,
ne diru "mia lang' liberas,
neniu povas bridi ĝin, do."
Diskuri viaj vortoj celas,
reagon ĉiu vorto havas,
rikoltas bona vort' espere.
Prizorgu amikaron kare,
karesu l' plebon konsidere,
zorgeme traktu idojn bone,
la plebo obeas fidele.

Amikojn vi regalas varme
jen kun afabla ridmieno,
vin gardu kontraŭ erar-faro.
Kiam vi solas sen ĉagreno,
vi ne emas penti al Dio.
Ne pensu "mi 'stas en obskuro,
neniu povas vidi nun min."
La Di' inspektas per veturo,
ĉe ĉiu ajn moment' Li falas

por puni vin per fajrobrulo.

Por plibonigi vian menson
riparu viajn mankojn bone.
Diskretu viaj diroj, agoj,
kondu tu laŭdece bontone.
Ne malutilu al aliaj,
estu kiel bona modelo.
Se oni donas al vi piron,
vi lin repagas per prunelo;
se pentras ŝafon vi kun kornoj,
vi trompas ja kun malsincero.

Per ligno supla kaj elasta
elfaras ni liuton belan.
Ĝentila kaj afabla homo
malhavas konduton ribelan.
Se vi tre saĝas kaj prudentas,
akceptas bonajn vortojn vere,
aplikas ilin en praktiko.
Se vi malsaĝas, sed fiere
asertas mian penson aĉa,
oni ne obeas prefere.

Ho ve! vi estas tro juna por
bonon kaj mav' distingi klare.
Mi ne vin helpas per la mano,
kaj vin irigas senerare.
Mi vin konsilas bonintence,
vi aŭskultu al mi modeste.
Vi ne 'stas juna kaj senscia,
jam via bebo ludas geste.
Vi jam malŝparis la junecon,
sed agu onte laŭsugeste.

Tre klare vidas la Ĉielo,
mi vivas plene sen plezuro.
Vidante vin tre konfuzmensa,
mi emas plori kun murmuro.
Mi vin instruas kun zorgemo,
vi min ignoras tute spite.
Instruojn miajn vi forĵetas,
vi surdas al mi senhezite.
Ĉu vi asertas, ke vi konas

nenion decan eĉ memfide?

Ho ve! vi juna suvereno,
imitu la prareĝojn bone.
Admonon mian sekvu strikte,
vi ne trafos ĝenojn persone.
El la Ĉiel' nun falas plagoj,
la regn' sin trovas en danĝero.
Mi citu kazojn de pereoj,
tre justa estas la Ĉielo.
Se vi insistas je eraroj,
la pleb' sin banos en sufero.

桑柔

菀彼桑柔，其下侯甸，捋采其刘，瘼此下民。不殄心忧，仓兄填兮。倬彼昊天，宁不我矜？
四牡騤騤，旃旌有翩。乱生不夷，靡国不泯。民靡有黎，具祸以烬。於乎有哀，国步斯频。
国步蔑资，天不我将。靡所止疑，云徂何往？君子实维，秉心无竞。谁生厉阶，至今为梗？
忧心慙慙，念我土宇。我生不辰，逢天憯怒。自西徂东，靡所定处。多我覯瘡，孔棘我圉。
为谋为毖，乱况斯削。告尔忧恤，诲尔序爵。谁能执热，逝不以濯？其何能淑，载胥及溺。
如彼遘风，亦孔之僇。民有肃心，苴云不逮。好是稼穡，力民代食。稼穡维宝，代食维好？
天降丧乱，灭我立王。降此蟊贼，稼穡卒痒。哀恫中国，具赘卒荒。靡有旅力，以念穹苍。
维此惠君，民人所瞻。秉心宣犹，考慎其相。维彼不顺，自独俾臧。自有肺肠，俾民卒狂。
瞻彼中林，甡甡其鹿。朋友已谮，不胥以谷。人亦有言：进退维谷。
维此圣人，瞻言百里。维彼愚人，覆狂以喜。匪言不能，胡斯畏忌？
维此良人，弗求弗迪。维彼忍心，是顾是复。民之贪乱，宁为荼毒。
大风有隧，有空大谷。维此良人，作为式谷。维彼不顺，征以中垢。
大风有隧，贪人败类。听言则对，诵言如醉。匪用其良，复俾我悖。
嗟尔朋友，予岂不知而作。如彼飞虫，时亦弋获。既之阴女，反予来赫。
民之罔极，职凉善背。为民不利，如云不克。民之回遘，职竞用力。
民之未戾，职盗为寇。凉曰不可，覆背善誉。虽曰匪予，既作尔歌！

Riproĉado al Reĝo Li

Kortegano riproĉis al Reĝo Li, ke li engaĝas aĉulojn, praktikas tiranadon, kaŭzas invadon de fremdlando kaj suferigas la popolon.

Morusfolioj kreskas freŝaj,
vastas la ombr' kun malvarmeto.
Se oni foliojn forigas,
sunlumo bakas sen kvieto.
La plebo tristas sen ombr-kovro
sufero ilin batas forte.
Tre senkompatas la Ĉielo,
ĉagreno min turmentas morde.

Ĉevaloj kvar galopas urĝe,
la flagoj flirtas kun leĝero.
Tumult' okazas en malordo,
la regn' sin trovas en pelmelo.
Formortis multaj en milito,
disfalas domoj al ruino.
Ni plenas je melankolio,
la regno iras jam al fino.

Nenio povas savi nin nun,
nin ne helpemas la Ĉielo.
Ni vagas por nia loĝejo,
senhejmaj iras ni sen celo.
Bonuloj povas ja mediti:
ne strebas ili al perfekto.
Kiu la plagon kaŭzas vere,
kaj vundas nin ja sen protekto?

Kun trista spleno en la koro,
sopiras mi al la hejmltero.
Mi vivas dum malbona tempo,
Ĉielo bolas de kolero.
De oriento al uesto
mi povas loĝi jen nenie.
Mi afliktiĝas kun amaro,
kaj zorgas pri la regn' anksie.

Se sekvus vi admonojn vere,
vi moderigus plagon certe.
Kompatu l' plebon en sufero,
disponu la saĝulojn lerte.
Kiu ne estingas fajrvarmon
per disverŝo de akvo frida?
Sen rimedoj bonaj la ŝtato
suferigus plebon perfide.

Se kuri kontraŭ la ventego,
ni ne povus spiri libere.
La plebo havas sindonemon,
sed ne povas montri ĝin vere..
Atentu kultivadon kampan,
oni vivas de kamplaboro.
Kampuloj penas jar' post jaro,

rikolto riĉa 'stas trezoro.

Ĉielo sendas plagon teren
por ruinigi l' regnon tute,
kaj fiinsektojn semas kampen
por detrui grenplantoj krude.
Ve! nia plebo en la regno,
al ili mankas kampoj riĉaj.
Ne havas forton ili peti,
ke falu benoj la feliĉaj.

Se l' reĝo saĝas kaj bonkoras,
la pleb' lin amas kun adoro.
Kun granda saĝo kaj prudento
li uzas homojn de valoro.
Se li tirano mava estas,
li prenas sin por la sanktulo.
Kun mavaj kaj malicaj pensoj
li kirlas plebon per torturo.

Jen vidu, inter arboj densaj
la cervoj kapriolas fole.
Sen la fidinda amikaro
vi povus treni vin dolore.
Kiel asertas antikvulo,
iun fermas dilem' izole.

Sanktulo kun saĝeco granda
kapablas rigardi al foro,
dum malsaĝulo proksimvida
blufadas ĉie per rumoro.
Eldiri veron ni ne povas,
nin trafos krimo de teroro.

Nur bonkoruloj ne avidas
je promocio kaj profito,
dum tiuj maliculoj serĉas
rangaltigon kun hipokrito.
La kialo de malord' socia
jen kuŝas en erara gvido.

Ventego blovas furioze
el la malplena monta valo.
Nur tiu saĝa bonkorulo

kondutas vere kun lojalo,
dum tiuj homoj sen racio
agaĉas hide en skandalo.

Ventego blovas furioze,
aĉuloj restas en palaco.
Aŭskultas ili al laŭdvortoj,
sed surdas al admon-agaco.
Bonuloj ignoratas blinde,
nenion diras kun aŭdaco.

Ho ve, ve, mia amikaro,
ĉu mi ne vin konas tre klare?
Insekto flugas en aero,
ĝi eble enretiĝas fale.
Admonas vin per bonaj vortoj,
vi min insultas tre amare.

La pleb' vin ĝenas per protesto,
ĉar vi mensogas sen sincero.
Vi malbonfaras ĝis ekstremo,
la plebo krias kun kolero.
Vi tro tiranas la plebanojn,
leviĝas ili kun ribelo.

La plebo vivas maltrankvile,
ĉar la rabistoj agas peste.
Kvankam mi admonas sincere,
vi ne ĝin akceptas modeste.
Mi estas ne kaŭzant' de kulpo,
sed por vi kantas mi konteste.

云汉

倬彼云汉，昭回于天。王曰：於乎！何辜今之人？天降丧乱，饥馑荐臻。靡神不举，靡爱斯牲。圭璧既卒，宁莫我听？

旱既大甚，蕴隆虫虫。不殄禋祀，自郊徂宫。上下奠瘏，靡神不宗。后稷不克，上帝不临。耗斁下土，宁丁我躬。

旱既大甚，则不可推。兢兢业业，如霆如雷。周余黎民，靡有孑遗。昊天上帝，则不我遗。胡不相畏？先祖于摧。

旱既大甚，则不可沮。赫赫炎炎，云我无所。大命近止，靡瞻靡顾。群公先正，则不我助。父母先祖，胡宁忍予？

旱既大甚，涤涤山川。旱魃为虐，如惓如焚。我心惮暑，忧心如熏。群公先正，则不我闻。昊天上帝，宁俾我遯？

早既大甚，龟勉畏去。胡宁瘕我以旱？僭不知其故。祈年孔夙，方社不莫。昊天上帝，则不我虞。敬恭明神，宜无悔怒。

早既大甚，散无友纪。鞠哉庶正，疚哉冢宰。趣马师氏，膳夫左右。靡人不周。无不能止，瞻昂昊天，云如何里！

瞻昂昊天，有嘒其星。大夫君子，昭假无赢。大命近止，无弃尔成。何求为我。以戾庶正。瞻昂昊天，曷惠其宁？

Sekego

La regno suferis sekegon dum la regperiodo de Reĝo Xuan (821 a.K.). La reĝo preĝis al spiritoj por savi la regnon kaj la plebon.

L' Arĝent-rivero* supre kuŝas,
senĉese rotacias steloj.

La reĝ' lamentas kun kaplevo:

“Ho, ĉu ni kulpas sen modero?

Pro la tumulto far ĉielo,

ni ja malsatas jar' post jaro.

Ni kultis jam ĉiujn spiritojn,

je ĉiuj kostoj sen komparo,

eĉ per jadpecoj kaj trezoroj,

sed nin ne trafas grac-deklaro.

“Sufokas morte la sekego,

vaporo varmas ĝis ekstremo.

Ni kulte preĝas pri pluvfalo,

klopodas peti ni kun peno.

Ni kultas teron kaj ĉielon,

spiritoj oferojn kunĝuas.

Grendio ne nin savi povas,

spiritoj jen nek kontribuas.

La kampoj dronas en sinistro,

ĉu l' Ĉiel' nin vole detruas?

“Sekeg' jam regas en la regno,

ne eblas ĝin forigi plene.

Tuttago timas mi en stulto

kvazaŭ minacus tondr' venene.

Plebanoj jam forlasas regnon,

jen por rifuĝi en pelmelo.

La homoj mortas sur la kampoj,

Kiel kruelas la Ĉielo!

La regno tuj falontas tute,

plebanoj timas en sufero.

“Sekeg’ jam regas en la regno,
ne estas bona la rimedo.
La suno bakas kun fajrbrulo,
varmond’ nin frapas per obsedo.
Jam alproksimas morto al ni,
ni ja baraktas sen konsolo.
Prapatroj kaj spiritoj surdas
kaj nin forlasas en izolo.
Ho, la Ĉielo kaj spiritoj
nin savi venu kun favoro.

“Sekeg’ jam regas en la regno,
rivero sekas, nudas monto.
Demono de sekeg’ malbena
etendas fajron tra l’ hommondo.
Varmeg’ min volvas per doloro,
mi afliktiĝas kun anksio.
Kial dioj ne venas helpi
kaj savi per via magio?
Ho, la Ĉiel’ ne nin kompatas,
ni dronas ja en agonio.

“Sekeg’ jam regas en la regno,
ni penas preĝi kun plenforto.
Kial nin punas Di’ per plago?
Ni ne scias pri l’ viv-distordo.
Ni frue okazigas kulton,
oferojn portas al altaro.
Ĉiel’ kompata kaj bonkora
jen pensu pri ni en amaro.
Ni kovadas respekton al vi,
vi scias pri nia lojalo.

“Sekeg’ jam regas en la regno,
kondukas ĉiuj senracie.
La altranguloj senrimedas,
Ministro fuŝ-agas simie.
La korteganoj helpas kulti,
asistas oficistoj pie,
neniu volas ripozeti,
neniu haltas senpasie.
Mi levas kapon al ĉielo,
mi maltrankvilas ja anksie.

“Serenas vasta la ĉielo,
 stelaro brilas tra nebulo.
 Sincere preĝas pri pluvfalo,
 mi, korteganoj, altranguloj.
 Ĉe l’ rando de l’ regna pereco,
 ne haltas preĝi ni obstine.
 Preĝad’ pri pluvo ne ’stas por mi,
 sed por plebanoj ja kapkline.
 Ho, la Ĉielo alte supre,
 nin benu vere korinkline.
 *L’ Argent-rivero estas la ĉina nomo de Lakta Vojo

崧高

崧高维岳，骏极于天。维岳降神，生甫及申。维申及甫，维周之翰。四国于蕃。四方于宣。
 亹亹申伯，王缵之事。于邑于谢，南国是式。王命召伯，定申伯之宅。登是南邦，世执其功。
 王命申伯，式是南邦。因是谢人，以作尔庸。王命召伯，彻申伯土田。王命傅御，迁其私人。
 申伯之功，召伯是营。有俶其城，寝庙既成。既成藐藐，王锡申伯。四牡蹻蹻，钩膺濯濯。
 王遣申伯，路车乘马。我图尔居，莫如南土。锡尔介圭，以作尔宝。往近王舅，南土是保。
 申伯信迈，王饯于郿。申伯还南，谢于诚归。王命召伯，彻申伯土疆。以峙其粢，式遄其行。
 申伯番番，既入于谢。徒御啍啍。周邦咸喜，戎有良翰。不显申伯，王之元舅，文武是宪。
 申伯之德，柔惠且直。揉此万邦，闻于四国。吉甫作诵，其诗孔硕。其风肆好，以赠申伯。

Pri Grafo Shen

La epopeo kantas pri investado de grafo al Shen, kiu, kiel komandanto, gvidis trupojn defendi la sudan landlimon.

Impone montoj firme staras,
 tre alte jen ĝis la ĉielo.
 La feoj de la montoj venis,
 naskiĝis Shen kaj Fu sur tero.
 Regno Shen kaj Regno Fu estas
 superaj en Zhou-dinastio,
 kaj baras invadon de l’ fremdaj,
 kaj muras ĉe la limlinio.

Grafo Shen estas diligenta
 en la palaca registaro.
 En sia regn-ĉefurbo ĉe Xie
 li elstaras en regn-najbaroj.
 La reĝ’ ordonis al li gvidi
 konstruon de domoj en sudo,
 kaj vivi tie kun decido
 por teni l’ regnon en la tuto.

La reĝ' ordonis al li esti
modelo en sud-regiono
kaj pere de ĉeloka forto
konstrui novan muro-zonon.
Ordono de la reĝ' alvenis:
ke li difinu l' landan limon
kaj korteganoj oldaj vivu
kun graf' Shen tie en intimo.

La finkonstruon de Regno Shen
grafo Zhao entreprenis vere.
La urbmuoj estis solidaj,
la templ' jam konstruiĝis bele.
Aspektas l'urbo ja majeste,
la reĝ' premiis al Shen bone:
stalonoj kvar fortikaj korpe
brustornamitaj or-blazone.

La reĝo forsendis grafon Shen
al Xie per kaleŝo orflava.
"Zorgeme planu l' urbon tie,
la suda regno 'stas bonhava.
Donacas mi jadplaton al vi,
ĝi estas la landa trezoro.
Foriru kun trankvilo, grafo,
defendi l' landon kun fervoro."

Grafo Shen pretis ekvojaĝi,
la reĝ' lin ĝisis per festeno.
Decidis Shen alsuden iri
por defendi limon kun peno.
La reĝo petis de Grafo Zhao
defini la landlimon bone,
pretigi sufiĉe da greno
rapide iri laŭordone.

Bravulo Grafo Shen ekiris
al Xie, la bona lok' de belo.
Sekvantoj liaj marŝis vice,
plebanoj kriis kun ĝoj-helo.
Modele li elstaris vere
en popolanoj, kun la gloro.
Impresas li majeste, brave,

lin plebo amas kun adoro.

Kondutas li kun bonaj virtoj
afable, milde kaj bonkore.
Li tenas regnon en bonordo,
famiĝas ĉie li honore.
Mi, Ji Fu, kantas per poemo
por laŭdi lin ja el la koro.
Prezentu mi ĉi versliniojn,
al graf' Shen, granda la sinjoro.

烝民

天生烝民，有物有则。民之秉彝，好是懿德。天监有周，昭假于下。保兹天子，生仲山甫。仲山甫之德，柔嘉维则。令仪令色，小心翼翼。古训是式，威仪是力。天子是若，明命使赋。王命仲山甫，式是百辟，缵戎祖考，王躬是保。出纳王命，王之喉舌。赋政于外，四方爰发。肃肃王命，仲山甫将之。邦国若否，仲山甫明之。既明且哲，以保其身。夙夜匪解，以事一人。

人亦有言，柔则茹之，刚则吐之。维仲山甫，柔亦不茹，刚亦不吐。不侮矜寡，不畏强御。人亦有言，德輶如毛，民鲜克举之。我仪图之，维仲山甫举之。爰莫助之。袞职有阙，维仲山甫补之。

仲山甫出祖。四牡业业。征夫捷捷，每怀靡及。四牡彭彭，八鸾锵锵。王命仲山甫，城彼东方。

四牡騤騤，八鸾喈喈。仲山甫徂齐，式遄其归。吉甫作诵，穆如清风。仲山甫永怀，以慰其心。

Pri ĉefministro Shan Fu

Laŭda odo pri la elstara talento de ĉeministro Shan Fu.

La Ĉielo faris la homaron,
ĉio aranĝitas en bonordo.
Homoj tenas la denaskan econ,
ĉiuj amas virtojn en akordo.
La Ĉiel' rigardas nian regnon,
ni preĝadas sub ĝi kun aspiro.
Por protekti sian filon de Zhou
ĝi generis Shan Fu kun saĝ-brilo.

Shan Fu havas la denaskajn virtojn:
milde kaj afable, sed severe.
Li aspektas bele kaj impone,
kaj kondutas diskrete vere.
Li instruojn sekvas de prareĝoj,
kaj plenumas vortojn jen kun peno.

Li obeas al la reĝa volo,
kaj ordonojn faras jen sen ĝeno.

Al Shan Fu ordonas la regnestro
starigi modelon por la lordoj:
servi kiel siaj antaŭuloj
helpi l' reĝon per sekuraj manoj;
kaj ordoni anstataŭ la reĝo,
esti lia gorĝ' kaj parolilo;
pasigi ediktojn al feŭdregnoj,
kiuj tuj reagis kun facilto.

La ordono reĝa ja solenas,
li plenumas ĝin kun tutanimo.
Shan Fu vere konas kun precizo,
kio bonas al regna destino.
Li prudentas kun erudicio,
kaj kondutas takte kun bonfamo.
Li klopodas pene tag' post tago
por defendi l' regnon por ĉiamo.

Kiel antikvuloj iam diris:
"Oni manĝas ion molan vole,
sed elvomas ion duran certe."
Li malsame manieras sole:
li neniel manĝas la molaĵon
sed ne vomas la malmolan ele.
Li ne tiranadas la malfortajn
timas nek la fortajn senŝancele.

Ankaŭ kiel antikvuloj diris:
"Virto ŝajnas plumo de leĝero,
ĝin malmultaj povas levi alten."
Mi decidas kun la konsidero,
ke nur Shan Fu 'stas levanto tia,
li ne petas helpon el Ĉielo.
Se la reĝa robo difektitas,
li ripari povas ĝin al belo.

Kiam Shan Fu vojaĝas survoje,
kvar ĉevaloj lian ĉaron tiras.
La ĉaro rapide kuras knare
kaj oni fini l' taskon deziras.
Kvar ĉevaloj jen galopas urĝe,

ok tintiloj bronzaj sonas klare.
Ordonitas iri li eosten
por konstrui urbon solidare.

Kvar ĉevaloj jen galopas urĝe,
ok tintiloj bronzaj sonas klare.
Al Qi-regno li ekiras prete,
li revenu glate kaj senbare.
Mi komponas por li ĉi laŭdkanton,
kiel blovas freŝa briz' leĝere.
Mia koro iras al vi, Shan Fu,
Ĉantas mi ĉi kanton por vi vere.

韩奕

奕奕梁山，维禹甸之，有倬其道。韩侯受命，王亲命之：纘戎祖考，无废朕命。夙夜匪解，虔共尔位，朕命不易。榦不庭方，以佐戎辟。
四牡奕奕，孔脩且张。韩侯入覲，以其介圭，入覲于王。王锡韩侯，淑旂绥章，簪珥错衡，玄衮赤舄，钩膺镂錡，鞞鞫浅幘，倕革金厄。
韩侯出祖，出宿于屠。显父饯之，清酒百壶。其肴维何？炰鳖鲜鱼。其蔌维何？维笋及蒲。其赠维何？乘马路车。笱豆有且。侯氏燕誉。
韩侯取妻，汾王之甥，蹇父之子。韩侯迎止，于蹇之里。百两彭彭，八鸾锵锵，不显其光。诸娣从之，祁祁如云。韩侯顾之，烂其盈门。
蹇父孔武，靡国不到。为韩姑相攸，莫如韩乐。孔乐韩土，川泽訏訏，鲂鱖甫甫，麀鹿嘒嘒，有熊有罴，有猫有虎。庆既令居，韩姑燕誉。
溥彼韩城，燕师所完。以先祖受命，因时百蛮。王锡韩侯，其追其貊。奄受北国，因以其伯。实墉实壑，实亩实藉。献其貔皮，赤豹黄罴。

Talenta Markizo Han

Laŭdkanto pri Markizo Han elstara en talento.

Monto Liang staras grandioze,
Yu de Xia ĝin ordigis pene,
la voj' kondukas al ĉefurbo.
Markizo Han pretas saĝplene,
la reĝ' edikton sendis al li:
“Servu prapatrojn fidele,
obeu la ordonojn de mi,
kaj ne langvoru malsincere,
persistu sur via posteno;
ne ŝanĝu l' ordonojn laŭvole,
subigu tributregnojn bone,
regadon helpu ja fervore.”

La ĉaron tiras kvar ĉevaloj,
fortika venas li impone
nun por la reĝa aŭdienco.
Li iras al palac' bontone
kaj riverencas al la reĝo.
Donacas al li l' reĝ' favore
drakflagon kun brokitaj floroj,
la ĉarkovrilon altvaloran,
nigran robon kun ruĝaj ŝuoj,
kapbridon belan por ĉevalo,
ĉaran garnaĵon tigro-felan,
kaj bridrimenojn kun or-palo.

Survoje la markizo kultas
kaj loĝas ĉe Tu kun trankvilo.
Regalas Xian Fu lin festene,
proponas vinon kun ĝentilo.
Sin trovas multaj bonaj pladoj
kaj fiŝaĵo kun bonodoro.
Legomoj freŝaj surtabliĝas:
la bambuŝosoj en vaporo.
Donacoj pretas ankaŭ por li:
kaleŝo kun kvar tirĉevaloj.
Festeno riĉas je frandaĵoj,
gastoj manĝas en jovialo.

Han edzinigas belulinon,
ŝi estas regnestra nevino,
filino de feŭdestro Gui Fu.
Markizo Han kun korinklino
persone prenas ŝin rehejmen.
Cent ĉaroj rulas sin impone
Ok tintiloj sonas tre klare
la sceno brilas impresdone.
la novedzinon akompanas
fratinoj kiel nuboj belaj.
Li kapsalutas rigardantojn
plenas la dom' je splendoj helaj.

Gui Fu tre lertas en milito,
vojaĝis ĉien li kun peno.
Li ŝatis la regnon Han, trovis
por filnjo edzon en la regno.
Tie 'stas lagoj kaj riveroj,

la vivo dronas en komforto.
Bramoj kaj karpoj grasas, grandas,
kuras cervoj sur mont' en hordo.
Vidiĝas ursoj en arbaro,
kaj ankaŭ tigroj kaj ŝakaloj.
Filino lia vivas tie
kvazaŭ naĝante en nektaro.

Altajn murojn en la regn' Han
konstruis plebo de l' Yan-regno.
Prapatroj de Han ediktitas
batali kontraŭ huna veno.
La reĝ' ordonas al markizo
de nun du regnojn regi plene
kaj nordajn tribojn inkluzive
por teni la nordon senĝene.
Li gvidas solidigi murojn
kaj agron dividi egale.
Kaj li prezentas al la reĝo
diversajn bestfelojn lojale.

江汉

江汉浮浮，武夫滔滔。匪安匪游，淮夷来求。既出我车，既设我旗。匪安匪舒，淮夷来铺。
江汉汤汤，武夫洸洸。经营四方，告成于王。四方既平，王国庶定。时靡有争，王心载宁。
江汉之浒，王命召虎：式辟四方，彻我疆土。匪疚匪棘，王国来极。于疆于理，至于南海。
王命召虎：来旬来宣。文武受命，召公维翰。无曰予小子，召公是似。肇敏戎公，用锡尔祉。
釐尔圭瓚，秬鬯一卣。告于文人，锡山土田。于周受命，自召祖命，虎拜稽首：天子万年！
虎拜稽首，对扬王休。作召公考：天子万寿！明明天子，令闻不已，矢其文德，洽此四国。

Brava Duko Mu

La odo prikantas Dukon Mu pri ties subigo de ribelo de la sudaj triboj.

Torentas onde la rivero,
antaŭen marŝas la armeo.
Por nek plezuro nek vojaĝo,
sed por ribelanta perejo.
Jam mia ĉaro prete iras,
militflagoj flirtas leĝere.
Sen ajna forta malstreĉeco
mi celas batali konkere.

Torentas fluoj de l' rivero,
ekiras trupoj en vicaro.

Por batali de lok' al loko
por reĝ' mi agas kun lojalo.
Jam la ribel' 'stas subigita,
la regn' sin trovas en trankvilo.
Milito ne plu portas ĝenon,
la reĝo vivas laŭ deziro.

Ĉe kunfluej' de du riveroj,
la reĝ' ordonis kun fidemo
al Zhao Hu: "Plivastigu plue
nian teron ja ĝis ekstremo.
Ne ĝenu nek perfortu l' plebon,
starigu modelon de l' regno.
Determinu agron kaj limon
ĝis Ĉina Maro jen kun peno."

La reĝo ordonis al Zhao Hu
dum inspektad' al suda limo:
"Kiam Wen kaj Wu reĝis, viaj
prapatroj helpis en domino.
Kvankam vi estas juna viro,
imitu ilin en spirito.
Klopodu jen kun energio,
atendos vin granda merito.

"Mi donas tason de jad' al vi
kaj pokalon da mili-vin'
jen por gepatrojn viajn kulti.
Mi rekompecos per tero vin.
Nun servu kiel la prapatroj
min strikte sekvu kun fidelo."
Li riverencas kaj deziras:
"Longe vivu kiel ĉielo!"

Li riverencas kaj prilaŭdas
la reĝajn virtojn kun sincero.
Komponas mi ĉi odon pri li,
pri l' reĝ' kun vivo de l' ĉielo.
La reĝo famas pro bonvirtoj,
la regno daŭros en prospero.
Li ja praktikas virtan regon
kaj regnoj pacas sen mizero.

常武

赫赫明明。王命卿士，南仲大祖，大师皇父。整我六师，以脩我戎。既敬既戒，惠此南国。王谓尹氏，命程伯休父，左右陈行。戒我师旅，率彼淮浦，省此徐土。不留不处，三事就绪。赫赫业业，有严天子。王舒保作，匪绍匪游。徐方绎骚，震惊徐方。如雷如霆，徐方震惊。王奋厥武，如震如怒。进厥虎臣，阊如虓虎。铺敦淮漬，仍执丑虏。截彼淮浦，王师之所。王旅啍啍，如飞如翰。如江如汉，如山之苞。如川之流，绵绵翼翼。不测不克，濯征徐国。王犹允塞，徐方既来。徐方既同，天子之功。四方既平，徐方来庭。徐方不回，王曰还归。

Ekspedicio kontraŭ Regno Xu

Odo pri Reĝo Xuan, kiu persone gvidis ekspedicion por konkeri Regnon Xu.

Reĝo Xuan saĝas kun prudento,
nomumis li ministron ĉefo,
kies prapatro estis Nan Zhong.
La reĝ' admonis lin pri devo:
“Ordigu la ses trupojn bone,
pretigu la armilojn vere.
Jen nepras teni vin gardemaj
por regi l' sudon senŝancele.

La reĝo diris al Yin Jifu
taski al ministro Xiu Fu, do:
“Aranĝu trupojn en linioj
kaj marŝu rekte al la sudo.
Laŭ Huai-rivero militiru,
observu Regnon Xu detale.
Armeoj tri ne garnizonu,
ne ĝenu l' plebon malbonfare.”

Kun imponeco kaj digneco
Reĝo Xuan montris sin majesta.
La reĝaj trupoj marŝis brave,
sen halto kaj sen ĝen' infesta.
Tumultis trupoj de regno Xu,
kaos' jam regis sen batalo.
Kiel tondr' eksonas horore,
Regno Xu staris ĉe fatalo.

Reĝaj trupoj avancis brave,
la malamikojn batis forte.
Militĉaroj sturmis antaŭen,
verŝajne tigre disŝir-morde.
Laŭlonge de la riverbordoj

tre multis kaptitaj soldatoj.
La reĝaj trupoj kaptis l' urbon
kaj garnizonis kun paradoj.

Potencis la armeo reĝa,
kiel birdoj flirtas ekzalte,
kiel la rivero torentas,
kiel montoj staras tre alte.
Similis ĝi al torentfluo
nebarebla sen interrompo.
Ĝi estis nevenkebla forto,
ĝi kaptis sudon kun aplombo.

Reĝo Xuan saĝas kaj sagacas,
regn' Xu jam tributas obee.
Ĝia reĝo venas por paco,
ni kantu por li epopee.
Kvieto regas en la mondo,
la reĝo de Xu ne ribelas.
Tumulto jam ne plu leviĝos,
la reĝo diras "ĉio belas!"

瞻印

瞻印昊天，则不我惠？孔填不宁，降此大厉。邦靡有定，士民其瘵。蠢贼蠢疾，靡有夷届。罪罟不收，靡有夷瘳！
人有土田，女反有之。人有民人，女覆夺之。此宜无罪，女反收之。彼宜有罪，女覆说之。哲夫成城，哲妇倾城。懿厥哲妇，为枭为鸱。妇有长舌，维厉之阶！乱匪降自天，生自妇人。匪教匪诲，时维妇寺。
鞠人忮忒，谮始竞背。岂曰不极，伊胡为慝？如贾三倍，君子是识。妇无公事，休其蚕织。天何以刺？何神不富？舍尔介狄，维予胥忌。不吊不祥，威仪不类。人之云亡，邦国殄瘁！天之降罔，维其优矣。人之云亡，心之忧矣。天之降罔，维其几矣。人之云亡，心之悲矣！鬻沸檻泉，维其深矣。心之忧矣，宁自今矣？不自我先，不自我后。藐藐昊天，无不可巩。无忝皇祖，式救尔后。

Plendoj kontraŭ Reĝo You

Satiro pri Reĝo You, kiu ekstreme favoris sian klaĉeman edzinon Si, spite al la sorto de la regno kaj la plebo.

Mi levas kapon al ĉielo,
ĝi ja ne montras al ni gracon.
Faligas plagon ĝi malice,
la plebon ĵetas en malpacon.
La regn' sin trovas en tumulto,

regnanoj naĝas en mizero.
Kiel insektoj ronĝas plantojn,
kiam finiĝos ĉi sufero?
Okazas ofte mavaĵoj krimoj,
la plebo vivas en despero.

Se aliaj posedas kampojn,
vi proprigas ilin avide.
Se aliaj disponas homojn,
vi rabas ilin ja inside.
Ĉi homo estas senkulpulo,
vi nomas lin krimulo vere.
Sed tiu homo 'stas krimulo,
vi senkulpigas lin prefere.

Povas saĝul' konstrui muron,
dum ĝin detruas saĝulino.
Ve, ĉi virino pli kruelas
ol la omena strig' sur pino.
Virin' venenan langon havas,
elvomas ŝi mavaĵojn flue.
Plagoj ne falas el ĉielo,
ŝi naskas ilin jen senbrue.
Neniu lernas mavon vole,
ĉar li kroĉigas al ŝi glue.

Ŝi fi-akuzas kaj denuncas,
kaj kalumnias sen fidelo.
Ĉi virino estas feroca,
ŝi malbonfaras kun kruelo.
Virinoj ŝajnas komercistoj,
ne decas agi en regado.
Virinoj taŭgas por hejmtaskoj,
sed ne por taskoj de la ŝtato.

Kial Ĉiel' vin punas forte?
Kial spiritoj ne nin gracias?
Rivalojn vi indulgas milde,
vi eĉ hate kun mi malpacas.
Sinistrojn vi ne konsideras,
bonuloj jam perdiĝis plene.
Nobluloj ĉiuj jen foriris,
la ŝtato ruiniĝos svene.

Ĉiel' faligas reton kriman
super nia dolora tero.
La bonaj homoj jam foriris,
mi afliktiĝas en kolero.
Ĉiel' ne montras kompateton,
panikas plagoj plebon vere.
La bonaj homoj jam foriris,
mi perdis la koron despere.

Fontakvo ŝprucas jen senhalte
el la profunda akv-prospéro.
Mi vere tristas kun ĉagreno,
jam longe restas ĉi mizero.
Ĝi ne ekzistis antaŭtempe
nek restos post multegaj jaroj.
Ho, la Ĉiel' en alta spaco,
vi regas ĉion en kvar maroj,
ne humiligu la prapartojn,
nek forgesu pri ni mortaloj.

召旻

旻天疾威，天笃降丧。殄我饥馑，民卒流亡。我居圉卒荒。
天降罪罟，蠹贼内讟。昏椽靡共，溃溃回遘，实靖夷我邦。
皋皋訚訚，曾不知其玷。兢兢业业，孔填不宁，我位孔贬。
如彼岁旱，草不溃茂，如彼栖苴。我相此邦，无不溃止。
维昔之富不如时，维今之疾不如兹。彼疏斯粝，胡不自替？职兄斯引。
池之竭矣，不云自频。泉之竭矣，不云自中。溥斯害矣，职兄斯弘，不裁我躬。
昔先王受命，有如召公，日辟国百里，今也日蹙国百里。於乎哀哉！维今之人，不尚有旧！

Sentaŭga Reĝo You

*Satiro pri Reĝo You, kiu kaŭzis ruiniĝon de la regno pro lia uzo de malbonaj kaj insidaj
uloj.*

Malica kaj feroce la Ĉielo
faligas plagojn kaj sinistrajn mavajn,
alportas malsategon kun kruelo.
Plebanoj fuĝas kaj vagadas ĉien,
dezertas tute ja la regna tero.

Ĉielo ŝutas sob reton de krimo,
la lordoj konfliktadas en malpaco.
Eŭnukoj vivas diboĉe sen limo,
malemaj teni ordon en palaco,
atendas la regnon pere-destino.

Malbofarantoj ja ne scias vere,
ke trompo kaj langvoro estas mankoj.
Ni, laboremaj, zorgemaj sincere,
maltrankviliĝas ege kun ansio,
ni timas perdi rangon ja despere.

Dum granda la sekeg' de tiu jaro,
cent herboj ne prosperis pro akvmanko,
folioj velkis, flirtis jen en aro.
Ho, ĝuste kiel tiu sceno trista,
la regn' tumultas, iros tuj al falo.

Nun la riĉaĵoj malpliĝas fale,
kaj la misfaroj plenas en la regno.
Li sola ĝuas rizon joviale,
kial el la tron' li ne retiriĝus?
La regno jam malboniĝas tre klare.

Sekiĝas tute l' akvo en la lago
jen komencante de la laga bordo.
Fontakvo ĉesas flui sen zigzago
ĝuste pro mank' de akvo en la fonto.
Serioziĝas ĉie jam la plago,
mizero disvolviĝas diversloke,
ĉu min ne trafas la sufer-atako?

Dum la prareĝo regis en prospero,
saĝulo Duko Zhao asistis al li.
La regna ter' pliiĝis kun akcelo,
sed nun ĝi reduktiĝas jen grandkvante.
Ve, lamentinda sceno en sufero!
Ĉu en la nuna palaco troviĝas
ankoraŭ korteganoj kun fidelo?

颂
Parto de Himnoj

周颂

Himnoj de Zhou

清庙

於穆清庙，肃雍显相。
济济多士，秉文之德。
对越在天，骏奔走在庙。
不显不承，无射于人斯！

La kvieta templo

Himno dum kultado al Reĝo Wen.

Solenas la kvieta templo,
la princoj staras en silento.
Ministroj penas kun fervoro
por kulti Reĝon Wen kun sento.
Al animo lia ĉiele
urĝe ili iras en korto.
Prilumas onin lia gloro,
liaj virtoj daŭros sen tordo.

维天之命

维天之命，於穆不已。
於乎不显，文王之德之纯。
假以溢我，我其收之。
骏惠我文王，曾孙笃之。

Reĝo Wen sur la ĉielo

Himno dum kultado al Reĝo Wen.

Ĉielo sekvas sian vojon
solene ĉiam sen devio.
Kiel impone kaj lumplene
Reĝo Wen gloras sen vario.
Bonvirtoj liaj falas sur nin,
daŭrigu ilin ni fidele.
Moralon kaj konduton liajn
niaj idoj sekvu prefere.

维清

维清缉熙，文王之典。肇禋，迄用有成，维周之祯。

Statuto de Reĝo Wen

Himno pri statuto de Reĝo Wen.

Statuto de la regno brilas,
prilumas ĝi en konkerado.
de uest' l' regno militiras,
sukcesas ĝi kun meritgloro,
la regno ja pro ĝi trankvilas.

烈文

烈文辟公，锡兹祉福。惠我无疆，子孙保之。无封靡于尔邦，维王其崇之。
念兹戎功，继序其皇之。无竞维人，四方其训之。不显维德，百辟其刑之。於乎，前王不忘！

Adresado de Reĝo Cheng ĉe surtroniĝo

Okaze de sia surtroniĝa ceremonio, Reĝo Cheng adresis ĉi vortojn al la ĉeestantoj.

Ho, lordoj vere brilaj kaj bonvirtaj,
vin benas la prareĝoj per favoro.
Iliaj benoj estas ja senlimaj,
sin banos niaj idoj en la gloro.
Ne kulpu multe kontraŭ via regno,
la reĝ' vin rekompencos per honoro.

Meritojn grandajn de l' prareĝoj
heredu, pliigu kun peno.
Tre gravas uzi talentulojn,
subigu regnojn ni sen ĝeno.
Per bonaj virtoj regu l' regnon,
kaj strebu sur via posteno.
Ho, ne forgesu la prareĝojn,
do, helpu al mi suvereno.

天作

天作高山，大王荒之。彼作矣，文王康之。彼徂矣，岐有夷之行。子孙保之。

Monto Qi

Kultado al Monto Qi

Alta Mont' Qi impresas impone,
kreis kampojn Reĝo Wen kun peno.
La plebanoj konstruadis domojn
kaj vivadis tie sen ĉagreno.

Tie Reĝo Wen kolektis homojn,
vojoj sin etendis tra l' tereno,
l' idoj loĝas tie ja sen ĝeno.

昊天有成命

昊天有成命，二后受之。成王不敢康，夙夜基命宥密。於緝熙！单厥心，肆其靖之。

Pri Reĝo Cheng

Himno dum kultado al Reĝo Cheng.

Edikto falis el Ĉielo
sur trono sidis du prareĝoj.
Reĝ' Cheng penas kun sinofero
por regi l' regnon en bonordo.
Kia perspektivo de belo!
Klopodas verve li por regno,
la mondo certas sen mizero.

我将

我将我享，维羊维牛，维天其右之。仪式刑文王之典，日靖四方。伊嘏文王，既右飨之。我其夙夜，畏天之威，于时保之。

Kultado de Reĝo Wu

Himno ĉe kultado de Reĝo Wu.

Mi oferu bovon kaj ŝafon
kaj metu ilin sur altaron.
Mi petu benojn de l' Ĉielo
laŭ la prareĝaj leĝoj kun lojalo.
Mi serĉas pacon en la mondo.
Reĝo Wen venu kun deĝn-sento
por ĝui l' oferaĵojn ĝoje.
Mi regos regnon kun atento,
sekvos l' edikton de l' ĉielo,
pacigos l' mondon ja sen pento.

时迈

时迈其邦，昊天其子之，实右序有周。薄言震之，莫不震叠。怀柔百神，及河乔岳，允王维后。

明昭有周，式序在位。载戢干戈，载橐弓矢。我求懿德，肆于时夏，允王保之。

Kultado al la Ĉielo far Reĝo Wu

Himno ĉe la kulta ceremonio al la Ĉielo far Reĝo Wu.

Inspektas Reĝo Wu tra l' regnoj,
lin traktas kiel filo la Ĉielo
kaj benas Regnon Zhou en pompo.
En militir' nia konkero
regnestrojn skuas per paniko.
Ni danke kultas per ofero
al la Ĉielo kaj cent dioj.
Reĝ' Wu estas bona modelo!

Regno Zhou radias per gloro,
la lordoj saĝas kun fidelo.
Kaŝiĝas sagoj de rankoro,
pafarkoj malstreĉiĝas vere,
por vizito al talentaj sinjoroj.
Reĝ' Wu certe pacigos mondon
per bonkoreco kaj favoro.

执竞

执竞武王，无竞维烈。不显成康，上帝是皇。自彼成康，奄有四方，斤斤其明。
钟鼓喤喤，磬筦将将，降福穰穰。降福简简，威仪反反。既醉既饱，福禄来反。

Prilaŭdo al Reĝoj Cheng kaj Kang

Himno pri meritoj de Reĝoj Cheng kaj Kang.

Reĝo Wu konkeris la perfortaĵojn,
li faris la meritojn sen komparo.
Reĝoj Cheng kaj Kang ja rikoltas
laŭdegojn de l' Ĉielo sen avaro.
Reĝoj Cheng kaj Kang firme regas mondon
unuigitan kun radia gloro.
Kia regado saĝa sin prezentas!
Tamburoj sonas verve kun fervoro,
muziko de flutado ŝvebas flirte,
vin la Ĉielo ŝutas per cent benoj.
Feliĉoj viaj multas kiel maro,
okazas ritoj, kultoj en soleno.
Post manĝado kaj drinkad' la spiritoj
nin plue multe benas kun ĝojpleno.

思文

思文后稷，克配彼天。
立我烝民，莫匪尔极。
貽我来牟，帝命率育。
无此疆尔界，陈常于时夏。

Kultado al prapatro Hou Ji

Himno al prapatro Hou Ji, kiu enkondukis kultivadon de grenplantoj.

Ho, nia Lordo de grenplantoj,
vi nin favoras sur ĉielo.
Vi amas nin plebanojn vere,
ni ĝuas gracon en libero.
Vi tritiksemojn donis al ni,
vi nutras ĉiujn kun sincero.
Vi ne difinis plu la limojn,
kunvivas ĉiuj tra la tero.

臣工

嗟嗟臣工，敬尔在公。王厘尔成，来咨来茹。嗟嗟保介，维莫之春，亦又何求？如何新畲？
於皇来牟，将受厥明。明昭上帝，迄用康年。命我众人：庀乃钱镛，奄观铎艾。

Preta por kamplaboro

Dum kultado en templo, Reĝo Cheng admonis al oficialuloj kaj kampuloj sin prepari por kamplaboro.

Ho, aŭskultu, miaj korteganoj,
penu por oficlaboron fari.
Vi kultiv-leĝojn por kamparanoj
konu kaj komprenu kun zorgemo.
Ho, oficistoj pri kamplaboro,
vin pretigu ĉe printemp' malfrua.
Kion vi postulas en ĉi horo?
Kiel zorgi pri l' plugad' de kampoj?
Tritikplantoj kreskas en prospero,
riĉrikolto estas en proksimo.
Ho, la granda Dio sur ĉielo,
nin favoru per abunda jaro.
Vi kampuloj faru laŭ ordono,
per kamplaboriloj pretigitaj,
por venonta rikolta sezono.

噫嘻

噫嘻成王，既昭假尔。
率时农夫，播厥百谷。
骏发尔私，终三十里。
亦服尔耕，十千维耦。

Preĝo de Reĝo Kang

Dum kultado ĉe komenco de kamplaboro Reĝo Kang preĝe faris admonon al kampuloj.

Mi pie preĝas al Reĝo Cheng supre,
sincero mia flugas al ĉielo.
Mi gvidu la kampulojn iri kampen
por tritikon semi sur nia sfero.
Ni nun elhaku pli da kampoj novajn,
kaj priplantu tridek liojn da tero.
Ni ĉiuj klopodadu en la kampoj,
atendas riĉrikolton kun prefero.

振鹭

振鹭于飞，于彼西雍。我客戾止，亦有斯容。在彼无恶，在此无斁。庶几夙夜，以永终誉。

Al gasto ĉe kultado

Himno kantata al la gasto, kiu asistis kultadon.

Vicoj da ardeoj flugas alte,
super marĉo en la okcidento.
Venas al ni honorinda gasto,
kiu bonkonduktas sen pretendo.
Ne regnantoj pri li plendas mave,
li traktatas kiel gast' honora.
Mi deziras, ke vi agu pene
por la regno kun renomo glora.

丰年

丰年多黍多稌，亦有高廩，万亿及秭。为酒为醴，烝畀祖妣。以洽百礼，降福孔皆。

Riĉa rikolto

Himno kantata dum kultado por festi la riĉan rikolton.

Multas rizo kaj mili' ĉijare,
altaj grentenejoj plenas plene,

granda kvanto amasiĝas mare.
Oni elfaras el ili vinon
por oferi al gepatroj kare.
Ni plenumu ĉiujn decajn ritojn
por ricevi benojn joviale.

有瞽

有瞽有瞽，在周之庭。设业设虞，崇牙树羽。应田县鼓，鞀磬柷圉。既备乃奏，箫管备举。喤喤厥声，肃雍和鸣，先祖是听。我客戾止，永观厥成。

Blindaj muzikistoj

Himno pri templa muziko.

Ho, blindaj muzikistoj, venu,
tuj venu al la templa korto.
Jam pretas la tamburaj bretoj
kaj plum-garnitaj en bonordo.
Tamburoj etaj, egaj pendas,
kaj ŝton-soniloj vice staras.
La muzikiloj ekas ludi,
muziko ŝvebe jen spiralas,
kaj ĝi ĉirkaŭflugas tre lante
de loko al loko kun folo.
Prapatroj kaj spiritoj satĝuas,
la gastoj venas kun favoro
muzikon aŭdi en ĉi horo.

潜

猗与漆沮，潜有多鱼。有鳣有鲔，鰋鰌鰪鲤。以享以祀，以介景福。

Oferado per fiŝoj

Himno pri oferto al prapatroj per fiŝoj.

Kvietas riveroj Ju kaj Qi,
jen ĝoje naĝas fiŝoj ene:
la flavaj fiŝoj kaj karasoj,
navedas karpoj jen senĝene.
Oferas ilin ni en kulto
por ĝui vivon feliĉplene.

雍

有来雍雍，至止肃肃。相维辟公，天子穆穆。於荐广牡，相予肆祀。假哉皇考！绥予孝子。

宣哲维人，文武维后。燕及皇天，克昌厥后。绥我眉寿，介以繁祉，既右烈考，亦右文母。

Kultado al Reĝo Wen

Himno ĉantata en kultado al Reĝo Wen far Reĝo Wu.

Ni venas kulti kun aplombo,
en templ' ni staras en soleno.
Feŭdestroj, princoj ambaŭflankas,
gravmienas la suvereno.
Mi jen prezentas bovon grasan,
aranĝas kulton en ĝardeno.
La reĝo-patro saĝa, granda
min feliĉigu ja per beno.

Vin ni adoras respektplene,
vi spertis en milit' kaj paco.
Deziru al la regn' prosperon,
nin homojn benu jen per graco.
Min benu per la longviveco,
riĉecon donu al palaco.
Descendu, paĉj' kaj panjo karaj,
por satĝui en nia spaco.

载见

载见辟王，曰求厥章。龙旂阳阳，和铃央央。𦘔革有𦘔，休有烈光。率见昭考，以孝以享。以介眉寿，永言保之，思皇多祐。烈文辟公，绥以多福，俾缉熙于纯嘏。

Kultado ĉe surtroniĝo

Reĝo Cheng, ĉe surtroniĝo, kultis Reĝon Wu.

Unuafoje l' lordoj vidas Reĝon,
la reglamenton ili de li petas.
Drak-flagoj flirtas brile en ventpelo,
tintiloj sur la ĉaroj sonojn ĵetas.
La oraj bridoj brilas en lukseco,
kaj ornamaĵoj glimas en sunlumo.
Li gvidas ilin al la tomb' de Reĝ' Wu,
oferi manĝaĵojn en incensfumo,
preĝante por longlonga homa vivo,
kaj por ĉiamaj sano kaj bonfarto.
Ĉielo benu nin per mil feliĉoj,
kaj per sekura viv' sub ĝia gardo.
Spiritoj donu al ni ja favorojn,

kaj donu al mi multajn brilajn horojn.

有客

有客有客，亦白其马。有萋有且，敦琢其旅。有客宿宿，有客信信。
言授之縶，以縶其马。薄言追之，左右绥之。既有淫威，降福孔夷。

Gasto ĉe kultado

Himno ĉantata por reteni gastojn.

Rajdante sur ĉevalo blanka,
vizitas min gasto el foro.
Lin sekvas trupo da subuloj,
lin ĉiuj traktas kun adoro.
Li loĝas jam du tagojn ĉe ni,
ni lin retenas kun bonkoro.

Pli bone ŝnurligi l' ĉevalon
kaj ĝin haltigi por reteno.
Mi lin regalas ĉe disiĝo,
ni lin eskortas por reveno.
La gasto jam traktitas bone,
surŝutu nin per granda beno.

武

於皇武王！无竞维烈。允文文王，克开厥后。嗣武受之，胜殷遏刘，耆定尔功。

Laŭdo al Reĝo Wu

Himno laŭdanta Reĝon Wu pro ties merito de konkerado super Shang-dinastio.

Ho, granda, senrivala Reĝ' Wu
elstaras ja meritoplene.
Reĝo Wen por lia filo Wu
elhakis vastan teron pene.
Reĝ' Wu laŭ volo de l' Ĉielo
konkeris Shang-n per fortopremo.
Li famas kiel suvereno.

闵予小子

闵予小子，遭家不造，嬛嬛在疚。於乎皇考，永世克孝。念兹皇祖，陟降庭止。维予小子，
夙夜敬止。於乎皇王，继序思不忘。

Elegio pri Reĝo Wu

Elegio ĉantata de Reĝo Cheng, la filo de Reĝo Wu, ĉe sia surtroniĝo.

Ve, mi ankoraŭ estas juna tro por
elteni morton de la patro kara!
Mi solas sendepende senkonsola,
nun laŭdas mi pri l' patro senegala,
li sindonemis dum la tuta vivo.
Reĝo Wen, mia avo, senkompara,
jen justis en regado de la ŝtato.
Nun sidas mi sur trono la firmstara,
mi devas peni kun klopodo granda.
Trankvilu, la prareĝoj karmemoraj,
mi regu l' regnon ja kun kor' lojala.

访落

访予落止，率时昭考。於乎悠哉，朕未有艾。将予就之，继犹判涣。维予小子，未堪家多难。
绍庭上下，陟降厥家。休矣皇考，以保明其身。

Surtroniĝo de Reĝo Cheng

Adresado al la korteganoj far Reĝo Cheng ĉe surtroniĝo.

Ĉe surtroniĝo petas mi konsilojn,
kiel mi sekvu l' patron kun fidelo.
Li spertis en regado de la ŝtato,
sed mi tro juna sen favora stelo.
Min helpu fari laŭ liaj reguloj
por fari lian aferon herede.
Nun mi tute senspertas kaj tro junas
por porti l' pezan regnan ŝarĝon prete.
Mi paŝu laŭ la spur' de mia patro
kaj bonordigu homojn en palaco.
Reĝo Wu, mia karmemora patro,
min benu longe vivi ja en paco.

敬之

敬之敬之，天维显思，命不易哉。无曰高高在上，陟降厥士，日监在兹。维予小子，不聪敬止。日就月将，学有缉熙于光明。佛时仔肩，示我显德行。

Averto al si mem

Reĝo Cheng faris averton al si mem, kiam li surtroniĝis.

Estu mi gardema kaj diskreta.
La Ĉiel' la fakton pruvas klare.
Malfacilas regi l' regnon bone.
Dio faras juĝon senerare,
ĝi superrigardas nian landon,
devu agi mi laŭ l' Dia volo.
Kiel reĝo junas mi sen spertoj,
mi ne devu ludi kun frivolo.
Ofte mi lernadu asidue,
kaj laŭgrade iru al kompreno.
Korteganoj min asistas pene,
mi min montru virta sen ĉagreno.

小毖

予其懲，而毖后患。莫予荇蜂，自求辛螫。肇允彼桃虫，拚飞维鸟。未堪家多难，予又集于蓼。

Memkritiko

Reĝo Cheng kritikis sin mem por gardi sin kontraŭ eventualaj misoj.

Mi devas gardi min kontraŭ eraroj
por ne fari misojn en la futuro.
La vespo havas dornon de veneno,
kial mi serĉus pikon de fajrbrulo?
La birdido ankaŭ povos altflugi
al ĉielo per sving' de flugilparo.
Mia regno jam dronas en mizero,
tristas mi nun profunde en amaro.

载芟

载芟载柞，其耕泽泽。千耦其耘，徂隰徂畛。侯主侯伯，侯亚侯旅，侯彊侯以。有嘏其馐，思媚其妇，有依其士。有略其耜，俶载南亩，播厥百谷。实函斯活，驿驿其达。有厌其杰，厌厌其苗，绵绵其麋。载获济济，有实其积，万亿及秭。为酒为醴，烝畀祖妣，以洽百礼。有飴其香。邦家之光。有椒其馨，胡考之宁。匪且有且，匪今斯今，振古如兹。

Kulturado

Himno pri kulturado de tero.

Jen miloj kaj miloj da kampuloj
jen forigas herbojn kaj arbetojn,
plugas kaj malkompaktigas teron,
sarkas pure veprojn, fi-vegetojn.

Mastro jen kunportas siajn filojn,
 ĉiuj, junaj kaj maljunaj, kune
 kamplaboras kun dungitoj pene.
 Tagmeze ili manĝas subsune,
 inoj belaspektas sur la kampoj,
 viroj junaj viglas kun fortpleno.
 Per brilanta la plugilo ili
 plugas grundon sur suda tereno.
 Ili ŝutas semojn sur la kampojn,
 semoj tuj eligas vivon vere,
 junaj ŝoso aperas senĉese.
 Longaj plantotigoj kreskas bele,
 grenplantidoj staras en bonordo.
 Spikoj de rizplantoj grandas grase,
 riĉrikolto venos en proksimo.
 Gren' surloka montas ja amase
 en milmil mezuroj jen en kvanto.
 Oni vinon per ili elfaras
 por oferi al gepatroj karaj
 kaj ĉe ĉiuj ritoj ne ĝin ŝparas.
 la aromo de la vino ŝvebas
 super la prospera regna sfero.
 Al olduloj donatas la vino,
 ili ĝuas vivon kun fiero.
 Ni rikoltas grenon diversloke,
 la ĝojiga sceno daŭras certe
 de l' prapatroj, ne nur novepoke.

良耜

矍矍良耜，俶載南亩。播厥百谷，实函斯活。或来瞻女，载筐及莛，其饌伊黍。其笠伊纠，
 其鍤斯赵，以薅荼蓼。荼蓼朽止，黍稷茂止。获之挈挈，积之栗栗。其崇如墉，其比如栉。
 以开百室，百室盈止，妇子宁止。杀时稊牡，有捄其角。以似以续，续古之人。

Kamplaboroj

Himno priskribanta la tutjarajn kamplaborojn kaj kultadon post rikolto.

Per brilanta, akra la plugilo
 ni plugas teron sur suda parto.
 Ŝutas ni diversajn semojn grenajn,
 ili tuj ekkreskas ja sen halto.
 Niaj homoj venas al la kampoj
 portante manĝaĵojn de milio
 en rondformaj korboj el bambuo

por satigi nin kun ventra krio.
 Kun pajloĉapeloj sur la kapo,
 falĉas herbojn ŝvite ni kun peno,
 el la kampoj pretaj por kultivo.
 Putraj herboj bonas por la greno,
 en la kampoj densas la plantaĵoj.
 Svingas ni falĉilon kun fervoro,
 greno rikoltita alte montas,
 kiel muro de blanka koloro.
 La pajlstakoj staras en linioj,
 grentenejoj mil kaj mil plenplenas,
 inoj kaj infanoj ekripozas.
 Por kultad' ni buĉi bovon venas,
 bovaj kornoj alte kurbaj belas,
 laŭ la tradicio de prauloj
 al malnovaj moroj ni fidelas.

丝衣

丝衣其紃，载弁俅俅。自堂徂基，自羊徂牛，鼐鼎及鼐，兕觥其觶。旨酒思柔。不吴不敖，
 胡考之休。

Inspekto al festeno post kultado

Reĝo Cheng inspektis la festenon post kultado.

En silka vesto de blanka koloro
 kaj felta ĉapo kun solen-mieno,
 kultantoj iras laŭ templ-koridoro,
 observas oferaĵojn bovan, ŝafan,
 tripiedajn ujojn por alkoholo,
 la kurbajn kornojn de la rinocero
 por teni vinon de dolĉa likvoro.
 Aŭdiĝas nek ĝojkrio nek voĉbruo,
 ni ĝuas benojn laŭ ĉiela volo.

酌

於铎王师，遵养时晦。
 时纯熙矣，是用大介。
 我龙受之，躋躋王之造。
 载用有嗣，实维尔公允师。

La reĝo lerta en milito

Himno far Reĝo Cheng laŭdanta Reĝon Wu, kiu lertis en milito kaj konkeris Shang.

L' armeo reĝa kun potenco
renversis Shang ja per konkero.
La mond' sin banas en sunlumo,
la pleb' benitas de l' Ĉielo.
laŭ providenco mi sukcedas
Reĝon Wu jen kun sinofero.
Posteuloj niaj memoru:
li 'stas nia bona modelo.

桓

绥万邦，娄丰年。天命匪解，桓桓武王。保有厥土，于以四方，克定厥家。於昭于天，皇以间之。

La brava Reĝo Wu

Himno ĉantata dum kultado de Reĝo Cheng al Reĝo Wu.

Ĉiuj regnoj trovas sin en paco,
sub la favoro de la Ĉielo,
havas riĉajn jarojn ni senĉese.
Kiel la bravulo sur la tero,
Reĝo Wu ja havas vastan regnon.
Li kaptadis regnojn per konkero
por defendi sian regnon brave.
Jen sur la ĉielo lia gloro brilas,
la plebo de la lando trankvilas.

赉

文王既勤止，我应受之。敷时绎思，我徂维求定。时周之命，於绎思。

La sagaca Reĝo Wen

Himno far Reĝo Wu al Reĝo Wen.

Reĝ' Wen regis l' regnon kun peno,
mi lin imitas sen devio.
Mi tenas lin en la memoro
kaj bravas kontraŭ la defio.
Daŭrigas mi prareĝajn pensojn,
plenumas ilin kun racio.

般

於皇時周！陟其高山，墮山喬岳，允猶翕河。敷天之下，裒時之對。時周之命。

Kultado dum ĉasado

Himno ĉantata al Reĝo Wu, kiam Reĝo Cheng ĉasis.

Kiel imponas de Zhou-regn' la tero!

Mi grimpas sur la monton kaj rigardas,

montriĝas holmoj ondantaj en belo,

mil rojoj kune fluas en riveron.

Spiritoj ĝuu kulton en ĉi sfero

kaj benu nin favore kun plezuro,

ĉiamas nia regno en prospero.

鲁颂

Himnoj de Lu

駟

駟駟牡马，在坰之野。薄言駟者，有驕有皇，有骊有黄，以车彭彭。思无疆，思马斯臧。
駟駟牡马，在坰之野。薄言駟者，有骝有駉，有骍有骥，以车伾伾。思无期，思马斯才。
駟駟牡马，在坰之野。薄言駟者，有驪有骆，有骝有雒，以车绎绎。思无斁，思马斯作。
駟駟牡马，在坰之野。薄言駟者，有骝有馵，有驪有鱼，以车祛祛。思无邪，思马斯徂。

Ĉevaloj

Himno laŭdanta Dukon Xi de Lu, kiu paŝtis ĉevalojn en sovaĝejo, sed ne en kampoj.

Altaj kaj fortikaj la ĉevaloj
paŝtas sin sur sovaĝejo fora.
Kelkaj blankaj, kelkaj flav-koloraj,
kelkaj nigraj, kelkaj noble rufaj.
Ili ja galopas kun fortpleno.
Duko Xi agas kun klarvideco,
li pretigas sin por militveno.

Altaj kaj fortikaj la ĉevaloj
paŝtas sin ĉe la bord' de l' rivero.
Kian koloron ĉevaloj havas?
Kelkaj nigraj, ruĝa de malhelo,
kelkaj brunaj, kelkaj noble flavaj.
Ili tiras ĉarojn kun plenforto.
Duko Xi pensas kun klarvideco,
li sin pretigas kontraŭ norda hordo.

Altaj kaj fortikaj la ĉevaloj
paŝtas sin ĉe rand' de monto alta.
Kian koloron ĉevaloj havas?
kelkaj blankaj, kelkaj helsmeraldaj,
kelkaj grizaj, kelkaj makulplenaj.
Ili tiras ĉarojn kun fervoro.
Duko Xi havas klaran vidkampon,
li preparas sin jen sen langvoro.

Altaj kaj fortikaj la ĉevaloj
paŝtas sin sur la herbej' ebena.
Kian koloron ĉevaloj havas?
Kelkaj rufaj, kelkaj pal-rubenaj,
kelkaj ruĝaj, kelkaj hele grizaj.
Ili trotras kun paŝa leĝero.
Duko Xi havas menson klarvidan,

li preparas sin jen por konkero.

有駉

有駉有駉，駉彼乘黄。夙夜在公，在公明明。振振鹭，鹭于下。鼓咽咽，醉言舞。于胥乐兮！
有駉有駉，駉彼乘牡。夙夜在公，在公饮酒。振振鹭，鹭于飞。鼓咽咽，醉言归。于胥乐兮！
有駉有駉，駉彼乘駟。夙夜在公，在公载燕。自今以始，岁其有。君子有穀，诒孙子。于胥乐兮！

La festeno al siaj oficialuloj

Duko Xi de Lu festenis kune kun siaj oficialuloj.

Altaj kaj fortikaj kvar ĉevaloj
tiras ĉaron en galopa kuro.
Oficistoj restas en palaco
sen ripozeto kaj sen plezuro.
Aro da ardeoj flugas alte
jen sor jen sob vere kun leĝero.
Tambursonoj jen aŭdiĝas klare,
ili dancas en ebri-ŝancelo.
Ili ludas ĝoje sen modero.

Altaj kaj fortikaj kvar ĉevaloj
kuras ja antaŭen per fortpleno.
Oficistoj okupitas pene,
ili drinkas post labora ĝeno.
Aro da ardeoj flugas alte
kaj flugilojn svingas en libero.
Tambursonoj jen aŭdiĝas klare,
post festeno ili sub vinpelo
hejmeniras lante ĉe vespero.

Altaj kaj fortikaj kvar ĉevaloj
jen galopas vete en akordo.
Oficistoj restas en laboro,
ili drinkas post labora mordo.
De ĉi-jar' ni havas riĉrikoltojn
kaj satĝuas vivon sen mizero.
Duko Xi bonfaras dum regado,
por principoj li 'stas ja modelo,
ili 'stas ekster si de ĝoj-helo.

泮水

思乐泮水，薄采其芹。鲁侯戾止，言观其旂。其旂茝茝，鸾声哖哖。无小无大，从公于迈。
思乐泮水，薄采其藻。鲁侯戾止，其马蹻蹻。其马蹻蹻，其音昭昭。载色载笑，匪怒伊教。
思乐泮水，薄采其茆。鲁侯戾止，在泮饮酒。既饮旨酒，永锡难老。顺彼长道，屈此群丑。
穆穆鲁侯，敬明其德。敬慎威仪，维民之则。允文允武，昭假烈祖。靡有不孝，自求伊祐。
明明鲁侯，克明其德。既作泮宫，淮夷攸服。矫矫虎臣，在泮献馘。淑问如皋陶，在泮献囚。
济济多士，克广德心。桓桓于征，狄彼东南。烝烝皇皇，不吴不扬。不告于訇，在泮献功。
角弓其觶。束矢其搜。戎车孔博。徒御无斁。既克淮夷，孔淑不逆。式固尔犹，淮夷卒获。
翩彼飞鸢，集于泮林。食我桑葚，怀我好音。憬彼淮夷，来献其琛。元龟象齿，大赂南金。

Apudlaga palaco

Himno laŭdanta Dukon Xi de Lu, kiu konstruigis apudlagan palacon kaj konkeris tribojn de Huai.

Apud lago regas ĝoj-etoso,
ni kolektas kresojn kun fervoro.
Duk' Xi tuj alvenos por festado,
jam vidiĝas flagoj en sungloro.
Sur la ĉaroj la tintiloj tintas
kaj flagetoj flirtas en ventpelo.
Oficistoj diversrangaj ĉiuj
sekvas lin akvflue kun prefero.

Apud lago vervas ĝoja sento,
ni kolektas algojn jen kun peno.
Duk' Xi tuj alvenos por festado,
ĉevaloj galopas kun vivpleno.
Kuregas ĉevaloj nun plenforte,
la sekvantoj gajas en apero.
Duko Xi afablas ridmiene,
li neniam bolas de kolero.

Apud lago bruas ĝojaj krioj,
ni kolektas herbojn kun plenforto.
Duko Xi alvenos por festado,
aranĝitas la festen' ĉe l' bordo.
Ĉiuj tason levas kaj deziras:
“Vi longlonge vivu en mil jaroj!
Marŝu brave laŭ ĉi tiu vojo,
vi ja venkos per konkeraj faroj!”

Duko Xi solenas kaj majestas,
regas li la regnon kun tutkoro.
Lia bonkonduto kaj bonvirto

estas la model' por la popolo.
Li tre lertas ankaŭ en milito,
kaj daŭrigas la regadon bone.
Li obeas al prareĝaj leĝoj,
li famiĝas vaste ja surtrone.

Saĝas Duko Xi kun asiduo,
kaj observas leĝojn kun diskreto.
La palac' ĉelaga konstruiĝis,
triboj de Huai vivas en kvieto.
Tigre bravaj oficiroj liaj
prezentas kaptitojn dum festado.
Li kaptitajn malamikojn montras,
kontribuas al la granda ŝtato.

Li elbakas multajn kapablulojn,
lia famo vastas pro bonkoro.
Tri armeoj militiras bati
tribojn eost-sudajn sen langvoro.
La imponaj trupoj en bonordo
pasas en la stratoj jen sen bruo.
Ili bone traktas la kaptitojn
kaj gajnas rangojn pro kontribuo.

Ili streĉas kordojn de pafarkoj
kaj elpafas sagojn kun susuro.
Militĉaroj multas en batalo,
la soldatoj bravas sen mezuro.
Triboj de Huai jam subiĝis vere,
ili ne plu agas kun ribelo.
Batalplano plenumiĝis bone,
triboj submetis sin kun sincero.

Strigo flugas flirte kun leĝero,
kaj ĉe lago nestas en arbaro.
Ĝi formanĝis niajn morusberojn
kantas ĝi por ni per voĉa klaro.
Nun la triboj de Huai jam obeas,
ili ja donacas per tributo:
ne nur ja testudoj kaj eburo,
sed valora oro el la sudo.

閼宫

閼宫有恤，实实枚枚。赫赫姜嫄，其德不回。上帝是依，无灾无害。弥月不迟，是生后稷。降之百福。黍稷重穆，植稚菽麦。奄有下国，俾民稼穡。有稷有黍，有稻有秬。奄有下土，缵禹之绪。

后稷之孙，实维大王。居岐之阳，实始翦商。至于文武，缵大王之绪，致天之届，于牧之野。无贰无虞，上帝临女。敦商之旅，克咸厥功。王曰叔父，建尔元子，俾侯于鲁。大启尔宇，为周室辅。

乃命鲁公，俾侯于东。锡之山川，土田附庸。周公之孙，庄公之子。龙旂承祀。六轡耳耳。春秋匪解，享祀不忒。皇皇后帝！皇祖后稷！享以骍牺，是飧是宜。降福既多，周公皇祖，亦其福女。

秋而载尝，夏而福衡，白牡骍刚。牺尊将将，毛炰醢羹。笱豆大房，万舞洋洋。孝孙有庆。俾尔炽而昌，俾尔寿而臧。保彼东方，鲁邦是尝。不亏不崩，不震不腾。三寿作朋，如冈如陵。

公车千乘，朱英绿縢。二矛重弓。公徒三万，贝冑朱綬。烝徒增增，戎狄是膺，荆舒是惩，则莫我敢承！俾尔昌而炽，俾尔寿而富。黄发台背，寿胥与试。俾尔昌而大，俾尔耆而艾。万有千岁，眉寿无有害。

泰山岩岩，鲁邦所詹。奄有龟蒙，遂荒大东。至于海邦，淮夷来同。莫不率从，鲁侯之功。保有凫绎，遂荒徐宅。至于海邦，淮夷蛮貊。及彼南夷，莫不率从。莫敢不诺，鲁侯是若。天锡公纯嘏，眉寿保鲁。居常与许，复周公之宇。鲁侯燕喜，令妻寿母。宜大夫庶士，邦国是有。既多受祉，黄发儿齿。

徂徕之松，新甫之柏。是断是度，是寻是尺。松栢有暵，路寝孔硕，新庙奕奕。奚斯所作，孔曼且硕，万民是若。

La solena templo

Himno laŭdanta Dukon Xi de Lu pro ties meritoj.

La templ' imponas kaj solenas
sur la malplena vasta tero.
Omaĝas fakte ĝi al Jiang Yuan,
la prapatrino en la vero.
Ŝin benis Dio per feliĉoj,
kaj ŝi gravedis en bonstato.
Post dek monatoj knabo Hou Ji
naskiĝis Grendio de l' ŝtato.
Ĉiel' lin benis per apogo,
li semis kaj poste rikoltis,
tritikojn, fabojn li kulturis.
la kamplaborojn li heroldis
instruis kiel planti grenon:
de sorgoplantoj al milio,
de arom-rizo al tritiko.
La mondo agis laŭ la scio,
la plebo ĝojis pri satigo.

Inter la pranepoj de Hou Ji
troviĝis Reĝ' Dan ambicia.
Kiam li loĝis sude de Qi,
li pensis pri ekspedicio.
Reĝoj Wen kaj Wu plue agis,
sukcesis en konkero fina.
Reĝo Wu Shang-n subigis tute,
fariĝis Shang jam ter' ruina.
"Ne agu trompe nek plaŭplaĉe,
ĉar gvatas nin ja la Ĉielo!
Kolektu l' forton de Shang kune
por regi l' mondon kun fiero."
Reĝo Cheng diris al la onklo:
"Mi nun nomumas jen sen ĝeno
markizo vian aĝan filon
por vastigi teron de l' regno
kaj bari fremdlandan aliron."

Reĝ' Cheng ordonis al Duko Xi,
fondi Lu-regnon en eosto.
La reĝo donis vastan teron
kaj etajn regnojn je nul-kosto.
Kiel nep' de Duko de Zhou,
Duko Xi fari kulton venis.
Kun flagoj sub lia komando
li bridajn ses en mano tenis.
Li kultojn faris laŭ sezonoj
kaj metis oferaĵojn pie
al la Ĉiel' potenca, granda
kaj al prapatro Hou Ji plie.
Oferis li orflavan bovon,
spiritoj ĝuis kun kontento,
lin ili benis per mil bonoj.
Prapatroj ĝojis kun kor-sento,
lin benis per favoraj donoj.

Por kulto al aŭtun-rikolto
bredatas bovoj jam somere.
Blankaj kaj flavaj estas bovoj,
je vino plenas tasoj vere,
bakita porko, sup' vianda
metitas bolve laŭ rutino.
Kaj oni dancas jen manie

por beni idojn per sangvino,
vin feliĉigi sen sufero,
kaj vin vivigi en bonfarto.
Mi volas, ke vi staru firme,
Lu-regnon tenu sub bon-gardo,
la lando neniam disfalu,
la regna sorto iru bone,
vi vivu longe en mil jaroj
kiel staras monto impone.

Mil militĉaroj de Lu pretas,
ĉiu kun du lancoj de ferŝtalo.
pafarkoj, sagoj multas mare,
tridek mil homoj por batalo,
marŝas kun kask' kun ruĝa kvasto.
Potencaj trupoj kun impeto
batas tribojn el nord' kaj sudo,
tretas sud-regnojn per piedo.
Kiu nin povas venki preme?
Mi volas, ke vi pompu plene,
longlonge vivu dum mil jaroj.
Kvankam vi oldas fortosvene,
vi portas ŝarĝon sur la ŝultro.
Mi volas, ke vi 'stu en sano
vivadu ĉiam kun trankvilo,
longecon ĝuu de vivspano,
pasigu tagojn sen senilo.

Imponon altan de Monto Tai
regno Lu laŭdas kun adoro.
Ni havas du montojn Gui kaj Meng,
iras la ter' al eosta foro.
Vasalaj regnoj ĉe l' marbordo
kaj triboj la tributojn faras.
Ne regno aŭdacas ribeli,
Duko Xi ĉiam firme staras.

Regn' Lu okupas montojn Fu, Yi,
tribon Xu ĝi jam regas plene.
tereno ĝia tuŝas maron,
barbaroj ne plu bruas ĝene.
Neniu el vasaloj sudaj
aŭdacas agi en ribelo.
respekton ili montras al Lu

kaj bonkondutas kun fidelo..

Ĉielo benas Dukon multe,
kaj per longa viv' por la regno.
Li kaptas teron de Chang kaj Xu
por Zhou-n starigi sen ĉagreno.
Kaj li festenas kun ministroj,
edzino kaj gepatroj rave.
La palacanoj harmonias,
la regno prosperas bonhave.
Duk' Xi rejuniĝu fortplene,
kaj vivu ĝoje ridmiene.

Surmonte kreskas dikaj pinoj,
cipresoj staras en prospero.
Dehakas ilin oni pene
mezuras ilin sur la sfero.
La pinaj traboj longaj, rektaj,
taŭgas por palaca konstruo
kaj ankaŭ por templa strukturo.
Mi per ĉi poem-kontribuo
prilaŭdon faras al Duko Xi,
aŭskultas ĉiuj kun plezuro.

商頌

Himnoj de Shang

那

猗与那与！置我鞀鼓。
奏鼓简简，衍我烈祖。
汤孙奏假，绥我思成。
鞀鼓渊渊，嘒嘒管声。
既和且平，依我磬声。
於赫汤孙！穆穆厥声。
庸鼓有斲，万舞有奕。
我有嘉客，亦不夷怿。
自古在昔，先民有作。
温恭朝夕，执事有恪，
顾予烝尝，汤孙之将。

Himno pri Reĝo Tang

Tiu ĉi himno dediĉita al Reĝo Tang, kiu sukcese renversis la dinastion Xia kaj fondis la dinastion Shang en 1765 a. K.

Jen kiel splenda kaj impona sceno!
Tamburon ni starigas en la halo.
Ni frapas la tamburon kun sonoro,
kaj amuzas prapatrojn ĉe altaro.
La posteuloj petas de l' spiritoj
la mondon beni per kvieta paco.
Resonas tamburfrapoj en bruego,
klaras fluta muzik' en vasta spaco.
Ario ŝvebas jen en harmonio
kun tintoj de sonorilegoj klare.
Ho, brave! l' posteuloj de Reĝo Tang
satĝuas la muzikon belan stare.
Tintiloj kaj tamburo sonas eĥe,
dancistoj svingas brakojn kun leĝero.
La gastoj jam alvenas por kultado,
ni ĉiuj ekzaltiĝas por ofero.
Laŭ la kutimo de prareĝoj niaj
aranĝas ni kultadon en bonordo.
Teniĝas humile, respektoplene
ni por kultadi pie en la korto.
Dum vintra kaj aŭtuna kultoj venu
spiritoj ĝui vinon kun komforto.

烈祖

嗟嗟烈祖！有秩斯祜。
申锡无疆，及尔斯所。
既载清酤，赉我思成。
亦有和羹，既戒既平。
鬯假无言，时靡有争。
绥我眉寿，黄耇无疆。
约軹错衡，八鸾鸛鸛。
以假以享，我受命溥将。
自天降康，丰年穰穰。
来假来飧，降福无疆。
顾予烝尝，汤孙之将。

Al prapatroj

Himno dediĉita al prapatroj dum kultado

Ho, prapatroj gloraj niaj,
benu nin jen per feliĉo
multa kiel eble pleje
por la tuta regna riĉo.
Klara vino estas por vi,
donu pacon al la lando.
Kaj la supo kun bongusto
oferiĝas al vi bando.
Ni silente preĝu al vi
sen voĉbruo kaj sen krio.
Ho, nin benu vivi longe
per feliĉ' kaj harmonio.
Iras ĉaroj kun ornamoj,
tintas sonoriloj bele.
Ni oferon faras al vi,
ke la lando grandas ŝvele.
Donu al ni pacan vivon,
riĉrikolton de la greno.
Vi descendu por satĝuo,
donu bonojn jen en ĉeno.
En kultadoj ni preĝadas,
ni ja vivas sen ĉagreno.

玄鸟

天命玄鸟，降而生商，宅殷土芒芒。古帝命武汤，正域彼四方。
方命厥后，奄有九有。商之先后，受命不殆，在武丁孙子。武丁孙子，武王靡不胜。

龙旂十乘，大糒是承。邦畿千里，维民所止，肇域彼四海。
四海来假，来假祁祁。景员维河。殷受命咸宜，百禄是何。

La dia hirundo

La himno estis ĉantata en la prapatra templo de Shang. Laŭdire la prapatro naskiĝis, kiam lia patrino sin banis sub la libera ĉielo kaj glutis ovon demetitan de hirundo. Poste Reĝo Tang fondis la dinastion Shang. La himno estis dediĉita al Reĝo Wu Ding (1328-1263 a.K.) .

Hirundon sendas la Ĉielo
al ŝi naskigi la prapatron.
Sterniĝas vaste nia tero,
Ĉiel' ordonis al Reĝo Tang
ekregi l' mondon kun fidelo,
kaj ordonis al ĉiuj lordoj
domini naŭ sferojn tutkore.
Patronita de la Ĉiel' la
prareĝo regis bonhumore.
Reĝo Wu Ding, la nepo de Tang,
sagacis ja kun kompetento,
Tang-n li sukcedis por reĝkrono.
De ĉaroj kun drakflagoj reĝaj
portas aĵojn laŭ kult-bezono.
La tero vastas por loĝado,
la plebo vivas kun trankvilo.
Amas' kaj sudaj triboj volas
veni por vivo en stabilo,
hasteme unuj post aliaj
laŭ l' bordo de l' Flava Rivero.
tre laŭdas la regadon bonan
dank' al bonoj de la Ĉielo.

长发

濬哲维商，长发其祥。洪水芒芒，禹敷下土方。外大国是疆，幅陨既长。有娥方将，帝立子生商。

玄王桓拨，受小国是达，受大国是达。率履不越，遂视既发。相土烈烈。海外有截。
帝命不违，至于汤齐。汤降不迟，圣敬日跻。昭假迟迟，上帝是祗，帝命式于九围。
受小球大球，为下国缀旒，何天之休。不竞不絀，不刚不柔。敷政优优，百禄是遒。
受小共大共，为下国骏庞。何天之龙，敷奏其勇。不震不动，不戢不竦，百禄是总。
武王载旆，有虔秉钺。如火烈烈，则莫我敢曷。苞有三蘖，莫遂莫达。九有有截，韦顾既伐，昆吾夏桀。

昔在中叶，有震且业。允也天子，降予卿士。实维阿衡，实左右商王。

Leviĝo de Shang

La himno ĉantata dum kultado al Reĝo Wu Ding.

La reĝo de Shang saĝas kun prudento
sub patronado ĉiam de l' Ĉielo.
Diluvon la praan en antikveco
lordon Yu li helpis bari al tero.
Vastigis li l' teritorion pene,
la spac' fariĝis larĝa sen mezuro.
Tribo Rong ege pligrandiĝis kaj Yu
generis la kronprincon kun plezuro.

La princo Qi eksidis sur la trono,
aneksis ne nur etajn regnojn saĝe
sed ankaŭ grandajn ŝtatojn per potenco.
li faris ĉion por la regn' kuraĝe,
inspektis tiujn regnojn kun ĝentilo.
Xiang Tu do sukcedis lin kaj severe
regi super vasalaj regnoj etaj,
neniu kontraŭstaris malfidele.
Al Reĝ' Cheng iris la potenco poste,
li bonkonduktis kun konsideremo,
liaj virtoj montras sin okulfrapaj,
li preĝis al Ĉiel' kun piec-pleno.
La Dio lin patronis per favoro,
naŭ sferojn li regadis jam sen ĝeno.

Observis lin ĉielajn leĝojn bone,
starigis li modelon por la mondo.
Ĉielo ame benis lin patrone,
li ne tiranis nek malpacienis,
li ĉiam agas takte tre bontone.
Regado lia estis tolerema,
feliĉoj meme venis senpropone.

Akceptis li vasalojn kun prefero,
la regnoj sidis sub egido lia.
Dank' al favora zorgo de l' Ĉielo
li montris sian bravon kaj genion.
Lin skuis nek paniko nek ŝancelo,
li sentis nek timegon nek konfuzon,
ĉe li feliĉoj multas en prospero.

Post plena konkerado de Xia, sceptron
li tenis en la mano kun majesto.
Kiel ardanta fajro li alvenis
ne malamikoj voĉis kun kontesto.
Bambuoj povas eligi tri ŝosojn,
ne liciis por ĝi kreski en prospero.
Se la naŭ sferoj iros al Shang-regno,
ekstermu rivalojn sur Wei-Gu-tero,
kaj forigu Kun Wu, Xia per konkero.

Kiam Reĝo Tang regis sur la regno,
la land' potencis super fremdaj ŝtatoj.
Reĝo Tang, patronata de l' Ĉielo,
lin helpis la ministroj kvazaŭ fratoj.
Asistas Ĉefministro A Heng pene
la reĝon jen per sinceraj persvadoj.

殷武

挾彼殷武，奮伐荆楚。深入其阻，哀荆之旅。有截其所，湯孫之緒。
維女荆楚，居國南鄉。昔有成湯，自彼氐羌，莫敢不來享，莫敢不來王。曰商是常。
天命多辟，設都于禹之績。歲事來辟，勿予禍適，稼穡匪解。
天命降監，下民有嚴。不僭不濫，不敢怠遑。命于下國，封建厥福。
商邑翼翼，四方之極。赫赫厥聲，濯濯厥靈。壽考且寧，以保我后生。
陟彼景山，松柏丸丸。是斷是遷，方斫是虔。松栢有梲，旅楹有閑，寢成孔安。

Venko super tribo Chu

La himno celebranta la venkon super tribo Chu far Reĝo Wu Ding.

L' armeo de Yin kun kuraĝo
jen militiras sur Chu-tero,
penetras profunden sukcese
kaj venkas fine per konkero.
Venko post venko akiritas,
la trupoj gloras kun fiero.

La reĝ' ordonis al tribo Chu:
“Vi staras sude de ni vere.
Dum la regperiodo de Tang,
eĉ triboj de Qiang malfidele
aŭdacis ne tributi al ni,
nek omaĝi al ni fiere,
do vi obeu jen prefere.”

Ordono venis el la Ĉielo:
ĉefurbojn fondi en Yu-sfero,
tributi jare kun prefero;
ne punu ni administrantojn,
prizorgu grenon sur la tero.

Ĉielo gvatas mondon suban,
konduitu l' plebo ja sincere.
Ne agu ekster decreguloj,
nek lasu kampojn vakaj vere.
La reĝ' postulas al vasaloj
feliĉojn krei jen prospere.

Ĉefurbo nia pompas ege,
ĝi estas modelo kun brilo.
La reĝo famas tra la mondo,
lin trafas jen varma jubilo.
Li ĉiam ĝuu bonan sanon,
la idoj vivu kun trankvilo.

Sur alta monto en prospero
cipresoj kreskas ja impone.
Ni dehakas ilin al tero,
preparas ilin por lignpecoj.
Kun longaj traboj jen de belo
kaj dikaj lign-kolonoj pinaj,
la templo splendas kun glorŝvelo!